# Heleco

Presorgano de Astura Esperanto Asocio

Organo de Asociación Asturiana de Esperanto

Numero 98 Junio - 2022

# KORUPTO EN HISPANIO

## UNUA PARTO



# Heleco

Presorgano de Astura Esperanto Asocio

Organo de Asociación Asturiana de Esperanto

Numero 98 Junio - 2022



**Astura Esperanta-Asocio**

Sidejo: Universitata Kampuso de Vieskes
GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)

Interret-paĝo: http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/

Retadresoj: easturias@telecable.es
mailto:esperanto@uica.info


**Astura Esperanta Asocio** estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la **Internacia Lingvo** unuavice en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, leŭeble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de **Esperanto**.

**Enhavo** | **Paĝo**


**80-a Hispana Esperanto-Kongreso** 3-8

**Korupto en Hispanio** 9-12

- **Antaŭ la 19-a jarcento** 13-39
- **La regado de *Godoy*** 40-52
- **Senĉesa koruptado sur konstanta kriza fono** 53-92
- **Koruptado dum la frua frankismo** 93-121
- **Koruptado dum la tarda frankismo** 122-149
- **Akcidenta transiro al Demokratio** 150-176
- **Legante pri la korupto en Hispanio** 177-184

**pripensoj…** 185-189

**iometa amuzado pri la koruptado** 190-200


La enhavo de la tekstoj de ĉi-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de **Astura Esperanta Asocio**: pri ili respondecas la verkintoj mem.


Leĝa Registro 0/319/85





Finfine, post du jaroj, denove estis en nia lando Kongreso de Esperanto, kies partoprenantoj povis renkontiĝi persone, vizaĝ-al-vizaĝe, kvankam ankoraŭ uzante duonmaskon en la fermitaj lokoj ĉar la kronviruso ankoraŭ ne tute malaperis.




La evento okazis en la kantabra urbeto ***Comillas***, de la 29-a de aprilo ĝis la 3-a de majo, kaj la ĉeestantaro estis sufiĉe multenombra konsiderante la cirkonstancojn kiuj ne incitas vojaĝi. ***Comillas*** estas apudmara alloga urbeto kun arkitekturaj vidindaĵoj kaj belan naturan ĉirkaŭaĵon.


La kongresa programo kaj ties realigo estis interesaj de lingva, kultura kaj arta vidpunkto, kaj estis ankaŭ distraj programeroj: ekskursoj, amuzaj spektakloj... Plej agrable estis tio ke la gesamideanoj povis, post longa tempo, renkontiĝi, intersaluti kaj interbabili esperante. Tiorilate, la programeroj de la unua kongresa tago konstituis daŭran interkonan vesperon. Unue estis ekskurso al la kaverno ***El Soplao***, en la montĉeno ***Arnero***; temas pri iama minejo kun ampleksaj koridoroj plenaj je stalagmitoj kaj stalagtitoj. La traveturado mem al tiu loko, tra bel-pejzaĝa itinero, konstituis ĝuon por la ekskursantoj.














Kaj la vespero kulminis, en tre agrabla etoso, per Frata Komuna Vespermanĝo en la kongresejo; la kongresanoj estis alportinte tipajn manĝaĵojn el siaj respektivaj regionoj.

Inter la kongresaj programeroj elstaras, kompreneble, la prelegoj. Ties enhavo kutime estas diversa; ne ĉiuj temoj rilatas al Esperanto, aŭ prilingvaj aferoj. En ***Comillas*** ni havis okazon ĉeesti, kiel unua prelego, iun pri historia afero. Estis tiu de ***Lorenzo Noguero*** kiu temis pri la unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo, inter 1519 kaj 1522, far Magelano kaj Elkano. De esperantista vidpunkto, kaj de tiuj kiuj ŝatas la historiajn temojn, estas interese scii ke pri tiu temo ekzistas iu libro, en Esperanto, de la ĉeĥa ***František Omelka***. Cetere, dank´ al tiu atentigo de la prelegganto, ni povis poste, per esploro tra Interreto, ekscii ke inter la ampleksa verkaro de tiu ĉeĥa aŭtoro ekzistas kelke da materialo en Esperanto.

Alia notinda prelego, ĉi-foje pri temo en rilato kun Esperanto, estis tiu de ***Vicente Manzano-Arrondo***. Li atentigas pri la fakto ke nia Internacia Lingvo, eĉ se ĝi estas multe pli regula ol ĉiu ajn idiomo en la mondo, tamen ĝi ne estas tiom regula kiom asertas la propagando kiun ni kutime faras. Li montris abundajn ekzemplojn kiuj ilustras pri tiu realaĵo. Ekzemploj kiaj la vortoj: *psikologo*, *teologo*… kiuj ne sekvas la regulon esprimi la profesion kaj oficon per la sufikso ***ist***.

La sama ***Vicente Manzano-Arrondo*** havis en ĉi kongreso alian prelegon kies temo sufiĉe rilatas al lia profesio de profesoro pri esplorado de la homa konduto. Konkrete, la prelego temis pri la malfacileco fari demandarojn kiuj kapablus atingi la celon kiun oni deziras el ili.

Aliaj prelegoj, kiuj altiris pli malpli da intereso de la kongresanoj, laŭ ĉi ties personaj preferoj estis, inter alie, tiu de ***José Antonio del Barrio***: «El Kantabrio ĝis Kanado: veturiloj de "feroca" esperantisto», tiu de ***Niko Voloshyn***: «Karikaturo kiel efika ilo en periodaĵoj, aparte en Esperanto», tiu de ***Miguel Gutiérrez Adúriz***: «Belartaj Konkursoj de UEA»…



Pri ĉi lasta prelego menciindas ke kadre de ĝi oni projekciis belan videon. Temis pri iu himno, titolita «Norda vento», kiu estas neoficiala de la Kantabria subŝtato, verko de ***Fernando Agüeros***. La esperanta versio estas traduko de ***Miguel G. Adúriz*** mem; la muzikon verkis la hungara esperantisto ***Feri Floro***, kiu kantas ĝin. Tiun videon videblas en Interreto en la adreso:

https://www.youtube.com/watch?v=Js6CFfPmcrs




En la reto estas troveblaj aliaj videoj de materialoj de ĉi tiu 80-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiel ni vidos.




***Ana Manero*** prelegis en la Kongresa Inaŭguro pri: «Projekto Lorca», kaj poste ankaŭ pri kantabraj poetoj, kaj kadre de tiu prelego oni projekciis la videon kiun oni povas vidi per tra la ret-adreso:

https://www.youtube.com/watch?v=ckJ-tCqJcIM




Alia prelego de ***Ana Manero*** temis pri la «Historio de la libro». Estis tre interesa ŝia raportado pri la evoluo de tiu grava ilo, kiun, pro ĝia rolo, oni povas difini kiel plilongigo de la homa cerbo. Ŝi detale priskribis la multenombrajn paŝojn de tiu evoluo, ekde la rudimentaj rimedoj de la antikvaj civilizacioj ĝis la nuntempaj bitigitaj libroj kiujn oni povas transsendi perrete kaj facile multobligi.





Menciindas ankaŭ la prelego de ***Javier Alcalde***: «Esperanto kaj anarkiismo - kiam, kie, kiel, kial?». Per ĝi, la kataluna esper-

















antisto priskribas la rilatojn de la maldekstraraj rondoj, ĉefe anarkiistaj, kun Esperanto kaj ĉi ties idealo.
Same kiel en ĉiu hispana kongreso de Esperanto, ankaŭ en ĉi tiu okazis Ĝenerala Kunskido de la Hispana Esperanto-Federacio, kaj dum la daŭro de la kongreso funkciis la E-libroservo, kun prezentado de iuj novaj libroj, kaj de migranta ekspozicio pri Esperanto. Krome, paralele al la kongresaj prelegoj estis aparta elmontrado de film(et)oj en Esperanto.
Kaj same kiel en ĉiuj E-kongresoj, kaj landaj, kaj universalaj, ne ĉio estis laborsesioj; estis ankaŭ distraj programeroj; ni jam menciis la ekskurson al la kaverno ***El Soplao***, komence de la kongreso. Poste, dum la cetero el la kongresaj tagoj estis iuj amuzaĵoj: keglo-ludado, muzikaj spektakloj… kaj ankaŭ komika teatraĵo.
**JoMo** ***(Jean-Marc Leclereq)*** estas franca kantisto kaj esperantisto. Li havas repertuaron en kelkaj lingvoj, Esperanto inter ili. Jam de antaŭ multaj jaroj, li altiris la atenton en la esperanta mondo. En nia kongreso, en la korto de la kongresejo, la kultur-domo ***El Espolón***, **JoMo** ludis, kantis, vespere de la sabato la 30a de aprilo, post la tiutagaj prelegoj. Eblas vidi iome el lia kantado en la ret-adreso: https://www.youtube.com/watch?v=GeVJYdDT-Bo
Estis aliaj amuzaĵoj en la sekvintaj tagoj. ***Georgo Handzlik*** estas pola aktoro kaj esperanta kantisto, kaj ***Saŝa Pilipovic*** estas serba profesia aktoro kiu kelkfoje aktoris antaŭ esperanta publiko okaze de kongresoj k. a. Li ankaŭ prikantas ciganajn kantojn. Ambaŭ aktoroj kunludis kabaredan spektaklon nomatan "Verda banano". Krome ambaŭ, unuope, faris por la publiko de nia kongreso kantadon kiun

oni povas vidi en la interretaj adresoj:
https://www.youtube.com/watch?v=TsmQw8b0PGo
https://www.youtube.com/watch?v=Q9dyFOpVkmQ
Per tiuj filmetoj oni povas konstati ke la kantado estis en Esperanto. Same oni povas diri pri la teatra kabareda komikaĵo el kiu estas peco en Interreto en:
https://www.youtube.com/watch?v=DEgtZnMJYLY
La kongresurbo, ***Comillas***, havas interesajn vidindaĵojn, ĝiaj mezepokaj kaj barokaj konstruaĵoj, sed ankaŭ arkitekturajn verkojn de modernistaj artistoj kiel ***Gaudí*** kaj ***Domènech i Montaner***. Tiuj kongresanoj kiuj ne devis tuj reveni al siaj loĝlokoj povis viziti ilin.

Sed tial ke la 3-a de majo, estis labortago, multaj kongresintoj eĉ ne povis partopreni la tuttagan ekskurson kiu estis la lasta programero de la kongreso. Tial, kiel oni povas vidi per la fotoj de ĉi tiu raporteto, la partoprenantoj en tiu ekskurso estis preskaŭ ĉiuj emerituloj.

La ekskurso estis tre agrabla kaj interesa. Post perbusa trairo de verda kaj bela teritorio, la ekskursantoj alvenis al iu apudmara urbeto, el kie oni ekiris perŝipe al Santandero, ĉefurbo de la Kantabria subŝtato, tranavigante la golfeton en kies rando troviĝas tiu urbo. Santandero havas kelkajn vizitindajn lokojn, inter ili kelkajn muzeojn, sed nia vizito al tiu urbo devis esti sufiĉe mallongdaŭra, pluraj horoj ĉirkaŭ la tagmezo, kaj nia vizito povis konsisti nur el promenado, aŭ rapida trairado, de la cefaj avenuoj de la apudmara kaj centra zonoj de tiu urbo; ĉiukaze la vizito estis agrabla kaj, feliĉe, ankaŭ la tiutaga vetero kontribuis al tio.

Poste la travizitado de la urbo daŭris perbuse, haltante en vidindaj kaj fotindaj lokoj. Post tagmanĝi en restoracio, en












bela, pitoreska loko, la ekskursantoj ekiris perbuse destine al la urbeto ***Santillana del Mar***.

Ĉi tiu vilaĝo konservas sian mezepokan aspekton; la stratoj, la domoj, preĝejoj kaj ĉio ĝenerale restis preskaŭ senŝanĝaj de antaŭ multaj jarcentoj. Tial ties trairado estas kvazaŭ vizitado al historia muzeo. Ni povis konstati ke eĉ en tiu epoko kiam, pro la kronvirusa pandemio, multaj personoj ne emas vojaĝi, tamen ne mankis en ***Santillana del Mar*** relative granda nombro da turistoj.

Poste ni, la esperantistaj eksursantoj, ekveturis denove perbuse destine al lasta vizit-loko de nia programo: ***Altamira***. Rimarkindas ke la tuta trairado de la Kantabria teritorio estis okazo de ĝuado de bele verda pejzaĝo.

Kiel sciate, ***Altamira*** estas loko interesa de arkeologia vidpunkto pro la tie malkovrita kaverno kun ŝtonepokaj surrokaj pentraĵoj. Sed la vizito al la kaverno mem estas malpermesata de antaŭ kelkaj jaroj pro tio ke la aliro de tiom multaj vizitantoj metis subdanĝere la konservadon de la interesaj prahistoriaj pentraĵoj. Tial oni konstruis, proksime de tiu loko, iun muzeon kiu, krom abunda informacio pri la homa vivmaniero de la epoko kiam la pentraĵoj estis faritaj, estas ankaŭ bona kopio de la interesa groto. La vizito al tiu kaverno-kopio estas kvazaŭ virtuala trairo de la reala groto. Ankaŭ en tiu muzeo ni konstatis la abundan ĉeeston de turistoj.

Resume pri la tiutaga ekskurso, kaj la tuta kongreso ĝenerale, ni povas konkludi ke la aranĝo estis fajna kaj interesa evento pri kiu oni devas danki kaj gratuli ties organizintojn.



# Korupto en Hispanio

Pli kaj pli oftas presara informado pri korupto-kazoj. En Hispanio, same kiel en aliaj landoj, la legado de la gazetoj iĝis maltrankviliga ekzerco. Lasttempe, dum tro longa tempo, la novaĵoj havas tiutipan enhavon. Ĉiu skriba eldono, same kiel la televidaj kaj radiaj elsendoj, ade memorigas nin pri situacio de institucia misfamigo pro la plago de koruptado. Konkrete en Hispanio, de antaŭ kelkaj jaroj, ĉi tiu afero fariĝis vera katastrofo, kiu riskas iĝi la difina elemento de la morala kvalifiko de la lando.

Kelkaj sociolog(in)oj pritraktis la aferon per sia verkaro kaj intencis esplori la kaŭzojn de tiu fenomeno. ***Melián Ibiza***, ***Victor Lapuente*** k. a. teoriadis pri la sociaj kondiĉoj kiu ebligas kaj favoras la disvolviĝon de la korupto. Ankaŭ la juĝisto ***Baltasar Garzón*** publikigis libron pritemante la aferon de la korupto en Hispanio. Iliaj prikonsideroj sendube estas trafaj; estas nedudeble ke, ekzemple, en la landoj de norda Eŭropo estas malpli da koruptado ol en la mediteraneaj landoj de nia kontinento, kaj en la afrikaj kaj mezorientaj landoj la korupto estas ege pli granda ol en la okcidenta mondo. Tio signifas ke la kultura medio de ĉiu socio estas influa faktoro pri tiu temo, kaj aliaj. Sed ankaŭ veras tio ke la korupto estas sufiĉe ĝenerala plago en ĉiutipaj socioj sendepende de la religio, kulturo, politika sistemo, grado de disvolviĝo… Tio montras ke estas io en la homa naturo mem kio inklinigas la personojn konduti koruptece. Sed tial ke ne ĉiuj homoj falas en tian moralan putraĵon, tio metas la aferon je persona nivelo, t. e. lastinstance, estas persona decido lasi sin korupti aŭ ne. Tial, per ĉi raporto ni enfokusigas la aferon je persona nivelo, tio estas pristudante kaj priskribante ĉiun apartan korupto-kazon, kun ties konkretaj responsuloj kaj ĉi ties personaj cirkonstancoj.

Kaj ĉar ni menciis la naturan homan inklinon al la gajno kiun la korupto ebligas, decas ke ni identigu tiun naturan inklinon kaj agnosku ke ĝi estas io esence homa, heredaĵo de nia reptilia deveno, al kiu apartenas ĉiuj niaj instinktoj. Do, la decido subpremi tiajn instiktojn: kolero, venĝemo, ĵaluzo, envio, seksavido, avareco… ĉiuj inkludeblaj en la koncepto de "egoismo", tio estas, memamo eĉ koste de alies damaĝo, estas rendimento de alia instanco de la homa

naturo: la nov-kortekso, frukto, de alia (la lasta) etapo de la evoluo de la homa speco, kaj la rendimentoj de tiu homa instanco estas ankaŭ rezulto de la influo de la edukado provizita de la kultura socia medio kaj, ĉiam lastinstance, de la konscia volo de la individuoj.

Frukto aŭ rezulto de tiu homa egoismo, kun la diversaj formoj kiujn ĝi povas alpreni, estas la fraŭdoj, seksa persekutado, seks-perforto, torturado, pederastio, subaĉeto, trompo-ŝtelo… Ĉiuj-ĉi aspektoj de socia putrado estas abomenindaj kaj postulas apartan pritrakton, sed ili ne ĉiam estas korupto. Nun ni priatentas, konkrete, pri la kazoj kiuj, jes ja, estas korupt(ad)o. Vidu jenajn difinojn pri «korupto»:

> Oni povas diri, ke ekzistas ia kunteksto de korupteco, kiam potenculo, kiu respondecas pri certaj agoj (t. e. funkciulo aŭ oficialulo kun respondeco) estas induktita, per mono aŭ aliaj avantaĝoj, kiuj ne estas donitaj laŭleĝe, plenumi agojn, kiuj favoras tiun, kiu donas la avantaĝon kaj cetere generas damaĝon al la publiko kaj ĝiaj interesoj.
> ***CARL FRIEDRICH*** (politikologo)

> La koncepto de korupteco povas esti komprenata kiel la uzo de publika potenco por atingi privatajn enspezojn per la misuzo de potenco aŭ ĝia ekzercado fare de la ŝtata burokratio.
> ***JENS CHR ANDVIG*** kaj ***ODD-HELGE FJELDSTAD***

Estas klare ke laŭ tiuj difinoj oni kontemplas la koruptadon kiel misuzon de la aŭtoritato. T. e. temas pri politika afero, io kio okazas en la tereno de la politiko en kiu rolas la autoritato, la publika potenco. Tiorilate, la sekva difino, kiun ni trovas en **Vikipedio**, nenecese aldonas la adjektivon "politika" al la substantivo "korupto":

> La politika korupto referencas al deliktoj faritaj de publikaj funkciuloj kaj aŭtoritatoj kiuj misuzis siajn povon kaj influon farante intence misan uzadon de la financaj kaj homaj rimedoj al kiuj ili havas facilan aliron, celante siajn personajn interesojn aŭ tiujn de iliaj proksimuloj, por atingi neleĝan avantaĝon ĝenerale sekrete kaj private.

Do, ni priskribos tiajn eksterleĝajn kazojn por kies realigado estis necesa helpo aŭ komplico de aŭtoritat(ul)o, aŭ kiam tia oficiala, aŭtoritata, partopreno estis necesa por mildigi (aŭ nuligi) la punon de la kulpuloj. Kompreneble, oftas la kazoj en kiuj la aŭtoritata implikiĝo estis necesa kaj por la plenumado de la deliktaj faroj kaj por senpunigo de la kulpuloj. Do la aŭtoritata implikiĝo povas esti politika kaj/aŭ juĝa.

Kiel ekzemplo de tiutipaj kazoj, sekve ni priskribas iun korupto-aferon kiu famiĝis en Hispanio en la lasta etapo de la frankisma reĝimo. Temas pri la tiel nomata «Kazo ***SOFICO***». ***SOFICO*** estis ensemblo da hispanaj kompanioj,

kies bankroto en 1974 konstituis unu el la grandaj skandaloj de la frankisma reĝimo, en kiu estis implikitaj tiamaj ministroj, arme-estroj kaj aliaj altrangaj funkciuloj. La ***SOFICO***-Grupo estis fondita en Madrido en 1962, kun la celo konstrui, vendi kaj lui loĝejojn ĉe la **Suna Marbordo** ĉefe en Estepono. Ĉi tiu firmao estis kreaĵo de ***Eugenio Peydró Salmerón***, naskiĝinta en 1906. Dum la Hispana Civil-Milito, li laboris kune kun kolonelo ***José Ungría*** en la inform-servo de la frankisma flanko, kie li kontaktis kun gravaj figuroj de la reĝimo. Poste li entreprenis kelkajn negocojn kaj fine tiun de konstruado, el kiu li kreis ***SOFICO***-n.
Iom poste Eugenio kreis ***SOFICO Investoj*** por altiri investantojn, al kiuj li pagis 10%-profiton kaj kies mono estis investita en apartamentojn jam konstruitajn kiuj estis metitaj sub la nomo de la aĉetanto, sed kiuj estis luitaj kaj administritaj de ***SOFICO***. En 1965, du aliaj kompanioj estis aldonitaj al la holdingo: ***SOFICO*** **Libertempo** kaj ***SOFICO*** **Atlaso**. Unue, la vendo de la apartamentoj estis efektivigita post kiam ili estis plene konstruitaj, sed poste la transakcio estis farita laŭ planoj kontraŭ parto el la prezo kaj kelkfoje la plena prezo, por ke la estontaj posedantoj financu la konstruadon.
Ĉar malgraŭ tio la fondusoj ne sufiĉis por la planita ekspansio de la holdingo, ***SOFICO*** komencis enspezi monon subskribante kontraktojn pri vendo de apartamentoj, supozeble finitaj aŭ konstruataj, kiam en multaj kazoj la konstruado ne komenciĝis aŭ eĉ ne estis akiritaj la terenoj. Vasta reto da persvadaj vendistoj kaj ega reklama kampanjo garantianta netan profiton je 12 elcento jare ŝajnis certigi la sukceson de la holdingo. Ĉi tiu kreis agentejojn en Francio, Britio, Germanio kaj Usono por altiri investantojn. La problemo estis, ke, reale, kun la normala funkciado, ne estis enspezita eĉ la necesa mono por pagi la promesitan procenton al la investintoj. ***SOFICO*** devis aĉeti novajn terenojn kaj vendi la koncernajn nefinkonstruitajn loĝejojn por pagi la procenton, kio pligravigis la deficitan procezon.
Notindas ke kiel reklamo por altiri investantojn, ***Peyró*** uzis sian influon en la sferoj de la frankisma reĝimo. En la Administra Konsilio de la ***SOFICO***-holdingo





**Iamaj reklamoj de *SOFICO***



***Eugenio Peydró Salmerón***
**kreinto de la *SOFICO*-holdingo**





Familio de *Eugenio Peydró*



*Eugenio Peydró* (filo)



*Rafael García Valiño*



*Rafael Cabanillas Prósper*




*SOFICO* en bankroto

estis altrangaj personoj de la reĝimo, generaloj, parencoj de ministroj, membroj de la kortego de Franko…: Kiel honora prezidanto: ***Luis Nieto Antúnez***, kortuma advokato kaj frato de la ministro pri mararmeo, ***Pedro Nieto Antúnez***, vicprezidantoj: generaloj ***Rafael García Valiño*** kaj ***Rafael Cabanillas Prósper***, konsilianoj: ***Segismundo Martín Laborda***, Prezidanto de la Provinca Juĝejo de Gvadalaharo, ***Juan Martín Pariente***, subkolonelo de la aerarmeo, ***Juan Losada Pérez***, kolonelo de la Civil-Gvardio kaj eksa estro de la sekurec-servo de Franko, ***José María López Pelegrín***, konsiliano de la Agrokultura Kredita Banko, peranta la Financan Ministrejon... Ĉiuj ili estis nuraj prestiĝaj figuraĵoj. La vera kontrolo de la entrepreno estis en la manoj de ***Eugenio Peydró Salmerón*** kaj lia filo ***Eugenio Peydró Brillas***.

En julio 1974 ***SOFICO*** ĉesis pagi la interakoditan procenton al siaj investintoj. ***Peydró*** ordonis diversajn rimedojn, por ke aĉetantoj kaj rentistoj ne timu, kaj ***SOFICO*** daŭre vendis apartamentojn, sciante, ke ĝi neniam povos liveri ilin. La 28-an de novembro de tiu jaro, iu kreditoro petas bankroton de la kompanio. Laŭlonge de la sekvintaj monatoj la diversaj firmaoj de la holdingo ĉesigis siajn pagojn.

Kiam la tribunaloj prijuĝis ĉi-tiun ***SOFICO***-kazon, ili ne povis procedi kontraŭ la altrangularo de la konsilio de la holdingo kvankam ili opiniis ke estis en tiu ularo indicoj de krimeco. Estis juĝitaj nur la du ***Eugenio Peydró***, patro kaj filo. Ili estis enprizonigitaj, sed tial ke la proceso longe daŭris, oni lasis ilin liberaj post malmultaj monatoj. En oktobro de 1987, 11 jarojn post la komenco de la procezo, oni eldiris verdikton. La entreprenisto estis kondamnita al naŭ-jara enprizoniĝo. Lia filo al du jaroj kaj kvar monatoj pro komplicеco. Ili ankaŭ estis kondamnitaj pagi 5 miliardojn da pesetoj (30.050.627,89 eŭroj) por kompenso por la 3.200 damaĝitoj. Neniu el ili iris en malliberejon ĉar ili apelaciis kaj, kompreneble, ili ankaŭ ne pagis la kompenson, ĉar ili sin deklaris nesolventaj. ***Eugenio Peydró Salmerón*** mortis kelkajn tagojn post la fino de la proceso. En 1991, 15 jarojn post la komenco, la Dua Ĉambro de la Supera Kortumo fermis la ***SOFICO***-kazon.

Jen ĝi estis tipa kazo de korupto, fraŭdo realigebla dank' al helpo de la politika aŭtoritato kaj kun senpuneco por la kulpuloj dank' al juĝsistemo submetita al la politika potenco.



# Antaŭ la 19-a jarcento

La korupto en Hispanio ne estas moderna afero, kaj ne havis subitan aperon en iu konkreta historia momento; ĝi venas “ekde ĉiam”. Respegulas ĉi tion la fakto ke ekzistas en la hispana literaturo iu tradicia novel-stilo konata kiel ***Pikareska romano***, al kiu apartenas gravaj verkoj kiaj ***Lazarillo de Tormes***, ***Guzmán de Alfarache***, ***La Celestina***, k. a. kiuj priskribas socian fonon en kiu oftas la korupta teniĝo de ĉiutipaj personoj de pasintaj epokoj. La fakto ke en Hispanio oni verkis tiujn pikareskajn rakontojn, kiuj gloras la trompadon, anstataŭ librojn, kiuj glorus laboron, montras ke la regantaj valoroj en ĉi tiu socio ne estas tiuj de honesteco, honoro, laboremo... La literaturo montras kiel vidas sin mem la lando kaj kiel taksas sin mem la landanoj. Ni ne forgesu ke dum multaj jarcentoj la hispana teritorio estis scenejo de intergentaj militoj en kiuj la rabado kaj dispredado de alies posedaĵoj estis kutima afero, kaj poste Hispanio konstruis imperion bazitan sur la rabado, predado kaj ekspluatado de aliaj teritorioj, ĉefe en Ameriko.
Do, ekde kiam ni komencu nian raportadon pri tiu temo de la koruptado? Ni ne komencu per la mezepokaj jarcentoj; ne estas agrable malkovri ke ***Rodrigo Díaz de Vivar***, la fama Cido, ne tiel estis la kavalireca kaj nobla figuro kiun prezentas pri li kelkaj legendoj kaj iu itala-usona filmo de la jaro 1961. Krome pri la epoko de la Cido tre malabundas dokumentaro. Ni komencu, do, per alia epoko kaj per alia gravulo pri kiuj ekzistas pli abunda dokumentaro, konkrete la 15-a jarcento kaj la Konestablo ***Álvaro de Luna*** (1390-1453). Li estis grava figuro en la kastilia politiko en la unua duono de la 15-a jarcento, ***Álvaro*** estis agema viro kiu atingis politikan potencon kiel favorato de la reĝo Johano la 2-a de Kastilio. Li regadis dank’ al sia kapablo, ne nur por kontentigi sian egan ambicion, sed ankaŭ por defendi la reĝan aŭtoritaton.
***Álvaro*** estis filo, kvankam bastarda, de nobelo kaj orfiĝis kiam li estis tre juna. Danke al sia familio, Álvaro ricevis fajnan edukadon kaj estis enkondukita en la kastilian kortegon kiel paĝio de la juna princo Juan, filo de Henriko la 3-a. Li sciis gajni la simpation de la princo per sia afabla traktado, siaj allogaj moroj kaj eĉ per sia kulturo, ĉar li multe legis kaj konis sufiĉe bone la verkistojn de la unua itala renesanco. Sed malantaŭ la ekstera aspekto de tiu agrabla kortegano,


La Konestablo *Álvaro de Luna*


Johano la 2-a de Kastilio


Izabela de Portugalio, patrino de Izabela la Katolika


Henriko la 4-a de Kastilio

estis fajra koro kaj malvarma kaj decidita inteligento. Li bone montris tion, kiam, post la reĝa kronado de Johano la 2-a en 1419, li sciis fiaskigi la kortegajn intrigojn kun granda lerteco, savi la junan suverenon kaj defendi ties personon en batalo en ***Montalbán*** en 1420. Post ĉi tiu feliĉa interveno, ***Álvaro*** estis premiita per la absoluta fido de la monarko kaj estis nomumita Konestablo, la plej altranga armea titolo en tiu tempo en Kastilio, kaj la ricevis la titolon de grafo de ***Santisteban*** en 1423. Ni temas pri epoko kiam la reĝa aŭtoritato estis tre malpliigata de la potenco de la feŭd-sinjoroj, kiuj konkurencis inter si kaj kontraŭ la krono por politika povo kaj kontrolo de la teritorio.
De tiam, fakte, dum la sekvintaj tri jardekoj la historio de la regno de Kastilio estis sinsekvo de intrigoj, bataloj kontraŭ la najbaraj regnoj de Aragonio kaj Navario, ribeloj de feŭd-sinjoroj… La privato ***Álvaro de Luna*** sciis iĝi nepre necesa por la reĝo Johano. Ĉi tiu plu kaj pli devis pagi al la Konestablo pro tiom valoraj servoj. Interalie, ***Álvaro*** ricevis la tre altrangan titolon de Majstro de la ordeno de Sankta Jakobo. La politika potenco de la Konestablo estis absoluta kaj profitis tion por ege riĉiĝi kaj favori siajn partianojn de la nobelaro kiuj apogadis lin kontraŭ aliaj nobelaj klanoj. Tiome granda estis la influo de ***Álvaro*** kun la reĝo, kiu cedis al ĉiuj petoj de la ministro, ke estis onidiro en la lando ke ambaŭ viroj estis seks-amantoj. Inter la postuloj kiujn la Konestablo faris al la reĝo, kiel pago pro liaj altvaloraj servoj, estis la donaco de iu kastelo kaj ties ĉirkaŭaj teroj kiuj apartenis al la posedaĵoj de la reĝino Maria de Aragonio, t. e. la bienoj kiuj devis provizi la vivrimedojn de la reĝa edzino kaj ties servistaro.
Krom lerta politikisto, ***Álvaro de Luna*** estis ankaŭ sperta militisto. Post solvi la militajn problemojn kontraŭ Aragonio kaj Navario, en la jaro 1431 li entreprenis militan kampanjon kontraŭ la maŭra regno de Granado, la sola maŭra teritorio tiam ekzistanta en la Iberia Duoninsulo, kaj atingis notindan venkon en ***La Higueruela***. Sed tiu venko, kvankam alportis la konkeron de iom da maŭra teritorio, ne kulminis per la esperita finigo de la muzulmana ĉeesto en Hispanio. La malamikoj de la ministro akuzis lin lasi sin subaĉeti de la maŭra reĝo de Granado por haltigi la kampanjon sen tia venka kulmino. La akuzo povas esti falsa,

ĉar la malamikoj de la Konestablo kapablis entrepreni ĉiajn intrigojn por ruinigi lin, sed ankaŭ povas esti vera, la ministro estis tute kapabla lasi sin aĉeti se la pago estus konvena por li.
En la disvolviĝo de tiuj kvereloj inter la nobelaro de la regno, plurfoje la malamikoj de ***Álvaro de Luna*** sukcesis premi la feblan reĝon por ke ĉi tiu provizore apartigu la Konestablon. Sed krom tio ke tiu nobeloj ne estis malpli ambiciaj kaj monavidaj ol la privato, ili ne havis la lertecon kaj kapablon por la regado kaj la milito. Rezulte de tio ĉiam ***Álvaro*** sukcesis disbati la intrigojn maĥinaciitajn kontraŭ li kaj rehavi la reĝan favoron. Post la morto de la reĝino Maria de Aragonio, la Konestablo aranĝis novan edziĝon de la reĝo kaj tiucele li serĉis princinon kiu favorus siajn interesojn. Sed ĉi-foje la ministro eraris ĉar la nova reĝino, Izabela de Portugalio, fine estis la plej danĝera el liaj malamikoj.
Edziniĝinta al la reĝo Johano en 1447, dum la sekvintaj ses jaroj ŝi naskis al li du gefilojn. La plejaĝa, Izabela, estis poste la fama reĝino Izabela la Katolika. Dum tiuj ses jaroj, ĝis 1453, Izabela de Portugalio dediĉiĝis konspiri kontraŭ la privato ***Álvaro*** per metodoj tiom efikaj kaj malhonestaj kiel tiuj uzataj de li dum la antaŭaj jardekoj por konservi la reĝan favoron. Fine la Konestablo estis viktimo de konspiro organizita de la reĝino. Ŝi konvinkis sian edzon pri la konveno kaj neceso nuligi la potencan ministron. Okazis ke ĉi tiu estis tiom efika dum sia demarŝado de la regno ke tre estis plifortiginta la reĝan povon kaj nuliginta kaj potencajn feŭd-sinjorojn, t. e. de tiam la reĝo jam ne plu bezonis lin por sia defendo. Estante en Burgoso, ***Álvaro*** estis arestita laŭ ordono de Johano la 2-a. Malmultajn tagojn poste, sekve de rapida proceso, li estis senkapigita en Valladolido la 2-an de junio de 1453. La reĝino ne multe ĝuis sian venkon. Unu jaro poste mortis la reĝo mem, kaj ŝi restis kun siaj gefiloj apartigita de la kortego de Henriko la 4-a, la unuenaskita filo de ŝia edzo.
La regno refalis en politikan ĥaoson; reestiĝis la civila malkonkordo kaj humiligo de la reĝa aŭtoritato. Nova generacio de ambiciaj kaj koruptaj nobeloj igis la 20-jaran reĝadon de Henriko la 4-a same malstabila kia estis tiu de lia patro Johano la 2-a, kaj ĉi-foje estis neniu lerta politikisto kia la Konestablo ***Álvaro de Luna*** por bridi ilin. La ĉefroluloj de la novaj intrigoj kaj konspiroj estis ***Juan Pacheco***, markizo de ***Villena***, ĉi ties frato ***Pedro Girón***, Majstro de la ordeno de ***Calatrava***, la klano de la Mendoza-anoj, ***Beltrán de la Cueva***, ***Alfonso Carrillo*** ĉefepiskopo de Toledo… La objekto aŭ celo kiun volis atingi tiuj altranguloj estis, kompreneble, la kapto de la politika potenco en Kastilio, kiel privato de la reĝo, kun sama povo kaj influo kiel havis ***Álvaro de Luna*** kaj riĉiĝi per tiu posteno same kiel estis riĉiĝinta li.
En la intrigoj kaj bataloj por superregi en la ĉirkaŭo de la reĝo ludis gravan rolon influi en la elektado de edzino por la monarko. Ĉiu nobela klano havis sian kandidatinon al tiu posteno. Henriko jam estis edziĝinta al Blanka de Navario en 1440 dum la reĝado de Johano la 2-a en Kastilio kaj la privateco de ***Álvaro de Lu-***



*Juan Pacheco y Téllez Girón,* **Markizo de *Villena***



*Beltrán de la Cueva y Mercado* **Majstro de la ordeno de *Santiago***



*Alfonso Carrillo de Acuña* **Ĉefepiskopo de Toledo**



**Johanino de Kastilio, misnomata "la Beltraneĥa"**

***na***, sed post dektri jaroj la geparo estis naskinta neniun idon, oni inicis proceson de geedziĝ-nuligo atribuante al Blanka ian malbenon kiu provokus seksan senpotencon al Henriko. La geedziĝo estis nuligita la 2-an de majo de 1453, ĝuste unu monaton antaŭ la senkapigo de ***Álvaro de Luna***. En la elektado de nova edzino por la estonta monarko de Kastilio venkis la nobela Mendoza-klano kiu pledis pri Johanino de Portugalio.

Sed ni provizore lasu la komplikajn aferojn de Kastilio kaj akompanu la malfeliĉan princinon Blanka de Navario revene al sia patrujo post la nuligo de ŝia edziniĝo al Henriko de Kastilio. Ni vidos ke en la, ankaŭ hispanaj, regnoj de Navario kaj Aragonio la situacio rilate al koruptado kaj krimoj ne estis pli bona ol en Kastilio. Dum la 13 jaroj kiujn Blanka pasadis en Kastilio multe ŝanĝiĝis la aferoj en Navario. Ŝia patrino, Blanka reĝino de Navario, estis mortinta, kaj ŝia patro, la reĝo Johano la 2-a de Aragonio estis edziĝinta al alia ino, ***Juana Enriquez***, kiu naskis al li filon. Laŭ la dinastiaj leĝoj de la epoko kaj la lando, post la morto de la reĝino Blanka, la krono de Navario apartenis al ŝia filo la **Princo de Viana**. Ĉi tiu ne bone aranĝis la rilaton kun sia patro, kiu volis konservi sian pridubindan reĝan rajton sur Navario. En la tiamaj intrigoj ludis gravan rolon ***Juana Enriquez,*** konspiranta favore al sia filo Ferdinando.

Resume ni diru ke estiĝis civilmilito en Navario inter la patro, Johano de Aragonio, kaj la filo, Karolo la **Princo de Viana**. Tiu kelkjara milito, en kiu intervenis ankaŭ la regno de Kastilio, apogante foje la patron, foje la filon, por atingi teritoriajn gajnojn, daŭradis ankoraŭ kiam Blanka revenis el Kastilio post ties eksedziniĝo. Tiam ŝi dediĉigis apogi la rajtojn de sia frato kontraŭ la patro de ambaŭ. Fine ambaŭ mortis en strangaj cirkonstancoj kiuj ĵetas mallumon sur Johano de Aragonio kaj ties edzino ***Juana Enriquez***. La filo de ambaŭ estis poste la profitanto de tiom da krimoj, intrigoj, maĥinacioj, konspiroj… Li estis tiu Ferdinando kiu post kelkaj jaroj edziĝis al Izabela de Kastilio kaj ambaŭ estis nomataj "la Katolikaj Gereĝoj". Nun ni vidu similajn koruptadon kaj intrigojn en Kastilio por ke tiu Izabela, same neleĝece, aliru al la trono de tiu regno.

Johanino de Portugalio naskis filinon al la reĝo Henriko en februaro de 1462, sed du jarojn poste, kadre de la konfront-

ado inter la nobelaj familioj de Kastilio kiuj konkurencis por la politika kontrolo de la regno, oni komencis pridubi la patrecon de la reĝo rilate al la infanino al kiu oni aplikis la kromnomon "Beltraneĥa" kio, en la lingvo de la lando signifas eksterleĝa filino de ***Beltrán***. Temis pri ***Beltrán de la Cueva***, Konestablo de Kastilio, grafo de ***Ledesma***, Superulo de la ordeno de Sankta Jakobo kaj favorato de la reĝo. La nobeloj kiuj enviis tiujn postenojn kaj aspiris al ili: ***Juan Pacheco***, ***Alfonso Carrillo***, ĉefepiskopo de Toledo, k. a. inventis la novaĵon ke la princino Johanino, fakte, estis filino de ***Beltrán*** kaj ne de la reĝo. La afero povis rezulti kredebla tial ke la reĝo Henriko estis gajninta al si famon je seks-senpotenca. En la konspiro partoprenis ankaŭ Izabela de Portugalio, la vidvino de Johano la 2-a. Ŝia filo Alfonso estis proponita de la ribeluloj kiel legitima heredonto de la kastilia trono. Kompreneble, estis ankaŭ partianoj de la legitimeco de la princino Johanino: la Mendoza-klano k. a. Se ni konsideras ke laŭlonge de la konfliktoj okazintaj en la regno dum la sekvintaj 12 jaroj pri ĉi tiu afero, la partianoj de ambaŭ teorioj pri le legitimeco de Johanino ŝanĝis sian teniĝon, ni devas konkludi ke la afero gravis nenion por tiuj koruptaj altranguloj, kaj ke ili kondutis nur laŭ la konveno de siaj interesoj kaj ambicioj.
Ĉiukaze la aventuro de la princo Alfonso, frato de la reĝo, rezultis fiasko; li ĉesis esti interesa por la konspirintoj kiam la reĝo konsentis apartigi la ministron ***Beltrán*** kaj akceptis aliajn postulojn de la ribelintoj. En 1468, Alfonso mortis, eble venenita. Lia patrino freneziĝis; verdire, la konspiroj en kiuj ŝi intervenis alportis al ŝi nur malfeliĉon. Sed de tiam komenciĝis tio kion ni povas nomi la politika kariero de Izabela, la fratino de Alfonso kaj patra fratino de la reĝo. Ŝi iĝis reĝeca alternativo por la interkonkurantaj nobelaj klanoj, kaj estis multaj planoj organizi ŝian edziniĝon laŭmaniere ke ĝi favorus aŭ ne ŝiajn pretendojn al la krono kaj al la interesoj de la intrigantaj klikoj. Fine ŝi, kontraŭ la volo kaj la planoj de sia frato la reĝo aranĝis sian edziniĝon al Ferdinando de Aragonio, filo de Johano la 2-a de Aragonio kaj de ***Juana Enriquez***, kies malhonesta konduto en la afero de Navario ni jam priskribis. En ĉi tiu intrigo Izabela ĝuis la apogon de la ĉefepiskopo ***Carrillo***, sed ĉi-foje ne de ***Juan Pacheco***, kiu tiam estis rolante kiel privato de la reĝo kaj, en iu de tiuj alianco-ŝanĝoj tre oftaj en tiuj intrigoj, estis alproksimiĝinta al la nobelaj klanoj apogantaj la legitimecon de Johanino.
Ni ne povas dediĉi pli detalan atenton al tiuj konspiroj kaj alianco-ŝanĝoj. Ni diru ke la personoj kiuj rolis en tiuj konfliktoj povas inspiri nur naŭzon al la homoj kiuj pensas ke la politiko devas esti servo al la popolo kaj ĉi ties bonstato. Eble la plej honesta kaj pacema inter la protagonistoj de tiuj konfliktoj estis la reĝo Henriko la 4-a. Li ĉiam klopodis eviti la militajn interfrontiĝojn kaj estis preta interakordi kun siaj kontraŭuloj. Laŭeble, li penis defendi la rajtojn de sia filino, sed klopodante eviti militajn konfliktojn. En tiuj bataloj kiujn li ne povis eviti, okaze de venko, li, male ol siaj malamikoj, ne kondutis venĝeme. La hispanoj malaprezis lin ĝuste pro tio; liaj samtempanoj akuzadis kaj insultadis lin asertante ke li protektadis la ju-



**La reĝino Johanino de Portugalio**



**Izabela de Kastilio**



**Ferdinando de Aragonio**



**Kardinalo *Pedro González de Mendoza***


dojn kaj la islamanojn, kaj damaĝadis la nobelulojn favore al la malalt-rangaj homoj. La nobeluloj plurfoje humiligis lin okaze de milita venko sur li. Lia edzino estis prenata kiel ostaĝino kiel garantio de plenumado de kondiĉoj truditaj al li. Dum unu el tiuj periodoj kiam la reĝino restis subkontrole de iu el la nobeloj, ŝi gravediĝis rezulte de amrilato kun alia viro; tio kontribuis misfamigi ŝin kaj pravigi la dubojn pri la patreco de la reĝo rilate al la princino Johanino.

Kiam la reĝo Henriko mortis, la 11-an de decembro de 1474, tuj estiĝis milito inter la partianoj de lia fratino Izabela kaj lia filino Johanino, t. n. Beltraneĥa far ĉi ties malamikoj. En tiu konflikto ne povis partopreni la eterne intriganta ***Juan Pacheco*** ĉar li estis mortinta antaŭ du monatoj. Sed la kastilia nobelaro plenis je ambiciuloj kiuj emis plibonigi ties feŭdecan staton apogante la partion kiu pli favorus iliajn interesojn. Verdire, ili ne estis veraj partianoj de tiu aŭ tiu pretendantino al la reĝa krono, kiel atestas la fakto ke multaj el ili ŝanĝis sian teniĝon antaŭ, dum kaj post la milito. Speciale notindaj estas la kazoj de la ĉefepiskopo ***Carrillo*** kaj de la kardinalo ***Mendoza***. La unua, kiu ĉiam estis apoginta la partion de Izabela kaj eble troviĝis inter la inventintoj de la insido "Beltraneĥa", en ĉi tiu lasta milito inter ambaŭ pretendantinoj sin metis ĝisfine favore al la filino de Henriko. Dume la klano ***Mendoza***, kiu ĉiam estis favora al Johanino, fine decide apogis la puĉon de Izabela. La kialo de tiu interŝanĝo de fidelecoj de ambaŭ klerikoj estis ilia konkurado pri la rango de kardinalo. Ferdinando kaj Izabela uzis sian influon en la papa kortego por ke tiu eklezia titolo estu asignata al ***Pedro González de Mendoza*** anstataŭ al la ĉefepiskopo de Toledo, kaj tiele ili gajnis la apogon de la potenca Mendoza-klano. ***Alfonso Carrillo*** konstatis kun amareco ke lia intrigo-disĉiplino fine pli lertis ol la majstro.

Tuj post la morto de ŝia frato Henriko, Izabela agadis laŭ maniero kiu povas esti taksata kiel vera puĉo. Ĉar fine ŝi rezultis venkinta, kaj ĉiuj postaj monarkoj de Hispanio estis posteuloj ŝiaj kaj profitantoj de ŝia puĉo, la historiistoj de la lando ne povis, ĝis lasttempe, pritemi la kontraŭkonstitucian manieron laŭ kiu ŝi alprenis la povon en Kastilio. Antaŭ la ekfunkciado de ĉiu ajn konvencia maniero je transdono de la politika aŭtoritato, ŝi sin proklamis heredantino de sia forpasinta frato kaj okupis per siaj partianoj ĉiujn meĥanis-

mojn de la regna aparato. Notindas ke en la defilado de la ceremonio de la kronado en Segovio, la Plejalta Justico (tiama titolo ekvivalenta al la nuntempa Ministro pri Justico) defilis kun elingigita glavo enmane kaj enalte. La gesto estis tre stranga kaj tute nekutima en la regno, kaj devis esti interpretata kiel minaco kontraŭ ĉiu opozicianto.
Oni devas klarigi ke, verdire, la minaco ne estis nur kontraŭ la partianoj de la princino Johanino, unuaranga en la vico de sukcedado, sed ankaŭ kontraŭ la duaranga en tiu vico, ĉar Izabela estis nur la triaranga en tiu vico. Ŝia puĉo, do, estis duobla; inter ŝia nevino kaj ŝi estis alia persono kiu rajtis la kastilian kronon pli ol ŝi. Ankaŭ pri ĉi tiu afero sufiĉe silentis la historiistoj. Temis pri Ferdinando de Aragonio mem, la edzo de Izabela; li estis parenculo (kuzo) de la forpasinta reĝo Henriko, kaj laŭ la tiamaj dinastiaj leĝoj, li, kiel viro, pli rajtis reĝi antaŭ sia edzino. Kiam Henriko mortis, Ferdinando troviĝis en Aragonio, kie li devis demarŝi iujn familiajn aferojn, kaj tuj revenis al Kastilio. Kun hororo kaj konsterniĝo li eksciis pri la puĉo realigita de lia edzino kaj la ŝokiga sceno de la elingigita glavo de la Plejalta Juĝisto de la regno. Oni ne permesis al li alproksimiĝi al lia edzino ĝis kiam li formale akceptis la situacion.
Pli malfacile estis konvinki pri la reĝeco de Izabela la partianojn de Johanino. Multaj feŭd-sinjoroj pretis defendi la rajtojn de la filino de Henriko. Oni devas klarigi, tamen, ke ili ne estis pli decaj kaj honestaj ol tiuj kiuj ariĝis ĉirkaŭ Izabela. Ĉiuj ili poziciiĝis nur laŭ siaj interesoj kaj ambicioj. Atestas pri tio la fakto ke laŭlonge de la pli ol kvar jaroj kiujn daŭris la milito, ju pli boniĝis la situacio de la partio de Izabela, des pli da nobeloj pasadis al ŝia flanko forlasante Johaninon. Tamen la milito estis sufiĉe longa tial ke Portugalio apogis la filinon de Henriko ĉar ŝi estis nevino de la portugala reĝo, kaj ĉi tiu eĉ edziĝis al ŝi.
Ekde la jaro 1479 Izabela estis agnoskita kiel reĝino de la tuta regno. Komenciĝis tiam la reĝado de la t. n. "Katolikaj Gereĝoj", Izabela kaj Ferdinando, kiu tiom gravis en la historio de Hispanio. La regnoj de Kastilio kaj Aragonio, fakte, estis definitive unuigitaj, oni konkeris la maŭran regnon de Granado, metante finon al la araba okupado de teritorio en la Iberia Duoninsulo, oni kompletigis la konkeradon kaj koloniigadon de la Kanaria insularo, oni malkovris la Amerikan kontinenton kaj komencis ties konkeradon kaj koloniigadon far Hispanio, sed ankaŭ aliaj eŭropaj landoj… Sed ankaŭ, kaj eble ĉefe, oni entreprenis en Hispanio tion kio povas esti konsiderata kiel vera ŝanĝo de politika reĝimo. Temas pri la submetado de la nobelaro. Ĝis tiam tiu feŭdisma klaso estis tre potenca en la politika tereno kaj ofte humiligis la aŭtoritaton de la monarĥoj. De tiam ne plu okazis tio. La feŭd-sinjoroj daŭre estis superreganta klaso en la ekonomia tereno, sed politike submetita al la krono. Kaj de tiam, kaj ĝis fine de la 18-a jarcento, la monarĥoj estis la veraj protagonistoj de la politiko de la landoj, en Hispanio sed ankaŭ en aliaj landoj de Okcidenta Eŭropo. Naskiĝis la absoluta povo de la reĝoj, kio por la popoloj ankaŭ ne estis pozitiva situacio. Konkrete en Hispa-


La Katolikaj Gereĝoj Ferdinando kaj Izabela


Kristoforo Kolombo


La Granda Kapitano Gonzalo de Kordovo


Filipo la Bela

nio, unu elmontro de tiutipa absolutisma reĝa povo estis la decido de la Katolikaj Gereĝoj forpeli el la lando la judojn kiuj ne konsentus iĝi kristanoj. En ilia decido atingi religian unuecon en la lando, tiuj gereĝoj establis la Inkvizician Tribunalon por persekuti ne nur la judismon sed ĉiutipan devion de la doktrino de la RomKatolika Eklezio.

Kaj kion pri la korupto? Ĉu ĝi malaperis kune kun la politika potenco de la nobeloj, kiuj estis la protagonistoj de ĝia praktikado? Tute ne, kiel ni vidos per la daŭrigo de ĉi tiu raporto. La koruptado estas planto kiu adaptiĝas kaj elkreskas en ĉiuj politikaj terenoj: feŭdismo, absolutismo, liberalismo, kapitalismo, socialismo… Ĝuste tiam floris en Hispanio tiu tipo je literaturo nomata "pikareska", kiu priskribas socion en kiu la koruptado estis normala afero en ĉiuj sociaj klasoj. La nomumo de ĉiuj politikaj postenoj: ministroj, gubernestroj, vic-reĝoj de la kolonioj, eĉ episkopoj… dependis de la reĝoj, sed ĉiuj-ĉi postenoj estis fonto de pliriĉiĝo de la nomumitoj.

Ni prikonsideru, ekzemple, la kazon de Kristoforo Kolombo, la fama malkovrinto de la Amerika kontinento. Dum lia vic-reĝado en la amerikaj teritorioj li distingiĝis per sia tiraneco, De 1494 ĝis 1508 proksimume tri milionoj da indianoj mortis en militoj, pro sklaveco aŭ laboro en minoj. La atakoj kontraŭ indianoj kaj la vendo de iuj kiel sklavoj estis malobeo al la eksplicitaj ordonoj de reĝino Izabela, kiu klare esprimis sian volon, ke la indianoj estu traktataj kiel regatoj de Kastilio, t. e. kiel liberaj homoj. Pro tio, Kolombo estis arestita post sia tria vojaĝo kaj sendita ĉenigita antaŭ la reĝino. Li kaj liaj fratoj estis en malliberejo dum ses semajnoj antaŭ kiam la reĝo Ferdinando ordonis ilian liberigon. Post mallonga tempo, la gereĝoj alvokis Kolombon kaj ties fratojn al la palaco en Granado. Tie, la monarkoj aŭskultis la petegojn de la fratoj kaj redonis al ili ilian liberecon kaj riĉecon. Kolombo povis fari kvaran vojaĝon al Ameriko.

Alia notinda kazo de riĉavidemo de la nomumitaj viĉ-reĝoj kaj toleremo far la reĝoj estis tiu de la t. n. «Granda Kapitano», Gonzalo de Kordovo. Ĉi tiu elstaris kiel tre kapabla militisto gvidante la trupojn kiuj en Napolio bataladis favore al la rajtoj de Ferdinando de Aragonio sur tiu regno. Fakte, li gajnis la regnon por Ferdinando. Kvankam tio eble ne estas pli ol legendo, oni diras, ke la reĝo Ferdinando la Katoliko petis

kontojn al Gonzalo pri tio kion li elspezis en Napolio. Ĉi tio estus vidita de li kiel insulto. Oni transskribas la kontojn tiele:

> Por pioĉoj, ŝoveliloj kaj sarkiloj, cent milionoj da dukatoj; por almozoj por ke monaĥoj kaj monaĥinoj preĝu favore al la hispanoj, cent kvindek mil dukatoj; por parfumitaj gantoj, por ke la soldatoj ne flaru la fetoron de batalo, ducent milionoj da dukatoj; por anstataŭigi la sonorilojn difektitajn de la kontinua sonorado de venko, cent sepdek mil dukatojn; kaj, finfine, pro la pacienco devi malsupreniri al ĉi tiuj bagateloj de la reĝo, al kiu mi donis regnon, cent milionojn da dukatoj.

Ĉu la anekdoto veras aŭ ne, la esprimo «la kontoj de la Granda Kapitano» restis kiel frazo farita kiel taŭga respondo por klarigo petita pri io, kio ne decas aŭ oni ne rajtas peti. La fakto mem ke en Hispanio oni taksas tre oportunan tiutipan respondon montras ke en ĉi tiu lando estas ĝenerale akceptata ke la altranguloj kiuj plenumis gravajn servojn rajtas enspezi, eĉ kontraŭleĝe, egajn monsumojn. T. e. en Hispanio la koruptuloj ne perdas la popolan favoron kaj simpation. Pri tio ni vidos abundajn ekzemplojn laŭlonge de ĉi tiu longa raporto.

Kiam okazis tio de la kontoj de la Granda Kapitano, se tio vere okazis, jam estis forpasinta la reĝino Izabela en 1504. Tiam la reĝo Ferdinando jam estis reĝo de Aragonio kaj post la venka kampanjo de Gonzalo de Kordovo li iĝis ankaŭ reĝo de Napolio. Sed dume li estis klopodante al si la akiron de pliaj du regnoj, tiu de Navario, kiun fine li sukcesis konkeri, kaj la alia estis la regno de Kastilio mem. Post la morto de lia edzino heredis la kronon de tiu regno la filino de ambaŭ, Johanino, kiu pasis al la historio kun la kromnomo de "la frenezulino"; ni memoru ke ŝia avino, la patrino de Izabela, estis tute freneza dum la lasta etapo de sia vivo. Tiu Johanino, filino de la Katolikaj Gereĝoj, estis edziniĝinta al Filipo, tiel nomita "la Bela", filo de la imperiestro de Aŭstrio. Fakte estis ĉi tiu kiu reĝadis en Kastilio pro la evidenta mensa malsano de lia edzino. Tiu situacio tute ne plaĉis al Ferdinando kiu ne estis forgesinte ke li havis pli grandan dinastian rajton al la kastilia krono ol sia forpasinta edzino. Lia tiama politiko evidentigas ke li estis intencante ripari la maljustaĵon faritan kontraŭ li far la kastilia partio de Izabela. Li aranĝis novan edziĝon kun la celo naski idon kiu heredos ĉiujn regnojn kiujn li estis kolektint/ant/e. Iuj historiistoj asertas ke li proponis geedziĝon al Johanino, la filino de Henriko la 4-a, tiel misnomata Beltraneĥa, kaj ke ĉi tiu rifuzis la proponon. La afero ne estas verŝajna; tiu ino estis tiam 43-jaraĝa, do, malfacile iu planus igi ŝin patrino.

Ferdinando, ja, edziĝis tiam al princino; temis pri la franca ***Germana de Foix***, kaj ŝi naskis al li filon sed ĉi tiu mortis malmultajn horojn post lia naskiĝo. Do Ferdinando devis rezignacii al tio ke la heredonto de ĉiuj liaj regnoj estu ido de la geparo Filipo la Bela kaj Johanino la Frenezulino. Sed li aranĝis la aferon por efektivigi la faktan regadon de Kastilio dum lia vivo. La juna Filipo mortis en septembro de 1506, malpli ol du jarojn post la forpaso de lia bopatrino Izabela. Ŝajnas ke damaĝis lin io kion li ingestis, eble iu veneno kiun lia bopatro igis provizi al li. Al Ferdinando ne estis politike malfacila enklostrigi sian filinon kies frenezo estis evidenta.


Karolo, hispana reĝo kaj germana imperiestro


Konflikto de la Komunumoj


*Hernán Cortés*


*Francisco Pizarro*

Jam ni diris ke la hispana popolo estas tre tolerema rilate al la koruptado de ĝia altrangularo. Sed kiel ni vidos nun, kaj en aliaj postaj okazoj, la afero ŝanĝiĝas kiam la koruptoj kiuj forrabas nin estas eksterlandanoj. Kiel sciate, la heredinto de la hispanaj regnoj kaj kolonioj, estis Karolo de Gento, nepo de la hispanaj Katolikaj Gereĝoj, de Maksimiliano la germana imperiestro kaj reĝo de Aŭstrio, kaj de Maria de Burgonjo. Tiu junulo, kiam li venis unuafoje al Hispanio, estis aspirante al la imperiestra krono de Germanio, kiu tiam oni asignadis per elektado far la tieaj princoj. Por tiu celo li bezonis multe da mono, do liaj burgonjaj ministroj dediĉiĝis eltiri el ĉi tiu lando kiel eble plej da mono. Ŝajnas ke, kiel kutime okazas en tiaj kazoj, tiu ministraro bone profitis siafavore la altan taskon kiun ili plenumadis. Unu el tiuj fremdaj ministroj fieris pri tio ke ili estis enspezante siafavore la oron kiun la hispanoj estis forrabante el la amerikaj indianoj; tiuj nederlandanoj konsideris la hispanojn siaj propraj indianoj.

Ĉi tio vekis la malkontenton de la hispanoj, aŭ pli ĝuste de la kastilianoj, kaj estiĝis ribelo kontraŭ la regantaro de Karolo. Tiam li ne estis en la lando. Kolektinte sufiĉe da mono por elaĉeti la elektantajn princojn de Germanio, li iris al tiu lando por esti nomumita imperiestro. Tiu milito, nomita “de la Komunumoj”, daŭris du jarojn, kaj finis per la kompleta malvenko de la ribelintoj. Karolo la 5-a venkis, sed li lernis la lecionon: la hispanoj povas esti ĉikanitaj nur de hispanaj friponuloj. De tiam li elektis por regi Hispanion kaj por la vic-regno de Napolio nur hispanajn altragulojn, kaj por tiuj de Ameriko nur kastiliajn.

La rabado kaj ekspluatado de la indianoj daŭris dum la reĝado de Karolo kaj dumlonge poste. En tiu epoko, en Ameriko, antaŭ la vic-reĝoj nomumitaj de la imperiestro iris la konkerantoj. Same kiel okazis en la kazo de Kristoforo Kolombo, la prestiĝo kiun tiuj uloj ĝuas en la historio ne akordas kun moralaj personaj kvalitoj. Ni vidu la kazojn de la du plej gravaj el tiutipaj homoj: ***Hernán Cortés*** kaj ***Francisco Pizarro***. La unua estis filo de malaltranga nobela familio, kiu destinis lin studi juron. Li studis en Salamanko dum du jaroj, sed li volis aventuri kaj intencis iri al Italio por aliĝi al la armeo de la Granda Kapitano, sed li ne sukcesis tion fari. Translokiĝinte al Ameriko, li laboris dum

iom da tempo en la insulo Hispaniolo kiel ŝtatoficisto kaj poste adresiĝis al Sankta Domingo. En 1511 li partoprenis en la ekspedicio de Diego Velázquez en la konkero de Kubo. En Kubo li rolis dum iom da tempo kiel urbestro de iu municipo. Sed li emis al pli ambiciaj celoj. En tiu medio, kie li interrilatis kun aliaj ambiciuloj, li gajnis al si potencajn amikojn kaj malamikojn. Fakte, la cetero el lia vivo estis plena je aventuroj de malkovro kaj konkerado de novaj teritorioj por Kastilio kaj je konfliktoj kun liaj personaj malamikoj. Kompreneble, la tasko de la konkerantoj estis la milito, la masakrado de indianoj. ***Hernán Cortés*** distingiĝis pri krueleco inter tiuj kruelaj kaj rab-avidaj ambiciuloj de la konkeranta medio. En 1519 li komandis 11 ŝipojn kun pli ol kvincent soldatoj kaj batalis kontraŭ la indiĝenoj en kelkaj lokoj de la meksikia teritorio. Kun lia trupo, li daŭre trairis teritorion ankoraŭ ne kaptitan kaj ekloĝis en meksikia urbo kvazaŭ fortikaĵo, kaj daŭre esploris la zonon kaj venkis la indiĝenojn kiuj frontis ilin. La hispanoj ricevis multe da riĉeco de la indianoj, foje kiel bonvena signo kaj foje pensante ke ilia teritorio ne estos konkerita. La milita supereco de la hispanoj, kaj de ĉiuj eŭropanoj ĝenerale en Ameriko baziĝis sur la posedo de rimedoj kiuj mankis al indiĝenoj; ĉi tiuj ne konis la feron kaj ne posedis ĉevalojn. ***Cortés*** ankaŭ profitis siafavore la kverelojn inter la indianaj triboj. Li sukcesis regi la plej grandan parton de la meksika teritorio.

Alveninte al la azteka ĉefurbo regata de ***Moctezuma***, la hispanaj trupoj instaliĝis tie kaj kaptis la reĝon. Kiam ĉi tiu mortis la aztekoj atakis la hispanojn kaj ĉi tiuj suferis malvenkon kaj devis eskapi el la urbo dumnokte. Krome poste ***Cortés*** devis alfronti hispanajn trupojn senditajn kontraŭ li de lia persona malamiko ***Diego de Velázquez***, reganto de Kubo. Post venki ilin, ***Cortés*** aliĝis al si tiujn hispanajn soldatojn por repreni la atakon al la azteka ĉefurbo, tiam regata de ***Guatemoc***. La fina konkero de la tuta meksikia teritorio, atingita post ega masakrado de la azteka loĝantaro far la trupoj de ***Hernán Cortés***, konstituis kolosan gajnon por Kastilio kaj la imperiestro Karolo. Ĉi tiu ordonis al ***Cortés*** reveni en Hispanion por respondi pri akuzoj faritaj kontraŭ li. ***Hernán*** estis absolvita de la tribunalo kaj la imperiestro eĉ aljuĝis al li iun nobelan titolon kaj permesis al li reveni en Amerikon por daŭrigi la konkeradon de teritorioj. Tamen ***Cortés*** neniam atingis ke oni asignu al li la vic-reĝadon de iu teritorio, kio estis lia plej kara revo. Kun tia elreviĝo li mortis poste en Hispanio estante 61-jara.

La historio de ***Francisco Pizarro*** estis iome simila en kio koncernas al ambicio, perforto, rabemo, aŭdaco kaj konkurado kun aliaj hispanaj konkerantoj. Li estis filo de iu infanteria kolonelo de la armeo kiu estis batalinta en Napolio subgvide de la Granda Kapitano. Oni scias ke certe li estis preskaŭ seneduka kaj analfabeta. Kiam la sciigo de malkovro de la Nova Mondo alvenis al Hispanio, li estis en Seviljo kaj li enŝipiĝis por la Nova Mondo en la jaro 1509 kaj partoprenis en ekspedicioj de esplorado kaj konkero subkomande de gravaj konkerantoj kiaj ***Alonso de Ojeda***, ***Vasco Nuñez de Balboa*** kaj ***Pedro Arias de Ávila***, kaj intervenis en la disputoj kaj kvereloj estiĝintaj inter tiuj kapitanoj. Ambiciulo kia li estis,

en 1522 li aranĝis sian propran ekspedicion en asocio kun ***Diego de Almagro*** kaj la pastro ***Hernando de Luque*** celante eksplori kaj konkeri en SudAmeriko. La kunsocianoj interakordis kune konkeri kaj egale dispartigi inter si la riĉan imperion kiun ili celis kapti. Ilia ekspedicio progresis suden laŭ la okcidenta marbordo de Suda Ameriko, sed ne atinginte la esperitan sukceson kaj profiton, plejparto el la ekspedicianoj ne kuraĝis sekvi antaŭen. ***Pizarro***, restis dum monatoj en eta insulo kun nur dektri sekvantoj, sen ŝipo kaj sen provizaĵoj. Sed ilia obstino fine donis frukton: ili atingis ian scion pri la inkaa perua imperio.
Ĉar la hispanaj aŭtoritatoj de Panamio ne kuraĝis entrepreni la mision konkeri tiun imperion, ***Pizarro*** decidis rekte peti helpon al la reĝo, kaj tiucele al li revenis en Hispanion en 1528. La imperiestro Karolo la 5-a nomumis lin vicreĝo kaj armeestro de provinco en la zono, distance proksimume milon da kilometroj el la novmalkovrita teritorio. Al liaj kunsocianoj, tamen, oni asignis malgravajn taskojn kaj rangon. En la daŭro de ses monatoj ***Pizarro*** devis pretigi ekipitan forton de ducent kvindek militistoj, kaj oni rajtigis lin elpreni plian centon el la kolonioj. Eĉ sen atingi sufiĉe da volontuloj, li kuraĝis entrepreni la mision kaj reenŝipiĝis destine al Ameriko. Poste lia frato Hernando unuiĝis al li kun kromaj aventuristoj. La ekspedicio eliris el Panamio fine de 1531. En la inkaa urbo ***Kajamarca***, ***Pizarro*** renkontis la plejsuperan reĝon ***Atahualpa***, kaj tuj estiĝis batalo en kiu la hispanoj amase mortigis la indianan armeon kaj eĉ kaptis la reĝon mem. ***Pizarro*** kondutis tiele same kruele kaj malhoneste kiel ***Hernán Cortés*** en Meksikio. Jam ni klarigis la kialon de la milita supereco de la hispanoj sur la armeoj de la indianoj. Konkerinte la inkaan imperion, ĉar la ĉefurbo Kuzko estis tro malproksime de la maro por taŭgi kiel hispana ĉefurbo de Peruo, ***Pizarro*** fondis la novan urbon, Limo, komence de 1535. La sekvaj jaroj estis signitaj de la konfliktoj de malakordo inter ***Pizarro*** kaj Almagro pri la limoj inter las respektivaj teritorioj kiujn ili estis konkerinte. Almagro estis venkita kaj mortigita en 1538; sed liaj partianoj poste konspiris kaj murdis ***Pizarro***-n en 1541. Tiuj konfliktoj inter la hispanaj konkerintoj kaj regantoj en Ameriko estis tre oftaj; verdire temis pri kvereloj propraj de bandoj je gansteroj, kio ili reale estis.
Krom tiu gansterismo kaj koruptado de la koloniisma imperio de Karolo la 5-a, ankaŭ en la kortego estis la kutima koruptado de la funkciuloj kiuj profitis sian postenon por pliriĉiĝi pli malpli eksterleĝe. En la kazo de tiu imperiestro la afero komplikiĝis pro la fakto ke la landa administrado ne ĉiam koincidis kun la kortego ĉar ĉi tiu ne havis fiksan lokon. Dum la tuta daŭro de la reĝado de Karolo li estis senĉese vojaĝante de iu loko al alia de lia ampleksega regnaro. Li heredis el ĉiuj liaj geavoj ampleksajn regnojn kun malsamaj kutimoj, lingvoj, leĝoj... kaj krome en tiu epoko ekestis la Reformo, krome kun kamparanaj revolucioj, en iuj el liaj regnoj. Resume, la ensemblo de la ŝtatoj kiujn li devis regi konstituis aferon malfacile demarŝeblan eĉ por geniulo de la politiko, kia li ne estis. La plej saĝa decido de li prenita estis abdiki en 1555, kiam li estis 55-jara, kaj retiriĝi al iu monaĥejo por pasigi tie, en trankvila etoso, la lastajn tri jarojn de sia vivo.

Lia filo Filipo la 2-a ne heredis ĉiujn posedaĵojn de sia patro. Germanio kaj Aŭstrio restis for de lia zorgado, sed Filipo iĝis suvereno de Kastilio (kiu inkluzivis la amerikajn teritoriojn), Aragonio (kiu inkluzivis la italajn reĝlandojn Sardio, Napolio kaj Sicilio), Burgonjo (Nederlando, Luksemburgio kaj Franĉ-Konteo) kaj la duklando Milano. La kolonia imperio de Kastilio en Ameriko estis tiam en plena ekspansio. Krome dum la reĝado de Filipo la 2-a aldoniĝis al liaj dominioj Filipinoj kaj aliaj lokoj en Azio, kaj li sukcesis havigi al si ankaŭ Portugalion kun ties ankaŭ disvastiĝanta kolonia imperio en Ameriko, Azio kaj alie. Krome li aspiris ankaŭ kapti la politikan povon en Anglio, kiu baldaŭ entreprenus konkeri sian propran kolonian imperion.



Filipo la 2-a

Ni pritemos la kazon de la plej fama el la sekretarioj aŭ ministroj de la reĝo Filipo: ***Antonio Pérez***. Li estis filo de la pastro ***Gonzalo Pérez*** **k**iu estis sekretario pri ŝtataj aferoj de la imperiestro Karolo kaj poste ankaŭ dum la komenca etapo de Filipo. ***Gonzalo Pérez*** mortis en 1566 kaj lia filo Antonio estis nomumita ministro unu jaron poste, kvankam liaj funkcioj reduktiĝis kompare kun tiuj de lia patro, transprenante nur atlantikajn aferojn (Nederlando, Francio, Anglujo kaj Germanio). Per sia sekretariejo en la Konsilio de Kastilio li ankaŭ havis aliron al la interna korespondado. Sed aliaj funkcioj, kiel la Mediteraneaj aferoj estis asignitaj al aliaj ministroj.



*Antonio Pérez*

Dum liaj unuaj dek jaroj kiel sekretario, ***Antonio Pérez*** havis grandan influon sur la reĝo, kiu kutime sekvis liajn konsilojn, agnoskante lian inteligenton kaj konon pri ŝtataj aferoj. Ĉi tiu reĝa konfido utilis al la lerta ministro por atingi pli da potenco kaj, kiel la plej multaj el siaj samtempuloj, riĉigi sin en sia pozicio. Post la morto de la princo de ***Éboli***, alia tiama influa ministro, en 1573, ***Antonio Pérez*** komencis sian asocion kun ***Ana de Mendoza de la Cerda***, princino de ***Éboli***, kio estis tre utila por Antonio plibonigante lian rilaton kun la aristokrataro, kaj kio alportis financan profiton al ambaŭ. ***Antonio Pérez*** malkaŝis ŝtatajn sekretojn al la princino kaj ambaŭ kune trafikis registarajn informojn. Kontraŭ li estis la duko de ***Alba***, la familio ***Álvarez de Toledo*** kaj la grafo de ***Barajas***.



La princino de *Éboli*



Donkiĥoto kaj la galeruloj

Dum la regado de Johano de Aŭstrio en Nederlando, ***Antonio Pérez*** kaj liaj aliancanoj konsilis al la reĝo interakordi pacon kun la ribeluloj kaj invadi Anglujon, konsilo, kiun la

reĝo ignoris momente ĉar li ne konsideris sin preta por tia invado. Pro nekonataj kialoj, ***Antonio Pérez*** ludis kun la jam streĉaj rilatoj inter Filipo la 2-a kaj lia frato Johano de Aŭstrio kaj prezentis ĉi ties asertojn pri Anglujo antaŭ la okuloj de la reĝo kiel konspiron. En 1578, ***Juan de Escobedo*** (la sekretario de Johano de Aŭstrio) alvenis al la Kortego por klarigi al la reĝo la pozicion de sia majstro, kiu povus malkovri la falsaĵojn de Antonio. Pro tio, ĉi tiu atribuis al ***Escobedo*** la ambiciojn de Johano kaj konsilis al la reĝo malaperigi lin. Ŝajnas ke la reĝo konsentis ke ***Escobedo*** estu likvidata. ***Antonio Pérez*** malsukcesis je iu provo de venenado, sed poste li dungis grupon de murdistoj, kiuj mortigis ***Escobedo***-n en Madrido en marto de 1578. Disvastiĝis onidiro pri la partopreno de ***Pérez*** en tiu murdo, sed Filipo la 2-a komence provis protekti la sekretarion, eble pro sia propra kulpo, sed kiam lia frato Johano mortis kaj liaj dokumentoj alvenis al Madrido, li malkovris la komploton kaj mensogojn de ***Antonio Pérez***, rimarkante, ke lia frato ĉiam estis lojala. Konsiderante sin perfidita, la reĝo komencis malfidi la asocion de ***Antonio Pérez*** kaj la princino de ***Éboli***, kaj suspektis pri komerco je ŝtataj sekretoj.

En julio de 1579, ***Antonio Pérez*** estis apartigita el siaj funkcioj en la kortego kaj la princino de Éboli estis enŝlosita en sia propra palaco en Pastrana, kie ŝi pasigis la ceteron de sia vivo. Poste, la familio kaj amikoj de ***Eskobedo***, sukcesis ke oni arestu Antonion en 1585 pro akuzoj pri trafiko de sekretoj kaj koruptado (por ne mencii murdon); li estis trovita kulpa kaj kondamnita al du jaroj da malliberejo kaj grandega monpuno. En 1590 li nur sub torturo agnoskis sian partoprenon en la murdo de ***Escobedo***.

En aprilo 1590, helpita de sia edzino, ***Juana Coello***, Antonio eskapis el sia prizono en Madrido kaj fuĝis al Zaragozo, kie li akiris la protekton de la foruoj. En la Regno de Aragonio li atingis la apogon de pluraj membroj de la malalta nobelaro. Filipo la 2-a faris akŭzon antaŭ la Aragona Justico kontraŭ ***Antonio Pérez*** pri murdo de ***Escobedo***, trafiko de ŝtataj sekretoj kaj eskapo el malliberejo. Sed poste, malespera pro la lanteco de la aragona justico, la reĝo faris kontraŭ Antonio akuzon kiu koncernus al la Inkvizicio. Antonio Pérez estis translokita en la malliberejon de la Inkvizicio, sed liaj defendantoj organizis ribelon en Zaragozo. Post pluraj prizonaj translokigoj, liaj subtenantoj liberigis lin, rezultigante krizon en Aragonio pro la defendo de la foruoj. En oktobro 1591 Filipo la 2-a sendis armeon al Zaragozo. Kiam ***Juan V de Lanuza***, Plejalta Juĝisto de Aragonio, estis ĉe la avangardo de la protestoj, li estis arestita kaj ekzekutita sen antaŭa avizo, kio ĉesigis la ribelon. ***Antonio Pérez*** fuĝis for de la dominioj de Filipo la 2-a, por resti en ekzilo ĝis sia morto en 1611.

La kazo de Antonio Pérez estis notinda ekzemplo de la koruptado de la politikistoj de tiu epoko, sed tute ne estis izolita kazo. Plejmulte el la vicreĝoj, ministroj kaj ceteraj altranguloj profitadis sian postenon por pliriĉiĝi kiel eble plej. Ne nur la alt-rangaj sed ankaŭ la mez-rangaj kaj la malalt-rangaj funkciuloj klopodadis eltiri profiton el siaj ŝtataj oficoj. Tion iome respegulas la fama tiama verko

Donkiĥoto, en la teksto-peco pri la galeruloj. Kiam Donkiĥoto demandas al tiuj katenitaj homoj la kialon de ilia malliberiĝo, unu el ili respondis:

—Mi pasos kvin jarojn en la plej moŝtindaj moŝtoj, la ***gurapas***, ĉar mankis al mi dek dukatoj.

—Mi volonte donus dudek por eltiri vin el ĉi tia sorto.

—Tio —respondis la galerulo— igas min pensi pri homo, kiu kun mono meze de la oceano mortas je malsato, ĉar li ne trovas lokon, kie li povus aĉeti kion li bezonas. Mi diras tion, ĉar, se mi havus siatempe la monon nun proponitan de via moŝto, mi estus ŝmirinta per ĝi la plumon de la aktisto kaj vigliginta la ruzon de la prokuroro, tiel, ke hodiaŭ mi troviĝus en la placo Zocodover de Toledo, ne sur ĉi vojo kaj ligita kiel levrelo. Sed Dio estas granda; kaj nur paciencon oni bezonas.

La ***gurapas***, al kiu oni kondamnis tiun ulon estis la galeroj. Nu, li ne povis liberiĝi el tia destino ĉar mankis al li mono por aĉeti la favoron de la notario kaj la prokuroro. Cervanto, la aŭtoro de tiu verko, bone konis la korupton ekzistantan en la malaltaj ŝtupoj de la administracio. Li mem pasigis tri monatojn en malliberejo en Seviljo akuzita esti alpropriiginta al si publikan monon dum la plenumado de sia funkcio kiel impost-kolektisto. Tri monatoj da malliberiĝo ŝajnas leĝera puno pro rabado al la ŝtata fisko; eble li disponis je kelke da dukatoj por ŝmiri la manon de la justicaj funkciuloj.

La enprizoniĝo de Cervanto daŭris de septembro ĝis decembro de la jaro 1597. Ĝuste unu jaron poste, en decembro de 1598, mortis la reĝo Filipo la 2-a kaj heredis la tronon de la hispana imperio lia filo Filipo la 3-a. Tiam komenciĝis la etapo de koruptado de ministro pli monavida ol ***Álvaro de Luna***. Temas pri ***Francisco Gómez de Sandoval-Rojas y Borja***, markizo de ***Denia*** kaj grafo de ***Ampudía***, pli konata laŭ lia titolo Duko de ***Lerma***, kiun aljuĝis al li Filipo la 3-a. Tiu nobelo estis edukita en la kortego de Filipo la 2-a, kie lia familio ĝuis egan influon. Lia patrina avo estis ***Sankta Francisco de Borja***, kio signifas ke inter lia praularo estis la reĝo Ferdinando de Aragonio kaj la papo Aleksandro la 6-a. Li estis la plej potenca homo dum la reĝado de Filipo la 3-a. Li fariĝis ege riĉa tial ke li sciis profiti influon, korupton kaj vendon de publikaj oficoj. Pro lia pozicio kiel la ministro de la reĝo, li iĝis la plej proksima kaj influa homo sur la monarko, eĉ igante lin transdoni la Kortegon de Madrido al Valadolido (1601). La duko estis antaŭe akirinte, je malalta prezo, terenojn kaj konstruaĵojn en tiu urbo, do la translokigo de la kortego igis plialtiĝi la prezo de tiuj propraĵoj ĉar la korteganoj bezonis instaliĝi tie, kaj la duko akiris egan gajnon vendante tiujn nemoveblaĵojn, kiel tiu nomata ***Huerta de la Ribera***, vendita al la reĝo mem. Li ankaŭ estis aĉetinta la palacon de ***Francisco de los Cobos***, kiun li ankaŭ vendis al la reĝo kaj kiu estis konvertita en reĝan palacon.

Verdire, la duko de Lermo neniam intencis tute forlasi Madridon; ĉio estis anticipe preparita. Dum la kvin jaroj kiam la kortego estis en Valladolido tre malaltiĝis la prezo de la palacoj en en Madrido. La lerta duko profitis la okazon por investi monon aĉetante tiujn konstruaĵojn. Laŭ konservitaj dokumentoj oni scias ke jam en 1603 okazis iuj manovroj kaj interkonsentoj inter la urbestro de Madri-

do kaj la duko. La reveno de la kortego de Filipo la 3-a al Madrido en 1606 fariĝis ankaŭ per la influo kaj konsiloj de la Plejalta Ministro. Ĉi tiu povis vendi altekoste tiujn nemoveblaĵojn.


Filipo la 3-a

La potenco de la duko de ***Lerma*** estis enorma: li administris la reĝan sigelon kiel Pleajalta Majordomo de la Reĝo. Fakte, estis li kiu vere regis la hispanajn regnojn kun ĉiuj ties kolonioj, kaj kiu mem prenis ĉiujn politikajn decidojn inter 1599 kaj 1618. La plej gravaj okazaĵoj de lia mandato estis en 1609 kun la subskribo de la armistico kun Nederlando kaj la elpelo de la maŭra loĝantaro el Hispanio.



La Reĝino Margarita, edzino de Filipo la 3-a, ne estis favora al la misuzoj kaj influo de la duko de ***Lerma***, kaj estis ankaŭ multaj malkontentaj konsilistoj. Estis enketo pri la financoj (aŭda procezo), kiu malkovris la reton de korupteco kaj malregulaĵoj. Komencis fali kulpuloj kaj implikitoj, interalie, la favorato de la duko, ***Rodrigo Calderón de Aranda***, grafo de ***la Oliva de Plasencia***, ekzekutita en la Plejgranda Placo de Madrido en 1621, komence de la reĝado de Filipo la 4-a. Pro la premo estiĝinta kontraŭ la reĝimo, kaj la danĝero kiu minacis lin, la duko de ***Lerma*** aplikis strategion kiu savus sian vivon: li petis de Romo la ĉapelon de kardinalo, donita al li en 1618, samtempe ke la reĝo permesis al li retiriĝi al siaj posedaĵoj en la urbo ***Lerma***. Li mortis en 1625, retiriĝinta el la publika vivo. Kiam oni aljuĝis al li la rangon de kardinalo, famiĝis en Madrido kopleto diranta: ***Para no morir ahorcado, el mayor ladrón de España, se viste de colorado*** (Por ne morti pendumita, la pleja hispana rabisto iĝas ruĝ-vestita).


*Francisco Gómez de Sandoval-Rojas y Borja*, **Plejalta Majordomo, Plejalta Grumo kaj Plejalta ministro de Filipo la 3-a, unua duko de *Lerma*, unua grafo de *Ampudia*, 5-a markizo de *Denia*, kaj kardinalo.**

Iuj historiistoj pretendas ke tiu famo pri la korupteco de la duko de ***Lerma*** ne alĝustiĝas al la realo. Ili konsideras ke la duko estis viktimo de komploto, reĝisorita de ***Gaspar de Guzmán y Pimentel***, grafo-duko de ***Olivares***, de ***Luis de Aliaga***, aragona dominikano nomumita konfesanto de la reĝo sub la influo de ***Lerma***, kaj de ĉi ties propra filo, la duko de ***Uceda***, kiu ambiciis anstataŭi sian patron kiel reĝa favorato. Kompreneble, ni ne povas esti certaj rilate al io pri kio la historiistoj polemikas, sed evidentas ke, ĉu veras la korupteco de la duko de ***Lerma*** aŭ la komploto kontraŭ li, ambaŭ aferoj malfavore atestas pri la hispanaj politikistoj de la epoko. Kaj ĉiukaze, ambaŭ teorioj povas esti veraj; ne estas kontraŭdiro inter ili, sed vera kongrueco.


Iu grava merito kiun oni devas agnoski al la duko de ***Lerma*** estis ke dum sia regado li klopodis teni la landon (la egan hispan-portugalan imperion) for de militaj konfliktoj. Li metis finon al la milito kun Nederlando, heredita el la antaŭa reĝado, kaj ne iniciatis aliajn militojn. Tiutempe en Hispanio, ekzistis inter la politikistoj ega kontraŭdiro pri tiu temo. Kontraŭ la partio de la paco, estrita de ***Lerma***, poziciiĝis la partianoj de la milito: konkeremaj militistoj, financistoj kiuj pliriĉiĝas investante en militajn aferojn: pruntedonante monon al la regantaro, provizante la armeojn… La plej elstara figuro de tiu partio de la milito estis la duko de ***Osuna***. Li estis, dum la reĝado de Filipo la 3-a, vic-reĝo unue en Sicilio kaj poste en Napolio. Ekde ĉi-lasta posteno li organizis, proprainiciate, komploton kaj militan operacion por kapti Venecio-urbon kaj konkeri ĉi ties respublikon por Hispanio. En tiu operacio kunlaboris kun li kiel diplomato kaj spiono la fama verkisto ***Francisco de Quevedo***. La operacio tute kontraŭis la politikon deciditan en Madrido, do ***Osuna*** trafis en malfavoron en la hispana kortego, estis elpostenigita, procesita kaj enfermita en malliberejon, kie fine li mortis.


Fine de la reĝado de Filipo la 3-a, la situacio estis ŝanĝiĝante en Hispanio. Kiel dirite, la duko de ***Lerma*** retiriĝis senhonore, kaj baldaŭ poste mortis la reĝo. Lia sukcedinto, Filipo la 4-a, havis sian propran favoraton: ***Gaspar de Guzmán y Pimentel Ribera y Velasco de Tovar***, grafo de ***Olivares***. La titolo ampleksiĝis poste al «grafo-duko de ***Olivares***» kiam la reĝo aljuĝis al sia ministro dukecan rangon. ***Olivares*** havis saman povon kiel havis ***Lerma*** dum la antaŭa reĝado. Kaj komence li ĝuis eĉ la popolan favoron tial ke la nova registaro entreprenis purigadon de la koruptuloj de la ŝtata administracio. Kiel dirite, estis punmortigita la favorato de ***Lerma***, ***Rodrigo Calderón de Aranda***, grafo de ***la Oliva de Plasencia***.

Neniu povus akuzi Grafo-Dukon de ***Olivares*** je koruptado, sed lia regado estis ruiniga por Hispanio pro aliaj kialoj. Li baldaŭ sin vidis implikita en la dinamiko de la milito kiun postulis potenca partio de la hispana nobelaro kaj kiun trudis la situacio mem de Hispanio kiel unuaranga potenco en la mondo. Dum la periodo inter 1621 al 1643, kiam li regadis la hispanan imperion kiel favorato de Filipo la 4-a, li ne povis entrepreni la gravajn reformojn de la administracio


***Rodrigo Calderón de Aranda***, **grafo de *la Oliva de Plasencia***


**Filipo la 4-a**


**Grafo-Duko de *Olivares***


***Francisco de Quevedo***

kiujn li elpensis ĉar li devis atenti pri la gravaj konfliktoj kiuj denove prezentiĝis al Hispanio en Eŭropo, ĉefe en Nederlando. Krome tiu periodo de la regado de ***Olivares*** koincidis ene de la daŭro de la 30-jara Milito (1618-1648) kiu tiom efikis sur Germanio kaj Aŭstrio regataj de la habsburga dinastio, same kiel Hispanio. Nia lando ne povis resti for de tiu konflikto. Estis kelkaj gloraj batalaj venkoj en tiuj militoj, sed la fina rezulto estis ke la hispana monarkio perdis teritoriojn en Nederlando, kaj krome definitive disiĝis Portugalio kun ties ega kolonia imperio. En la fina etapo de la regado de la grafo-duko estiĝis ankaŭ milita konflikto en Katalunio; post pluraj malvenkoj de la reĝaj trupoj en tiu regiono, Katalunio estis fakte sendependa dum dek jaroj (1642-1652).
Sed ekde 1643 jam ne plu okupiĝis pri la aferoj de la regno la grafo-duko de ***Olivares***. Liaj politikaj malamikoj sukcesis apartigi lin el la reĝa favoro, kie li estis anstataŭita de lia nevo la duko de Haro. Dum la regado de ***Olivares*** ĉi ties havaĵo tute ne kreskis, sed tute male, ĝi malboniĝis tial ke li malatentis ĝin por plendediĉiĝi al la servo de la regno. Sed tio ne signifas ke malaperis la koruptado en la sferoj de la ŝtata administracio aŭ ke ĉi ties funkciado pliboniĝis tiorilate. Oni povas konstati tion legante la pikareskajn verkojn de tiu epoko, konkrete iujn tekstojn de ***Francisco Quevedo***, «La sonĝoj» kaj «La ***Buscón Pablos***», kiuj priskribas la tiaman socion. ***Quevedo*** mem estas interesa kaj pitoreska specimeno de la politikaj aktivuloj de la epoko. Ni jam menciis ke li agadis kiel diplomato kaj spiono serve de la duko de ***Osuna*** en tiu stranga venecia konspiro favore al Hispanio sed kontraŭ la politiko de la tiama registaro de Hispanio. ***Quevedo*** saviĝis el la purigado de la partianoj de ***Osuna***, kaj ĉar poste baldaŭ estiĝis en la hispana kortego pli favoraj kondiĉoj por la partianoj de la milito, li sin metis serve de ***Olivares*** kiel spiono kaj politika konspiranto. Tiutipa agado, pro sia propra naturo, estas sekreta, do, ankoraŭ nuntempe la historiistoj ne havas klaran scion pri la operacioj en kiuj li intervenis kaj la rolo kiun li ludis en ili. Estas konate ke fine li estis enkarcerigita laŭordone de ***Olivares***. Oni spekulacias kun la teorio ĉu ***Quevedo*** perfidis la hispanan ĉefministron kaj sin metis serve de ***Richelieu*** en iu el tiuj komplikaj intrigoj de la epoko. Konante la politikan idearon de ***Quevedo***, bone respegulitan en lia verkaro, ne estas verŝajna tiu teorio de perfido lia favore al fremda potenco. Pli kredebla estas la ebleco ke li estus aginta propriainiciate en iu ajn afero pri kiu li malkonsentus kun la vidpunkto de la favorato.
Ĉiukaze, eĉ se la temo estas sufiĉe interesa kaj fascina, ĝi falas for de la celo de nia raporto, kiu estas tiu de la koruptado en Hispanio. La nova ĉefministro, Ludoviko de Haro, sukcesis solvi kelkajn el la problemoj hereditaj de ***Olivares***, kiel tiu de Katalunio, sed male ol en la kazo de lia onklo, lia havaĵo ne malboniĝis, sed tute male, dum lia regado. Sed por troviĝi antaŭ alia skandala kazo de korupta ĉefministro, ni devas priatenti la sekvintan reĝadon, tiun de Karolo la 2-a, filo de Filipo la 4-a. Kiam ĉi lasta mortis, en la jaro 1665, estis pasintaj kvar jaroj ekde la morto de la efika ministro Ludoviko de Haro, kaj la princo Karolo estis infanaĝa (10-jara). La reĝo Filipo timis ke lia alia filo, la bastarda ***Juan José de Austria***, tiam

34-jara, estus perturba elemento dum la neplenaĝo de la juna Karolo. Tial li dispoziciis per sia testamento ke la reĝino Mariana de Habsburgo rolu kiel regentino akorde kun la Ŝtata Konsilantaro ĝis la plenaĝo de la filo de ambaŭ.

El la 29 bastardaj idoj de Filipo la 4-a, ***Juan José*** estis la sola kiu ricevis oficialan agnoskon. Dum la jaroj 1647 al 1661 li plenumis, laŭ ordonoj de sia patro, kelkajn politikajn kaj militistajn misiojn; interalie, li komandis la armeon kiu metis finon al la ribelo de Katalunio, dum la regado de la duko de Haro. La gravaj postenoj kiujn li okupis vekis lian ambicion. La reĝino sentis egan antipation al tiu bastardo kaj atingis ke la reĝo forigu lin el la kortego kaj ekzilu lin al ***Consuegra***. Post la morto de Filipo, lia vidvino profitis sian rolon de regentino por plirangigi ŝian konfesprenanton, la aŭstra jezuito ***Juan Everardo Nitard***. Ĉi tiu rolis kiel fakta privato aŭ ĉefministro dum tri jaroj. Al ***Juan José de Austria*** ne rezultis malfacile forpeli tiun fremdan entrudulon kiu, cetere, ne estis lerta politikisto. Al la hispanoj ne plaĉas la fremdaj regantoj, kaj la opono al li igis kreski la popolan apogon al la reĝa bastardo. Okaze de serioza ribelo kontraŭ li, ***Nitard*** rezignis sian postenon kaj ekziliĝis.

La reĝino Mariana ne povis eviti la falon de ŝia konfesprenanto sed ŝi plu manovris por bari la aliron de ***Juan José de Austria*** al la politika potenco. Ŝia sekva mispaŝo estis promocii ulon el ŝia interna rondo, konkrete, la edzon de unu el ŝiaj damoj. La ulo, ***Fernando Valenzuela***, estis humil-devena, ne nobelo, kio altiris al li la malaprecon de la kortega nobelaro. Kiel politikisto li ne estis malpli taŭga ol ***Nitard***, eble male, sed li estis pli ruza kaj lerta ol la jezuito por la kortegaj maĥinacioj. Dum la regado de ***Nitard*** li rolis kiel konfidenculo de tiu ministro kaj de la reĝino, por informi ilin, kvazaŭ spiono, pri la intrigoj de la kortego. Lia plirangiĝo estis iompostioma; komence li rolis kvazaŭ sekretario de la regentino por demarŝi ĉi-ties korespondadon kun ***Nitard***, en 1671 li estis nomumita kavaliro de la ordeno de Sankta Jakobo kaj enkondukanto de ambasadoroj, en 1674 oni aljuĝis al li la postenon de Konsiliano pri Italio, la sekvan jaron li estis nomumita markizo de ***San Bartolomé de Villasierra***, poste li estis ankaŭ kapitan-generalo de Granado kaj fine, jam post la atingo de la leĝa plenaĝo de la reĝo Karolo, ĉi tiu, konsilita de sia patrino, igis lin reĝa sekretario kaj asignis al li la plej altan nobelan rangon en la lando: “Hispana Grandulo”.


**Karolo la 2-a**


**Mariana de Habsburgo**


***Juan Everardo Nitard***


***Fernando Valenzuela***


***Juan José de Aŭstria***

Sed tiu oficiala laŭgrada plirangigo de ***Valenzuela*** ne respegulis la realan situacion; fakte, li estis vera favorato dum tiuj sep jaroj kaj regadis kiel ĉefministro. Kaj li lerte profitis la situacion por pliriĉiĝi pere de vendado de publikaj oficoj. Estis multaj "interesaj" postenoj en la administracio de la granda kolonia imperio, en Hispanio mem, en la italaj dependantaj regnoj kaj aliaj lokoj. La plejalta reganto povis elekti por tiuj oficoj kaj postenoj siajn amikojn, aŭ simple vendi ilin. Tio kio igis "interesaj" tiujn postenojn estis la fakto ke iliaj posedantoj povis siavice pliriĉiĝi ankaŭ ili. La koruptado, do, fluis de supre al malsupre kaj estis ĝenerala. ***Valenzuela*** ne kreis tiun sistemon, sed li sciis profiti ĝin tiom efike kiom estis same farinte la duko de ***Lerma***.

Sed ***Valenzuela*** estis plebo-devena, la aristokrataro konsideris lin parvenuo. Elektinte lin, la reĝino Mariana atingis ĝuste malan rezulton ol ŝi celis. Aldoniĝis al la partio de ***Juan José de Austria*** multaj nobeloj kiuj, en aliaj cirkonstancoj, neniam estus farinte tion. Ĉiuj granduloj kaj la plej altaj korteganoj konspiris kontraŭ la fiera favorato. La reĝa bastardo, ***Juan José***, ĝuis la apogon de la tuta lando kiam li entreprenis ion kio povas esti konsiderata kiel militista puĉo kaj eniris en Madridon komandante trupojn favoraj al li. La 25-an de decembro de 1676, vidante sin perdita, ***Valenzuela*** fuĝis al la Eskorialo, en kies monaĥejo li estis arestita la sekvan 22-an de januaro. Li estis juĝita kaj kondamnita al la perdo de liaj titoloj kaj posedaĵoj, kiuj valoris 10 milionojn da realoj, kaj ekzilita al Filipinoj. Post enklostrigi la reĝinon Mariana en monaĥinejon, por ke ŝi ne influu sur sian tro influeblan filon, ***Juan José de Austria*** povis roli kiel ĉef-ministro de la reĝo, lia frato, dum la lastaj tri jaroj de sia vivo. Kiam li mortis en 1679 li lasis aranĝita la edziĝon de Karolo la 2-a al iu franca princino.

Jes, la unua edzino de Karolo la 2-a estis francino, ***María Luisa de Orleans***, nevino de la franca reĝo Ludoviko la 14-a kiu tiom multe estis farinte por forpreni teritoriojn de la hispana krono (la perdo de Luksemburgo okazis dum tiu reĝado). Tiu hispana reĝino mortis pro apendicito 10 jarojn poste sen esti naskinta unu heredonton por la krono. La dua edzino de la hispana reĝo estis Mariana de Noeburgo, bofratino de la germana imperiestro. Estas altsignife la fakto ke ambaŭ edziĝoj de la reĝo Karolo rilatis al la eŭropaj potencoj kiuj, fine de lia reĝado permilite konkuris por lia heredaĵo. Ĉar, jes ja, tiu monarko mortis, fine de la jaro 1700, estante relative juna, 38-jara, sen generi iun heredonton. Kvankam lia alnomo "la Sorĉita" devenis de la atribuo de lia bedaŭrinda fizika stato al sorĉado kaj diablaj influoj, estas verŝajne, ke la sinsekvaj endogamiaj geedzecoj de la reĝa familio kaŭzis liajn gravajn sanajn problemojn, kun simptomoj kiel malfortaj muskoloj kaj malfekundeco. Kiam oni komprenis ke li estus baldaŭ mortonta sen heredanto komenciĝis en la kortego de Madrido intensa diplomatika kaj politika aktivado de la ambasadejoj de Francio kaj la Germana Imperio. La monarĥoj de ambaŭ potencoj havis samagradan dinastian rajton al la heredaĵo ĉar ĉiu ili estis posteuloj de la imperiestro Karolo, Filipo la 2-a…

Kiel sciate, la mortanta Karolo la 2-a dispoziciis per sia testamento ke la heredonto de la hispana trono estu Filipo de Anĵuo, nepo de la reĝo Ludoviko la 14-a de Francio. Por alveni al tiu decido estis ega diplomatia kaj politika batalo antaŭe, kaj por ties efektivigado devis okazi 13-jara civila kaj eŭropa milito. La poziciiĝo de la hispanaj altranguloj en tiu konflikto tre similis al tiu de antaŭaj dinastiaj militoj en nia lando. Tiuj granduloj celis nur sian personan profiton, la plenumadon de siaj ambicioj. Oni povas kompreni ke Mariana de Noeburgo apogu sian habsburgan nevon, la arkidukon Karlon. Sed krom ŝi, la ĉefa partiano de tiu pretendanto estis la Admiralo de Kastilio, ***Juan Tomás Enríquez de Cabrera y Álvarez de Toledo***, tre altranga nobelo kiu ambiciis la postenon de favorato ĝis tiam rolata de la kardinalo de Toledo, ***Luis Fernández Portocarrero***. Ĉi tiu sendube esperis plu regadi kiel ĉefministro dum la reĝado de Filipo de Anĵuo, la burbona pretendanto kiun li apogis.
Ĉi tiu, ja, iĝis Filipo la 5-a de Hispanio. Sed tuj deklaris militon al Hispanio kaj Francio aliaj potencoj de Eŭropo: la Germana Imperio, Anglio, kaj Nederlando. Kaj la loĝantaro de Hispanio kaj ĉi ties dependantaj regnoj poziciiĝis favore al iu aŭ alia el la konkurantoj. La Admiralo de Kastilio ekziliĝis al Portugalio kaj mortis tie sep jarojn poste dum daŭris ankoraŭ la milito. La kardinalo ***Portocarrero*** suferis grandan elreviĝon. Filipo la 5-a sendis lin al Toledo por teni lin for de la politikaj intrigoj de la kortego. La posteno de favorato kiun li ambiciis estis asignita de Ludoviko la 14-a al iu itala princino, ***Marie Anne de La Trémoille***, princino ***degli Orsini***, nomata en Hispanio ***princesa de los Ursinos***. Ŝia oficiala titolo estis "Unua damo de la reĝino" sed ŝia vera tasko estis teni la reĝon Filipon subkontrole de la kortego de Versajlo. Ĉiuj funkcioj de ĉefministro estis realigitaj de ŝi dum 14 jaroj. La kardinalo, vidante sin disdegnita post la valorega servo de li farita al la nova monarko, ribelis kontraŭ li kaj komencis subteni la trupojn de la arkiduko Karlo, pro kio la reĝo Filipo sendis lin definitive ekzilitan al Toledo, kie li mortis en 1709, kvar jarojn antaŭ la fino de la milito. Dum la konflikto, multaj hispanaj nobeloj kondutis pli malpli lojale kiel ***Portocarrero***, ŝanĝante sian pozicion laŭ la propraj interesoj kaj ambicioj.


Kardinalo *Portocarrero*


La arkiduko Karlo


Filipo de Burbono


Princino de la Ursinoj

La milito finis laŭ neatendita formo. Mortinte la germana imperiestro Leopoldo kaj ties rekta heredinto, la arkiduko Karlo aliris al la imperiestra trono. De tiam, por Anglio li ĉesis esti interesa kandidato al la hispana trono. Al la angloj pli malplaĉis ia Hispanio unuigita al la Germana Imperio ol al Francio. Tio akcelis la alvenon al paca interakordo. La interbatalintaj potencoj interakordis kondiĉojn konvenajn por ĉiuj en la t. n. «Kongreso de Utreĥto». Oni agnoskis la burbonan Filipon kiel reĝo de Hispanio kaj ĉi ties kolonia imperio en Ameriko, sed kiel kompenso al la Germana Imperio ĉi tiu akiris en Italio la influon kiun ĝis tiam havis la hispana potenco. Oni interakordis ke la kronoj de Francio kaj Hispanio, kvankam ambaŭ apartenis al la burbona familio, neniam ili estus portataj de la sama persono. Sed kiu pli gajnis en tiu milito estis Anglio; ĉi tiu potenco lasis la aferojn de Eŭropo aranĝitaj laŭ sia konveno kaj krome ĝi estis kaptinta Ĝibraltaron kaj la Menorko-insulon. Ĉi tiu estis poste rekonkerita de la hispana armeo, sed Ĝibraltaro daŭre estis angla, brita, ĝis nun.
Ene de Hispanio, iu rezulto de la milito estis tiu ke la regionoj kiuj estis apoginte la arkidukon Karolon, Valencio, Katalunio kaj Aragonio, definitive perdis siajn foruojn. La foruoj estis mezepok-devenaj privilegioj ĝuitaj de kelkaj urboj aŭ regionoj en diversaj lokoj en Eŭropo; ili konstituis limigon al la absoluta povo de la monarkoj. La plifirmiĝo de la reĝa povo en la landoj de Okcidenta Eŭropo baziĝis sur la nuligo de la milita potenco de la nobelaro kaj la nuligo de la foruoj. Tiorilate, la rezulto de la Milito pri Sukcedado en Hispanio estis tiu definitiva plifirmiĝo de la absolut(ism)a potenco de la reĝo. Tiam, je la fino de tiu milito, daŭre estis plenregantino de la lando la Princino de la Ursinoj; fakte estis ŝi kiu negocis la hispanajn kondiĉojn en la Kongreso de Utreĥto. Sed en 1714 mortis la juna edzino de Filipo, ***María Luisa Gabriela de Saboya***, kaj tiam la ***Orsini*** profitis sian potencon en la hispana kortego por elekti novan edzinon por la reĝo. La elektita estis alia italino, Izabela Farnesio, kiun ŝi taksis plej konvena por siaj interesoj. Sed tiu pritakso estis tute erara; en decembro 1714, baldaŭ post la alveno de Izabela en Hispanion, la Princino de la Ursinoj iris por akcepti ŝin en ***Jadraque*** kaj tie, anstataŭ ricevi dankon de la nova reĝino, ŝi estis forpelita de Hispanio al la limo kun Francio eskortita de kvindek membroj de la Palaca Gvardio.
Facile manipulebla, Filipo la 5-a akceptis la ŝanĝon de la situacio kaj dum la cetero el sia vivo li restis submetita al Izabela Farnesio same kiel li antaŭe estis al la ***Orsini***. Ŝi havis fortan karakteron kaj aŭtoritateman personecon, kiu donis al ŝi grandan influon en la kortego. Estante ambicia, ŝi ĝuis la ekzercadon de la reĝa potenco. Kiam la reĝo izoliĝis, ŝi reduktis lian personan rondon, igante ŝin fundamenta rolulo en la politikaj aferoj. Tiel, dum la monarko falis en depresiojn, kiuj enigis lin en pli kaj pli intensan melankolion kaj malĝojon, kun ĉiam pli daŭra forlasado de lia persona higieno, Izabela uzis sian tutan influojn por realigi siajn proprajn ambiciojn: meti siajn gefilojn sur tronojn en Eŭropo, ĉefe en Italio. Ŝi naskis al la reĝo sep gefilojn. La plejaĝa el ŝiaj filoj, Karolo, estis nomumita reĝo de Napolio. Por ke eblu

tio, kio sufiĉe kontraŭis la dispoziciojn de la Kongreso de Utreĥto, okazis ke Izabela Farnesio sciis aranĝi la politikajn aferojn en Hispanio por profiti la militajn konfliktojn kiuj poste okazis en Eŭropo. La politiko kiun ŝi apogis estis orientita rekuperi por la hispana monarkio la italajn teritoriojn perditajn pro la internaciaj traktatoj. La reĝino neniam montris amon, sed malestimon al siaj duonfiloj. Por ŝi, la idoj de la unua edzino de la reĝo, ***María Luisa Gabriela de Saboya*** konsistigis unu plian obstaklon por atingi ŝian ĉefan celon: provizi al ŝiaj filoj Karlo kaj Filipo regnon, kie ili povus regi.



***María Luisa Gabriela de Saboya***

Jes. Izabela Farnesio plenumis, kiel reĝa edzino, la rolon kiun antaŭe plenumis alitipaj favorataj personoj, sed jen, siavice, ŝi havis sian propran favoraton. Temis pri la kardinalo ***Giulio Alberoni***. Verdire, tiu rango de kardinalo, kaj ankaŭ tiu de episkopo de Malago, kiun oni asignis al li antaŭe, estis frukto de lia amikeco kun la reĝino, amikeco kiun iuj supozas intima. Fakte, oni pensis ke li, kaj ne la reĝo, estis la patro de iuj el la idoj kiujn akuŝis la reĝino, ĉefe la unua, tiu kiu poste estis la reĝo Karolo la 3-a de Hispanio. Kompreneble, ne estas certeco pri tio, sed estas sciate ke en tiuj okazoj kiam la reĝino furioziĝis kaj esprimis sian koleron per la disĵetado de teleroj kontraŭ la servistaro, nur la efika kardinalo ***Alberoni*** sukcesis kvietigi kaj trankviligi ŝin.



**Izabela Farnesio**

Reale, la politika influo de ***Giulio Alberoni*** en Hispanio ekzistis jam dum la regado de la Princino ***Orsini***. Estis li kiu konvinkis ŝin por la elektado de Izabela Farnesio kiel dua edzino de la reĝo Filipo, kaj estis li kiu instigis Izabelan forpeli la favoratinon. Li estis vera majstro pri politikaj intrigoj, ekzemple por la atingo de la kardinala rango, kaj profitis sian rolon kiel ĉefministro por pligrandigi sian havaĵon. Kiam lia ambicio estis kontentigita, li necesis kontentigi sian avidecon; do li atingis de la reĝo la enspezojn de la ĉefepiskopejo de Taragono, tiam vaka. Tamen lia privateco ne estis longdaŭra; ĝi ĉesis en 1719, nur ses jarojn post la alveno de Izabela Farnesio, ¿kio okazis? La problemo estis la politiko kiun li praktikis: la etapo de lia regado konstituis rompon de kunlaborado kun la kortego de Ludoviko la 14-a. La edziĝo de Filipo la 5-a kun Izabela Farnesio kaj la forpelo de la



**Kardinalo Giulio Alberoni**



**Familio de Filipo la 5-a**

Princino de la Ursinoj estis la unua paŝo de tiu disiĝo inter ambaŭ burbonaj kortegoj. Sed plejgrave estis ke sub la regado de ***Giulio Alberoni*** Hispanio entreprenis procezon de reakirado de la influo kaj posedaĵoj perditaj en Italio rezulte de la Milito pri Sukcedado. Ekzemple, iu hispana floto rekonkeris Sardio-Insulon. Kaj, kiel menciite, iuj italaj teritorioj pasis denove al la hispana kontrolo eĉ se sendependaj, ekzemple la reĝado de la princo Karolo en Napolio. Tiu politiko pli kaj pli metis kontraŭ Hispanio la Germanan Imperion, Anglion, Nederlandon, la Vatikanon, kaj fine eĉ Francion mem. La lasta aŭdaco de ***Alberoni*** estis sendi eskadron por rekonkeri Sicilion por la hispana krono.
La kortego de Versajlo faris egan premon sur Filipo la 5-a por eksigi la iniciateman ministron, kaj Izabela Farnesio povis fari nenion por eviti la ekzilon de ŝia amata kardinalo. Kiel dirite, la regado de tiu ministro en Hispanio daŭris nur ses jarojn; poste li vivis ankoraŭ dum 33 jaroj kaj dediĉiĝis intrigi en aliaj lokoj kun pli malpli da fortuno, sed ŝajnas ke la bazo de liaj vivrimedoj estis la riĉaĵo kiun li sukcesis amasi en Hispanio dum la jaroj 1713 al 1719. Kiam li mortis, en 1752, li lasis al la nevo kiu heredis de li siajn posedaĵojn kaj tion kio restis el lia hispana riĉaĵo, escepte 600.000 dukatoj, kiujn li asignis al la seminario, kiun li ĵus estis fondinta. Tiam, kiam okazis la morto de ***Alberoni***, vivis ankoraŭ Izabela Farnesio sed jam ne plu la reĝo Filipo. Ĉi tiu estis forpasinta en 1746 kaj de tiam reĝadis en Hispanio Ferdinando la 6-a, kies ĉefministro estis la markizo de la ***En-senada***; ĉi tiu jam estis plenuminte tiun rolon ekde la lastaj laroj de la reĝado de Filipo la 5-a.
Kun la permeso de la reĝo Ferdinando la 6-a, ***Ensenada*** organizis sekretan operacion, ekzekutitan en maniero sinkronigita tra la hispana teritorio la 30-an de julio de 1749 kaj nomatan Granda Amas-arestado de la ciganoj. Ĝia celo estis aresti ĉiujn ciganojn de la reĝlando, apartigante la virojn de la virinoj por atingi la formorton de la etno. Jam en la unua tago de la ago, inter 9.000 kaj 12.000 romaoj estis arestitaj. Ciganoj pli aĝaj ol sep jaroj estis ĉenitaj kaj internigitaj en arsenaloj, kie ili faris devigan laboron. Virinoj kaj infanoj estis en malliberejoj kaj fabrikoj. Iliaj havaĵoj estis konfiskitaj. Kiam ĉi tiu kontraŭcigana politiko, cetere fiaskinta, finiĝis en 1763, jam ne regis la ministro ***Ensenada***, falinta en 1754 viktimo de internaj kaj eksteraj intrigoj kontraŭ lia politiko, kaj ankaŭ ne vivis jam la reĝo Ferdinando la 6-a, morta en 1759, kiam sen heredonta filo.
Lia plejaĝa frato Ludoviko, estis mortinta antaŭe tre junaĝa. Do, Finfine Izabela Farnesio povis vidi la surtroniĝon en Hispanio de ŝia filo, Karolo la 3-a. Ĉi tiu reĝo ĝuas en la historio de la lando je tre favora bildo. Ni vidos ke en lia kortego kaj sub lia reĝado ne mankis intrigoj kaj gravaj konfliktoj generitaj de la homaj ambicioj. Karolo venis el sia reĝlando de Napolio kun italaj ministroj kiel la markizo de Skilaĉo. La monarko nomumis Skilaĉon sekretario de la fisko. Ĉi ties reforma programo kaj la hispana interveno en la Sepjara Milito postulis pli da enspezoj, kio estis atingita per pliigo de la imposta ŝarĝo kaj novaj formuloj, kiel

la kreo de la Nacia Loterio. Samtempe li liberaligis la komercon de cerealoj, kio kaŭzis altiĝon de la prezoj de bazaj necesaĵoj pro spekulado de akaparantoj kaj malbonaj rikoltoj. La popolanoj respondecigis la italojn pri ĉio; en marto de 1766 okazis la t. n. Insurekcio de (kontraŭ) Skilaĉo. Ĝia incitilo estis la ordono ŝanĝi la longan mantelon kaj la larĝan ĉapelon de la madridanoj per la kurta mantelo kaj la triangula ĉapelo. La streĉo kreskis danke al la afiŝoj, kiuj cirkulis tra la ĉefurbo kaj aperis en publikaj lokoj, afiŝoj kies vortprovizo kaj ortografio povis veni nur de kleraj homoj. La manipulado farita de noblaj kaj eklezîaj sektoroj igis ĝin rekta atako al la reformisma politiko farita de fremdaj ministroj. La ribelo de Skilaĉo estis socia ribelo kun politikaj kaj ekonomiaj postuloj esprimitaj sufiĉe naive; sed neniel ekzistis popola sento kontraŭ la reĝa potenco aŭ la privilegioj de la nobelaro, kaj des malpli la pastraro. Krom la nacia digno ofendita de la mantelo kaj ĉapeloj kaj la fremda kondiĉo de la ministro, la materia kaŭzo de la malkontento estis la kresko de la prezoj de bazaj nutraĵoj, kiu produktis malsatan situacion inter la popolaj tavoloj, kaj tio estis atribuita al la ekonomiaj reform-iniciatoj antaŭenigitaj de Skilaĉo.

De Madrido, la ribelo translokiĝis al urboj kiel Kvenko, Zaragozo, Korunjo, Oviedo, Santandero, Bilbao, Barcelono, Kadizo kaj Kartageno inter multaj aliaj. Sed dum en Madrido la plendoj koncernis la registaron de la nacio, en la provincoj la plendoj estis direktitaj kontraŭ la lokaj aŭtoritatoj, rivelante subkuŝantan problemon de korupteco kaj administra nekompetenteco. La ribelintoj postulis la redukton de la nutraĵa prezo kaj la nuligon de la Komisiono pri Provizaĵoj, la nuligon de la ordono pri vestaĵoj, la eksigon de la fremdaj ministroj de Karolo la 3-a, ilian anstataŭon far hispanoj, kaj ĝeneralan pardonon. La reĝo ekzilis Skilaĉon kaj anstataŭis lin per la grafo de ***Aranda***. Oni metis rimedojn por akceli la importadon de cerealoj el Sicilio, kaj la konsiliaj registaroj estis reformitaj, aldonante popolajn deputitojn elektitajn per voĉdonado.


La grafo de ***Aranda*** okupis la prezidantecon de la Konsilio de Kastilio post la ribelo de Skilaĉo. La ribelo finiĝis dank' al la koncedoj de Karolo la 3-a, kio estis konsiderita kiel venko de la ribelintoj. Subtenita de advokatoj kiaj ***Campo-***


Ferdinando la 6-a


Markizo de la *Ensenada*


Karolo la 3-a


Markizo de Skilaĉo



Insurekcio kontraŭ Skilaĉo

***manes*** kaj ***Floridablanca***, kaj aragonaj nobeluloj kiaj ***Manuel Roda*** kaj ***Juan Gregorio de Muniaín***, ***Aranda*** plenumis la malfacilan mision lerte aboli la nerealigeblajn koncedojn donitajn de la reĝo. Temis pri firmigado de reĝa aŭtoritato sen eksciti pasiojn, kiuj povus gdeneri novajn tumultojn. Li faris ĝin tre profesie, ĉar li sciis utiligi sian popularecon en la meza klaso kaj la metiistoj. Li sukcesis anstataŭigi la ĉapelon kaj la longan mantelon per la trikorno kaj la mallonga mantelo, kaj la Konsilio de Kastilio proklamis verdikton, en kiu ĝi deklaris nulaj la ĉefajn postulojn donitajn al la aŭtoroj de la ribelo de Skilaĉo. ***Aranda*** volis kompletigi sian pacan laboron kaj proponis la revenon de la reĝo, kiu, nesekura en Madrido, estis sin translokiĝinte al la Reĝa Palaco de ***Aranjuez***. Karolo la 3-a komence rezistis, sed fine li konsentis reveni.
Preskaŭ tuja sekvo de la ribelo de Skilaĉo estis la elpelo de la Jezuita Societo, unu el la plej polemikaj eventoj de la reĝado de Karolo la 3-a. Efektive, ***Aranda***, subtenata de ***Campomanes***, malfermis sekretan esploron por kolekti pruvojn, atestantaj pri la interveno de la jezuitoj en la ribelo de Skilaĉo. La markizo de la ***Ensenada*** kaj iuj mezgravaj pastroj estis aŭ ekzilitaj aŭ malliberigitaj. La reĝo fine subskribis la dekreton pri elpelo de la jezuitoj en februaro 1767; ĉi tiu dekreto havis la aprobon de kvin sesonoj el la hispanaj prelatoj. La jezuitoj estis akuzitaj, interalie, pri plano konstrui imperion en Paragvajo, kaj ankaŭ pri rilato kun la angloj kiam ili kaptis Manilon, kaj esti defendantoj de la koncepto de reĝ-mortigo. Fine, la generalo de la Kompanio, ***Lorenzo Ricci***, estis akuzita je pridubado je la rajto de Karolo la 3-a al la trono, ĉar li estis filo ne de Filipo la 5-a sed de la kardinalo ***Alberoni***. Oni diris, ke se la reĝo decidis tion, estis subinflue de homoj kiaj ***Aranda***, kiuj laŭdire "nur gloris sin esti kalkulitaj inter la malamikoj de la katolikismo”. Krome ***Voltaire*** diris ke "kun ses viroj kiel ***Aranda***, Hispanio regeneriĝos".
Notindas ke tiu ofensivo kontraŭ la jezuita ordeno ne estis izolita kazo ene de la katolika mondo. Ok jarojn antaŭe, en Portugalio oni enkarcerigis ne malpli ol 180 anojn de tiu societo kaj la ceteraj estis elpelitaj el la lando kaj ties kolonioj, kaj tri jarojn poste, en 1762, okazis similan forigon de la ordeno en Francio. Fine, en 1773, la ordeno estis nuligita far la papo Klemento la 14-a. Kiu estis la reala kaŭzo de tiu fenomeno? Ne facilas respondi tion kiel atestas la fakto ke estas diversaj kaj kontraŭdiraj opinioj inter la historiistoj kaj aliaj studintoj pri la afero. La opinioj diversas ankaŭ ene de ĉiu politika medio: konservativa, revolucia… Izabela Farnesio, kiu apogis la refortigon de la Inkvizicio en Hispanio, tamen, abomenis la jezuitojn kaj inspiris tian senton en sian filon Karolo la 3-a. Kaj ne malmultaj francaj revoluciuloj de 1789-1993 sin konsideris venĝantoj de la jezuitoj kaj la templkavaliroj. Ja la maniero kiel la jezuitoj estis traktitaj de la Eklezio kaj la katolika mondo en la 18-a jarcento tre similas al la kazo de la templanoj en la 14-a jarcento. En ambaŭ kazoj temis pri riĉaj ordenoj, kaj ilia nuligo implicis al alpropriigo de iliaj riĉaĵoj. En la kazo de la jezuitoj, ilia elpelo el Hispanio signifis la ekspropriigon de la posedaĵoj de la ordeno. Temis pri la unua “alienado” (en la hispana lingvo “***desamor-***

***tización***") de bienoj kaj aliaj posedaĵoj en Hispanio. La maljusteco de tiaj operacioj konsistas el tio ke oni eksproprigas ies apartenaĵojn, teorie favore al la ŝtato, sed poste la ŝtato privatigas ilin aliesfavore. En la kazo de la laŭleĝaj "alienadoj" en Hispanio la benefic-profitanto estis la tiam naskiĝanta burĝklaso. Kaj tio estas klara ekzemplo de la koruptado kiun ni priatentas per ĉi tiu raporto.


**Grafo de *Aranda***

Sed estas aliaj prikonsideroj kiujn metas antaŭ ni tiu afero de la jezuitoj en la Hispanio de Karolo la 3-a sed ankaŭ en aliaj landoj tiutempe kaj en la Eklezio ĝenerale. Jam ni menciis la similecon de tiu kazo kun tiu de la mezepokaj templkavaliroj. La komuna trajto de ambaŭ eventoj, krom tio ke ambaŭkaze oni eksproprigis la nuligitajn ordenojn, estis ke oni akuzis ilin je konspira agado, t. e. oni atribuis al ili, prave aŭ ne, sekretan planon por la socio, kaj ĉio nekonata aŭ nekomprenata vekas suspekton, timon kaj rifuzon. Tiorilate memorindas la kazon de la framasonaro: sekreta societo, kun nekonata socia projekto… Kurioze, dum la reĝado de Ferdinando la 6-a en Hispanio, regante ties ministro, la markizo de la ***Ensenada***, estis malpermesita kaj persekutita la framasonaro, kaj jen la ministroj ***Aranda***, ***Campomanes***, ***Floridablanca***… ekzilis la markizon de la ***Ensenada*** kaj elpelis la jezuitojn, kaj estis onidiro ke ili estis framasonoj. Kiun batalon havis tiuj sinjoroj, post-kulise? Ĉu temis pri disvolviĝo de klasbatalo en politika situacio en kiu ne eblis partioj? Ĉu tiuj organizaĵoj havis/as konkretan planon por socio-evoluado kiun la ĝenerala publiko devas ne koni?


***Pedro Rodríguez De Campomanes***


**Grafo de *Floridablanca***

Ĉiukaze estis klare ke la okcident-eŭropa socio estis alveninte al iu stato de disvolviĝo kaj komplekseco en kiu jam ne plu eblus pludaŭri la mezepoka skemo de la tri ŝtatoj: militista nobelaro, klerikaro kaj Tria Ŝtato. Tiu socia skemo estis en krizo kvankam la tiamaj homoj ne kapablus percepti tion kaj formuli alternativon. Ni jam vidis, ekzemple, kiom fuŝe alfrontis la tiamaj regantoj la aferon de la ciganoj. La sistemo estis komencante kraki. La ribelo kontraŭ Skilaĉo kaj la forpelo de la jezuitoj estis krakoj de sistemo kiu komencis rompiĝi. La sekva generacio vidos kun surprizo ĝian disrompiĝon kaj definitivan ruinon.


**Elpelo de la jezuitoj**




Ĝis la 19-a jarcento, Hispanio jam estis koninta kaj suferinta la koruptadon de potencaj ministroj: ***Álvaro de Luna***, la Duko de Lermo… sed je la finiĝo de la t. n. Manova Reĝimo nia lando travivis la plej koruptan etapon de sia historio. La regado de ***Manuel Godoy***, la jarojn 1792 al 1808, plenplenis je koruptado senkompare pli granda ol ĉio antaŭe, kaj ankaŭ ne estis pretersuperita poste kvankam, kiel ni vidos per ĉi tiu raportado, ne mankis egaj prikoruptaj skandaloj ĝis nia epoko mem.

***Godoy*** naskiĝis en 1767, dum la reĝado de Karolo la 3-a, en familio de la malalta nobelaro en Hispanio. Lia edukado estis tia konvena por militisto, armeano, kia estis la dediĉo ankaŭ de lia patro kaj lia pli aĝa frato Ludoviko. En 1784 li alvenis al la kortego de Madrido kaj estis akceptita de Karolo la 3-a al la Palaca Gvardio, kie deĵoris jam lia frato. Se kredi iun el la multaj historiaj verkoj pri la regado de ***Manuel Godoy***, kiam ĉi tiu membris ĉe la Palaca Gvardio, jam lia frato Ludoviko ne apartenis al tiu regimento ĉar estis elpelita de ĝi laŭ ordono de la reĝo Karlo la 3-a tial ke la junulo estis establinta amrilaton kun Maria Ludovikino de Parmo, la Princino de Asturio, t. e. la edzino de la heredonto de la krono. Se tiel, la afero ne estis tro stranga en la epoko; la reĝo devis koni la tiamajn onidirojn ke li mem ne estis filo de Filipo la 5-a sed de la kardinalo ***Alberoni***. Kaj pri Maria Ludovikino de Parmo estas konate ke ŝi havis kelkajn amantojn; ***Manuel Godoy*** estis la ĉefa el ili.

Li kontaktis kun la ankoraŭ Princino ***María Luisa*** en la jaro 1788. En decembro de tiu jaro mem mortis la reĝo Karolo la 3-a, kaj la Princino iĝis reĝino kiel edzino de la nova reĝo Karolo la 4-a. La rilato de ***Godoy*** kun la nova reĝino estis intensa kaj longdaŭra. Oni supozas ke la infantino Maria Izabela, naskiĝinta en julio de 1789, kaj la infanto Francisco de Paula, naskiĝinta en marto de 1794, estis filoj de ***Godoy***, kaj ne de la reĝo. La reĝino ***María Luisa*** havis egan influon sur sia edzo en ĉiuj politikaj decidoj, kaj tio respeguliĝis en la fulm-rapida progreso de la kariero de ***Manuel Godoy***. La 15-an de novembro 1792, ok jarojn post lia aliĝo al la Palaca Gvardio, ***Godoy*** estis promociita al la posteno de Unua Ŝtata Sekretario, do ĉefministro aŭ universala ministro, de la nova suvereno Karolo

la 4-a, kiu ekde sia surtroniĝo en 1788 ne ĉesis superŝuti lin per honoroj: kadeto, ĝenerala adjutanto de la Palaca Gvardio, brigadestro, kampo-marŝalo kaj ĉefserĝento de la Gvardio. Ambicia viro, eble pli pri politika povo ol pri mono, tamen li dum sia regado amasigis konsiderindan riĉaĵon. Inter 1788 kaj 1795, Godojo trairis karieran vojon, kiun aliaj faris dum la tuta vivo. La nomumoj sekvis unu post alia: politikaj postenoj kaj nobelaj kaj militaj titoloj fine kondukis lin al la estreco de la Ŝtata Konsilio.

Kiam ***Godoy*** komencis roli kiel hispana ĉefministro jam Francio troviĝis meze de la revolucia procezo komenciĝinta en julio de 1789, sed ĝis tiam ankoraŭ estis reĝinta Ludoviko la 16-a. Preskaŭ ĝuste unu monaton post la ekregado de ***Godoy*** la franca reĝo estis enkarcerigita, kaj baldaŭ poste juĝita kaj kondamnita al la gilotino. La reĝa familio de Hispanio havis kompromison kun tiu de Francio, la t. n. «Familia Pakto». Tio devigis nian landon unuiĝi al la eŭropaj potencoj kiuj deklaris militon al la ĵus proklamita Franca Respubliko.

La maniero kiel ***Godoy*** plenumis sian politikan taskon en la tiamaj komplikaj cirkonstancoj eble ne estis pli fuŝa ol tiu kiun estus realiginta aliaj pli spertaj politikistoj, kiel tiuj, ĝis tiam reginte, la grafoj de ***Aranda*** kaj de ***Floridablanca***, sed la kazo de ***Godoy*** estis speciale groteska pro la tro skandala kaj korupta maniero laŭ kiu li plirangiĝis kaj pliriĉiĝis. En la dokumento kiun li subskribis, kiel ĉef-ministro, la 25-an de majo de 1793 en Aranjuez pri defenda alianco kontraŭ la Franca Respubliko, li aperis kun la titoloj de Duko de ***Alcudia***, Grandulo de Hispanio el la plej alta rango, dumviva magistratano de la urbo ***Santiago de Compostela***, kavaliro de la Ora Felo, Granda Kruco de la Ordeno de Karolo la 3-a, Komandoro de ***Aceuchal***… Poste li kolektis kromajn titolojn: Komandoro de ***Valencia del Ventoso***, Ŝtat-konsilantano, unua sekretario, sekretario de la reĝino, ĝenerala super-intendanto de la Poŝto kaj Vojoj, servo-nobelo de la reĝa ĉambro, ĉef-generalo de la Reĝaj Armeoj, inspektoro kaj ĉefserĝento de la Reĝa Regimento de la Palaca Gvardio…



**La juna Karolo la 4-a, ankoraŭ princo**



**La juna *Maria Luisa de Parma*, ankoraŭ princino**



**La kadeto *Manuel Godoy***


La reĝo Karlo la 4-a


La reĝino *Maria Luisa de Parma*


La ĉefministro *Manuel Godoy*



Blazono de *Manuel Godoy*

Kiam, du jarojn poste, oni subskribis interakordon kiu metis finon al la milito kun la Franca Respubliko, ***Godoy*** ricevis la titolon de Princo de la Paco, kaj poste li estis nomumita duko de ***Sueca***, sinjoro de ***Soto de Roma*** kaj de la Ŝtato de ***Albalá***, dumviva magistratano de Madrido kaj de la urboj de Kadizo, Malago, ***Écija*** kaj ***Reus***, barono de ***Mascalbó***, kavaliro de la urba korporacio de Sevilo, kavaliro de la granda kruco de la ordeno de Kristo kaj de la religio de Sankta Johano, patrono de la Reĝa Akademio de Nobelaj Artoj kaj de la Reĝaj Institutoj de Natura Historio, de la Botanika Ĝardeno, Kemia Laboratorio kaj Observatorio.
Ĝenerale tiuj-ĉi titoloj kaj honoroj inkluzivis la enspezadon de rentoj. Do tre riĉiĝis dum tiuj jaroj la ***Godoy***-familio. Ludoviko, la pli aĝa frato de Enmanuelo estis nomumita Duko kaj promociita al armeaj profitdonaj postenoj. Li, la Princo de la Paco atingis de la gereĝoj la edziĝon al iu nevino de Karolo la 4-a, ***María Teresa de Borbón***, la grafino de ***Chinchón***. El ĉi tiu geedza paro naskiĝis unu filino, sed tute ne temis pri feliĉa familio. Godojo nek amis nek respektis sian edzinon. En la sama domo kunloĝis kun la geedzoj ***Pepita Tudó***, la amantino de ***Manuel Godoy***. Evidentas ke li, same kiel ĉiuj kiuj facile atingas neatenditan sukceson, pensis ke ĉio estis permesite al si. Ni vidos pliajn similajn kazojn en la historio de la hispana korupto. Nia samurbano, ***Gaspar Melchor de Jovellanos***, kiu tiam estis ministro de la registaro de ***Godoy***, estis iam invitita de ĉi tiu manĝi en ties domo. Laŭ posta deklaro lia, ***Jovellanos*** eliris naŭzigita el tiu bankedo vidinte la senhonton de la favorato igi kunloĝi edzinon kaj amantinon.
***Jovellanos*** apartenis al la klereca partio liderata de la grafo ***Aranda***, al kiu sin kontraŭmetis la modera partio, ĝis tiam estrita de la grafo ***Floridablanca***. ***Godoj*** atingis la mirindaĵon unuigi ĉiujn… sed kontraŭ li. Lia politika situacio komplikiĝis kiam ankaŭ la franca direktorio sin metis kontraŭ li kaj premis la hispanan monarkon por lia eksigo el la hispana regantaro. ***Godoy*** restis dum du jaroj, de 1798 al 1800, for de la regantaro de la lando, sed li daŭre konservis la favoron de la gereĝoj kaj siajn honorojn en la kortego. Lia reveno al la politika potenco koincidis kaj eble rilatis kun la ŝanĝo de la situacio en Francio. Tie elstaris tiam iu nova personulo, iu militisto nomata Napoleono Bonaparto, kiu

donis iun neatenditan ĝiron al la revolucio en tiu lando kaj al la politikaj aferoj en Eŭropo. Eble jam dekomence la franca konsulo, poste imperiestro, vidis kiom multe povus utili al liaj politikaj planoj tiutipa koruptebla ĉef-ministro en la hispana kortego.
En novembro de tiu jaro 1800 alvenis al la kortego de Madrido iu speciala ambasadoro de Francio kun tre konkretaj planoj por la kunlaborado inter Francio kaj Hispanio. Temis pri Luciano Bonaparto, frato de Napoleono. La korespondado de tiu ambasadoro kun lia frato tre multe helpas nin kompreni la tiaman situacion de Hispanio kaj la koruptadon ĉi tie regantan. Luciano estis dum unu jaro kaj tri monatoj kiel ambasadoro en Madrido, de novembro de 1800 al februaro de 1802. Tiam li forlasis Hispanion kun grandega riĉaĵo en oro, arta kolekto kaj la plej bonaj juveloj de la Krono. Ni vidu kiel li gajnis kaj akiris tiun riĉaĵon. Jen la unua informo "konfidenca" kiun li sendis al sia frato meze de decembro:
***Al la Unua Konsulo, mia kara frato. Al kia lando ci sendis min! La unua afero, kiun mi povas diri al ci, estas ke post tre malfacila vojaĝo, mi alvenis al Madrido preskaŭ kiel kiam mia patrino akuŝis min, ĉar transirante la montĉenon, kiu ĉirkaŭas la ĉefurbon, tra la pasejo, kiun ili nomas Somosierra, mia veturilo kaj tiuj, kiuj akompanis min, kaj eĉ la eskorto, estis atakitaj de granda grupo de banditoj, kiuj ŝtelis ĉion de ni, ili nur lasis al ni niajn kostumojn kaj, hazarde, niajn ĉevalojn.***
***Frato, ĉi tiu lando estas putrinta, ruinigita kaj faliĝinta, laŭ tio, kion mi ĝis nun povis priesplori. Mi eliris kelkajn noktojn, por orienti min kaj vidi per miaj propraj okuloj (la madridanoj vivas pli dumnokte ol dumtage) kaj mi ankoraŭ ne digestis mian surprizon. La malmoraleco de kutimoj teruras. La sodomita kaj sadisma amo, evidenta prostituado kaj ĝenerala malordo memorigis min pri la jaroj antaŭ la Revolucio de la 89-a jaro.***
***En Madrido, la novriĉuloj: aĝiotistoj, provizantoj, spekulantoj… kaŝvestitaj kiel mi-ne-scias-kio marŝas brak-enbrake kun siaj amantinoj, kiuj portas travideblajn robojn aŭ aspektas virece, kaj humiligas per siaj luksoj kaj aroganta elmontrado tiujn, kiuj nur de tempo al tempo povas malbone manĝi. Ĝi estas socio -mi certigas vin- malkonstruita, kie la malĉasteco, adulto, krimo, incesto, senhonteco estas terura realaĵo. Ĝi estas malordo kaj morala***


La grafino de *Chinchón*, Edzino de *Godoy*


*Pepita Tudó*, amantino de *Godoy*


*Gaspar Melchor de Jovellanos*

*anarkio. Kaj mi, estis pensinta ke Hispanio estas la plej katolika nacio en la mondo! Oni diras al mi, ke nur la banditoj, voj-rabistoj, ŝtelistoj, poŝtaj rabistoj, fraŭdantoj, trompistoj, krimuloj… estas bone organizitaj ĉi tie, sed por ŝteli aŭ mortigi. La predado starigis sin kiel absoluta suvereno. La stratoj estas plenaj je malriĉuloj, ĉiuj almozpetas eĉ ĉe la pordoj de preĝejoj kaj palacoj. Mi neniam vidis ion similan.*
*Kaj kion pri la nobelaro? Dum la tagoj, kiam mi estis ĉi tie, mi jam devis ĉeesti kelkajn noktmanĝojn kaj multajn festojn, en palacoj pli luksaj ol tiuj de Parizo... ci ridu pri Luksemburgo, la Malmaison, eĉ la Tuileries. Sinjorina vesto pli ŝajnas juvela montrofenestro ol io por reliefigi belecon. Ĝuste hieraŭ nokte mi estis ĉe noktmanĝo kun festoj, kiujn la dukoj de Osuna organizis miahonore (esti la frato de la "granda" homo de Francio, kiel ili diras, malfermas ĉiujn pordojn por mi!) Kaj mi certigas al ci, ke mi ankoraŭ ne finis noti la titolojn de la Dukino (cetere, belega!), ĉar la Sinjorino, krom esti pro ŝia edziniĝo Dukino de Osuna, estas proprarajte Grafino de Benavente, Dukino de Béjar, Dukino de Mandas, Dukino de Plasencia, Dukino de Arcos, Gandía kaj Mallorga, Princino de Anglona kaj Esquilace, Markizino de Lombay kaj Jabalquinto. Ho!*
*La alian Grandan dukinon, tiun de Alba, mi ankoraŭ ne havis la plezuron renkonti. Ŝajne ŝi estas tre malsana. Jes, mi jam renkontis la dukojn de Infantado kaj tiujn de Medina-Sidonia. Kiaj personuloj! Hispanio apartenas al ili, al kelkaj familioj, emparencigitaj kaj en interrilato, kiuj dividas inter ili la terojn, la urbojn, la kastelojn, la palacojn, la provincojn, la riverojn kaj eĉ la marbordojn. Jen ĉi tio estas la mezepoko.*
*Kaj kion pri la Reĝa Familio? Mi scias, ke ĉi tiu raporto devus esti komencita per ili, sed ili estas la supro de ĉi tiu piramido, kiu estas Hispanio. Kurioza piramido kies bazo estas malriĉeco kaj malsato, kaj supreniras de oro al diamantoj. Nu, tie, supre, preskaŭ tuŝante la ĉielon, estas la Reĝoj kaj ilia familio... Kaj la fama korpogardisto, Don Enmanuelo Godojo! Ĉar ĉi tiuj estas miaj unuaj impresoj, mi estos konciza prezentante al ci la "personulojn". Karlo la 4-a similas portreton, kopiaĵon, de Ludoviko la 16-a, malfeliĉulo, kiu nur pensas pri ĉasado kaj vivado bone kaj trankvile. Li ne volas problemojn kaj ĝenas lin pensi. Li mem diris al mi, kiam Godojo kondukis min al la protokola prezentado, jenon: "Sinjoro ambasadoro, mi volas, ke vi komuniku al la Unua Konsulo, ke mi estas lia admiranto ekde la kampanjo en Italio, la kampanjo en Egiptujo kaj la granda batalo de Marengo... bedaŭrinde por mi, mi estas la malo, paca homo, kiu ne volas problemojn kaj kiu nur amas ĉasadon, pli ol Reĝo, mi estas bona ĉasisto. Majesto -respondis mi-, antaŭ ĉio kaj laŭ la peto de la Unua Konsulo, mi transdonas al Via Moŝto lian dankemon pro la 16 belegaj ĉevaloj, kiujn Via Moŝto sendis al li por festi la Batalon de Marengo. Honore al Via Majesto li donis tiun nomon ("Marengo") al la plej bela el la specimenoj. Li ankaŭ petis al mi transdoni bondezirojn al la Reĝa Familio kaj al Hispanio, lando, kiun li honoras kaj admiras pro ĝia historio kaj grandeco". La Reĝino María Ludovikino estas groteska virino, la plej terura, kiun mi iam ajn vidis en mia vivo, kaj ankaŭ el tiuj personoj kiuj ne rigardas rekte. Laŭ la onidiro en la kortego, ŝi estis la amantino de Godoy ekde la jaro 1775, tio estas, la jaro kiam mi naskiĝis. Do ĉi tie la regantoj estas la geamantoj, la Reĝino kaj Godoy, sed laŭ tio, kion oni diris al mi kaj mi mem konstatis, al Lia Moŝto la Reĝo ne ĝenas tio. Mi dirus, ke tio eĉ plaĉas al li, alie li ne ĉiam nomus la ĉefministron "kara Manuel". Tial mi jam scias, kiujn mi devas konkeri kaj kun kiuj mi devas trakti por atingi niajn celojn. Mi skribos al ci. Brakumon de cia frato. Luciano".*

Kaj tion li faris. Luciano konkeris la Reĝojn, precipe la Reĝinon, al kiu li faris multajn donacojn, kaj Godojon, el kiu li fariĝis "partnero". Ĉar tiu lerta Luciano Bonaparto tuj konstatis, ke la kortego estis korupta kaj ke ***Godoy*** estis la "Reĝo de la koruptuloj". Do, li konsideris ke venis la tempo krei sian propran riĉaĵon kaj li plonĝis en koruptecon, kaj preskaŭ ekde sia alveno li komencis organizi sian "reton" de financaj amikoj. Li estis alveninte al Madrido kun prezentletero de la pariza bankisto ***Ouvrad***, la sama, kiu financis la puĉon de la 18-a de Brumero, krom, kompreneble, ankaŭ tiu de sia frato, jam la Majstro de Francio.
***Ouvrad*** havis amikon kaj partneron en Madrido, kiu regis la fiskon, la ekonomion, financojn kaj ĉion rilate al la komerco. Temis pri la grafo ***Cabarrús***, franco naskiĝintata en Bajono, sed loĝanta en la hispana ĉefurbo de antaŭ pli ol 30 jaroj. ***Francisco Cabarrús*** alvenis al Hispanio tre juna, sed kun nur unu ambicio: negoci... kaj li rapide triumfis ĉe la kortego de Karolo la 3-a. Li fondis la Bankon de Sankta Karlo, origino de la Banko de Hispanio, kaj la Komercan Kompanion de Filipinoj kaj Hispan-Ameriko. Kiam la reĝado de Karolo la 4-a komenciĝis, li jam estis supermilionulo kaj unu el la plej grandaj bankistoj en Eŭropo. Tuj kiam ***Cabarrús*** renkontis Lucianon, la fraton de la "Granda Viro", li komprenis, ke li estas lia viro, des pli se lin rekomendis lia partnero, la bankisto ***Ouvrad***. Ambaŭ, pro siaj propraj interesoj, perfekte komprenis unu la alian... eĉ pri enkorpigi Godojon en "negocon". Ĉiuj kvar uloj konstituis efikan ensemblon por korupta entrepreno: ***Ouvrard***, ***Cabarrús***, Luciano kaj ***Godoy***. La du bankistoj kiel kapitalismaj partneroj, Luciano kiel la perfekta peranto kaj ***Godoy*** la provizanto de leĝeco kaj politika potenco.
Laŭ la informo de Luciano, la ŝtato estis bankroto, la gereĝoj devis pruntepreni por pagi la elspezojn de la kortego, la armeo kaj la mararmeo estis sen armiloj, sen ŝipoj, kaj la soldatoj sen ekipaĵo, la agrokulturo estis neglektita, la industrio blokita, la vojoj plenis je herboj, la Ministerioj estis senpotencaj... kaj tamen la kolonioj estis tie kaj ili estis minoj. Napoleono klarigis tion al sia frato per sia respondo al ĉi ties unua informo:


Napoleono Bonaparto


Luciano Bonaparto


La familio de Karolo la 4-a


*Manuel Godoy*

*Al la ambasadoro de Francio en Madrido kaj tre kara frato. Frato, mi legis cian unuan raporton pri la situacio en la nuna Hispanio kun plej granda intereso kaj ankoraŭ impresas min la bildo, kiun ci pentras al mi. Kiel eblas ke la Hispanio de Karolo la 5-a kaj Filipo la 2-a alvenis al la ŝtato en kiu ĝi troviĝas? Kiel eblas, ke la ĉefurbo de Imperio falis en malhonoron, koruptecon kaj moralan anarkion? Se mi estus hispano, mi pasigus mian vivon plorante aŭ ĵetante komercistojn ekde la plej alta monto.*
*Tamen ci eraras pri la ekonomia afero. Ci pentras la situacion de totala malriĉeco kaj absoluta manko de rimedoj por levi la landon... ci eĉ asertas, ke la Reĝoj devas pruntepreni por travivi... Ci eraras!*
*Kaj ci eraras, ĉar ci forgesis, ke Hispanio estas ankaŭ sia Imperio, Imperio kiu, escepte de Brazilo, ampleksas la teritoriojn, kiuj etendiĝas de Teksaso kaj Kalifornio ĝis Fajrolando, kaj Kubo, Porto-Riko, Filipinoj kaj la Nordo de Afriko... Imperio kun imponaj rimedoj, kiu provizas la Metropolon per ĉiaj fundamentaj krudmaterialoj, de oro, arĝento kaj aliaj grandvaloraj metaloj de Meksiko kaj Peruo, ĝis sukero, kakao, kafo, kotono, spicoj, ligno de Campeche, fero, marmoro, viando, karbo kaj mil aliaj produktoj, kiuj mankas al Eŭropo. Estas vere, ke la Metropolo, tiu Regno, kiu etendiĝas sude de la Pireneoj, havas malmultajn aŭ tute elĉerpigitajn naturajn rimedojn, sed ankaŭ estas vero, ke ĝia geografia situo estas privilegia por navigado inter la Mediteraneo kaj la Atlantiko.*
*Frato, ne, la problemo en Hispanio ne estas la manko de rimedoj (Francio ŝatus havi tiun Imperion kaj tiujn rimedojn!), la problemo temas pri administrado kaj demarŝado, la mallerteco de ĝiaj regantoj kaj la blindeco de la Burbonoj. Kiel utilas ricevi ŝipojn plenajn je oro kaj arĝento, se la aŭtoritatoj permesas ke ili ne atingu sian veran celon anstataŭ uzi ilin por modernigi sian Agrikulturon kaj Industrion, plifortigi Mararmeon, kiu defendas siajn rilatojn kun la Kolonioj, prizorgi kaj ekipi Armeon per la plej modernaj kaj potencaj armiloj (Kiu Imperio povas esti subtenata sen imperia armeo?)... Kaj dume iuj Nobeloj, kiuj nur pensas kaj vivas por siaj festoj kaj siaj Palacoj, kaj popolo, kiu vivas en mizero kaj malsato. La stranga afero estas, ke la hispanoj ne estis farinte jam Revolucion kiun faris la francoj en 1789!*
*Frato, ci plu studu ĉi tiun temon kaj eksciu pli pri la rimedoj kiujn la Imperio provizas al Hispanio. Tio interesas al mi por miaj estontaj planoj. Gardu cin. Mi bezonas cin.*
*La Unua Konsulo.*

La unua ega "negoco" de Luciano venis al li senhelpe de siaj partneroj. Okaze de la Traktato de Badajozo, kiu metis finon al la t. n. "Milito de la Oranĝoj". Ĉi-kaze la paganto estis Portugalio. Ĉar tiu Traktato ne estis akceptita de Napoleono, kiu postulis grandan milit-kompenson por Francio. Tiam, la portugaloj dorse de la hispanoj kaj per la ambasadoro en Madrido, Luciano, kaŝe ofertis 100 milionojn da frankoj por la Bonaparto-fratoj, kondiĉe ke Francio retiru sian postulon (500 milionoj). Kaj Luciano agis kiel peranto antaŭ la Unua Konsulo, kio valoris gajnon de 20 milionoj por li. Kaj ne kontenta kun tio, li postulis de la portugaloj la transdonon de la diamantoj de la princino de Brazilo, kiuj estis la plej admirataj kaj dezirataj de la tuta eŭropa nobelaro. Siaflanke, la gereĝoj de Hispanio petis al li alian favoron, influi la Unuan Konsulon por ke Francio retiru la armeon, kiu kiel helpo kontraŭ Portugalio eniris Hispanion subkomande de generalo ***Leclerc*** kaj kiu estis restinta en la Nordo, proksime al la portugala limo.

Luciano efike kaj laŭŝate plenumis tiujn diplomatiajn taskojn kaj tio estis profitdona por li. Karolo la 4-a, dankema, kaj la reĝino, entuziasma pri la "bela" ambasadoro, tuj aljuĝis al li la ordenon de la Ora Felo, kaj kvazaŭ ne sufiĉus dumviva pensio de 100.000 frankoj monate, oni donacis al li unikan kolekton da diamantoj alportitan de la Kolonioj kaj 20 pentraĵojn elekteblajn el la Retira Galerio. Luciano estis spertulo pri Arto, kaj ankaŭ ĉi-kaze li lasis sin konsili de la Grafo de ***Cabarrús***. La elektitaj pentraĵoj estis, interalie, verkoj de ***Leonardo da Vinci***, Tiziano, Tintoretto, ***Rafael***, Murillo, ***Velazquez***, ***Veronés***, ***El Greco***, ***Goya***…

Sed estis pliaj profitdonaj negocoj de la juna ambasadoro, ĉar lia "amikeco" kaj "kunlaboro" kun liaj partneroj donis riĉan frukton. Jen kelkaj:

- La 13-an de februaro 1801 Luciano, nome de Francio, kaj ***Godoy***, nome de Hispanio, subskribis en ***Aranjuez*** Traktaton de "intima mararmea kunlaboro" por plifortigi ambaŭ mararmeojn en sia batalo kontraŭ Anglujo... kaj, hazarde, la rekonstrua laboro (ŝipoj, armiloj, ekipaĵo kaj cetere) estis konfidita al la konsorcio prezidita de la grafo ***Cabarrús***. Luciano kaj ***Godoy*** ricevis milionan makleraĵon.
- En tiu sama jaro, 1801, estis la kazo de la "Amerika Luiziano", la hispana kolonio, kiun Karolo la 4-a cedis (pli ol vendis) al Francio, kaj kiun Napoleono volis vendi al Usono. Hispanio igis lin vidi kaj memori la "retroan" klaŭzon, inkluzivita en la Interkontrakto, tio estas, ke Francio povus vendi ĝin nur al Hispanio aŭ kun ĉi ties permeso. Napoleono ignoris la hispanan peton... kaj... jen aperis Luciano kaj liaj partneroj. Luciano "sugestis" al ***Godoy***, ke se Hispanio ne volis perdi siajn rajtojn pri la eksa kolonio, ĝi devus finance helpi la Unuan Konsulon, ĉar li jam estis sin preparanta por militi kontraŭ Aŭstrio. ***Godoy*** prezentis la aferon al la reĝo, kaj ĉi tiu, kiu ne volis problemojn, kaj krome estis preta ekiri por ĉasado, akceptis tion, kion la ĉefministro sugestis: interkonsenti prunton kun la "Konsorcio ***Cabarrús***" kaj sendi 400 milionojn al la bankisto ***Ouvrard*** por helpi Napoleonon. Sed perdiĝis survoje 200 milionoj pri kiuj la partneroj klarigis nenion. La afero havis strangan kulminon: du jarojn poste Napoleono, ja, vendis la Luizianon al Usono.


**La franca bankiero *Gabriel Julien Ouvrad***


**Grafo *Francisco Cabarrús***


**La Princo Ferdinando**

- Alia grava korupta ago de la partneroj estis tiu de la politika ŝanĝo de la lando rilate al la administrado de la komerco kun la kolonioj. De la tempo de la Konkero, Hispanio havis ekskluzivan komerc-rajton kun siaj kolonioj en Ameriko. Ĉi tio estis la vera kaŭzo de la militoj kun Anglujo, ĉar la angloj neniam akceptis tiun "ekskluzivecon". La bankistoj ***Cabarrús*** kaj ***Ouvrard***, pere de Luciano proponis al ***Godoy***, kaj ĉi tiu al la gereĝoj, privatigi la koncesiojn kun siaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj. La ŝtato ricevus fiksan monsumon kaj la koncesiuloj alprenus la riskojn, la ĉefa, la kapto aŭ sinkigo de la ŝipoj fare de la angloj. La reĝo akceptis, kiel kutime, la proponon de ***Godoy*** kaj la "Konsorcio Cabarrús" atingis la koncesiojn. Ili ne diris al la reĝo ke la Konsorcio povus revendi ĉiujn aŭ partajn koncesiojn al aliaj kompanioj, kaj tiam aperis nederlandaj, prusaj, aŭstraj kaj eĉ rusaj kompanioj por akiri iujn komercajn rajtojn. Estis ega gajno por la kvar amikoj kaj partneroj. Ili pagis al la hispana ŝtato ioman kvanton kaj revendis kontraŭ trioble pli alta prezo. T. e. ili fariĝis la "ŝlosilo" de la komercado kun la kolonioj: miliona profito kaj decida influo!
Kiam Luciano forlasis Hispanion, li estis jam unu el la plej riĉaj homoj en Eŭropo. Iome antaŭ la Kristnasko-festo de 1801, nur jaron post sia unua konfidenca raporto, Luciano skribis al sia frato, ankoraŭ Unua Konsulo, kvankam jam Konsulo dumviva (li ne fariĝus imperiestro ĝis decembro 1804) jenon:
***Al la Unua Konsulo, mia kara frato. Mi sciis, ke ci estis malsana. Mi pensas, ke ci tre serioze traktas la aferojn. Memoru kaj ĉiam memoru, kion diras nia patrino: hodiaŭaj problemoj solviĝos morgaŭ. Mi deziras al ci la plej bonan. Ne forgesu, ke Francio bezonas cin kaj ankaŭ Eŭropo bezonas cin.***
***Kaj nun pri Hispanio. Mi certigas al ci, ke mi estas jam laca, pli ĝuste naŭzita, je ĉi tiu lando. Mi pasis nur unu jaron kaj ŝajnas kiel jarcento. Frato, la situacio en ĉi tiu lando deprimas min kaj eĉ pli sciante la "mino", kiu estas la Kolonioj. Mi ne komprenas, ke la nacio, kiu malkovris kaj konkeris la "Novan Mondon", alvenis al la bedaŭra stato, en kiu ĝi troviĝas. Nuntempe ĝi estas kvazaŭ cindro kiu atendas ke blovo de vento ekflugu kaj malaperigu ĝin. Ĉi tie oni bezonas ian Napoleonon. Mi eĉ ne plu volas paroli kun la gereĝoj. Kion mi diras "gereĝoj"! Karolo kaj Maria Ludovikino estas du pupoj en la manoj de Godoy... kaj la heredonto, la princo de Asturio, malbonvola, ruza estaĵo, plena je rankoroj, malkuraĝa, perfidema kaj, se io mankus, malsana. Se ĉi tiu "estaĵo" iam regos, lasu plori Hispanion aŭ tion kio restos el ĝi! Ci pravis. Ĉi tiu dinastio finiĝis kaj ĝi certe finiĝos pli malbone ol tiu de la Habsburgoj. Parencaj geedziĝoj kondukis ĝin al kompatinda mensa kaj homa stato. Ne mirinde, ke el ĉiu Burbono, kiu postvivas en la aĝo de dek jaroj, ses pli frue mortas. Hispanio bezonas novan sangon!***
***La malbona afero estas ke la sola kiu povus helpi nin anstataŭigi ilin, estas Godoy, kaj la "Ekstremadura taŭro" aŭ la "Kolbas-faristo", kiel oni nomas lin, ankaŭ ne estas saĝa viro... sed oni povas uzi lin por malfermi la pordon kaj poste grasigi ĝin en emerita Palaco. Krome, Godoy scias, ke lia fino estas proksima, ĉar la Princo kaj tiaj servemaj nobeloj senkaŝe malamas lin. La heredonto, pro ties patrino la Reĝino, kaj la nobeluloj ĉar ili ne akiris de li tion, kion ili volis... kaj ĉar ĉi tiuj homoj havas neniujn principojn krom siaj interesoj, ci jam scias: "se vi donos al mi, mi estas kun vi, se vi***

***ne donos al mi, mi estas via malamiko". La tago, kiam al li mankos la subteno de siaj "pupoj" (la gereĝoj), Godoy malaperos el la mapo. Do ne perdu tempon. Morgaŭ eble estos "tro malfrue".***
***Mi ne rakontas al ci pri pliaj aferoj, ĉar mi neniel scias, ĉu la kurieroj atingos la land-limon kaj ciajn manojn aŭ la manojn de la banditoj. Ankaŭ mi ne parolas al ci hodiaŭ pri miaj "amrilatoj". Mi renkontis imponan virinon. Mi rakontos al ci pri ŝi. Frato, mi ŝatus ŝanĝi scenon kaj postlasi ĉi tiun depresion, kiu premas mian cerbon. Gardu cin. Luciano.***
***Postskribo: Cianome mi sendis iujn donacojn al Iliaj Moŝtoj la gereĝoj kaj Godoy por klini ilin favore al via proceso kun Portugalio.***
***- Mi sendis al la Reĝo imponan aron da ĉas-pafiloj.***
***- Al la reĝino, iuj roboj broditaj per ora fadeno kaj porcelana servo el Sèvres.***
***- Al Godoy, grandioza damaska kiraso.***

Luciano, kiel oni povas vidi, ne parolas al sia frato pri siaj koruptoj aŭ "entreprenoj" kaj la facila riĉaĵo kiun li amasigis dum nur unu jaro. Sed li ne sciis ke la Unua Konsulo sciis ĉion per ***Talleyrand*** kaj ***Fouche***. Luciano Bonaparto ĉesis esti ambasadoro de Francio kaj en februaro de 1802 li forlasis Hispanion por neniam reveni. Sed li povintis reveni, ĉar kiam en 1808 la gereĝoj kaj la princo de Asturio donis al Napoleono la hispanan kronon, Luciano estis la unua al kiu la franca Imperiestro ofertis ĝin, eĉ antaŭ ol al Jozefo. Luciano ne akceptis ĝin kaj preferis vivadi en Romo, kie li amikiĝis kun la papo (kiu eĉ nomumis lin princo de ***Canino***). Poste, kaj kiam li foriris al Usono, li estis kaptita de la angloj kaj en Anglujo li estis tenata dum kvar jaroj. Li revenis nur flanken de la Imperiestro post la malvenko de ***Waterloo***, kiam la ratoj fuĝis de la ŝipo, por vivi kun sia frato la maldolĉan finon de la Imperio.

Dum la sekvintaj jaroj, post la foriro de Luciano, la Hispanio regata de ***Godoy*** daŭre restis ligita al Napoleono (Imperiestro ekde 1804) kaj ties politiko. Tiu alianco, kiel sciate, alportis al nia lando katastrofojn kiel la perdo de la mararmeo en la Batalo de Trafalgaro (oktobro de 1805) kontraŭ la angla eskadro. La malamo kaj rifuzo al la ĉefministro



La reĝo Karolo la 4-a



La reĝino Maria Ludovikino



*Manuel Godoy*


Traktato de *Fontainebleau*


Batalo de Trafalgaro


Insurekcio de *Aranjuez*


La reĝo Ferdinando la 7-a

Godojo estis ĝenerala en la lando, sed li persistis en sia politiko de senĉesa cedo al la francaj postuloj. Post la fiasko de lia provo invadi Brition, Napoleono dekretis Kontinentan Blokadon, kiu malpermesis la komercon de britaj produktoj sur la eŭropa kontinento. Portugalio, tradicia aliancano de Anglujo, rifuzas obei kaj Napoleono decidas sian invadon. Por tio li bezonis transporti siajn terajn trupojn tien. La 27-an de oktobro de 1807, la Hispanio regata de ***Godoy*** kaj la Napoleona Francio subskribis la Traktaton de ***Fontainebleau***, per kiu oni interakordis komunan franc-hispanan militan invadon de Portugalio, por kiu estis permesata la paŝo de francaj trupoj tra la hispana teritorio.

La Traktato entenis planon de divido de la portugala teritorio post ties konkerado far la franc-hispanaj trupoj. La suda el tri partoj, tiu apuda al la hispana Ekstremaduro kie naskiĝis ***Godoy***, estis destinita iĝi reĝo-lando por tiu ulo. Sendube li konsideris tiun solvon kiel decan kulminon de sia politika kariero. Sed la saman tagon de la subskribo de tiu Traktato, en la Eskorialo-palaco kie tiam restadis la reĝa familio, okazis io kio devigis lin pensi ke lia situacio ne tiom estis firma. Estis malkovrita iu komploto kontraŭ li. La konspirantoj apartenis al la kamarilo de la princo Ferdinando, heredonto de la krono, kaj havis ties konon kaj apogon.

Laŭ la plano de la konspiro, la Princo de la Paco estus arestata, kaj iu prestiĝa nobelo kaj militisto de tiu kamarilo alprenus la komandon de la armeo kaj devigus la reĝon Karolon abdiki favore al la Princo de Asturio, la heredonto de la krono. La plano estus povinta sukcesi ĉar la tuta lando abomenis la ĉefministron Godojon. Sed ĉi tiu estis informita antaŭ la entrepreno de la operacio kaj li povis abortigi ties realigadon. La princo estis arestita laŭordone de lia patro kiu, kiel kutime, agadis favore al la interesoj de ***Godoy***.

En la proceso kiun oni faris al li, la Princo Ferdinando kondutis ĝuste kiel li estis. Malkuraĝa kaj egoisma antaŭ danĝero, li konfesis ĉion kaj perfidis siajn

komplicojn. Submetita al aŭtoritato, li ne hezitis peti, laŭ la plej malnobla kaj infana maniero, la pardonon de la gereĝoj kaj promesis al ili konduti ekde tiam kiel la plej fidela el la filoj... Flatema, li certigis al ***Godoy*** en persona kunveno senti pri lia persono kaj kiel reganto la plej fervoran admiron. Tamen antaŭ la hispana publika opinio li eliris el la krizo kiel la senkulpa kaj martira princo, bildo kiu tre utilus al li en la estonteco. La ĝenerala teniĝo de la publika opino favore al la princo kaj ties komplicoj influis sur la juĝistoj kiuj, fine, absolvis la arestitojn "pro manko de pruvoj".

Dume sekvis antaŭen la planoj de Napoleono por la milita atako al Portugalio. La reĝa familio de tiu lando, antaŭ la danĝero, enŝipiĝis destine al Brazilo. La fakto ke ***Godoj*** konsilis al la hispana reĝa familio enŝipiĝi destine al la Amerikaj Kolonioj atestas ke li ne fidis pri la konduto de la franca Imperiestro. Tiam estis trairante la hispanan teritorion pli da francaj trupoj ol tiuj interakorditaj per la Traktato de ***Fontainebleau***, kaj aferoj kiel tiu de la Luiziano instruis ke Napoleono ne estis fidinda pri la plenumado de interakordoj. Kiam la reĝa familio, kaj ***Godoy*** kun ili, estis en ***Aranjuez*** pretaj entrepreni la vojaĝon al Ameriko, de la 17-a al la 19-a de marto de 1808, estis tie popolaj tumultoj kiuj kaŭzis ne nur la falon de la ministro ***Godoy*** sed ankaŭ la abdikon de Karolo la 4-a favore al lia filo Ferdinando.

La ribelo komenciĝis dum la nokto de la 17-a, kiam amaso da agitantoj gviditaj de la grafo de ***Teba***, kiu uzis la kaŝnomon de "onklo Pedro" por identigi sin inter siaj dungosoldatoj, atakis la palacon de ***Manuel Godoy***. La ribelantoj ne trovis la Validon, nur liajn du virinojn (edzino kaj amantino) kaj lian filinon, kiujn ili prenis inter montroj de entuziasmo al la Reĝa Palaco. Tiu amaso vivuis la edzinon kaj filinon de ***Godoy***, kiujn ĉi tiu ne amis, kaj primokis la amantinon ***Pepita Tudo***, kiel signo ke la celo de la ribelo estis nur la favorato. Matene de la 19-a de marto, ***Godoy*** estis trovita de la ribelantoj kaŝita en kromkonstruaĵo de lia palaco. Inter batoj de la homamaso, la malamata reganto estis kondukita al la kazerno de la Gvardio, kiun regis subtenantoj de la princo Ferdinando. Tiutage mem okazis intertraktado inter la reĝo Karolo la 4-a kaj la subtenantoj de lia filo, post kio la maljuna reĝo abdikis favore al Ferdinando, metante la vivon de ***Godoy*** kiel ĉefan kondiĉon.

La falo de ***Godoy*** estis bonvenigita kun ĝenerala jubilo tra la tuta regno. Ankaŭ, pluraj kunlaborantoj liaj suferis la atakon kaj rabadon de siaj domoj, dum iuj el la altaj eminentuloj, kiuj perdis sian pozicion por kontraŭstari lin, rekuperis ĝin. La Princo Ferdinando estis, de tiam, reĝo de Hispanio, kvankam li ankoraŭ ne havis la agnoskon de Napoleono. Por altiri la favoron de Bonaparto, la nova reĝo cedis la gardadon de siaj gepatroj al la generalo ***Murat*** (kiu tenis siajn trupojn en la ĉirkaŭaĵo de Madrido). Li ankaŭ rajtigis la francajn trupojn eniri en la ĉefurbon. Tial, kiam la francoj eniris la ĉefurbon la 23-an de marto, la madridanoj akceptis ilin kiel amikojn; ne kiel okupotrupoj. Baldaŭ poste, la generalo ***Murat*** transdonis la eksiĝintan reĝon kaj lian edzinon al Francio. Komence de aprilo 1808 Ferdinando la 7-a ankoraŭ ne estis agnoskita kiel reĝo far Napoleono, kiu havis sian grandan armeon distribuita tra la tuta lando.

Karolo la 4-a, post sia deviga abdiko, petegis al Napoleono favore al ***Godoy***. La franca premo igis la novan reĝon, Ferdinando la 7-a, liberigi la kaptiton kaj translokiĝi kun li al Bajono, kie li renkontiĝis kun la reĝa familio por, en ĉeesto de la imperiestro, solvi ilian malakordojn. Tie la komedio finiĝis kaj la dramo komenciĝis. Post senfinaj riproĉoj, Ferdinando redonis la kronon al sia patro, kiu siavice abdikis la 5-an de majo 1808. Napoleono kronis sian fraton Jozefon kiel reĝon de Hispanio.

Napoleono mistaksis la situacion de Hispanio esperante ke la landa loĝantaro bonvole akceptu lian solvon; li mem agnoskis tion kiam li verkis siajn memoraĵojn en Sankta Heleno. Pri la sepjara milito kiu okazis en Hispanio kontraŭ la francaj trupoj, kaj ties sekvoj (komenciĝo de la perdo de la hispana kolonia imperio), estas informo en Esperanto en la 83-a numero de ĉi tiu revuo **Heleco**, en la retadreso: **https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/83/heleco83.html**

Nun ni metu finon al la raportado pri la korupta aventuro de ***Godoy*** priskribante lian destinon post la perdo de la ega politika potenco kiun li ĝuis ĝis tiam. Dum ankoraŭ vivadis la eksaj gereĝoj Karolo kaj ***María Luisa***, t. e. ĝis la jaro 1819, ***Godoy*** kunloĝis kun la eks-monarkojn en la diversaj lokoj (en Francio kaj Italio) kie ili vivadis, ofte kun ekonomiaj malfacilaĵoj. Akompanis lin en tiu ekzilo lia amantino ***Pepita Tudó***, sed ne lia edzino, la grafino de ***Chinchon*** kaj la filino de ambaŭ.

Post la morto de la grafino, en 1828, ***Pepita Tudó*** postulis ŝian rajton iĝi lia edzino; sed kiam ili edziĝis, la rilato finiĝis. ***Pepita*** sopiris brili en la salonoj; tie, kie ŝi regis kiel kromvirino, ŝi volis regi kiel edzino. La hejmo de ***Godoy*** fariĝis kontinua festo, sensenca malŝparo. Bankroto estis praktike neevitebla. ***Godoy*** ekloĝis kun sia familio en Parizo en 1832. Sed ĉe sia hejmo sur Bulvardo ***Beaumarchais***, ***Pepita*** daŭrigis sian karieron por atingi agnoskon en la socio kaj, malgraŭ la manko de financaj rimedoj, ŝi organizis festenojn, donis abundajn dancojn kaj enŝuldiĝis. La disputoj estis konstantaj ĝis ŝi decidis foriri al Madrido por ne reveni.

En Parizo, ***Godoy*** modere travivis, kun malmulte da socia vivo, la ceterajn 16 jarojn de sia vivo. La lasta granda ĝojo de lia vivo venis al li el Madrido. En 1843, iu jam tre maljuna ***Godoy*** ricevis neatenditan viziton: temis pri la verkisto ***Ramón Mesonero Romanos***, kiu aŭskultis liajn plendojn kaj skandaliĝis kiam li ekkonis la realon, en kiu loĝis la eksa Princo de Paco. Reen al la hispana kortego, ***Mesonero*** atingis de Izabela la 2-a, kiu eble estis pranepino de ***Godoy***, subskribi la 30-an de aprilo 1844 dekreton, per kiu liaj iamaj havaĵoj estis redonitaj al li. Ne estis facile; la tribunaloj aŭskultis la apelacion de ***Pepita Tudo*** kaj, atendante la juĝon, la riĉaĵo estis konfiskita. En kompenso, ***Godoy*** ricevis siajn malnovajn titolojn, escepte tiun de Princo de la Paco, kaj lian armean rangon estis agnoskita al li. Krome, lia filino ***Carlota***, princino ***Rúspoli***, donis al li pension de 12.000 duroj jare. Se, en liaj lastaj jaroj, li pripensis la eblon reveni al Hispanio, li devis kompreni ke li ne povus esti pli ol fremdulo en sia lando. Definitive loĝanta en Francio, li ankoraŭ havis tempon vidi la revolucion de 1848 kaj la regadon de nova Bonaparto, ***Louis Napoleon***.

# Senĉesa koruptado sur konstanta kriza fono



Jam ni vidis kiom multe malfeliĉa estis por Hispanio la unuaj 15 jaroj de la 19-a jarcento. Post la lastaj 8 jaroj de la korupto-plena reĝado de Karolo la 4-a, sekvis sep-jara milito de la hispana popolo kontraŭ la armeoj de Napoleono. La hispanoj kiuj rifuzis la reĝon kiun la franca Imperiestro preskribis al ili, Jozefon Bonaparton, pensis ke ili estis farante ion gravan, indan kaj interesan batalante favore al tiu kiun ili kromnomis «La Dezirito», la filo de Karolo la 4-a, Ferdinando la 7-a. Ĉi tiu ulo revenis el lia ekzilo kiam evidentiĝis la fiasko de la napoleonaj planoj por Hispanio, kaj reĝis ĝis sia morto en 1833. Dum tiu ne longdaŭra reĝado li atingis nekredeblan prodaĵon: li sukcesis forpreni el sia patro la titolon je «plej malinda reĝo de Hispanio».

Inter la multaj friponaĵoj kiujn oni atribuas al li estis devigi ke li gajnu kelkfoje la loterian premion. Ĉu tiu akuzo estas vera? Ne eblas certigi tion, sed, jes ja, li tute kapablis fari eĉ pli abomenindajn agojn; ni vidu: En oktobro de 1807 li konspiris por la detronigo de lia patro, kaj fiaskinte tiu komploto, kelkajn monatojn poste, en marto de 1808 la detronigo estis realigata sekve de la t. n. «Insurekcio de ***Aranjuez***». Neniu kulpigas lin pro tiuj faroj. Ambaŭ elpaŝoj ĝuis, kaj daŭre ĝuas, la simpation de la tuta lando ĉar estis/as ĝenerala rifuzo al la politiko kiun ***Godoy*** estis realigante kun la apogo de la gereĝoj Karolo la 4-a kaj ***María Luisa de Parma***. Do, kiam la milito kontraŭ Napoleono finiĝis, li estis akceptita en la lando per homamasa aklamado, kaj malmultaj memoris la bedaŭrindan rolon, kiun li ludis en la eventoj en ***El Escorial*** en la aŭtuno de 1807 perfidante kaj denoncante siajn komplicojn. Nur en tre malgrandaj rondoj oni eksciis pri la hontigaj epizodoj okazintaj en Bajono en la samaj tagoj, kiam la madridanoj leviĝis kontraŭ la franca ĉeesto. Ankaŭ ne estis publike konataj la gratuloj, kiujn li dediĉis al la franca imperiestro pro siaj militaj sukcesoj en ĉi ties militado en Hispanio.

Nu, estante li reĝo laŭ popola aklamado, spite al la tradicia kutimo transigi la kronon de patro al filo, laŭ la "Dia Rajto", tamen li rifuzis akcepti konstitucion kaj postulis plenumi la reĝecon ĝuste laŭ la "Dia Rajto", t. e. absolutisma, kvankam lia patro estis ankoraŭ vivanta. Ĉi tio oportune solviĝis la 19-an de januaro de


La reĝo Ferdinando la 7-a


Rafael de Riego


María Cristina de Borbón


Juna Izabela la 2-a

1819. Tiutage mortis en Napolio Karolo la 4-a, nur 17 tagojn post la morto de lia edzino ***María Luisa de Parma***. Se tiu reĝa geparo estus reakirinta la politikan potencon en Hispanio sendube ili estus senheredigiinte sian filon Ferdinandon. Tial ne mankas historiistoj kiuj supozas ke "la Dezirito" iome influis sur tiuj oportunaj mortoj.
Kiel difinaj elementoj de la personeco de Ferdinando la 7-a, oni povas aserti mankon de intereso pri la ŝtataj aferoj kaj ian hedonismon. Li ne kapablis alfronti la gravajn malfacilaĵojn de la historiaj cirkonstancoj de lia reĝado. Ekzemplo de ĉi tiu nekapablo estis la skandala afero de la aĉeto de floto el la rusa caro Aleksandro la 1-a. La etapo de ***Godoy*** (Batalo de ***Trafalgar***) kaj la milito kontraŭ Napoleono estis lasinte la hispanan mararmeon en bedaŭrinda situacio. Estis necesaj ŝipoj por transporti soldatojn de Hispanio por estingi la ribelon en la Amerikaj kolonioj. Tial la kamarilo proksima al la reĝo entreprenis aĉeti ok ŝipojn el Rusujo kontraŭ la skandala monsumo de preskaŭ sepdek milionoj da realoj. Kiam la ŝipoj alvenis al Kadizo, en februaro 1818, oni konstatis ke la ligno de iliaj karenoj estis putra kaj ili ne povis vojaĝi al Ameriko.
Post kelkaj fiaskintaj ribeloj celante konstitucian reĝimon, sukcesis unu iniciatita de la asturiano ***Rafael de Riego*** komence de la jaro 1820. La reĝo sin vidis devigita akcepti konstitucion, sed tiam li senĉese konspiris por restarigi la absolutismon. Kiam fiaskis unu ribelo organizita de li, pluafoje li ne hezitis perfidi siajn komplicojn. Sed poste, en 1823, li povis profiti tion ke la situacio en Eŭropo ne estis favora al la progresisma politiko, kaj iu franca armeo restarigis la absolutisman monarkion en Hispanio. Tiuj liberaluloj kiuj ne sukcesis forfuĝi ekzilen estis severe punitaj. La militisto ***Rafael de Riego*** mortis pendumita. De tiam la perfida reĝo pli akre persekutis la politikajn oponantojn ĝis la fino de lia reĝado.
El siaj tri unuaj edzinoj li ne sukcesis generi idojn. La kvara kaj lasta edzino estis Maria Kristina de Burbono, nevino lia, nepino de lia patrino ***María Luisa de Parma*** kaj eble ankaŭ de ***Godoy***. Tiu lasta edzino naskis al li du filinojn; Ferdinando volis nomumi la plejaĝan el ili, Izabelan, lian heredontinon, sed por tion fari li devis ŝanĝi iun leĝon kiu tiam malpermesis al la inoj reĝi en ĉi tiu lando. Tiu dispozicio

trovis kontraŭstaron de lia frato Karolo. Kiel sciate, tio estis kaŭzo de la t. n. Unua Karlisma Milito. Pri ĉi lasta evento, tamen, ne kulpis la reĝo Ferdinando; ĝi estis rezulto de la politikaj kontraŭdiroj de la lando ĉar ĉirkaŭ la pretendanto Karolo ariĝis la absolutistoj dum la liberaluloj apogis la legitimecon de la etulino Izabela. Pri tiu milito kaj ceteraj epizodoj de la 19-a jarcento en Hispanio estas informo en Esperanto en la numero 87-a de ĉi tiu revuo **Heleco**, en la retadreso: **https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/87/heleco87.html** . Nun ni volas pritrakti nur la koruptadon dum tiu periodo, sed ni ne povas delasi la politikajn eventojn de la epoko ĉar la tiama koruptado multe rilatas al ili.
Verdire, tiel la reĝa regentino, ***María Cristina de Borbón***, kiel ŝia bofrato, ***Carlos María Isidro***, estis ambiciuloj kiuj agadis same koruptece celante la politikan potencon. La pretendanto bazigis sian legitimecon sur tio kion liaj partianoj nomis «La Sankta Tradicio», sed la leĝo kiu malpermesis la virinojn reĝi tute ne estis "sankta", kaj krome eĉ ne estis tradicio, ĉar ĝi estis relative ĵusa, kaj en Hispanio estis kelkaj reĝinoj, iu tre grava kia Izabela la Katolika. Sed la pretendanto Karolo, kondiĉe esti kronita kiel reĝo de Hispanio estis preta sin apogi sur la plej reakciaj fortoj de la hispana socio, konservi la feŭdismon kaj eĉ restarigi la Inkvizicion. Dume Maria Kristina de Burbono, celante konservi la reĝecon de sia filino, sin apogis sur la partianoj de la kontituciismo: ŝi proklamis amnestion por tiuj kiuj devis ekziliĝi dum la reĝado de ŝia edzo kaj por tiuj kiuj suferis enprizoniĝon kaj alitipan persekutadon. Ŝi ankaŭ rehabilitis tiujn, kiel ***Rafael de Riego***, kiuj estis kondamnitaj al mort-puno dum la reĝado de Ferdinando la 7-a. Sed ŝi tute ne kontemplis la eblecon konsenti ellaboradon de konstitucio, kiel pruvas la fakto ke estis necesa militista ribelo de ŝia armeo por ke ŝi akceptu tion.
Tiu sinjorino vere prenis la kontrolon de la landa politiko kaj profitis ĉiujn eblecojn pliriĉiĝi dum ŝia regenteca etapo. Ĝuste tri monatojn post la morto de ŝia edzo la reĝo Ferdinando, ŝi edziniĝis al iu serĝento de la palaca gvardio, ***Agustín Fernando Muñoz***. La geedziĝo estis sekreta sed ne dumlonge ĉar baldaŭ oni vidis ŝin publike graveda. Krom la du filinoj kiujn ŝi naskis al la reĝo Ferdinando, al Sinjoro ***Muñoz*** ŝi naskis ne malpli ol 8 gefilojn. Kune kun sia edzo, ŝi entreprenis negocojn en rilato kun la salo, fervojo kaj sklaveco, en kiuj partoprenis ankaŭ la generalo ***Narváez***, kaj oni diris, ke ne ekzistis industria projekto, en kiu la reĝa patrino ne havis interesojn. Sekve de tio, ŝi vekis popolan antipation. Ni vidu, ekzemple, ŝian demarŝadon de la afero t. n. «Alienado de ***Mendizábal***», la alienado ("desamortización" en la hispana lingvo) de la ekleziaj posedaĵoj.
La realiginto de tiu politiko estis ***Juan Álvarez Mendizábal***, ministro dum la Karlisma Milito kaj ĉef-ministro inter septembro de 1835 kaj majo de 1836. La eksproprietigo de la ekleziaj bienoj estis realigita laŭ dekretoj de ***Mendizábal*** en februaro kaj marto de 1836. La celo de ***Mendizábal*** estis rekuperi por la lando la grandajn bienojn kiuj restis nekultivitaj dum jarcentoj, subkontrole de la Eklezio, kaj transdoni ilin al la kamparanoj por ilia kultivado. Sed tiu celo ne povis esti


Carlos María Isidro


Juan Álvarez Mendizábal


Atako al la konventoj en Madrido en 1835


Baldomero Espartero


atingita: La Regentino elpostenigis ***Mendizábal***-on post la eksproprietigo de la bienoj sed antaŭ ties aŭkciado. Do, la kontrolo de la asignado de la teroj pasis al alia ministro kun aliaj planoj, kaj tiele la teroj ne estis disdonitaj al la kamparanoj sed al grandaj terposedantoj kaj riĉaj burĝuloj. Evidentas ke la sinjorino lerte sciis ludi, siafavore, kun la klasaj kontraŭdiroj de la socio.
Ĉi tio altiras nian atenton al la klas-strukturo de la tiama hispana socio. Priskribi ĝin ne apartigas nin el la celo de ĉi raporto, la koruptado en Hispanio, sed male, ĉar estas granda rilato inter ambaŭ aferoj, kiel ni vidos. Unue ni vidu kia estis la situacio en la hispanaj zonoj kiuj apogis la karlismon. Konstatinda fakto estis ke la karlismo kun ties ideologia flago de la "Sankta Tradicio" kaj ties politika celo de la konservado de la absolutisma monarkio kaj ekonomia potenco de la feŭdsinjoroj, ne venkis en la urboj sed en la kamparo. Kaj tio estis pro la influo de la katolika klerikaro en tiu medio. La dominado de la reakcia penso en la kampara medio ne tiom estis rezulto de la agado de la Inkvizicio kiom de la persistado de malklereco. Ja, la influo de la klerisma movado de la antaŭaj generacioj disvolviĝis, kompreneble, en la akademiaj medioj, en la urboj, ne en la kamparo. La dormado de la racio produktas monstrojn.
Sed estis ankaŭ alitipa personalo kiu sin metis plendecide favore al la Pretendanto ***Carlos María Isidro***. Temas pri la t. n. Foruaj Regionoj: Eŭskio, Navario, Katalunio, Valencio… kiuj konservadis tiujn mezepokajn instituciojn de la foruoj. Kaj tio, unuavide, ŝajnas stranga afero ĉar laŭ ilia naturo la foruoj estas limigoj de la absoluta reĝa povo kaj de la potenco de la feŭdsinjoroj, do, temis pri celoj tute kongruaj kun tiuj de la konstitucioj. Tiorilate la foruoj povus esti konsiderataj, kaj iuj historiistoj tion faras, kiel ĝermo aŭ origino de la konstitucioj. Kial, do, tiu kontraŭdiro ke ĝuste la foruaj regionoj poziciiĝis favore al la absolutismo? La ekspliko de tiu stranga politika fenomeno estas ke la konstitucioj estis atingitaj **rajtoj**, dum la foruoj estis atingitaj **privilegioj**. T. e. la konstituciismo celis ellabori leĝan kodon entenantan la rajtojn de la tutlanda civitanaro, sed la foruoj estis lokaj, urbaj, kiel multe regionaj, privilegioj ĝuataj

de la koncernaj loka, urba, regiona loĝantaro kun ekskludo de la loĝantaro de la sama lando kiu ne apartenas al la forua teritoria ento.
Do, **privilegio**, jen la esenco de la afero. Al plejmultaj el la loĝantoj de la foruaj regionoj tute ne interesas ĝeneralaj rajtoj kiujn ili kunhavus kun la cetero el la landa loĝantaro. Tio kio entuziasmigas ilin estas ĝui ion kio mankas al aliaj. Tiu emo nomiĝas «elitismo», la sento kaj la pretendo aparteni al elstara kaj distingita kolektivo kiu meritas pli ol la ordinaraj grupoj. Kaj por konservi tian altrangecon rilate al la cetero el Hispanio, la foruaj regionoj pretis militi por submetigi la ceteron de Hispanio al tiraneca reĝadformo. Kiel ajn oni rigardus la aferon, la elitismo povas esti konsiderata kiel iu formo de korupto.
Ĉi-kaze la korupta ento estas ne persona sed kolektiva. Ni devas eltiri la instruon ke ankaŭ la popoloj povas esti, kaj fakte estas, koruptaj kiel atestas la fakto ke la popolanoj de ĉiuj imperiismaj potencoj kunlaboras kun ties regantoj en la ekspluatado kaj subpremado de la submetitaj kolonioj.
Daŭrigante la studon de la karlisma zono, ni devas noti ke laŭlonge de la disvolviĝo de la milito estis sin profilante du malsamaj tendencoj kies kontraŭdiroj senĉese pliakriĝis. Unu el ili estis tre radikala en ties reakciaj pozicioj, favore al la feŭdismo, la absolutisma monarkio kaj la Inkvizicio. La alia sentis inklinon al la valoroj de la kapitalismo kaj pli kaj pli emis interakordi kun la partianoj de Izabela. Fine tiu lasta tendenco sukcesis trudi la interakordon de ***Vergara*** kiu metis finon al la milito agnoskante la reĝecon de la filino de Ferdinando la 7-a.
Ankaŭ inter la partianoj de la infana reĝino estis dum la milito konfliktoj kaj kontraŭdiroj. Ni jam vidis ke la Regentino ***María Cristina***, fakte, estis tiom malfavora al la konstituciismo kiom ŝia bofrato ***Carlos María Isidro***. Estis necesa ia ribelo de ŝia propra gvardio por ke ŝi agnosku konstitucion. Inter la partianoj de ŝia filino ne mankis moderaj absolutistoj kvankam pli nombris la liberaloj, sed ene de la liberalaj vicoj komencis aperi distingo inter moderaj kaj progresistaj liberaloj. La nomumo de ***Mendizabal*** kiel ĉef-ministro, ĉi ties leĝo por eksproprigo de la ekleziaj posedaĵoj kaj la posta eksigo de tiu ministro, far la Regentino, estis epizodoj de la kontraŭdiroj inter ambaŭ tendencoj de la liberalismo. La eksigo de ***Mendizabal*** provokis popolan malkontenton kiu manifestiĝis per perforto kontraŭ la klerikaro, ĉefe la monaĥejoj, en Madrido kaj aliaj lokoj. Poste okazis, en 1836, la menciita militista ribelo kiu devigis la Regentinon agnoski konstitucion. La ellaborado de la konstitucio estis la lasta komuna, interakordita, ago de ambaŭ sektoroj de la liberalismo; de tiam ne plu estos konkordo inter tiuj politikaj tendencoj.
Povas ŝajni strange ke du politikaj fortoj kiuj kunhavis la rifuzon al la reĝa absolutismo, ankoraŭ forta en tiu epoko, ne sin tenu pli amikece kaj kunlabore. Por kompreni kial okazis kaj daŭre okazas tio sufiĉas klarigi ke la titoloj de "moderuloj" kaj "progresistoj" estis la tiama nomado de tio kio nuntempe nomiĝas "dekstraro" kaj "maldekstraro". La tiama karlismo estas konceptata hodiaŭ,


Reĝino Izabela la 2-a


*Ramón María Narváez*


*Antonio María Claret*


La monaĥino Patrocinio
*Josefa Anastasia Quiroga*

same kiel la postaj faŝismoj, kiel ekstrema dekstraro. La progresistoj, tiamaj maldekstruloj, baldaŭ komprenis ke ilia ekonomia intereso kontraŭdiris tiun de la naskiĝanta burĝaro. Tiu kontraŭdiro en Francio jam estis aperinta antaŭe, dum la Revolucio. La tieaj kaj tiamaj maldekstruloj estis nomitaj ***Sans-Culottes*** (senĉemizuloj). En tiu unua duono de la 19-a jarcento tiuj popolaj tavoloj ankoraŭ ne estis alprenintaj la trajtojn de la proletaro kiun poste generis la disvolviĝo de la industrio. Krome ili, tiutipaj homoj, tre multenombraj en la urboj kaj sen ia ajn korelativeco en la kamparo, ankoraŭ sciis nenion pri klas-batalo, klasaj interesoj, klas-konscio… En la jaro 1835, kiam ekzaltitaj amasoj de tiu soci-klaso entreprenis en Madrido bruligadon de preĝejoj kaj masakradon de klerikoj, ***Karl Marks*** estis ankoraŭ 17-jara knabo kaj ankoraŭ ne estis verkinte pli ol kelkaj lernejaj laboraĵoj. Do, la tiamaj hispanaj jakobenoj, maldekstruloj, senĉemizuloj aŭ kiel ajn oni volus ilin nomi, fakte havis klaskonscion kvankam ili ne scius kion signifas tio. Ili perceptis ke la karlismo ne estis favora al la plibonigo de ilia situacio, kaj konstatis ke plejparto el la pastraro pledadis favore al la karlismo. Dume, ili komprenis ankaŭ ke tiu liberala riĉularo kiu profitadis la bien-ekspropriigon de ***Mendizabal*** por pliriĉiĝi, ne estis siaj fratoj eĉ se koincidus kun ili en la afero de la konstitucio.

Oni konas, kiel la milito finiĝis kaj kiaj estis ĝiaj politikaj sekvoj. Post malsukcesi provante akordigi la politikajn tendencojn de progresemuloj kaj moderuloj, ***María Cristina*** estis devigita cedi la Regentecon al ***Baldomero Espartero*** kaj ekziliĝi. Kiel Regento, ***Espartero*** sin vidis, kiel antaŭe la reĝa patrino, nekapabla alfronti la interfrontiĝojn, ofte perfortaj, inter la diversaj politikaj fortoj de la lando. Post tri jaroj li mem devis eliri ekzilita, koincidante kun la plenaĝiĝo de la reĝino Izabela kaj ĉi ties alpreno de la reĝa funkcio. Decida apogo por la forpelo de ***Espartero*** estis tiu de alia militisto, ***Ramón María Narváez***, kiu poste ludis gravan rolon dum la tiam komenciĝanta reĝado. Estas sufiĉe da historia informo pri la okazintaĵoj de tiuj krizaj jaroj, kaj la menciita 87-a numero de ĉi tiu revuo priskribas ĝin en Esperanto.

Ĉar la temo pri kiu ni atentas nun estas tiu de la koruptado, ni diru ke la reĝado de Izabela la 2-a, laŭ iuj histori-

istoj, kiel ***Jesús Cruz***, povus esti klasifikita kiel unu el la plej koruptaj en la historio de Hispanio. Dum tiu periodo, 1843-1870, en Hispanio la monarkio cedis multe pli da politika potenco al la parlamento ol ĉiam antaŭe kaj poste, sed ĝi metis kontinuajn obstaklojn al la partopreno de civitanoj en registaraj aferoj. Sur la tereno de la batalo por demokratiaj liberecoj, la reĝado de Izabela la 2-a estis fiasko. Ankaŭ la institucioj estis distorditaj kaj disvastiĝis privoĉdona korupto. Neniu partio, kiu organizis elektadon, perdis ĝin en tiu periodo. Se okazis ŝanĝoj, ĝi estis pro la enmiksiĝo de la milita kasto, kiu ŝanĝis registarojn surbaze de insurekcioj aŭ puĉoj de iu aŭ alia signo.


**Izabela la 2-a (foto)**

Facile manipulita de ŝiaj ministroj kaj de la religia "kliko" de la kortego (la pastro ***Antonio María Claret***, ŝia konfes-prenanto, kaj la monaĥino Patrocinio), la reĝino ofte enmiksiĝis en la politikon de la lando: iuokaze ŝi eĉ kandidatiĝis por prezidantino de la registaro, kio igis ŝin nepopulara inter politikistoj kaj fine okazigis ŝian falon pro la Revolucio de 1868.


***Emilio Castelar y Ripoll***

Dum la reĝado de Izabela la 2-a, Hispanio precipe moderniĝis danke al la konstruado de multaj fervojaj linioj. La kreado de la fervoja reto utilis al multaj roluloj de la reganta klaso por riĉigi sin, kiel la patrino de la reĝino mem, ***María Cristina***, aŭ ***José de Salamanca***, bankisto el Malago, kiu ne nur akiris, kun la konsento de la krono kaj de la Parlamento, tutan serion da koncesioj (129 milionoj da realoj kiel subvencioj en 1853-1854), sed samtempe, li vendis la fervojan linion ***Madrid-Aranjuez*** al la registaro kontraŭ pli ol 60 milionoj da realoj kaj ricevis ĝin denove de ĉi-lasta en luo, sen antaŭa oferto, por miliono kaj duono jare, kiun li neniam pagis.


**Markizo de *Salamanca***

En la aŭtuno de 1844, la Madrida Borso spertis serion de entuziasmaj tagoj dum kiuj la plej multaj investantoj spekulis haŭsiere, je kurzo-altiĝo. Optimismo regis rezulte la stabileco ebligita de la ***Narváez***-registaro. Tamen, post kelkaj tagoj da analizado, La financisto ***José de Salamanca*** komencis spekuli basiere, je kurzo-falo, en ŝajne mallerta strategio. Tamen la realo estis alia: per sia privilegia pozicio en la publikaj aferoj, la estonta markizo konis la pretecon de kelkaj generaloj ribeli. ***Narváez*** eĉ korespondis kun ili cele igi ilin rezigni je tiu intenco. Uzante ĉi tiujn


**Disturboj en Madrido en aprilo de 1865**


*María Cristina de Borbón* kun ŝia dua edzo, *Agustín F. Muñoz* kaj *Maria Luisa Fernanda*, filino ŝia kaj de Ferdinando la 7-a


Foto de Izabela la 2-a kun ŝia edzo Francisco de Asís


Generalo *Francisco Serrano*


*Enrique Puigmoltó*

informojn, li atendis ĝis la alveno de novaĵoj pri la puĉo de generalo ***Martín Zurbano*** en ***Nájera***, kiun ***Salamanca*** kaj liaj kunuloj diskonigis kun klara intenco kaŭzi panikon inter la investantoj. La valoroj de la merkato, tiel sentemaj kiel ĉiam okaze de iu subita ŝanĝo de la publikaj aferoj, falis kaj ***Salamanca***, kiu estis spekulinte pli basiere dum borsaj sesioj, en kiuj ĉiuj faris la malon, enpoŝigis proksimume 30 milionojn da realoj en unu tago. La markizo de ***Riánsares,*** edzo de la reĝa patrino ***María Cristina***, kaj la generalo ***Narváez*** ricevis po du milionoj.

La febro je spekulado malmulte rilatis al la realo de la lando. La bilanco de tio, kio estis farita ĝis 1856, limiĝis al la linio ***Barcelona-Mataró*** (1848), la linio ***Madrid-Aranjuez*** (kiu finfine estis privata komerco de la Markizo de ***Salamanca***), la linio ***Gijón-Langreo*** (privata komerco de la duko de Riánsares) kaj tiu de ***Valencia-Játiva***. Krome la malfacila hispana orografio devigis adopti malsaman mezurilon ol la eŭropa kaj la adapto de reto de vojoj faciliganta aliron al la stacidomoj estis forlasita, kio, aldonita al la altaj tarifoj de fervoja transporto, baldaŭ kondukis al perdoj en komerco. Gravaj hidraŭlikaj laboroj ankaŭ estis faritaj, kiel la Kanalo de Izabela la 2-a, impulsita de la ministroj ***Juan Bravo Murillo*** kaj ***Manuel Alonso Martínez***.

La respublikana lidero ***Emilio Castelar y Ripoll***, per iu gazeta artikolo deklaris, ke Izabela la 2-a, ŝarĝita de ŝuldoj, rezervis 25 elcenton de la enspezoj el la vendo de aktivaĵoj, kiuj plejparte ne estis ŝiaj, sed de la nacio. La registaro ordonis eksigi kaj forpeli ***Castelar***-on el ties posteno kiel universitata profesoro, kio ankaŭ kaŭzis la eksiĝon de la Rektoro de la Centra Universitato; studentaj surstrataj manifestacioj la 10-an de aprilo de 1865 por subteni la eksiĝintojn, sufokitaj de la Civil-Gvardio kulminis per dek unu mortintoj kaj 193 vunditoj, inter ili maljunuloj, virinoj kaj infanoj.

Krom la koruptado kaj la misa demarŝado de la publikaj aferoj, malbonigis la reputacion de la reĝino ankaŭ ŝia privata vivo kiu, fakte, ne tiom estis privata ĉar estis publike konataj la skandaloj de la reĝa familio. Ŝi havis kelkajn amantojn antaŭ kaj post ŝia edziniĝo al ŝia kuzo ***Francisco de Asís de Borbón***, kaj oni pensas ke ĉi tiu estis patro de preskaŭ neniu el la gefiloj kiujn ŝi akuŝis, kio estas tre verŝajna ĉar li estis samseksemulo kaj havis siajn proprajn amantojn. Inter la amantoj de la reĝino estis famaj politikistoj, armeestroj, artistoj…




**Nur post la detronigo de la reĝino Izabela oni povis fari karikaturojn kiel ĉi tiuj, sed ili trafe respegulas la ideon kiun la hispana popolo havis pri la skandala vivo de la reĝa familio, politikistoj…**

Iuj el la plej konataj estas: ***Francisco Serrano y Domínguez, Manuel Antonio de Acuña, José María Ruiz de Arana, Enrique Puigmoltó, Carlos Marfori***… La malĉasteco, per si mem, ne enkalkulendas en la koncepton de korupteco, kaj krome en Hispanio ĉi tiu afero ne estas tiom malaprobe rigardata kiom en aliaj landoj, sed, kiam temas pri amaferoj de politikaj potenculoj, ĉi tiuj aferoj ofte estas en rilato kun ia aŭ alia formo de koruptado. Kelkaj politikaj nomumoj dependis de la seksaj kapricoj de la reĝino, kaj ĉi tiu ofte faris multekostajn donacojn por premii seksajn servojn… kaj tio estis sufiĉe konata de la popolo, almenaŭ en la urboj.

Sed tiuj skandaloj estis la fono de pli kriza politika situacio en kiu ne mankis popola malkontento pro malsato kaj oftaj militistaj puĉoj. Krome la malakordo estis granda eĉ ene de la ĉefaj politikaj fortoj, modera kaj progresista, kio igis ke la daŭro de la registaroj estu mallonga, esceptante tiujn de ***Narváez***, kiu regadis aŭtoritatece kaj sen konsidero al Parlamento. Sed ankaŭ tiuj regad-periodoj de ***Narváez*** iĝis malstabilaj kaj devis ĉesi ĉar li ĉiam sukcesis unuigi kontraŭ si ĉiujn politikajn fortojn. Kaj kiel kroma, iom pitoreska, elemento estis la kamariloj de la palaco. La patrino de la reĝino kaj ties edzo havis sian propran kamarilon kaj faradis negocojn kun la Markizo de ***Salamanca***. Ankaŭ la edzo de la reĝino, ***Francisco de Asís***, havis sian kamarilon, al kiu apartenis la pitoreska monaĥino Patrocinio.

La menciita konflikto de la jaro 1865 pro la forpelo de la profesoro ***Castelar*** okazis kadre de iu popola reago kontraŭ la tiama degradiĝo de la politika situacio. En 1854 estis okazinte militista ribelo de ***O'Donell*** kun la aprobo de Espartero kaj fervora entuziasmo de la progresistoj kaj grandparto el la popol-amasoj. Tiam, 1854-1856 estis la t. n. "Progresista jarduo", kiu metis finon al la modera jardeko (1844-1854). Sed ekde 1856 denove ***Narváez*** prenis la kontrolon de la situacio kaj Espartero devis retiriĝi, ĉi-foje definitive. Reiĝis la kutima koruptado de la kortego kaj ties financistaj komplicoj. La politika malstabileco, kun ofta ŝanĝoj de registaroj, tiel dum la moderaj kiel dum la progresistaj etapoj, ne estis rezulto de mankoj aŭ difektoj de la konstitucio. Esence, la hispana konstitucio ne estis malsimila ol tiu de Anglio, kie estis tiam sufiĉe da politika stabileco. La politikaj krizoj en Hispanio dum la reĝado de Izabela la 2-a estis rezulto de militistaj puĉoj, manipulado de la balotsistemo far la regantaro, kaj ĉefe de la intrigoj de la palacaj kamariloj, t. e. koruptado en ĉiuj sferoj de la politika povo, kaj ĉio ĉi vekis malestimon de la hispana loĝantaro kontraŭ la monarkio.

En 1868, jam forpasinte ***Narváez,*** okazis militista puĉo kiu pro ties ega popola apogo povas esti konsiderata revolucio, kaj fakte tiele ĝi estis nomata: "la Glora Revolucio". La ĉefa organizinto de la militistaj kaj civilaj politikaj fortoj kiuj ribelis kontraŭ la reĝino Izabela estis la generalo ***Juan Prim***, kaj li estis la ĉefa, aŭ sola, demarŝanto de la politika situacio post la forpelo de la Izabela la 2-a. Inter la konspirantoj kiuj apogis lin, meritas apartan atenton ***Antonio de Orleans***, duko de ***Montpensier***. Ĉi tiu ulo naskiĝis por reĝi, almenaŭ tia estis lia penso. Li estis filo

de la franca reĝo Ludoviko Filipo la 1-a (1773-1850). Tra lia patrino li estis ankaŭ posteulo de la hispana reĝo Karolo la 3-a. Kiel princo, li ĝuis en Francio grandajn honorojn kaj altrangiĝojn. Lia aliro al la franca trono prezentiĝis malfacila: li havis du fratojn pli aĝajn ol li, sed li estis pretendanto al la trono de Ekvadoro kie la franca kortego entreprenis operacion por starigi tie monarkion. Sed tiu plano fiaskis kaj krome lia patro Ludoviko Filipo estis forpelita el la franca trono en la jaro en 1848 kaj li devis ekziliĝi kun sia familio. Lia edzino estis ***María Luisa Fernanda***, fratino de la hispana reĝino Izabela. Kiam ĉi tiu estis detronita en 1868, inter la eblaj heredontoj, laŭ la dinastiaj normoj, estis ĉi ties fratino edziĝinta al ***Antonio de Orleans***.


Nu, tiu, senĉesa obsedato al iu ajn reĝa trono, elstarigis lin inter la konspirantoj kontraŭ lia bofratino la reĝino Izabela, cele kunreĝi en Hispanio kiel edzo de ***María Luisa Fernanda***. Li subvenciis la konspiradon de la Generalo ***Prim*** pere de ega monsumo (5.750.000 pesetoj de la epoko) kiun li atingis per hipotekado de lia palaco kaj du bienoj en ***Sanlúcar***. La Kortesoj (hispana Parlamento) voĉdonis elekti novan reĝon por Hispanio la 16-an de novembro 1870. Estis elektita Amadeo de Sabojo, kiu atingis 191 voĉodonojn; la respublikanoj atingis 60 voĉdonojn; la Duko de ***Montpensier***, nur 27; la Generalo Espartero, 8, kaj la princo Alfonso, kiu poste iĝus Alfonso la 12-a nur 2. Amadeo de Sabojo estis filo de la itala reĝo Viktoro Enmanuelo la 2-a, kaj same kiel la eksreĝino Izabela kaj ***Antonio de Orleans*** ankaŭ li estis posteulo de la hispana reĝo Karolo la 3-a.

Kompreneble, la fiasko de la kandidateco de ***Montpensier*** tre estis rezulto de la volo de la ĉefministro ***Prim.*** En la Parlamento li havis sufiĉe da politika influo por atingi plimultan apogon. ***Antonio de Orleans*** ne ĝuis lian simpation spite al la ekonomia apogo de tiu ulo al la revolucio de 1868. Multaj aliaj personoj el ĉiuj politikaj tendencoj abomenis la dukon de ***Montpensier*** ĉefe post tio ke li mortigis en duelo iun kuzon lian, ***Enrique de Borbón***. Sed la ĉefa obstaklo por la hispana reĝeco de ***Montpensier*** estis la opono de la tiama franca imperiestro Napoleono la 3-a. Fakte, la demarŝoj de ***Prim*** serĉante reĝon por Hispanio provokis la franc-germanan militon de 1870, el kiu rezultis la falo kaj detroniĝo de Napoleono la 3-a.


**Generalo *O'Donell***


**Generalo *Juan Prim***



***Antonio de Orleans*, Duko de *Montpensier***


**Murd-atako kontraŭ Generalo Prim**


**Amadeo de Sabojo antaŭ la kadavro de *Prim***

Apogante la reĝecon de Amadeo de Sabojo, ***Prim*** altiris al si la malamon ne nur de ***Antonio de Orleans*** sed ankaŭ de la respublikanoj, de la karlistoj, de la partianoj de la princo Alfonso, filo de de la detronita Izabela, k. a. Do, malfacilas ekscii kiu(j) estis la konspiranto(j) organizinto(j) de la atenco kiu metis finon al lia vivo, fine de 1870, malmultajn tagojn antaŭ la alveno de la reĝo Amadeo. Pri tiuj okazintaĵoj oni faris en 2014 la filmon titolitan «***Prim***; **la murdo de la strato de la Turko**», kies prezentado de la afero, ĵetas suspekton sur multaj personuloj de la epoko: ***Montpensier***, la respublikanoj, la regento ***Francisco Serrano***… Eble ne estis tia la intenco de la scenaristoj de la filmo, sed en ĝi ĉiuj gravuloj de la epoko, kaj eĉ la vulgaraj popolanoj, aspektas kiel roluloj de opereto (komika opero). Ja, la historio de ĉi tiu lando de la lastaj jarcentoj, ĝis nia epoko, estas ĝuste tio, senĉesa opereto (kun tragikaj aldonaĵoj).
Eble la abdiko de Amadeo de Sabojo post dujara reĝado estis pro tio ke li volis ne plu ludi kiel aktoro en tiu opereto. Lia reĝado estis markita de politika nestabileco. La ses kabinetoj, kiuj sukcedis sin dum ĉi tiu periodo, ne povis solvi la krizon, pligravigitan de la sendependeca konflikto en Kubo, kiu komenciĝis en 1868, kaj nova karlista milito, kiu komenciĝis en 1872. Post atenco kontraŭ li, Amadeo la 1-a deklaris sian angoron pri la komplikaĵoj de la hispana politiko: ***Ah, per Bacco, io non capisco niente; siamo una gabbia di pazzi*** (Ha, je Bakko, Mi komprenas nenion; ni estas en kaĝo de frenezuloj). Opereto, kaĝo de frenezuloj… jen bonaj difinoj de nia lando en tiu tempo, kaj poste ĝis la nuntempo.
Temante pri la opereto-aktoroj de la tiama hispana politiko, kaj en ega rilato kun la koruptado, ni devas dediĉi ian atenton al la jam plurfoje menciita generalo ***Francisco Serrano***. Li elstare partoprenis en la Karlisma Milito kaj rapide plirangiĝis pro batalaj meritoj. Kiam estis subskribita la Interakordo de ***Vergara*** en 1839, li jam estis kolonelo, kaj la sekvan jaron li estis promociita al brigadgeneralo. Pelita de granda ambicio, kiu kondukus lin ŝanĝi poziciiĝojn laŭ la cirkonstancoj, li komencis sian politikan karieron en julio 1839 kiel deputito por Malago. Ekde septembro de 1840 li kunlaboris kun generalo Baldomero Espartero, kiu nomumis lin feldmarŝalo, kvankam tri jarojn poste, estante Ministro pri Milito, li aliĝis al la movado gvidata de ***Ramón María Narváez***, kontraŭ Espartero. Fine de 1843 li estis dum kelkaj tagoj la Ministro de Milito en la progresema registaro de ***Salustiano de Olózaga***, post kio li apartiĝis de la politiko ĝis 1845 kiam li estis nomumita senatano. En tiu epoko Serrano iĝis favorato de la reĝino Elizabeta, jam edzinigita al sia kuzo, Francisko el Asizo. La reĝino sentis egan altiron al ***Serrano***, kiun ŝi nomadis ***El General Bonito*** (la beleta generalo), kaj postkuris lin tra la militistaj kazernoj kie li deĵoradis. La registaro delokigis Serranon al Granado, kun la rango de Kapitan-Generalo, por malproksimigi lin el la reĝino kaj repacigi ĉi tiun kun ŝia edzo. Post kelkaj jaroj de apartiĝo el la publika vivo kaj iu vojaĝo al Rusujo, Serrano, jam edziĝinta al iu kuzino lia, revenis al la politiko en 1854 partoprenante en la militista ribelo favore al la reveno de Espartero,

kaj dum la du sekvintaj jaroj li okupis militistajn kaj politikajn postenojn, kiel tiu de ambasadoro en Parizo.
Inter 1856 kaj 1868, periodo regata de moderaj politikaj fortoj, Serrano kontribuis krei la politikan partion de la Liberala Unio, gvidata de generalo ***Leopoldo O'Donnell***, sub kies registaro li rolis kiel Kapitan-Generalo de Kubo inter 1859 kaj 1862. En tiu trijara Kariba destino li akiris grandan riĉaĵon permesante la sklavkomercon. Poste oni aljuĝis al li la ordenon de la Ora Ŝafo pro la sufoko de la ribelo de la kazerno ***San Gil***, kune kun la nobelan titolon de Duko de la Turo kaj la titolon je Hispana Grandulo, kaj estis ministro de Ŝtato kun ***O'Donnell***. En 1867, post la morto de ***O'Donnell***, li gvidis la Liberalan Union. De tiam, en nova politika turno, li partoprenis la komploton kontraŭ la reĝino Izabela, alproksimiĝante al la progresemuloj, gvidataj de la generalo ***Juan Prim***, kaj al la demokratoj, tial li estis ekzilita al Kanarioj. En 1868 li gvidis, kune kun ***Prim*** kaj la admiralo ***Topete***, la revolucion kiu detronigis Izabelan. La Provizora Revolucia Komitato konfidis al li la formadon de Provizora Registaro, kiu estis konstituita la 8-an de oktobro kaj post la proklamo de la Konstitucio de 1869 la Konstituciaj Tribunaloj investis lin per la posteno de regento de la Regno. Post la enoficigo de Amadeo, li denove okupis la Prezidantecon de la Konsilio de Ministroj dufoje, en 1871 kaj 1872. Poste li implikiĝis en diversajn politikajn manovrojn: li subskribis interkonsenton kun la karlistoj, kiu estis rifuzita de la Parlamento, pro kio li petis al Amadeo suspendi konstituciajn garantiojn, kion la reĝo rifuzis. Post la proklamo de la Unua Respubliko li ekziliĝis al Francio, fiaskinte en sia provo ribeli la Nacian Milicon.
En 1874 Serrano revenis en Hispanion iomete antaŭ la puĉo de generalo ***Pavía***, kaj post tio, li akceptis la postenon de Prezidanto de la Plenuma Potenco de la Respubliko, kaj dissolvis la Respublikan Parlamenton en 1874, establante specon de respublika diktaturo kun konservativa spirito sed kun iuj liberalaj formoj. Lia ambicio estis iĝi la hispana ***Mac-Mahon***. Serrano regis subtenata de la Konstitucio de 1869. Li sufokis la kantonan ribelon kaj ĉesigis la sieĝon de Bilbao en 1874, lasante la karlistojn fakte venkitaj. Sed la detruo de la respublikanaj politikaj fortoj malfermis la vojon al la restarigo de la Burbonoj.




**Amadeo de Sabojo**










**Flago, karikaturoj kaj prezidentoj de la Unua Hispana Respubliko**

Akceptinte Alfonson la 12-an kiel novan reĝon, Serrano ne povis adaptiĝi al la nova politika partia sistemo elpensita de la konservativa ***Antonio Cánovas***. En la nova situacio estis ***Práxedes Mateo Sagasta*** la figuro de la liberala tendenco preferita de la monarko por estri registaron. La ambicia generalo Serrano devis konstati ke post longa vivo je politika sukceso, Hispanio povis ignori lin. Lia registara laboro, tra tiom da sortoŝanĝoj, estas sensignifa, ĉar li estis politikisto sen idealoj aŭ projektoj, kies ega ambicio ofte igis lin ŝanĝi sian orientiĝon kaj lojalecon (li estis moknomita "la Judaso de ***Arjonilla***", pro lia emo al perfido kaj pro la loko, kie li havis sian bienon). Por pli bone pritaksi la teruran moralan karakteron de la ulo ni devas scii ke dum lia etapo de plejalta politika potenco en la lando li forportis al sia domo la arĝentan manĝilaron de la reĝa palaco. Por ke li ĝin redonu, la ĉefministro ***Cánovas*** de la reĝo Alfonso la 12-a publikigis per la Gazeto de Madrido noton "dankante" al Serrano pro tio ke li "metis en savon" tiun manĝilaron antaŭ la danĝero ke ĝi malaperus pro la malordo de la respublika epoko. Estis ia delikata maniero indiki al la eksregento ke venis la momento fari la redonon.
Eĉ se ne tiom altgrade, ankaŭ plejparto el la hispanaj politikistoj estis simile nekonstantaj, nelojalaj kiaj la generalo Serrano. Tiel Amadeo de Sabojo kiel la kvar prezidentoj de la Unua Hispana Respubliko ne povis kalkuli je stabilaj politikaj fortoj ĉar la tiamaj partioj spertadis subitajn kaj ne antaŭvideblajn skismojn kaj diverĝojn kiuj ne estis rezulto el politikaj, sociaj aŭ strategiaj diferencoj sed nur el la ambicio de la lideroj kiuj celis nur sian personan profiton. Krome la Respubliko kiu estis proklamita post la abdiko de Amadeo de Sabojo ne havis klaran ideon pri la tipo je konstitucio konvena por la lando. Oni alprenis la usonan modelon t. e. Federacia Respubliko, federacio de statoj… Rezulte de la interpretado al la hispana realo, estiĝis en iuj zonoj de la hispana teritorio, ĉefe en Kartaĥeno, jam antaŭ la debatado kaj aprobo de la konstitucio, emon al difino de propra "ŝtato" federaciebla al la ensemblo de la lando. Tiu fenomeno estis nomata "Kantonismo" kaj okazis kun la fono de Dua Karlisma Milito en la nordo de la lando kaj milito de vera sendependeco, ne federaciisma, en Kubo. Dum la daŭro de unu jaro, kvar sinsekvaj prezidentoj rezignis tiom konfuzitaj kiom la abdikinta Amadeo.
Iu militista puĉo establis diktaturon sed sub la ŝajno de konservado de la Respubliko. Ĉar la puĉista personalo estis konservema oni asignis la estrecon de la registaro al la generalo Serrano ĵus reveninta el lia ekzilo. Kiel jam priskribite, li ne povis eviti la restarigon de la monarkio, sekve de nova militista puĉo, kaj tiele komenciĝis nova etapo en la hispana historio. Sed ĉar ni estas temante pri la koruptado en ĉi tiu lando, ni devas priraporti ke la afero de Alfonso, estis financita, ĉefe, de grupo de la burĝaro kun interesoj en la karibaj kolonioj, kiu bazigis sian ekonomion en homa kontrabando, komerco de sklavoj. Multaj el ili estis partneroj de ***Maria Cristina de Borbon*** kaj ŝia edzo, la duko de ***Riansares***. Ili formis grupon de tre grava premo, pro la malavaraj monsendaĵoj en impostoj, ĉefe ĉar ili investis en la lando parton el la profitoj de potencaj karibaj firmaoj.

La reĝado de Alfonso la 12-a estis pli stabila ol tiu de lia patrino. ***Cánovas*** elpensis sistemon de alternado de du politikaj moderaj fortoj de la hispana burĝaro. Li kaj ***Sagasta*** interakordis tiun alterniĝon de du dinastiaj partioj. Alia merito de tiu sistemo de ***Cánovas*** estis tio ke ĉesis la influo kaj interveno de la armeo kiuj estis granda en la antaŭa reĝado. Sed tiu sistemo, en kio rilatas al ĝia karaktero kaj funkciado, estis korupta per si mem. La alternigo de la registaroj de ***Cánovas*** kaj ***Sagasta*** estis interakordita artefaritaĵo kiu tute ne respegulis la politikan situacion kaj evoluadon de la hispana socio. Same kiel en la reĝadoj de Izabela kaj Amadeo, kaj ankaŭ dum la Respubliko, la registaroj ne estis rezulto el faritaj balot-procezoj, sed inverse, ĉiu nova registaro organizis, per la ŝtata povo, balotadon por atingi parlamentan apogon.



**La reĝo Alfonso la 12-a**

La metodo por aranĝi, far la regantaro, la popolan voĉdonadon estis la t. n. «kacikismo». En la kunteksto de la hispana politiko la koncepto de kacikismo indikas homojn kun granda influo en kamparaj teritorioj. La pribalota tereno estis la ĉefa kvankam ne la sola konkretiĝo de la kacikismo. La klientisma strukturo en la hispana socio akiris sian definitivan formon meze de la 19-a jarcento kiam, per la vendo de konfiskitaj havaĵoj, la kampara klientismo devis adaptiĝi al merkata ekonomio. La kacik-sistemo havis sian ĉefan forton en la agrara mondo, kvankam ĝi ankaŭ agis, malpligrade, en la urboj. La kacikoj kontroladis la voĉdonojn de ĉiuj homoj kun balot-rajto en sia loko, kio estis la bazo de la politika alternigo kiun postulis la reĝimo de ***Cánovas***.



***Antonio Cánovas***

La kacikoj estas homoj kun ekonomia povo, kiuj havas armitajn sikariojn, kapablajn timigi siajn najbarojn, kiuj sciis, ke se la aferoj ne irus laŭ la deziroj de la kaciko, ili povus suferi fizikan damaĝon. La hispana liberala reĝimo estis ĉiam dominata koncerne la balotprocezoj per fraŭdo kaj sindetenismo.



***Práxedes Mateo Sagasta***

Jes, la balotoj en Hispanio estis markitaj de fraŭdo, kiu per si mem estis sufiĉe grava por fariĝi la figuro mem de la politika sistemo. Fraŭdaj mekanismoj, kiuj komenciĝis per la manipulado de la balota listo, en kiuj aperis la malsanuloj, forpasintaj kaj nekonataj individuoj, kies voĉoj estis profitataj de tiuj, kiuj montris pli grandan lertecon en parodii kaj duobligi voĉojn. La Ministrejo pri internaj aferoj



**Karikaturo pri la alternigo de la registaroj de *Cánovas* kaj *Sagasta***

ellaboradis la liston de la kandidatoj interesaj por la registaro en ĉiu distrikto. Tiuj kandidatoj povus aparteni al la reganta partio, tiu kiu atingis la dekreton de forsendo de la Parlamento kaj organizis la balotadon por fabriki al si novan plimulton, aŭ de la opozicio, ĉar la listo-ellaborado ne estis nura registara ordono sed rezulto de komplika negocado inter la diversaj politikaj fortoj. Fakte, en la partio kiu kontroladis la registaron ofte ekzistis diversaj tendencoj, reprezentitaj de la estroj de diversaj klientaroj, kiuj postuladis iome da parlamentaj sidlokoj dependante de sia forto.
Do, kaj kiel dirite, la oficiala politiko de la alterniĝantaj burĝaj moderaj partioj ne respeguladis la realaĵon de la hispana socio kaj ĉi ties evoluadon. Atestas pri tio, ekzemple, la teniĝo de ***Sagasta*** rilate al la proletara Internacio, kiu jam havis sekvantojn en Hispanio. Li provokis persekuton kontraŭ la internaciistoj, kaj kvalifikis la Internacion kiel la "filozofia utopio de la krimo". Dum la reĝado de Izabela, ***Sagasta*** apartenis al la progresistaj rondoj kiuj sin oponis al tiu korupta reĝimo, sed li, kiel burĝulo, sin tenis malamike kontraŭ la naskiĝanta forto de la industria proletaro. ***Práxedes Mateo Sagasta*** prezidis la registaron ok-foje inter 1870 kaj 1902. Tiel dum lia regado kiel dum tiu de la alterniĝanta kun li ***Antonio Cánovas del Castillo***, krom la politika koruptado de la kacikismo kaj pribalota fraŭdo, abundis ankaŭ la koruptado en rilato kun la atingo de monprofito kun la kompliceco de la regantoj; jam ni menciis kiel apogis la burbonan restaŭradon la potencaj financistoj de la sklav-komerco. ***Cánovas*** estis membro de unu el la premgrupoj kiuj pledis por la konservado de la sklaveco en la kolonioj; Malgraŭ tio, pro la premo de aboliciistaj grupoj, li subskribis la definitivan forigon de sklaveco en Hispanio en 1880.
Kiel sciate, la reĝado de Alfonso la 12-a ne estis longa. Li mortis en novembro de 1885; antaŭe estis mortinta, en 1878, lia unua edzino, ***María de las Mercedes de Orleans***, filino de ***Antonio de Orleans***, duko de ***Montpensier***. Edziĝinta poste al ***María Cristina de Habsburgo-Lorena***, ĉi tiu naskis al li du filinojn, kaj restis graveda kiam li mortis. Tiam, ***Sagasta***, kiel gvidanto de la liberala partio, subskribis kun ***Cánovas***, estro de la Konservativa Partio, la tiel nomatan «Pakto de ***El Pardo***», kun la celo subteni la regentecon de ***María Cristina*** (kiu poste akuŝis la reĝon Alfonso la 13-an) kaj tiele garantii la kontinuecon de la monarkio fronte al la situacio kreita de la antaŭtempa morto de la monarko. En ĉi tiu pakto estis sankciita la alterniĝo de registaroj inter ambaŭ partioj; la pakto jam ekzistis implicite ekde 1881, kiam ***Sagasta*** ekregis unuafoje.
Dum la infanaĝo de Alfonso la 13-a rolis kiel regentino lia patrino ***María Cristina***. Ĉi tiu devis plenumi sian funkcion en tre malfacilaj cirkonstancoj. Milito en Afriko, daŭrigo de la milito en Kubo, kiu kulminis per usona interveno kaj sendependiĝo de la lastaj kolonioj: Kubo, Filipinoj, Puerto Rico… en 1898. La antaŭan jaron estis atenc-murdita ***Cánovas del Castillo***. Ankaŭ pliakriĝis la sociaj kontraŭdiroj: pliforftiĝis la laboristaj organizaĵoj, naskiĝis la naciismaj movadoj en Katalunio kaj Eŭskadio…

Rilate al koruptado, oni devas klarigi ke ĉi tiu ***María Cristina de Habsburgo-Lorena*** estis tute malsimila ol ŝia samnoma antaŭa regentino, la patrino de la reĝino Izabela, ***María Cristina de Borbón***, ĉar ĉi lasta, kiel jam ni vidis, estis implikita en ĉiuj koruptaj aferoj tiam entreprenitaj en la lando. La patrino de Alfonso la 13-a, male, tiorilate estis tute malsama, ŝi havis nenian rilaton kun koruptaj aferoj, kaj krome ŝi diferencis el la alia ***María Cristina*** ankaŭ pri alia afero: ŝi havis nenian amrilaton kun viro post la morto de Alfonso la 12-a. Konsiderante ĉion-ĉi, la popolo alnomis ŝin "***Doña Virtudes***" (la Sinjorino de la Virtoj). Sed inter ŝiaj virtoj ne estis la grandanimeco, la pardonemo... Tion oni konstatis laŭ la rankora maniero kiel ŝi traktis la dukon de ***Sexto*** kaj markizon de ***Alcañices***, ***José Osorio y Silva***.

***Alcañices*** estis amiko de Alfonso la 12-a kaj elstaris pro la rolo kiun li ludis en la Burbona Restarigo, la surtronigo de Alfonso, por kies celo li elspezis grandan parton el sia familia riĉaĵo. Kun fortaj monarkismaj konvinkoj, hereditaj el edukado kaj familia tradicio, li metis sian loĝejon en ***Deauville*** (Francio) je la dispono de la hispana reĝa familio, kaj subtenis ĉi tiun dum ties ekzilo. Alfonso la 12-a amis lin kiel patron, kaj dum sia tuta vivo li estis lia plej bona amiko kaj plej proksima konsilisto. Li ankaŭ estis mentoro kaj edukisto de princo Alfonso, kaj kune kun sia edzino, la rusa princino ***Sofía Troubetzkoy***, li socie pledis por la restaŭro inter la hispana nobelaro. Lia ekonomia kontribuo al la burbona afero estas kalkulita inter 15 kaj 20 milionoj da realoj. Antaŭ 1879 la geparo ***Sexto-Troubetzkoy*** estis preskaŭ ruinigita kaj komencis vendi parton el siaj posedaĵoj, kiel la palaco en strato Alcalá kaj egnombro da biendomoj en Salamanko kaj Sevilo. Post la morto de ***María de las Mercedes***, Alfonso la 12-a ne estis feliĉa en sia edziĝo al ***María Cristina*** kaj oftis lia diboĉado. ***Alcañices*** asistis la reĝon ankaŭ en tiu etapo, kio altiris al li la malamon de la reĝino. Post la frua morto de Alfonso, en 1885, ties vidvino eksigis la favoraton, kiu perdis ĉiujn siajn palacajn oficojn kaj eĉ la titolon je duko de ***Sexto***.

Nu, eĉ se ne laŭdinda, ĉi tiu konduto de la reĝino ne povas esti taksata kiel korupto. La politika koruptado de la reĝimo troviĝis, kiel jam menciite, en la strukturo mem de de la sistemo kaj ties funkciado surbaze de la kacikismo. Ĉi



**La regentino *María Cristina* kaj Alfonso la 13-a en 1885**



**Murdo de *Antonio Cánovas* (1897)**



***María Cristina* kaj Alfonso la 13-a en 1898**





**1898: Usona milito kontraŭ Hispanio en Kubo, Filipinoj...**

tiun sistemon heredis Alfonso la 13-a en la jaro 1902, kiam li iĝis dekses-jara. Pli detalan informon pri la regenteco de ***María Cristina*** oni povas legi, en Esperanto, en la 87-a numero de ĉi tiu revuo, konkrete en la ĉapitroj alireblaj tra la ret-adresoj: **https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/87/58-60.html** kaj **https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/87/61-62.html**

Tiu 16-jara knabo devis alpreni sian reĝan rolon kiam la lando troviĝis meze de la ega krizo rezulte de la milito kiu finiĝis en 1898 per la perdo de la lastaj restaĵoj el la iam kolosa kolonia imperio de Hispanio. Tiu krizo efikis malsammaniere sur la diversaj sektoroj de la hispana socio. Ekzemple, la armeo, la militista kasto, celis kompensi la perditan influon en la perditaj kolonioj per atingo de nova influo en novaj kolonioj. Tial la lando sin vidis implikita dum la sekvintaj jardekoj en militojn en Afriko, ĉefe en Maroko, kaj tiu nenecesa militado alportis egan malfeliĉon al lando. Krome Alfonso la 13-a mem plene identiĝis kun tiu militista sento kaj tio kondukis lin al eraroj kiuj fine ruinigis lian reĝadon. En la politika tereno li ne sin aranĝis lerte en la kanovista sistemo kiun li heredis. Oni devas precizigi, tamen, ke tiu sistemo mem sufiĉe estis sin degenerinta pro iaj esencaj karakteraĵoj de ties funkciado. Konkrete, ni temas pri la fakto ke ĉar la stimulo aŭ motivigilo de la politika sin dediĉo en tiu sistemo estis la atingo de persona profito, kaj la maniero demarŝadi la akireblan influon paŝadis tra interakordo inter la politikaj fortoj surbaze de ties socia influo, tio igis ke la du komencaj partioj de la sistemo, kiuj estis interakordintaj la alterniĝon en la regado, frakciiĝis laŭ tendencoj aŭ klikoj kun apartaj interesoj malfacile akordigeblaj. Do al la reĝo pli kaj pli rezultis malfacile nomumi registrar-prezidentojn kiuj povus regi dum sufiĉe longa tempo por realigi ian koheran politikon. Pli detalan priskribon de tiu politika sitiacio oni povas legi en Esperanto en la 88-a numero de ĉi tiu revuo **Heleco**, en ties ĉapitro titolita «Krizo de la parlamentismo», videbla en la ret-adreso:
**https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/12-14.html**

Do tiu etapo de la reĝado de Alfonso la 13-a karakteriĝis pro ofta sinsekvo da mallongdaŭraj registaroj. Krome en la fono de tiu malstabila politika situacio estis persista sociekonomia krizo. La industria disvolviĝo generis sian nepran sekvon de pliakrigo de la sociekonomiaj diferencoj kaj konfliktoj. Jam estis plene organizitaj la laboristaj fortoj de la Internacio: anarkiistoj kaj socialistoj, kaj iĝis pli kaj pli evidenta ilia mobiliz-kapablo. En 1909 okazis en Barcelono la t. n. «Tragika Semajno», revolucia movado estiĝinta kiel kontraŭstaro al la forsendo de rerzerv-soldatoj al milito en Afriko. La anarkiistoj estis speciale perfortemaj. Estis anarkiisto tiu kiu mort-atencis kontraŭ ***Cánovas*** en 1898. Kiam, en 1909, Alfonso la 13-a edziĝis al la angla princino ***Victoria Eugenia de Battenberg***, iu anarkiisto ĵetis kontraŭ la reĝa kaleŝo florbukedon interne entenantan bombon. La gereĝoj saviĝis sed mortis kaj estis vunditaj multaj personoj de la kortego kiuj estis akompanantaj la ĵus-geedziĝintojn en tiu parado tra la madridaj stratoj.

Poste, en la jaro 1912 estis murdita, far alia anarkiisto, iu hispana registrar-prezidento: ***José Canalejas***. Tiu fenomeno de la perfortaj anarkiistaj atencoj estis tre tipa de la epoko, ne nur en Hispanio: iu rusa caro kaj iu aŭstria imperiestrino estis tiele murditaj en tiu epoko. Alfonso la 13-a mem, en unu el siaj vizitoj al Francio suferis unu el tiaj atencoj kiam li troviĝis en unu kaleŝo kune kun la tiama prezidento de tiu lando.

Alia problema faktoro de la politiko de tiu periodo estis la ekapero de la naciismo en iuj hispanaj regionoj. Verdire, la naciisma sento jam troviĝis latenta en tiuj regionoj kiuj konservadis foruojn aŭ estis perdinte ilin antaŭ nelonge, sed en tiuj unuaj jardekoj de la 20-a jacento tiu naciisma inklino instituciiĝis per la formado de naciismaj partioj kun pli malpli klara programo pri sendependiĝo. Ŝajnas ke decida rolanto por tiu politika iniciato estis la burĝaro de tiuj regionoj. Temis pri alte industriigitaj regionoj kiuj estis perdintaj la merkatojn de la hispanaj kolonioj en 1898. La komercado kun tiuj kolonioj, komence ekskluziva de Kastilio, estis koncesiita kiel favoro al tiuj regionoj far la unuaj burbonaj monarkoj por plifortigi la unuiĝon de tiuj teritorioj al la cetero de la lando, t. e. la iama regno de Kastilio. Sed, kiel dirite, la perdo de la lastaj kolonioj en 1898 ruinigis tiun komercadon, kaj la industria burĝaro de tiuj periferiaj regionoj, Katalunio, Eŭskio… bezonis alian elementon de ĉantaĝo por premi la centran regantaron cele atingi de ĝi prikomercajn avantaĝojn aŭ privilegiojn. Ĉi tiu politiko, ja, povas esti enkalkulita en la sferon de la koruptado pri kiu ni estas priatentante.

La reĝado de Alfonso la 13-a koincidis ankaŭ kun la Unua Mond-Milito kaj la Rusa Revolucio. Tial ke Hispanio sin tenis neŭtrale en tiu milito, tio estis favora kaj ekonomie profitdona por la lando. Sed ĝuste ekde la jaro 1917, kiam okazis la revolucio en Rusujo, plikomplikiĝis la politika kaj socia situacio en Hispanio; pliintensiĝis la putriĝo de la reĝimo elpensita kaj establita de ***Cánovas***. La militistoj rekomencis influi sur la politika vivo, pliiĝis la proletara mobilizado, kaj fine, en 1921 okazis en la milito en Afriko la grava kaj katastrofa malvenko de ***Annual***. Ĝuste en tiu sama jaro 1921 estis murdita, far anarkiista



**Alfonso la 13-a**



**Alfonso la 13-a kaj Victoria Eugenia de Battenberg**



***José Canalejas***



***Antonio Maura***

atenco, la registrar-estro Eduardo Dato, kio estas kroma elmontro de la tiama krizo de la lando. Detalan priskribon de tiu periodo oni povas vidi en la 88-a numero de ĉi tiu revuo **Heleco**, en ties ĉapitro titolita «La ŝtorma jaro 1917 kaj ties sekvoj», en la ret-adreso: **https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/15-16.html**
Resume, pri la politika krizo kiu ruinigis la monarkian reĝimon kaj ebligis stariĝon de Dua Respubliko pli respondecis la objektivaj cirkonstacoj de la lando sed ankaŭ personaj eraroj de la reĝo. Li sufiĉe respondecis pri la militista katastrofo de ***Annual***, en kiu pereis pli ol dekmilo da hispanaj soldatoj kaj multaj aliaj estis kaptitaj de la maŭroj. Tiu milita malvenko estis rezulto de la eraroj de la generalo ***Silvestre***, amiko de la reĝo, kaj la koruptado reganta en Hispanio: La soldatoj estis mise vestitaj kaj ekipitaj. Oni porciumis al ili la manĝaĵon kaj ŝuo-vestaĵojn. Ekzistis ĝeneraligita korupto ene de la militistaro, deturnante provizaĵojn de la trupo profite al kelkaj koruptaj oficiroj. Alfonso la 13-a sufiĉe kulpis pri tiu milita katastrofo ĉar li malprudente sin tenis favore al la militistaro kiu postuladis tiutipajn koloniismajn aventurojn.
Sed inter tiuj eraroj pli gravis tiu de la akcepto de la militista puĉo de ***Miguel-Primo-de-Rivera*** en la jaro 1923. Tiu generalo ne havis klaran politikan programon sed svagajn ideojn pri armeaj virtoj kiaj ordo, disciplino, aŭtoritato kaj amo al la patrujo, sed ĉefe inspiris lin la modelo de la itala faŝista lidero ***Benito Mussolini***, kiu estis metinte finon al la parlamenta kaj konstitucia reĝimo en tiu lando. Tiu itala modelo influis ankaŭ sur la reĝo Alfonso la 13-a; li imitis la italan reĝon kaj konsentis la personan diktaturon de la ribelinta generalo. Sed al ***Primo-de-Rivera*** mankis la persona karismo de ***Mussolini*** kaj krome li ne disponis je popolamasa partio kia la itala faŝismo; lia apogo estis ĉefe la armeo sed ankaŭ la superregantaj sociklasoj, la klerikaro, la konservativaj fortoj… Malantaŭ lia militista regantaro troviĝis la sama pov-bloko kiu estis reginta la landon dum la reĝimo de la Restariĝo, t. e. la oligarkio de ter-posedantoj kaj industrio-mastroj. ***Primo-de-Rivera*** sin deklaris unika ministro, regante per dekreto-leĝoj, helpita aŭ konsilita de la Militista Direktorio. Komence lia regado atingis iajn sukcesojn, eble pro tio ke ĝi estis pli stabila kaj daŭra ol tiuj registaroj de la konstitucia etapo. Li persekutis la anarkiistojn kaj komunistojn, kaj sufokis la naciismojn; poste estis malpermesataj ĉiuj partioj kaj li intencis formi unu solan simile al la itala faŝismo, sed tiu provo ne estis sukcesa. La plej notinda atingo de lia regado estis la restarigo de la situacio en la fronto de la milito en Maroko. ***Primo-de-Rivera*** interakordis kun Francio militan ofensivon en tiu teritorio kaj fine la hispana marameo realigis venkan elŝipiĝon kaj konkeron en ***Alhucemas***. Per la ĉapitro: «1923-1930. La Direktorio de Primo de Rivera», ret-adreso: **https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/17-20.html** de la menciita 88-a numero de ĉi tiu revuo **Heleco**, oni informas ke tiu sukcesa afero de ***Alhucemas*** kuraĝigis la diktatoron pludaŭrigi sian Direktorian reĝimon anstataŭ retiriĝi post la plenumado de la plej urĝaj taskoj. Nun ni volas atenti pri la afero de la

koruptado dum tiu periodo de la Militista Direktorio kaj ĝenerale de la reĝado de Alfonso la 13-a. Dum tiu reĝado la korupto inundis ĉion. La armeaj kaj civilaj aŭtoritatuloj estis implikitaj en la afero. La milito en Maroko, per kiu la militistaro volis forviŝi siajn fiaskojn de la 19-a jarcento, kiu kulminis per la perdo de Kubo kaj Filipinoj, estis bona ekzemplo de korupto kaj politika ne-kompetenteco, ĉar tiu imperia aventuro forprenis trionon el la Ŝtata Buĝeto. Tiu milito utilis nenion al Hispanio; ĉio estis perdoj je mono kaj sango. Sub la regado de Alfonso la 13-a, firmiĝis unu el la plej grandaj riĉaĵoj en la mondo, tiu de ***Juan March***, kiu kontrolis tabak-entreprenojn, bankojn, kargo-kompaniojn kaj la gazetaron, tirante la fadenojn de la politiko, kaj kiu, kiam li devis resti en malliberejo, li estis tie kvazaŭ gasto je luksa hotelo.

Kaj same estis koruptado en la justico-administrado. La generalo ***Eduardo López Ochoa*** raportis en 1930 ke plejmulte el la juĝistoj kaj anoj el la Plejsupera Tribunalo estis atingintaj sian postenon dank´ al politikaj intrigoj kaj sentencadis favore al siaj patronoj, kaj same oni povus diri pri la tribunalaj sekretarioj kaj funkciuloj. Pri la grava kaciko ***Juan de la Cierva***, oni diris ke en la provinco de Murcio falus eĉ ne unu sola folio sen lia permeso. Plene estis je lia servo kelkaj juĝistoj de la Plejsupera Tribunalo, kaj tial li ĉiam povis kalkuli je favoraj sentencoj por li aŭ lia amikoj. Iu jur-profesoro asertis ke la deliktoj de ŝtelo kaj rabo ekzistis en Hispanio nur por mon-kvanto malpli granda ol cent-mil pesetoj, al pli altaj monsumoj oni asignas la kvalifikon je «prifinancaj aferoj». En ĉiu ajn civila aŭ kriminala jur-afero, kiu devus pasi tra la tribunaloj, oni devis apartigi ioman mon-sumon por grasigi la radojn de la justico. Evidentas ke tiorilate la afero ne multe ŝanĝiĝis ekde la epoko kiam Cervanto, per sia verko Donkiĥoto, priskribis la funkciadon de la justico en sia epoko.

***Antonio Maura***, kiu estris la registaron kvinfoje inter 1903 kaj 1922, volis entrepreni la purigadon de la balotsistemo por meti finon al la kacikeca influo en tiu tereno altiris sur sin, pro tio, la ĉagrenon de la reĝa patrino, ***María Cristina***, kiu konsideris ke tia sistemo estis esenca por la konservado de la monarkio. ***Maura*** mem uzis poste tiun sistemon siafavore kiam li komprenis ke se la balot-



**Eduardo Dato**



**Generalo *Miguel Primo de Rivera***



**La Militista Direktorio**




**Elŝipiĝo kaj kapto de *Alhucemas***

ado estus pli puraj kaj demokratiaj atingus pli favoran rezulton la respublikanoj kaj la socialistoj. La balotado de la 9-a de aprilo de 1916 estis aranĝita por ke la grafo ***Romanones*** atingu ampleksan plimulton. La Parlamento rezultinta el tiu balotado estis nomita «la Korteso de la parenculoj» ĉar la ĉefaj lideroj de la konservativa kaj liberala partioj sukcesis ke iliaj familianoj atingu parlamentajn seĝojn.
La socialista presaro informis ke la ĉefaj politikistoj mem troviĝis en la direktoraro de la plej prosperaj entreprenoj de la lando, kiel pruvo ke Hispanio estis kontrolita de iu malgranda elito de privilegiuloj. La ministroj de la registaro aktive partoprenadis en la koruptado. Dum la Mond-Milito, la ministro pri Financoj, ***Santiago Alba***, amasigis kapitalon dank' al lia alianco kun la malhonesta magnato ***Juan March***, kiu estis eltirante kolosan profiton pro la eksportado de nutraĵoj al la militantoj, samkiel lia ĉefa negoco: la kontrabando de tabako. ***Alba*** atingis por ***March*** kelkajn permesojn de eksportado kiuj permesis al la plutokrato eviti la laŭleĝajn restriktojn. En 1916, la Registaro malpermesis la eksportadon de rizo el Valencio. La agentoj de ***March*** en la Valencia regiono komencis amasigi grandegajn kvantojn da rizo kaj petis eksterordinaran permeson, asertante, ke ekzistis pluso, kiu superis la absorb-kapablon de la merkato. Ne postulinte ajnan pruvon aŭ farinte ajnan inspektadon, ***Alba*** akiris la permesilon, kiun li deziris por ***March***, kio permesis al ĉi tiu vendi en Eŭropo altpreze, la rizon kiun antaŭe li estis aĉetinte je ege malalta prezo. ***Alba*** kaj la grafo ***Romanones*** faris nenion por eviti la grandskalan tabak-kontrabandon de ***March***. Ŝanĝe de la ekonomia apogo de ***March*** al ***Alba***, ĉi tiu aranĝis ĉion por ke la magnato atingu parlamentan seĝon en 1923. Kelkaj gravaj kaj influaj registrar-oficistoj estis en la salajro-etato de la magnato, inter ili ***Alejandro Lerroux***.
Ĉi tiu ulo meritas apartan atenton. ***Alejandro Lerroux*** estis ĵurnalisto kaj politikisto de respublikana ideologio. Fondinto kaj gvidanto de la Radikala Respublikana Partio, dekomence li estis polemika politikisto, precipe konata pro sia demagogia retoriko. Kun laborista diskurso, kontraŭ-klerikala kaj tute kontraŭa al la tiam naskiĝanta kataluna naciismo, dum lia unua politika etapo li iĝis elstara politika gvidanto en Barcelono. Kelkaj el liaj agresemaj artikoloj alportis al li problemon kun la leĝo, pasigante naŭ monatojn en malliberejo. En 1901 li unuafoje estis elektita deputito, posteno kiun li revalidigis en la balotadoj de 1903 kaj 1905. Ĝis 1903 la ***Lerroux***ist-movado atingis sian pinton en Barcelono. Tiun jaron, krome, li partoprenis la fondon de la Respublikana Unio, kune kun la "historia" respublikano ***Nicolás Salmerón***. Respondeca pri la disvolviĝo en Barcelono de laborista politiko, en 1907 li iniciatis en la urbo iun "Domo de la Popolo". En tiu tempo li elstaris pro sia kontraŭ-klerikala teniĝo. Poste ni havos okazon vidi lian malhonestan politikan trajektorion, sed jam en tiu lia unua etapo de lia politika kariero li estis implikita en koruptaj aferoj.
Sed, kiel dirite, la korupt(ad)o estis ĝenerala en la hispana politiko ĉiunivele. Tiel en Andaluzio, kiel en Katalunio, la reĝo ne estis interesita stimuli la socian

harmonion. En Maroko, granda parto el la malavaraj monrimedoj destinitaj al konstruado de vojoj kaj kazernoj, kaj aĉeto de provizoj, finiĝis en la poŝoj de la koloneloj kaj generaloj, kiuj, en kelkaj kazoj, eĉ alproprigis al si la monon teorie destinitan al subaĉeto de maŭraj estroj kiuj vere ne ekzistis. Per tiaj manovroj, kunligitaj kun la grandskala vendo de armilaro far ĉefoficiroj, konsiderindaj riĉaĵoj estis amasigitaj. Same kiel la mispagitaj registraroficistoj kiuj vivtenis sin per subaĉetaĵoj, ankaŭ la malsuperaj oficiroj interŝanĝis armeajn provizojn kiel sapo, konstru-materialoj, manĝaĵoj, armiloj, municio… Oni malkovris ke en iu municio-deponejo, 77 milionoj da pesetoj estis elspezitaj lasante nenian ajnan kontan spuron. La oficiroj kaj ties edzinoj interŝanĝadis armilojn kaj municion kontraŭ freŝaj legomoj en la marokaj merkatoj. Indiko de la grando de la koruptado estas la fakto ke, en 1921, kiam ***Santiago Alba*** estis ministro pri ŝtato, kun la helpo de ***Juan March***, amasigis konsiderindan riĉaĵon vendante armilojn al la marokaj ribelintoj. Tiam, la Trasmediterranea Firmao, de kiu ***March*** estis unu el la ĉefaj akciuloj, havis monopolon pri la transportado de soldatoj kaj materialoj al la nordafrika marbordo dum la milito. La korupto de la militistaro ne estis limigita al la maroka kolonio.

Kaj, kiel dirite, en la fono kaj la bazo de la tuta sistemo estis la kacikismo; ĉi tiu estis kvazaŭ institucio. Same kiel la impost-kolektisto, la urbestro kaj la juĝisto, ankaŭ la kaciko povis alproprigi al si la komunumajn terojn, permesi al sia grego paŝti en la tereno de liaj najbaroj, devii la akvofluon el la bienoj de liaj malamikoj kaj ĝin kanaligi al la propraj, kaj fari laboraĵojn en siaj propraĵoj koste de la municipo. Komence de la regad-etapo de ***Miguel Primo-de-Rivera*** ŝajnis ke li volis meti finon al tia situacio de ĝenerala koruptado kaj tiorilate li ĝuis ian popolan aprobon. Okazis ke tiam en Hispanio ekzistis, ekde la katastrofa jaro 1898, ia kvazaŭ mesia espero pri la apero de iu reganto kiun oni nomis «***Cirujano de Hierro***» (Fera Kirurgo) kiu metus finon al la dekadenco kaj la koruptado de la lando. Nu, ***Primo-de-Rivera*** prezentiĝis kiel tiu personulo kaj multaj hispanoj kredis lin. La manifesto kiun li publikigis la 12-an de septembro estis pamfleto kontraŭ la nepotismo kaj la korupto de la




***Juan March***




Grafo ***Romanones***



***Juan de la Cierva***




***Alejandro Lerroux***


**Pablo Iglesias Fondinto de la Socialista Partio**


**Francisco Largo Caballero**


**Indalecio Prieto**


**Migel de Unamuno**

politika sistemo de la konstitucia monarkio. Li invitis la popolon denunci ĉian "mal-bonfaradon, subaĉeton aŭ mal-moralecon" kun la promeso malfermi “procezon, kiu sen-ĉese punu tiujn, kiuj ofendis kontraŭ la lando, koruptante kaj malhonorigante ĝin”, laŭdinda ambicio, kiu ne ŝajnis akordiĝi kun la fakto ke la armea kariero de ***Primo*** tre estis bazita sur la korupta esenco de tiu sistemo.

Sed dum iom da tempo estis loko por la espero. La tiamaj sindikatoj, **CNT** kaj **UGT** havis nenian intereson defendi la koruptan konstitucian sistemon. Sed ĉar la **CNT** kaj la Komunista Partio estis eksterleĝaj kaj centoj da iliaj aktiv-uloj estis en malliberejo, la socialistoj ***Francisco Largo Ca-ballero*** kaj ***Pablo Iglesias*** vidis tion kiel ilian grandan ŝancon plifortigi la socialistajn partion kaj sindikaton koste de la plej maldekstraj organizaĵoj kunlaborante kun la diktato-ro. Aliaj socialistaj lideroj kiel ***Indalecio Prieto*** ne apogis tion. Sendube tia teniĝo povas esti konsiderata kiel ia formo je korupto, sed notindas ke ĉi-kaze temas ne pri persona sed kolektiva korupto, ĉar tiuj uloj, farante tion, respegulis la senton de la grandparto el la membraro de ilia partio. T. e., temas pri la klasika rifuzo aŭ abomeno de la komunismo kaj anarkismo far personoj kiuj, tamen, sin difinas kiel social-istoj, kiel la rusaj menŝevistoj kaj la socialdemokratoj de Germanio kaj aliaj lokoj.

Sed ĉiukaze, kiu ajn estus la espero kiun ***Primo-de-Rivera*** povus esti vekinta en la hispanoj, socialistoj aŭ ne, baldaŭ estis multaj kaj gravaj kazoj de koruptado de la nova reĝimo kiu tute ne plibonigis la situacion. La diktatoro tute ne metis finon al la kacikismo, laŭ promesite, sed li nur metis la kacikec-sistemon serve de lia reĝimo kaj volis krei propran partion surbaze de tiu personalo. Iuj personoj en rilato kun la antaŭa koruptado fuĝis eksterlanden. Laŭ la gazetaro, ***Juan March*** -same kiel liaj marionetoj, ***Alejandro Lerroux*** kaj ***Alba***- fuĝis en ekzilon. La landlima polico ricevis ordonon aresti lin, sed oni ne povis fari tion ĉar ***March*** estis en Madrido. Fakte, jam la 19-an aŭ 20-an de oktobro, la komercisto havis la aŭdacon peti intervjuon kun ***Primo***. Kio ajn estis dirita en tiu unua el la multaj kunvenoj, kiujn ili havis, ***March*** sukcesis konvinki la diktatoron ke lia tabak-komerco alportus profiton al la ŝtato kaj ke la reĝimo gajnos pli el la kunlaboro ol el la konflikto kun li.

Malgraŭ la pruvoj ke li daŭrigis siajn kontrabandajn agadojn, baldaŭ iĝis klare ke la diktaturo ne plu konsideris lin unu el siaj celoj. La kargo-kompanio de ***March***, ***Compañía Trasmediterránea***, komencis ricevi signifajn registarajn subvenciojn, lia firmao ***Petróleos Porto Pi*** profitis ŝanĝon en la kotizado de la fuelo, kaj estis finfine koncesiita al li la ŝtat-tabaka monopolo en Maroko en 1927.

La reĝo Alfonso, kiu elspezis multe pli ol li ricevis de la malavara registara stipendio, estis implikita en koruptaj entreprenoj kaj apogis plurajn neklarajn firmaojn sub lia nomo. Laŭ onidiro, li estis subaĉetita fare de fraŭdulo, ***Isidro Pedraza de la Pascua***, por igi la registaron financi la eksterordinarajn fervojajn konstru-projektojn de la Hispana Societo de Industrioj kaj Elektra Trakcio. Alie, oni aljuĝis sen aŭkcio aŭ konkurso de la telefona servo, al entrepreno kie eniris kiel advokato kun 20 aŭ 25 mil pesetoj je salajro, ***José Antonio***, la dudekunujara filo de la Diktatoro, kiu estis ĵus fininta sian karieron. Ministroj, altrangaj armeaj oficistoj kaj gravuloj de la partio de la diktatoro, la Patriota Unio, ne hezitis uzi sian pozicion, kaj la foreston de vigla opozicio, por certigi sinekurojn aŭ atingi profitdonajn registarajn kontraktojn.

Same favora fiska imposto estis koncesiita al hidr-elektra firmao, la ***Sociedad Saltos del Alberche***, kiun la ministro ***Rafael Benjumea*** kreis por konstrui digon ĉe la rivero ***Alberche***, okcidente de Madrido. Inter ties direktoraro estis la Ministro pri Milito, ***Juan O'Donnell***, Duko de Tetuano, kiu eniris en la registaro ŝarĝita je ŝuldo, kaj mortis riĉa en 1928. Tri aliaj ministroj havis profitdonajn rilatojn kun bankoj, industriistoj kaj terposedantoj: ***José Calvo Sotelo*** (Fisko), ĉe la Banko de Katalunio kaj la Centra Banko, de kies direktoraro li iĝis prezidanto tuj kiam li forlasis la Registaron; **José María Yanguas Messía** (Ŝtato), kun min-industriaj kompanioj, kaj la Grafo de ***Andes*** (Ekonomio), kun terposedantoj. Iu intima amiko de la diktatoro, ***José Sanjurjo***, prezidis la firmaon kiu havis la koncesion de la monopolo de civila aertransporto en Hispanio, ***Concesionaria de Líneas Aéreas Subvencionadas SA***, kies profito venis ĉefe el publikaj subvencioj. Okazis diversaj kazoj de fraŭdo kiuj ne estis procesitaj pro registara interveno. Unu el la plej famaj estis tiu de iu banko de Bilbao. Pro la nekompetenteco de ĝiaj administrantoj, nerespondeca spekulado kaj malzorgema invest-politiko, la banko kolapsis en 1925 kun ŝuldo de 92 milionoj da pesetoj. Kelkaj el la direktoroj de la ento alproprigis al si la monon de la deponantoj, kio kaŭzis la ruinon de multaj homoj. Oni komisiis al la juĝisto ***Pedro Navarro*** esplori la rolon de la direktoro de la banko, ***Juan Núñez***, kaj iuj aliaj altrangaj oficialuloj kiuj atingis egan riĉaĵon el la afero. Inter la arestitoj estis la grafo de ***Abásolo***, la markizo de ***Aldama*** kaj la grafo de ***Gaitanes***, ĉiuj el ili amikoj de Alfonso la 13-a. La grafo de ***Floridablanca***, la bofilo de ***Aldama***, petis la intervenon de la reĝo, kiu tuj vokis la prokuroron de la Supera Kortumo, la ĉiam obeema ***Galo Ponte y Escartín***, kaj ordonis al li liberigi ĉiujn tri nobelojn. ***Ponte*** iris al Bilbao, ordonis al ***Navarro*** liberigi ilin, detruis la pruvojn kontraŭ ili, kaj punis ***Navarro***-n per deviga translokigo. La Plejsupera Kortumo nuligis la grandegajn monpunojn kiujn oni estis truditaj al la akuzitoj. La reĝo laŭdire ricevis milionon kaj duonon da pesetoj por lia interveno en la kazo.

Post 1926, kiam la malkontento komencis pliiĝi, la organizado de homamasoj, kiuj aklamadis la diktatoron en la paradoj kaj manifestacioj de la Somaten-milico kaj la Patriota Unio povus esti konsiderata parto de la kaŝita korupto de la reĝimo, ĉar ĝi implicis enorman koston por la urbaj aŭ provincaj aŭtoritatoj, laŭ la kazo, aŭ por la nacia registaro.
Iu plia kazo de la ofta koruptado de la epoko, kiun ***Primo-de-Rivera*** nek povis nek volis elradikigi estis tiu de la usona art-komercisto ***Arthur Byne***, agento de ***William Randolph Hearst***, tre ege riĉa kaj avida magnato. ***Byne*** organizis la aĉeton kaj eksportadon al Usono, ŝtono post ŝtono, je astronomia kosto, de pluraj historiaj konstruaĵoj, inkluzive de la monaĥejo de ***Santa María la Real*** de ***Sacramenia*** (Segovio), operacio kiu estis rajtigita spit' al tio ke ĝi malobservis la leĝaron aprobitan fare de ***Eduardo Callejo de la Cuesta***, ministro pri Publika Instruado kaj Belartoj. ***Byne*** fanfaronis antaŭ la arkitektino de ***Hearst***, ***Julia Morgan***, ke li povis venki la leĝajn obstaklojn dank'al siaj abundegaj subaĉetaĵoj al oficialuloj de la ministerio, ŝajne inkluzive de la ministro mem. La oficiala konsento al la agadoj de ***Byne*** iĝis eĉ pli evidenta en 1927, kiam la komercisto estis ordenita, kurioze, per la Kruco de Armea Merito "pro liaj servoj al hispana kulturo".
La reĝimo organizis landan abonkampanjon por rekompenci la diktatoron pro lia "sinofero" favore al Hispanio: kompanioj kaj bankoj estis oficiale informitaj, ke ilia teorie libervola kontribuo estos determinita laŭ ilia spez-grando. La 9-an de marto 1929, Primo publikigis unu el siaj plej naivaj kaj hipokritaj neoficialaj notoj, per kiu li klarigis, ke la celo de la landa abono estis havigi al li "domon, kiu estus deca ŝirmejo de mia deviga ripozo post la kruda lukto de ĉi tiuj jaroj kaj taŭga solvo por la vivo de mia familio». La "donacoj" atingis la sumon je pli ol kvar milionoj da pesetoj. La reĝo estis akuzita je ricevado de subaĉetaĵoj por helpi firmaojn akiri favorajn kontraktojn, kaj la diktatoron, de profitado el la distribuado de registaraj kontraktoj.
Tiom ega koruptado eblis tial ke oni estis pli limiginte la malgrandan sendependecon de la juĝistaro. Unu dekreto de la 16-a de majo 1926 estis doninta al la Registaro la povon trudi sentencojn sen pli da limo ol "la bono por la lando". Ĉiuj leĝaj baroj al tiu dispozicio estis suspenditaj kaj oni ne povus prezenti apelacion kontraŭ tiuj juĝoj krom antaŭ la Registaro mem. Alia dekreto de la 14-a de junio 1926 kreis la tiel nomatan "Juĝista Konsilio", kun la povo revizii ajnan decidon de la juĝistaro kaj forigi ajnan juĝiston kies agoj malplaĉus al la Registaro. Alia dekreto de la 14-an de oktobro 1926 donis al la Registaro la povon revoki la decidojn de la Plejalta Tribunalo, kio eliminis ajnan eblecon je jura apelacio kontraŭ registaraj decidoj. Responde al kreskanta opozicio kontraŭ la reĝimo, ĉiu signo de aŭtoritato de la juĝistaro super la Registaro estis forigita. Alia dekreto de la 22-an de decembro 1928 donis al la Registaro la povon eksigi, transloki aŭ devige emeritigi ajnan juĝiston, magistraton aŭ prokuroron. Tiu povo estis pligrandigita per nova dekreto de la 3-an de februaro 1929 kiu permesis al la Registaro transloki, suspendi aŭ eksigi ajnan oficiston kiu montrus malamikecon al la reĝimo aŭ iamaniere malhelpus ties politikojn.

Tia enorma jura subprema aparato de diktaturo ne estis uzita por persekuti la krimon kaj la korupton sed ĝuste kontraŭ ties viktimoj, la proletaro kaj la kamparanaro, kaj kontraŭ la denoncantoj de tiu sistemo, la intelektuloj kaj la honestaj politikistoj (ekzistis iuj). Inter la intektuloj kiuj devis suferi la persekutadon far la reĝimo, per enkarceriĝo, ekzil(iĝ)o aŭ alimaniere elstaris ***Miguel de Unamuno***, ***Fernando de los Ríos***, ***Luis Jiménez de Asua***, ***Manuel Hilario Ayuso Iglesias***, ***José Giral***... Rilate al la laboristaro, en la industriaj centroj, ĉefe Katalunio, la sindikataj aktivuloj devis suferi la subpremadon far ***Severiano Martínez Anido***, kruela kaj perfortema homo kiu agadis kontraŭ la anarkisma movado jam antaŭ la diktaturo de ***Primo-de-Rivera***. Ĉi tiu nomumis ***Severiano***-n ministron pri Internaj Aferoj por gvidi la kontraŭlaboristan politikon land-skale.
Kompreneble tia politiko fine ruinigis la bonan rilaton kiu dekomence ekzistis inter la diktaturo kaj la socialista sindikato **UGT**, kiu estis perdante anojn laŭlonge de la fia kaj korupta regado de ***Primo-de-Rivera***. En la jaro 1929 la prestiĝo de la reĝimo estis nula en ĉiuj sektoroj de la hispana socio, eĉ la militista kiu ĝis tiam estis la ĉefa apogo de ***Primo***. Ĉi tiu estis atinginte la miraklon, same kiel ***Godoy*** en la antaŭa jarcento, unuigi la tutan landon… kontraŭ li. Por ke li mem perceptu tion devis okazi la afero ***Sánchez Guerra***. Ni dediĉu ioman atenton al tiu afero.
***José Sánchez Guerra*** estis unu el la multaj politikistoj de la epoko, nek pli nek malpli bona aŭ honesta ol la multaj kiuj estis ludintaj politikajn rolojn dum la malstabila reĝado de Alfonso la 13-a. Trifoje ministro, unufoje eĉ Registar-Prezidento, kaj aliaj influaj postenoj: dufoje Guberniestro de la Banko de Hispanio, Prezidento de la Korteso... En tiu politika sistemo, kie la registaroj daŭris malmulte kaj estis oftaj ŝanĝoj en la altaj postenoj de la Administracio, ekzistis kelkdeko da uloj kiaj ***Sánchez Guerra***. Krome dum lia politika kariero li ne speciale distingiĝis pro sia honesteco; li estis unu el la multaj politikistoj kies kariero dependis de la kacikeca sistemo kaj ties korupta funkciad-maniero. Li apartenis al la politika klientaro de ***Antonio Maura***, kaj kune kun ĉi tiu li forlasis la liberalan partion por aniĝi al la konservativan... do, io tre normala en la epoko. Tial neniu povus pensi ke li, en la lasta etapo de sia vivo, ludus tiun indan kaj heroan rolon kontraŭ la diktaturo kaj la monarkio kiu igis lin elstari en la tiutempa historio de nia lando.


***José Calvo Sotelo***


***José Sanjurjo***


***Severiano Matínez Anido***


***José Sánchez Guerra***

Li kuraĝis admoni la reĝon rifuzi la diktaturon, sed Alfonso la 13-a troviĝis tre komforta en la politika sistemo establita de ***Primo-de-Rivera***. Do, ***Sánchez Guerra*** pasis al la opozicio. Li libervole ekziliĝis en Francion en septembro de 1927. En Parizo, li fariĝis la gvidanto de la puĉoplano kontraŭ la diktaturo. La 29-an de januaro de 1929 li revenis en Valencion por gvidi la ribelon. Estis interakordite la helpo kaj partopreno de la tiea generalo ***Alberto Castro Girona***, sed ĉi tiu, last-momente ne kuraĝis entrepreni la operacion kaj arestis la konspir-estron. ***Sánchez Guerra*** estis malliberigita en prizonŝipon en Valencio. La proceso kontraŭ li kaj liaj komplicoj komenciĝis la 25-an de oktobro. Dum la proceso, ***Sánchez Guerra*** ne hezitis proklami la ribelan naturon de la operacio kiun li provis realigi, kaj la justecon de tiu faro kontraŭ la diktaturo. Tial rezultis tre strange ke la tribunalo absolvis lin. ***Primo-de-Rivera*** perceptis kiel vango-frapon tion ke iu tribunalo, krome militista, senkulpigu konspiranton kontraŭ lia reĝimo. Plej grave por li estis tio ke ***Sánchez Guerra*** kaj ties komplicoj estis vivuataj kaj aklamataj de egaj hom-amasaj manifestacioj kiam ili estis kondukataj antaŭ la tribunaloj, kaj dume tute ne aperis surstrate, por defendi lian reĝimon, la membraro de la Patriota Unio, la partio kiun li estis formante, kaj de la Somaten-milico kiu estis kvazaŭ lia pretora gvardio.
Por klarigi al si la situacion, ***Primo*** skribis al la General-kapitanoj de la militistaj regionoj demandante ĉu li daŭre kalkulis je ilia apogo. Ĉi tiu elpaŝo estis granda eraro ĉar li en tiu konsulto ignoris la reĝon, kiu estis la plejkomandanto de la landa armeo kaj krome la sola persono kiu povus rajtigi aŭ ne la landan regadon. Alfonso la 13-a alvokis ***Primo***-n kaj akre skoldis lin, kio montris al la diktatoro ke li ne plu ĝuis la reĝan favoron. Krome la respondo de la armeestroj estis sufiĉe ambigua; la generaloj deklaris ke ili estis plene lojalaj al la reĝo. Ĉio-ĉi estis ia delikata maniero diri al la diktatoro ke li devus rezigni sian politikan rolon. Li demisiis la 28-an de januaro de 1930 kaj ekziliĝis en Parizon, kie li mortis ses semajnojn poste. En la fina etapo de lia regado, ***Primo-de-Rivera*** eĉ ne ĝuis la apogon de la industria kapitalista klaso kaj la terposedanta oligarkio kiujn li tiom multe favoris. Okazis ke post la jaroj de ekonomia progreso, kiuj favoris lian pozicion, venis la ekonomia krizo de 1929 kiu tiom malfavore efikis kontraŭ la tuta sistemo. Ni memoru ke tiu krizo favoris la potenciĝon de la naziistoj en Germanio. En Hispanio ne nur la diktaturo sed ankaŭ la monarkio kaj poste ankaŭ la respubliko, kiel ni vidos, estis viktimoj de tiu kolosa krizo.
Post la falo de la diktatoro, la monarkio enkarnigita de Alfonso la 13-a ne multe povis rezisti la kolosan oponon de ĉiuj sociaj sektoroj kiuj estis kontraŭ-starante la diktaturon. La lideroj de la diversaj partioj kaj famaj intelektuloj publike pledadis por starigo de respubliko. Ankaŭ la iama monarkiisto ***José Sánchez Guerra*** faris diskursojn kontraŭ la monarkio. En la armeo, inter la junaj oficiroj kreskis sentoj favore al la starigo de respublika reĝimo. Okazis militista ribelo, mise organizita, celante proklami Respublikon, sed kvankam ĝi fiaskis, la maniero kiel oni procedis kontraŭ la responsuloj, la oficiroj ***Hernández*** kaj ***Galán***, alportis eĉ pliajn popolan malamon kontraŭ la monarkio. Tiuj junaj oficiroj estis arestitaj, juĝitaj kaj paf-mortigitaj, kaj tiele ili iĝis martiroj de la respublika afero.

La 13-an de aprilo de 1931 okazis en la lando balotado por elekti la urbestrarojn. La fakto ke en la urboj, kie ne funkciadis la kacikisma kontrolo de la balotado, venkis la respublikanaj fortoj, estis interpretita kiel ĝenerala popola rifuzo al la monarkio. Pri tiuj eventoj estas informo en Esperanto en la 88-a numero de ĉi tiu revuo **Heleco**, en la ret-adresoj:
**https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/21-23.html**
**https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/24-26.html**
La Dua Respubliko estis proklamita la 14-an de aprilo 1931, meze de popola jubilo en la ĉefaj urboj. La homamasoj kriadis insultojn kontraŭ la reĝo pro lia korupto. Iu verkisto diris: «Nun Alfonso la 13-a ne estas elĵetata kiel kontraŭ-konstitucia, sed kiel ŝtelisto». La indigno pro la ekscesoj de la monarkio kaj la diktaturo kreis troajn esperojn pri tio, kion la nova reĝimo povus oferti. La sekvoj de la tutmonda recesio intensigis la bezonon de reformoj pri socia protekto kaj terposedado, sed la Respubliko havis malgrandan ekonomian kapablon enkonduki ŝanĝojn pro la peza financa ŝarĝo heredita kaj la malfido de la internaciaj bankoj. Ĝuste de la komenco, la politikaj fortoj de la dekstraro komencis plani la detruon de la nova reĝimo. Krome, la kunlaboro de la socialista sindikato kun la diktaturo estis generinta kontraŭ-socialisman senton en la anarkistaj medioj kio ege damaĝus la Respublikon. Sociaj konfliktoj en la sudo de la lando, kie la terposedanta oligarkio malaltigis la salajrojn kaj senlaborigis multajn kamp-laboristojn, provokis perfortan reagon de la policaj fortoj. Tio draste malpliigis la kapablon de la Respubliko atingi reĝimon de kunvivado. La nova reĝimo estus detruita ĉar ĝi provis efektivigi reformojn kaj malsukcesis en tiu celo.
Okazis ke, fakte, la starigo de la nova reĝimo ne ŝanĝis la ekvilibron de socia kaj ekonomia povo. La riĉeco kaj influo de la terposedantoj, industriistoj kaj bankistoj ne malpliiĝis la 14-an de aprilo de 1931, kaj same oni povas diri pri la presaro, ĉiam kontrolata de la superregantaj klasoj. La politika potenco estis demarŝata tiam de malstabila koalicio de moderaj fortoj: socialistoj, respublikanoj el diversaj tipoj kaj la radikala partio de la nefidinda ***Lerroux***. Prezidis la Respublikon ***Niceto Alcalá Zamora***, malamiko de Alfonso la 13-a sed ne simpatianto de sociaj reformoj. La reformoj kiujn la registaro, subgvide de ***Manuel Azaña***, volis entrepreni, daŭre koliziis kun la interesoj de tiuj reakciaj potencoj. ***Lerroux*** estis nomumita ministro pri Eksteraj Aferoj, ĉar tiele li havis malpli da ŝancoj defraŭdi financon. En decembro






**La Dua Respubliko estis proklamita la 14-an de aprilo 1931, meze de popola jubilo.**

1930, kiam la membroj de la revolucia komitato estis en malliberejo, ***Lerroux*** organizis popolan kveston favore al ili sed la kolektita mono malaperis. La malamikeco de la dekstraro kontraŭ la Respubliko rapide manifestiĝis. La ministro pri Financo, ***Indalecio Prieto***, anoncis en la unua registara kunveno, ke la peseto estas malfortigita pro grandskala kapitalfuĝo. La reĝo estis akuzita je administra malmoraleco, li estis forportinta riĉaĵon je 85 milionoj da pesetoj je lia foriro el Hispanio. La peseto malplivaloriĝis je 22 elcento rilate al la usona dolaro. La decido de ***Prieto*** elradikigi la korupton gajnis al li la malamikecon de la entreprenistaro kaj komercistoj kiaj ***Juan March***. La celo de la respubliko plibonigi la vivkondiĉojn de la plej malriĉaj membroj de la socio postulis signifan redistribuon de la riĉaĵo. Dum la tutmonda depresio, salajra pliigo kaj la kosto de pli bonaj laborkondiĉoj ne povus esti financitaj per simpla malpliigo de la profitoj. Dum recesio, tio prezentis revolucian defion al la ekonomia ordo. Unu el la rajtoj kiuj estis protektitaj ekde tiu momento estis la nova okhora labortago.
La dekstraro mobilizita kontraŭ la Respubliko diversmaniere organiziĝis en la politika tereno; aperis novaj burĝaj partioj kaj komencis aperi kelkaj faŝistaj organizaĵoj. Inter la malamikoj de la Respubliko, du el la plej potencaj estis la Eklezio kaj la Armeo. Ambaŭ finiĝus trenitaj al la kontraŭ-respublika dekstraro sen grandaj malfacilaĵoj, parte pro la eraroj faritaj de respublikaj politikistoj, sed ankaŭ pro la agado de la fundamentistoj de la Eklezio, fervoraj defendantoj de la bezono de "konfesia ŝtato" kiu trudus la praktikadon de la katolika religio perforte, per civita milito se necese, kaj malpermesus ĉiujn aliajn. La tiama episkopo de Barcelono deklaris ke la Eklezio bezonis glavojn kaj artilerion. La 11-an kaj 12-an de majo de 1931, estis bruligitaj preĝejoj kaj monaĥejoj en Madrido, Malago, Sevilo, Kadizo kaj Alakanto. Fine, la ordo estis facile restarigita per la deklaracio de militstato. La



***Niceto Alcalá Zamora*** ***Manuel Azaña***

fajroj estis ago de junaj fanatikuloj de la Ateneo kaj la anarkiisma movado, konvinkitaj ke la Eklezio estas la araneo kiu teksis la intrigojn de la reakcia politiko en Hispanio. La Respublikana gazetaro kaj ***Maura*** asertis ke dekstraraj agentoj provokantoj estis implikitaj en la atakoj. Kelkaj atestantoj konfirmis ke membroj de la Monarkia Rondo pagis junulojn por aĉeti benzinon kaj bruligi religiajn konstruaĵojn.
Ankaŭ la armeo komencis abomeni kaj kontraŭstari la Respublikon. Okazis puĉoprovo far la generalo ***José Sanjurjo*** la 10-an de aŭgusto de 1932. Nur frakcio de la hispana armeo partoprenis en la operacio, kio signifis ĝian fiaskon ekde preskaŭ la komenco. Ĝi estis la unua ribelo de la armitaj fortoj kontraŭ la Respubliko, kaj ĝia fiasko erare konvinkis multajn respublikanojn ke la danĝero de konspiroj estis pasinta kaj ke la akcepto de la Respubliko estis firma. La generalo ekziliĝis en Portugalion atendante pli konvenan momenton por plua provo. Sed tiam la reakciaj fortoj ne bezonis puĉistajn militistojn por rehavi la politikan potencon.
La registaro de ***Azaña*** entreprenis esploron pri la korupt-skandaloj de la monarkio kaj la diktaturo. Rezulte de ĝi estis enkarcerigita la komercisto ***Juan March*** kies komercadon ni jam priskribis. Tuj je la komenco de la balot-kampanjo de 1933, la 3-an de novembro, ***March*** eskapis el la malliberejo. Poste li rakontis al brita ambasadoficialulo ke la 2-an de novembro, en la ĉeesto de gardisto, li rakontis al iu amiko kiu venis por viziti lin: «*Mi fuĝos morgaŭ je la sesa horo matene, mi telegrafos al ci de Ĝibraltaro*». Kiam lia amiko alarmite rigardis la gardiston, ***March*** trankviligis lin dirante: «*Mi aĉetis ĉi tiun sinjoron kaj la gardistojn ĉe la pordego*». Du anarkiistaj korpogardistoj akompanis lin. Lia fuĝo estis priskribita de la dekstrara kaj anarkiisma gazetaro kiel la heroa ago de persekutita kaj malavara viro. Unue, ***March*** rifuĝis en Ĝibraltaro, poste ekloĝis en luksa hotelo en Parizo. Li certigis al si parlamentan sidlokon en la balotado, do li povis baldaŭ reveni en Hispanion kun parlamenta imuneco, kiel deputito por Majorko, danke al la elspezo de grandega monsumo. La mon-rimedoj disponeblaj de la dekstrara koalicio **CEDA**, liderata de ***José María Gil Robles***, por la kampanjo estis enormaj, danke al la malavaraj donacoj de la riĉuloj, precipe de ***Juan March***. La pinto de ĝia kampanjo estis militema parolado farita de ***Gil Robles*** en Madrido: «*Estas necese, nuntempe, senkompate venki la socialismon... «Ni devas fondi novan Ŝtaton, novan nacion, lasi la landon purigita je judaj framasonoj... Ne gravas, ĉu kostos al ni eĉ verŝi sangon!... Kiam la tempo venos, la Parlamento aŭ ĝi submetiĝos al ni, aŭ ni malaperigos ĝin*».
Rezulte de la balotado de la jaro 1933, la dekstraro kontrolis la situacion. Intervenis tri faktoroj por ebligi la politikan renversiĝon. Unue, dum la progresista jarduo (1931-1933) oni estis aprobinte la voĉdonrajton de la virinoj, kaj ĉar multaj virinoj, ĉefe en la kampara medio, estis tre subinflue de la pastraro, multaj el ili voĉdonis favore al la dekstraro. Due, la anarkiistoj decidis ne voĉdoni en tiu balotado. Multaj perfortaj konfliktoj en la sudo de la lando post 1931 estis severe sufokitaj de la armitaj fortoj de la ŝtato. Plejmulte el la kamparanaj viktimoj de tiu polica perforto estis anarkiistoj, do ĉi tiuj komencis taksi la Respublikon kiel tiom abomeninda kiom la monarkio kaj decidis balote sin deteni. Kaj trie, kaj plej grave, multaj voĉdonantoj de maldekstraro balote apogis la Radikalan Partion kies lidero estis


José María Gil Robles













Pribalota propagando de la dekstraro en 1933


Lerroux kaj Gil Robles


***Alejandro Lerroux***. Pri tiu ulo ni jam klarigis ke li estis korupta kaj oportunista demagogo kiu, ŝajnigante sin progresisto, fakte, li ĉiam celis personan profiton, kaj politikan kaj monan. Post lia rompiĝo kun la progresemaj respublikanoj, ***Lerroux*** alproksimiĝis al la pozicioj de la dekstraro kaj post la balotado de novembro 1933 li povis prezidi la registaron kun la apogo de la dekstrara koalicio. Inter 1933 kaj 1935 li havis la prezidantecon de la registaro tri fojojn. La dekstrara koalicio liderata de ***Gil Robles***, uzis sian parlamentan plimulton por kondiĉigi la politikon de la registaro de ***Alejandro Lerroux***. Kun ĉi ties konsento, la dekstraro reakiris la ŝtatan aparaton, kiun ĝi decidis uzi por likvidi la reformojn de la antaŭaj du jaroj. Sed la esperoj generitaj dum tiu tempo estis vekintaj popolan koleron kontraŭ la dekstraro.

Estis konate kaj fifame ke ***Lerroux*** ĉiam sopiris lukse vivadi. Atinginte la registaran potencon, li petadis al la aliaj ministroj oficialajn postenojn por liaj parencoj kaj amikoj. Baldaŭ post ilia ekregado, la deputitoj de ***Lerroux*** kreis oficejon por distribui ŝtatajn favorojn, monopolojn, publikajn ofertojn, licencojn... Estis multaj akuzoj pri defraŭdo de municipaj fondusoj en la urboj regataj de la radikaluloj kaj kontraŭ konsilistoj de la sama partio -inkluzive de la adoptita filo de ***Lerroux***, ***Aurelio***- pro permesado de la funkciado de kontraŭleĝaj kazinoj. Aliaj akuzoj temis pri la aljuĝo de publikaj kontraktoj al kompanioj posedataj de ***Lerroux*** mem.


Kvankam malfrue, fine la anarkiistoj komprenis ke ilia malamikeco kontraŭ la Respubliko potencigis plej danĝerajn fortojn de dekstraro kiuj estis provante imiti la tiaman germanan naziismon. Jam en decembro de 1933 okazis anarkiistaj perfortaj atencoj kaj ribeloj kiuj estis facile sufokitaj. Dume la ekstrema dekstraro organiziĝis en la perspektivo de ebla estonta civilmilito por draste kaj definitive dispremi la politikajn fortojn de maldekstraro kaj tute submeti la laboristaron. La diversaj grupoj kaj partietoj de ekstrema dekstraro ariĝis en faŝistan organizaĵon, la Falango, subgvide de ***José Antonio Primo de Rivera***, filo de la forpasinta diktatoro. Tiu Falango organiziĝis surbaze de la skemo de la itala faŝismo kaj la germana naziismo. La reĝimo de ***Benito Mussolini*** komencis provizi ekonomian kaj armilaran helpon al la hispanaj faŝistoj, kiuj baldaŭ entreprenis perfortajn surstratajn agojn kontraŭ la fortoj de maldekstraro.

Krome, laŭ la pasado de la tempo, ***Gil Robles*** pli kaj pli

premadis la registrar-prezidenton ***Alejandro Lerroux*** kaj la ŝtat-estron ***Niceto Alcalá Zamora*** por ke oni inkludu plurajn membrojn de la **CEDA** men en la registaron, kaj fine li atingis ian sukceson tiorilate. La maniero laŭ kiu la dekstraro pligrandigis sian politikan potencon tre similis al la procezo de potenciĝo de la faŝistaj fortoj en Italio kaj Germanio. Tial, la socialistoj kaj ceteraj fortoj de maldekstraro ektimegis ke en Hispanio ripetiĝus tia historio kaj komencis serioze pripensi revolucian agadon por kapti la politikan potencon perforte.
Tamen la revolucia movado kiu konkretiĝis ekde la 5-a de oktobro de 1934 tute ne estis serioza afero escepte en Asturio, kaj malpligrade ankaŭ en Katalunio. En ĉi lasta regiono la burĝa regantaro de la aŭtonomeca aŭtoritato, subgvide de ***Lluís Company***, entreprenis ian ofensivon kontraŭ la centra ŝtato de la lando kadre de strategio por atingo de pliaj politikaj funkcioj, sed rifuzis armi la laboristojn, do la movado neniam atingis la nivelon de sociala revolucio. En Asturio, male, La karbo-ministoj havis armilojn kaj dinamiton je sia dispono kaj la revolucio estis tre bone organizita. La Asturia Socialisma Respubliko estis proklamita en Ĥiĥono, kaj la kazernoj de la Civil-Gvardio, preĝejoj, urbodomoj, ktp. estas atakitaj, tiel ke preskaŭ ĉio en Asturio estis en la manoj de la ministoj post tri tagoj, inkluzive de la armilfabrikoj de ***Trubia*** kaj ***La Vega***. Post dek tagoj, proksimume 30.000 laboristoj estis formantaj la Asturian Ruĝan Armeon. Sed la subpremo estis tre severa tie kie la revoluciuloj renkontis reziston. La registaro konsideris la ribelon kiel veran enlandan militon, eĉ kiam ankoraŭ ne eksciis ke la ministoj komencis pripensi en ***Mieres*** la eblecon de marŝo sur Madrido. Dum la revolucio, la urbo de Oviedo estis plejparte detruita, interalie, la universitataj konstruaĵoj, kies biblioteko konservadis bibliografiajn fondusojn de eksterordinara valoro kiuj ne povus esti reakiritaj, aŭ la teatron ***Campoamor***. Ankaŭ la Sankta Ĉambro en la Katedralo estis dinamitita, kie gravaj relikvoj portitaj al Oviedo, kiam ĝi estis kortego, ekde la Sudo de Hispanio. Inter la fortoj de maldekstraro kiuj inspiris la revoluciulojn elstaris la lidereco de la socialista deputito ***Ramón González Peña***.
La registaro adoptis serion da energiaj dispozicioj. La eneraloj ***Goded*** kaj ***Franco*** estas vokitaj gvidi la sufokadon de la ribelo ekde la Ĉefa Stabo en Madrido. Ili



**Lluís Companys**




**Afiŝo de la Revolucio de 1934 en Asturio**




**Ramon Gonzalez Peña**



**Eduardo López de Ochoa**


Manuel Goded


Francisco Franco


Juan Yagüe Blanco


José Antonio Primo de Rivera

rekomendis ke trupoj je dungo-soldatoj estu venigitaj el Maroko. La generalo ***Eduardo López Ochoa***, komandante la ŝtatajn militfortojn, venis por subteni la sieĝitajn trupojn en Oviedo, kaj la kolonelon ***Juan Yagüe*** kun siaj legianoj kaj kun la subteno de la aviado. La posta subpremado estis tre severa. Ĝi estis aranĝita fare de solduloj kies merito estis agadi senlime senkompate kontraŭ la maŭraj trupoj en Afriko. Ili uzis la samajn metodojn de subpremo kontraŭ la ribelintaj laboristoj kiel kontraŭ la furiozaj kaj agresemaj Rif-gerilanoj. Pli ol 1000 laboristoj mortis, aliaj du mil estis vunditaj kaj pliaj miloj da ili estis malliberigitaj.

La revolucio, do, estis sufokita en la sola regiono kie ĝi estis vere serioza afero. Poste venis la okazo por la dekstraro eltiri ideologian profiton pri ĝi. La burĝa presaro emfazis la revolucian perforton por malhonorigi la teoriojn de la marksismo kaj aliaj ideoj de la maldekstrularo, kaj konkludi ke nur la dekstraro enkarnigas la interesojn de la patrujo. Ĉefe la Eklezio, profitis la fakton ke la asturaj revoluciuloj murdis 34 religiulojn por pli kaj plu veki la rifuzon de la katolikoj al la teorio pri la klasbatalo kaj tiele plifortigi la ideologian influon de la burĝaro. Tia eklezia teniĝo, kiu jam daŭradis multajn jarcentojn, estis la kaŭzo de la agresemo de la subpremataj klasoj kontraŭ la religio. Jam ni vidis ke en antaŭaj krizaj situacioj la popolamasoj esprimis sian rifuzon kontraŭ la klerikaro per la bruligo de preĝejoj kaj monaĥejoj. En 1934, en Asturio, la popola perforto kontraŭ la Eklezio, krom la detruo de religiaj konstruaĵoj, konkretiĝis ankaŭ en la murdo de pastroj. Temis pri grava elpaŝo kiu iĝis poste pli grava dum la civilmilito (1936-1939). Grava faktoro, krom la Eklezio, por la pliakriĝo de la politika krizo kaj la sociala konflikto, estis la Falango de ***José Antonio Primo de Rivera***. Li estis sekvante la germanan modelon por prezenti sian partion kiel la solan alternativon por defendi la sistemon ekde la politika potenco. La falangistoj pli kaj pli dediĉiĝis "konkeri la straton", t. e. perforte kontraŭfronti la laboristajn mobilizojn.

Sed, kun aŭ sen politikaj krizoj kaj sociaj konfliktoj, la koruptado daŭris en ĉi tiu malfeliĉa lando dum la periodo inter la Revolucio de Oktobro-1936 kaj la Civilmilito. En oktobro de 1935, serio da gravaj skandaloj finruinigis la prestiĝon de ***Lerroux***. Temis pri la samtempaj skandaloj de la ***Straperlo*** kaj ***Nombela***. Jam antaŭe, ***Alcalá Zamora*** malkovris kun alarmo, ke ***Lerroux*** planis enpoŝigi la profitojn de landa kolekto lanĉita kiel rezulto de la okazaĵoj de oktobro 1934. La vorto

“***estraperlo***”, kiu de nun estus uzata en la hispana kiel sinonimo de “korupto” kaj “nigra merkato”, devenas de fraŭdo, en kiu partoprenis tri fremdaj uloj: ***Daniel Strauss***, ***Joachim Perlowitz*** kaj ***Frieda Lowann***. Ili inventis elektran ruletan radon, kiun kazin-posedantoj povis manipuli. Fakte, la ruleto estis laŭleĝe malpermesita en Hispanio, sed ***Strauss*** kaj ***Perlowitz*** sukcesis instali siajn maŝinojn en du kazinoj, tiu de ***Formentor*** (Mallorko) kaj tiu de Donostio, per mon-subaĉetaĵoj kaj en formo de multekostaj donacoj, kiaj oraj horloĝoj por ***Lerroux***. Ĉi tiu estis devigita demisii el sia posteno je registar-prezidento, tamen la Radikala Partio tuj estis implikita en alia skandalo, kaŭzita de la provo pagi per publikaj mon-rimedoj al amiko de ***Lerroux***, posedanto de ŝip-kompanio. La rezulto de ĉi lasta skandalo estis registara krizo.

***Gil Robles*** estis plenkonvikita ke la politika potenco estis facile atingebla kaj rifuzis kunlabori kun ĉiu ajn registaro kiu ne estus prezidita de li mem. Sed la Prezidento ***Alcalá Zamora*** ne fidis je li kaj decidis aliajn formulojn eĉ se provizoraj en la perspektivo de baldaŭa balotado. Responde al la malcedemo de la dujara kunlaboro de la Radikala Partio kun la **CEDA**, la maldekstraro kreskis en forto, unueco kaj militemo. En malliberejo, la politikaj kaptitoj trempis sin per revolucia literaturo. La ekonomia mizero de granda nombro da kamparanoj kaj laboristoj, la brutala persekutado de la oktobraj ribelintoj kaj la atakoj kontraŭ ***Manuel Azaña*** kontribuis plifirmigi la solidarecon inter ĉiuj progresistaj fortoj. ***Azaña***, post lia liberigo, kaj ***Prieto***, de sia ekzilo en Belgio, kampanjis por ke la malunueco kaŭzita de la balot-malvenko de 1933 ne ripetiĝu. Ankaŭ la ĉefaj figuroj de la Komunista Partio de Hispanio, ***José Díaz*** kaj ***Dolores Ibárruiri*** (***Pasionaria***) pledis por la formado de tiu koalicio kiu ricevis la nomon je «Popola Fronto». Nuntempe oni scias ke en tiu epoko ***Gil Robles*** estis pripensante la eblecon je armea puĉo kontraŭ la Respubliko, sed la generaloj konsideris ke la armeo ne estis tiam tute preta por tia elpaŝo.

La balotado okazis en februaro de 1936, kaj en ĝi la maldekstraro kaj la respublikanoj reakiris la politikan potencon perditan en 1933. Ĉar la balotrezultoj reprezentis senduban deklaracion de la popola deziro al forta registaro konsistigita de respublikanoj kaj socialistoj, ampleksaj sektoroj de la dekstraro komprenis la senutilecon de la leĝismo por iliaj interesoj. La brutaleco de la dekstraj politikoj de la antaŭa dujaro



Dolores Ibárruri



José Díaz Ramos



Emilio Mola Vidal



Gonzalo Queipo de Llano


sukcesis malhelpi la maldekstron ripeti la erarojn de 1933 kaj malaltigis balotsindetenon inter la anarkiistoj. La **CEDA**-junuloj kaj multaj el la riĉaj subtenantoj de la movado ankaŭ restis certaj pri la bezono akiri per perforto tion, kion ili ne povis atingi per persvado. Ekde tiu momento, la dekstraro pli zorgis pri la detruo de la Respubliko ol pri laŭleĝa ekkaptado de la politika potenco, kaj la militistaro komencis serioze konspiri.

La venko de la Popola Fronto signifis la preskaŭ tujan revenon al la lokaŭtoj en la kamparo kaj la renovigon de la kontraŭstaro de industriistoj kaj terposedantoj, kiuj ankaŭ transdonis sian ekonomian subtenon al la konspira dekstro, same kiel ***Juan March***. La popola reago konkretiĝis en iuj zonoj per atakoj al malliberejoj, bruligo de preĝejoj kaj atakoj kontraŭ dekstruloj. La tiama registaro de ***Azaña*** kaj ties respublikanoj troviĝis senpotenca en tiu situacio de keskanta perforto inter dekstruloj kaj maldekstruloj. Ne eblas kulpigi kun la certeco kiun ambaŭ flankoj faris tiam. Tamen, post la balota venko de la Popola Fronto ties partianoj ne bezonis perforti por preni la politikan potencon. Male, la kreado de klimato de ĥaoso kaj malordo povus pravigi la uzon de forto por establi dekstran diktaturon. Kadre de tiu radikaligo de la politikaj pozicioj, efektiviĝis la unuiĝo de la junularo de la socialista kaj komunista partioj en organizaĵo kiu jam dekomence, subgvide de ***Santiago Carrillo***, pli kaj pli sin difinis kiel komunista.

La maldekstraro kompletigis tiam la kapton de la politika potenco per la anstataŭo de ***Niceto Alcalá Zamora*** kiel Prezidento de la Respubliko per ***Manuel Azaña***. Poste, la tiama registaro de ***Santiago Casares Quiroga*** (majo de 1936) malmulte povis fari por eviti ke la politika perforto degeneru en ĝeneralan konflikton. Kvankam la generaloj ***Goded*** kaj ***Franco*** estis apartigitaj el la influaj postenoj kiujn ili havis en la antaŭa etapo, la generalo ***Emilio Mola*** povis trankvile kaj akurate prepari militistan puĉon kontraŭ la Respubliko. La historiistoj kiuj pritraktis tiun epokon koincidas pri tio ke ***Azaña*** kaj ***Casares Quiroga*** ne sufiĉe atentis pri la avertoj kaj informoj kiujn oni faris al ili pri la agado de la konspirantoj.

Tiam la Falango de ***Primo de Rivera*** havis jam plene faŝistan karakteron. Ekde la somero de 1935, la falangista lidero ricevadis monatan salajron de 50.000 liroj kiel eksterlanda agento de la itala faŝisma registaro. Post la venko de la Popola Fronto en la balotado de februaro 1936, la Hispana Falango, nutrita de novaj aktivuloj kaj novaj monrimedoj kaj en proksima rilato kun la armeaj konspirantoj, evoluigis la strategion de streĉiĝo kiu pravigus puĉon. Do, la perfortaj faroj de falangistoj daŭris senĉese ĝis la enlanda milito. La 14-an de marto, ***José Antonio Primo de Rivera*** estis arestita de la polico en sia propra hejmo, li estis perdinta sian parlamentan imunecon tial ke li ne estis elektita deputito en la februara balotado. Vespere de la 12-an de julio, kelkaj falangistoj perpafe mortigis la leŭtenanton ***José del Castillo***, de la Respublikana Gvardio. La kolerigitaj kamaradoj de la leŭtenanto reagis per reprezalio de enormaj sekvoj kaj senrespondeco: frumatene de la 13-a de julio, ili kidnapis kaj murdis ***Calvo Sotelo***-n. La murdo de ***Calvo Sotelo*** forte pravigis la argumenton ke nur armea interveno povus savi Hispanion el la anarkio.

Kiel sciate, kelkajn tagojn poste estiĝis en Hispanio civitana milito. La puĉo organizita de ***Mola*** fiaskis kiel puĉo, t. e. la ribelintoj ne sukcesis kontroli la situacion dekomence en la tuta lando, kaj tio estigis trijaran interfrontiĝon inter la dekstraro venkinta en iuj lokoj kaj la maldekstraro kiu sukcesis rezisti en aliaj lokoj. La grava situacio kaŭzita de la puĉo en julio 1936 kaj la malkapablo de ***Casares Quiroga*** alfronti ĝin kaŭzis lian eksiĝon dum la nokto de la 18-an de julio. Post mallongdaŭra centrista kabineto gvidita de ***Diego Martínez Barrio***, ***José Giral*** prezidis la registraron. Tiam la respublikana registaro jam estis perdinta la kontrolon de Maroko, Kanarioj, Balearoj -escepte Menorko-, Malnova Kastilio, Navaro, grandparto el Aragonio kaj parto el Andaluzio. Unu el la unuaj dispozicioj de ***Giral*** estis permesi la armigon al la popolo, kio ebligis disbati la ribelon en multaj lokoj. Tiel, ĝis la 25-a de julio, la milita ribelo estis venkita en la urbaj centroj -Madrido, Barcelono, Valencio, Malago aŭ Bilbao- kaj en diversaj regionoj. La malsukceso de la puĉistoj kapti potencon kaj la malkapablo de la registaro kontroli la ribelon transformis la situacion en civitan militon.


*Santiago Casares Quiroga*


juna *Santiago Carrillo*


leŭtenanto *José del Castillo*


***José Giral***

La hispana civitana milito estis amplekse priraportata per libroj, raportoj, noveloj, revuoj, filmoj… Eĉ ni pritemis ĝin esperant-lingve, kvankam sufiĉe resume, en alia loko.Vidu la ret-adresojn:
https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/33-38.html
https://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/39-42.html
Do, ne estas nia celo priskribi ĝin, eĉ se resum-maniere, ĉi tie. Nia nuna temo estas la koruptado en nia lando. Sed la korupto, kiel jam ni vidis, ofte interrilatas kun la historiaj eventoj. Do, ni iome atentos pri dum-militaj skandaloj. Tial ni devas mencii ke la negocisto ***Juan March*** malavare financis la ribelintoj, ĉefe tiun kiu poste iĝis la ĉefa figuro de la faŝista tendaro: ***F. Franco***. Kvankam li estis nur unu el la konspirantoj, liaj ambicioj iris preter ia baldaŭa venko. Ne multajn tagojn post lia alveno el Maroko, li kreis diplomatiajn kaj gazetarajn oficejojn. La internacia gazetaro baldaŭ ricevis deklarojn nomante lin plejsupera komandanto de la "naciaj" fortoj. ***Franco*** rapide konvinkis la perantojn de Germanio kaj Italio ke li estis la homo kiun oni devus apogi.
Nu, ***Franco*** mem agnoskis en iu diskurso en 1942 kiom multe helpis lin por lia venko la kapital-posedantoj; li deklaris: *«Nia Kruc-milito estas la sola batalado, el kiu la riĉuloj, kiuj militis, eliris pli riĉaj»*.

***March*** jam ekziliĝis en Parizo antaŭ la februara balotado, timante, ke venko de la Popola Fronto submetos lin al renoviĝinta persekuto. Pro lia malamikeco al la respubliko, li entuziasme ricevis la novaĵon pri la kunveno de la konspiraj generaloj la 8-an de marto, sed li maltrankviliĝis eksciante pri la timoj de la militistaro pri la riskoj de la plano, precipe en la kazo de ***Mola***, al kiu ***March*** sendis jenan mesaĝon: «*Vi ne zorgu pri viaj familianoj. Se io okazos al vi,* ***Juan March*** *prizorgos ilin. Krome, ĉi tiu garantias al vi, anticipe, la sumon de unu miliono da pesetoj*». Tio permesis al ***Mola*** instali sian edzinon kaj kvar idojn en Biarritz, kaj al ***Franco***, kelkajn tagojn poste, sendi sian edzinon kaj filinon al Havro per la germana ŝipo ***Waldi***.
La monarĥisto ***Antonio Goicoechea*** agnoskis la gravecon de la financa subteno de ***March*** intencante konvinki multajn nedeciditajn oficirojn kaj pritaksis, tion kion estis farita tiorilate: «*Al tiuj oficiroj oni certigis specialan financan apogon, garantiante al ili la ekonomian riskon, kiun povas kuri iliaj familioj. Ili ne moviĝas pro mono, sed ili ne agas se ili ne vidas sian ekonomian retiriĝon kovrita*». El ĉio ĉi ni devas eltiri la lecionon ke la mon-kontrolantoj posedas la stangon kiu vere movigas la aferojn de la mondo. La popoloj povas elekti politikajn regantojn en la balotadoj, sed la elektitaj uloj povas resti kiel sendefendaj pupoj en la manojn de la kontrolantoj de la kapitalo. Pri ĉio ĉi ni vidos pluajn kazojn en la sekvaj ĉapitroj de la historio de nia lando.
Dum la printempo de 1936, ***March*** ofertis sian subtenon por venki la malemon de pluraj esencaj generaloj kaj konservi ilian engaĝiĝon al la komploto. Krome, ***March*** pruntis al ***Franco*** kaj ***Mola*** duonmilionon da sterlingaj pundoj tra la banko ***Kleinwort*** por la aĉeto de armiloj. Ĉi tiu kvanto pliiĝis al 800.000 sterlingaj pundoj en aŭgusto kaj 942.000 en decembro. En Biarritz, dum la printempo de 1936, la aĉeto de armiloj estis en la tagordo de la oftaj renkontiĝoj de ***Mola*** kun ***March***, kiu, ĝenerale, trudis severajn amortizojn kaj interezkondiĉojn. La majorka magnato ankaŭ pagis pli da 20.000 pundoj por la ***Dragon Rapide***, la aviadilo kiu portis ***Franco***-n de Kanarioj ĝis Maroko. La malavara kontribuo de ***March*** al la preparoj por la puĉo tute kontraŭpruvas la asertojn de la frankistoj ke la ribelo estis aranĝita kun tre malmultaj rimedoj.
Poste ***March*** fanfaronis antaŭ altranga brita ambasad-oficialulo pri sia kontribuo al la venko de ***Franco***, deklarante ke li estis la ĉefa responsulo por la konvinkado al financistoj kaj hezitemaj magnatoj riski sian monon apogante la generalon ***Franco***-n, kaj en multaj kazoj estis la scio ke ***March*** volis triobligi iliajn kontribuojn (kaj ne la militan situacion de ***Franco***) kio donis al ili la necesan konfidon.
Kiam la ribelo komenciĝis, ***March*** transdonis kapitalon de la ***Kleinwort*** banko en Londono por pagi al la itala registaro por la dek du aviadiloj ***Savoia Marchetti*** kiuj devis transporti la soldatojn de ***Franco*** el Maroko ĝis la Duoninsulo. Li deponis egan kvanton da oro en la Banko de Italio por financi la partoprenon de tiu lando en la milito. La 3-an de septembro, ***March*** deponis 49,5 tunojn da oro kaj pliajn 72 tunojn post ses tagoj. Eble li estis la ĉefa financisto de la ribelo dum la unuaj monatoj de la milito; kun konsiderinda profito por li mem, li uzis siajn valut-

rezervojn por aĉeti materialon por la ribelintoj. Oni pritaksas ke ***March*** avancis proksimume 8 ĝis 10 procentojn de la kosto de la militinvesto de ***Franco***. Kiam ***March*** postulis pagon de la ŝuldo, oni diras ke ***Franko*** rajtigis la vendon de la fabelaj trezoroj de la Zaragoza katedralo. Krome, danke al lia financa subteno por la ribelantoj, ĝis la fino de la konflikto lia riĉaĵo pli ol duobliĝis, kio tre rilatas al la fakto, ke la enormaj donacoj al la ribelintoj far la hispanaj aristokratoj en kontant-mono, akcioj kaj juveloj estis enkanaligitaj tra la konto de ***March*** ĉe la ***Kleinwort***-banko. ***Gil Robles***, kiu poste estis unu el la ĉefaj laŭleĝaj perantoj de ***March***, estis la agento de la ribelintoj en Lisbono. Ankaŭ lia agado, kune kun tiu de la frato de ***Franco, Nicolás***, kiel neoficiala ambasadoro, estis financitaj de ***March***. Laŭ la opinio de ***Diego Hidalgo***, kiu estis Ministro de Milito kiam ***Franco*** estis la armea komandanto de la Balearoj, ***Franco*** estis fakte marioneto de ***March***, kun kiu li estis en ofta kontakto tiutempe. Vere estas ke ***Nicolás***, kiel ŝipa inĝeniero, jam estis laborinta en la ŝipkompanio de ***March*** en 1914.

La ekonomia helpo donita al la ribelintoj fare de ***Francesc Cambó*** estis preskaŭ same grava kiel tiu de ***Juan March***. La kataluna politikisto eksciis pri la ribelo dum li krozis la Adriatikon sur sia cent-tuna jakto ***Catalònia***, kaj oni diras, ke li reagis al la novaĵo dirante: «Tiuj, kiuj havas monon, donu ĝin, kaj tiuj en milita aĝo, ke ili batalu». Li metis sian konsiderindan riĉaĵon je la dispono de la ribelintoj, kiuj uzis ĝin por krei propagand-oficejon en Parizo kiu havis enorman influon. ***Cambó*** financis unu el la spion-servoj de la ribelintoj, la Informservon de la Nord-okcidenta Limo de Hispanio. ***Cambó*** iĝis esenca rolanto por konvinki la moderan internacian opinion pri la justeco de la kaŭzo de la ribelintoj. Poste, li private bedaŭris ke la ekonomia intereso devigis lin subteni la *«politikon de arogant-eco kaj analfabeteco»* de ***Franco***, kiun li malestimis, taksante lin kiel ia ***Primo de Rivera*** *«sed kun multe malpli da talento»*. Dum la milito progresis, ***Cambó*** sentis kresk-antan zorgon ke, se la ribelintoj venkus, ili alprenus kontraŭ-katalunan politikon. Tamen li metis siajn ekonomiajn interesojn antaŭ sian katalunismon.

Dum la disvolviĝo de la milito plifirmiĝis la lidereco de ***Franco*** en la faŝisma tendaro. Liaj plej eblaj rivaloj en la armeo, la generaloj ***Sanjurjo*** kaj ***Mola***, estis mortintaj en aviadil-akcidentoj. ***Goded*** kaj ***López Ochoa*** estis kaptitaj kaj mortig-itaj de la ruĝuloj, kaj la falangista lidero ***José Antonio Primo-de-Rivera***, kiu trov-iĝis en prizono je la milit-komenco, estis juĝita kaj kondamnita al paf-morto.

En marto de 1939, post preskaŭ tri jaroj da sanga kaj kruela civil-milito, la konflikto troviĝis antaŭ baldaŭa fino en kiu ludis gravan rolon la korupto. La situacio por la Respubliko iĝis katastrofa pro la malinda teniĝo de la eŭropaj potencoj: la faŝistaj landoj helpis la ribelintoj, kaj la demokratiaj landoj rigardis aliflanken kaj ne helpis la hispanan popolon. Krome estis ankaŭ la misaj ecoj de tiu popolo mem; inter la fortoj de maldekstraro: socialistoj, komunistoj, anarkiistoj, trockistoj… estis mal-akordo kaj konfliktoj kiuj foje kulminis per perforta interfrontiĝo kiu kontribuis fa-vori la faŝismajn fortojn. Tiu temo estas sufiĉe interesa kaj studinda, sed kiel dirite, nun ni atentas pri alia afero.



*Juan Negrín López*



*Segismundo Casado*



*Julián Besteiro*



**Triumf-paradon de la venkintoj de la civil-milito**

Proksimume 30 elcento de la teritorio de centra kaj sudorienta Hispanio restis ankoraŭ kontrolita de la Respubliko. La registaro daŭre konservadis la esperon de rezisto ĝis la evidente proksima milito en Eŭropo. Tamen, en Madrido, la 5-an de marto 1939, la komandanto de la Respublikana Armeo de la Centro, la kolonelo ***Segismundo Casado***, ribelis kontraŭ la Registaro. Per siaj memuaroj, plenaj je malveraĵoj, li asertis, ke li faris tion por ĉesigi sensencan buĉadon, sed, kiel malkaŝis liaj proksimaj ligoj al la frankisma kvina kolumno, lia ĉefa celo estis certigi sian propran estontecon. Li profitis la rankoron de la partianoj de ***Largo Caballero*** kaj la anarkiistoj kontraŭ la tiama Registar-prezidento, ***Juan Negrín***, kaj la komunistoj. Li ankaŭ konvinkis multajn armeoficirojn ke li povus certigi iliajn pensiojn en la estonta frankisma ŝtato. Lia ago ricevis ampleksan subtenon ĉar li ekspluatis ĝeneraligitan malsaton kaj malmoraliĝon. La puĉo atingis veraĵon de legitimeco danke al la partopreno en ĝi de la eminenta socialisma jurprofesoro ***Julián Besteiro***. Ĉi tiu, en kontakto kun la kvina kolumno, naive kredis ke la post-milita subpremo estus minimuma. La puĉo de ***Casado*** startis sestagan civitan militon ene de la Respublikana zono kaj senutiligis la sangoverŝadon kaj oferojn de la antaŭaj tri jaroj. ***Casado*** venkis la por-komunismajn fortojn. Liaj promesoj de bonvolemo de la frankistoj neniiĝis kaj lia Nacia Defenda Konsilio ne sukcesis organizi la evakuadon de la dekmiloj da homoj minacataj de la ribelantoj, kaŭzante humanitaran katastrofon de grandegaj proporcioj.

La 27-an de marto, la fortoj de ***Franco*** eniris Madridon meze de timiga silento. Baldaŭ poste komencis ankaŭ tie la reprezalioj de la venkintoj. La hispana maldekstraro estis milite venkita kaj ĝiaj plej valoraj figuroj, malpliigitaj post trijara milito. Duonmiliono da respublikanoj ekziliĝis kaj tiuj, kiuj ne estis sufiĉe bonŝancaj atingi Latin-Amerikon, baldaŭ estis englutitaj en la ventego de la Dua Mondmilito. Tiuj, kiuj restis en Hispanio, tuj komprenis, ke la politiko de ***Franco*** rilate al la venkitoj estos same brutala kiel la elpurigoj de la teritorio kaptita dum la milito.

Sed ĉi tio apartenas al la postmilita epoko, la frua frankismo, kiu meritas apartan pritrakton, kiun ni faros per sekva ĉapitro, kaj kiu estis, ankaŭ ĝi, plena je koruptado, kiel ni vidos.




Kelkfoje por la ĝis nun priskribitaj etapoj de la historio de nia lando ni notis ke kvankam la temo pri kiu ni atentas estas tiu de la koruptado, tamen ni ne povis flankenlasi la pritemadon de la politikaj eventoj de la epokoj en kiuj disvolviĝis la koruptaj kazoj ĉar foje, ofte en iuj periodoj, ambaŭ aferoj estis koneksaj, interligitaj. Se tio estis vero por tiuj pritemitaj epokoj, multe pli ĝustas por la periodo kies priskribon ni entreprenas. La frankisma epoko kiu sekvis al la civitana milito estis esence korupta: ĉiu politika faro aŭ politika evento havas rilaton kun koruptado, kaj ĉiu koruptado de tiu epoko eblis ĝuste dank' al la politika reĝimo estrita de tiu malbeninda homo.

Nia ĝisnuna raportado prezentis, do, la defiladon de multaj koruptaj personoj, nu, la defilado plu daŭros senhalte. Sed, esplorante la historion por eltiri informon pri la koruptado, neplanite, senintence, ni renkontiĝis kun alia, alitipa, defilado. Temis pri pitoreskaj personoj, ni nomis ilin “roluloj de opereto”, “opereto-aktoroj”. Laŭ nia percepto, tiu defilo estus komencinta per la reĝo Karolo la 4-a, ties edzino Maria Ludovikino de Parmo, kaj ilia favorato ***Manuel Godoy***. Kaj de tiam la listo, la defilo, daŭris senĉese. Pri tiuj de la 19-a jarcento ni jam temis ĝiamomente. Kaj la defilado daŭris ankaŭ dum la 20-a jarcento; al tiu kategorio apertenis uloj kiaj ***Miguel Primo de Rivera***, ***Alejandro Lerroux***… kies korupto kaj pitoreska agado ni jam priskribis per la antaŭa ĉapitro.

Ĉi tiu ĉapitro pri la frua frankismo, kies amplekson ni fiksas inter la jaroj 1939 kaj 1960, kaj la ceteraj ĉapitroj, dediĉe al la koruptado ĝis la nuntempo, prezentos longan defiladon de koruptuloj kiuj samtempe estis/as vere operet-roluloj. Tamen, iu korupta kaj koruptiga homo, ***Juan March***, pri kiu ni jam sufiĉe temis, kaj daŭre devos temi ĉi-ĉapitre, ne estas enkalkulita de ni en la defilon de la pitoreskaj operet-aktoroj. Se enkadrigi lin en ia stilo, ni taksus lin ĉefrolulo de verko el tiu stilo nomata “nigra novelo”. Per tio jam dirita pri li, lia agado dum la regado de ***Primo de Rivera***, la Respubliko kaj la Civil-milito, jam niaj legantoj eble estus komprenintaj ke temas pri tiu tipo je personoj kiuj kreas kaj manipulas la ulojn tiajn kia ***Francisco Franco***. Ni plu vidos lin tiri la fadenojn de la Historio.

…





…

**Post tiuj de la 19-a jarcento, ankaŭ en la 20-a kaj 21-a estis/as en Hispanio riĉa rikolto da opereto-roluloj: en la politiko, en la financoj, en la Eklezio…**

Reprenante la fadenon de nia raportado, ni notu ke finiĝinte la batalado, la milito kontraŭ la Respubliko daŭris en la militaj tribunaloj, en malliberejoj kaj koncentrejoj, en laboristaj batalionoj kaj, kun la helpo de la **GESTAPO**, en la persekutado kaj posta ekzekuto de famaj ekzilitoj ilustritaj tiaj kia ***Lluís Companys***. La tujaj taskoj estis la klasifiko kaj puno de tiuj kaptitoj en la havenoj kaj la elpurigo de la laste konkeritaj provincoj. Centmiloj da kaptitoj estis amase enprizonigitaj en malhigienajn tendarojn kaj provizorajn malliberejojn kie egnombro da ili mortis pro subnutrado, malsano, torturo kaj batado. La malliberigitaj virinoj ankaŭ sufer-spertis teruran seksmisuzon kaj la ŝtelon de siaj infanoj.

Kun cent-miloj da laboristoj en ekzilo aŭ en malliberejoj aŭ koncentrejoj, Hispanio alfrontis gravan mankon je laborforto. La respondo de la reĝimo estis senkompata ekspluatado de la kaptitoj. Tio faciligis amasigon de kapitalo kio ebligis la ekonomian prosperon de la 1960-aj jaroj. La kaptitoj estis luitaj al privataj firmaoj. La uzo de punlaboro –fakte, sklava laboro– de kolonoj da kaptitoj en minado, metado de la fervojo kaj en la rekonstruo de la tiel nomataj "detruitaj regionoj" permesis al la firmaoj de konstruado, fervojaj kompanioj, min-firmaoj kaj entreprenoj de metalurgio kaj ŝipkonstruo amasigi egajn riĉaĵojn. Multaj viktimoj de reprezalioj mortis laborante en ekstreme danĝeraj kondiĉoj en karbo- kaj hidrargaj minejoj. La detruo de la sindikatoj permesis ke la salajroj de la laboristoj estu mizeraj, kio siavice igis pli facile por la bankaj, industriaj kaj terposedantaj klasoj registri sensacian profitpliiĝon. Ekstrema ekzemplo de la korupta ekspluatado de respublikanaj kaptitoj estis la persona kaprico de ***Franco***: la giganta baziliko kaj impona kruco de la t. n. ***Valle de los Caídos***, maŭzolea monumento al lia venko, kiu evidentigis lian megalomanan koncepton pri lia loko en la historio. Dudek mil kaptitoj estis dediĉitaj al ĝia konstruado kun nekonsiderinda salajro. Multaj mortis pro subnutrado.

La subprema jura sistemo estis bazita sur la administra maŝinaro kaj pseŭd-leĝa kadro kreita dum la milito. Tiuj kiuj kontraŭbatalis la puĉon estis konsideritaj


kulpaj je armea ribelo, pro kiu ili devis esti submetitaj al militkortumoj kaj kondamnitaj al morto. Tiu fikcio estis la bazo por la miloj da procesoj kiuj okazis post la milito. Ofte oni rifuzis al la akuzitoj la ŝancon defendi sin. La militistaro elektis la juĝiston, la prokuroron, kaj la defendan advokaton, kiu ĉiam estis malĉefa oficiro de la juĝisto kaj la prokuroro. La proces-proceduro kutime limiĝis al legado de la akuzo, sen prezentado de pruvoj. La akuzitoj ne rajtis voki atestantojn aŭ prezenti ajnan pruvon. Kaj ne eblis apelacii.

La subpremado ne estis limigita al teroro; la frankisma diktaturo ankaŭ estis ŝtel-reĝimo. Centmiloj da homoj perdis sian vivrimedon kiam publikaj laborpostenoj iĝis la monopolo de ofte nekvalifikitaj subtenantoj de la reĝimo. Amasa forkapto de posedaĵoj okazis per la jura aberacio de la t. n. Leĝo de Politikaj Respondecoj, kiu garantiis la punon de ajna respublikano kiu kontraŭstaris la militan ribelon aŭ kiu faris la “krimon” de “grava pasiveco” ne apogante ĝin. La sankcioj konsistis el troaj monpunoj aŭ la konfisko de aktivaĵoj kiel firmaoj kaj domoj kaj ankaŭ mebloj, vazaĵoj kaj manĝilaĵoj, bankkontoj kaj akcioj. La leĝo estis ilo de sistema ĉantaĝo kiu ne nur punis la venkitojn, sed ankaŭ igis ilin pagi la koston de la milito kiun oni faris kontraŭ ili. Ĝi estis aplikita retroaktive kaj agadoj kiuj estis perfekte laŭleĝaj tiutempe estis krimigitaj, kiel aliĝo al politika partio aŭ rolado en registara pozicio. La monpunoj truditaj al la mortaj aŭ ekzilitaj respublikanoj estis kolektitaj per la konfisko de la havaĵoj de iliaj familioj.

Dum la jaroj de 2-a Mondmilito, estis eksportitaj urĝe bezonataj agrikulturaj produktoj por pagi la ŝuldon de ***Franco*** al ***Hitler***. ***Franco***, kiu konsideris sin genia ekonomikisto, haste adoptis faŝism-stilajn aŭtarkiajn politikojn, sen konsideri, ke Hispanio ne havis la necesan teĥnologian kaj industrian bazon. Iu amiko de la diktatoro, la ministro pri industrio kaj komerco ***Juan Antonio Suanzes***, estis anstataŭigita de la eĉ pli nekompetenta ***Luis Alarcón de la Lastra***, aristokrata terposedanto. La nova estro de la fisko, ***José Larraz***, sufiĉe kompetenta ministro, estis konsternita kiam la ŝtat-estro klarigis sian alvokiĝon al aŭtarkio kaj sian konvinkon ke Hispanio baldaŭ estos granda milita potenco. ***Franco*** diris al la ministro ke li rifuzis peti kreditojn eksterlande kaj ke por pagi la ĝeneralan modernigon de la armeo sufiĉas presi monon. ***Larraz*** ege surpriziĝis pro la nescio de la ŝtatestro, kaj plue maltrankviligis lin la senutilaj registaraj kunvenoj en kiuj ***Franco*** aranĝis siajn planojn kaj la nura konsiderado estis en tiaj aferoj kia la prezo de la tol-ŝuoj. La provoj de ***Larraz*** trudi severan kaj realisman ekonomian politikon koliziis kun la deliraj fantazioj de ***Franco***. Ekzemple, kiam ĉi tiu anoncis la konstruadon de preskaŭ ducent batal-ŝipoj, inkluzive de kvar kiras-ŝipoj, kvindek kvar destrojeroj kaj kvindek submar-ŝipoj. Li insistis pri tio ke presi monon por publikaj konstrulaboroj ne kaŭzus inflacion. Inter aliaj projektoj de ***Franco*** neniam efektivigitaj estis iu tunelo sub la Ĝibraltara Markolo kaj kanalon de la Biskaja Golfo ĝis Mediteranea Maro. La Estro estis konvinkita ke li estis ĉioscia pri ekonomiaj aferoj.

La erara politiko de ***Franco*** iĝis pli grava pro lia naiva kredo pri miraklaj solvoj. Oni konvinkis lin, ke li povus iĝi granda internacia figuro dank' al la senlimaj


Juan Antonio Suances


Luis Alarcón de la Lastra


José Larraz López


Albert von Filek

rezervoj de oro, kiujn havigus al li iu hindua alkemiisto, nomata ***Savarpoldi Hammaralt***. Por faciligi lian laboron, ***Franco*** metis je la dispono de tiu ulo la sciencajn laboratoriojn de la Universitato de Salamanko. Same mirinde estis, ke li kredis je la ekzisto de fikcia sinteza benzino ofertita al li de iu aŭstra ŝtelisto kaj fraŭdisto nomata ***Albert von Filek***. Ŝajnas ke la familio de la diktatoro esperis egan profiton el la projekto. Fine, post kiam la registaro investis konsiderindan sumon en ĝi, kiam enketoj estis aranĝitaj, la trompo estis malkovrita kaj ***Filek*** estis enprizonigita.

La malabundeco igis necesa la porciumadon de la necesaj aĵoj, kio kaŭzis la aperon de la nigra merkato kaj sensacie granda korupto. La sufero de la hispana popolo dum la malsatjaroj de la 1940-aj jaroj, ĉefe kiel rezulto de la ekonomiaj deliroj de ***Franco***, estis enorma. La venkitoj vivis ĉe la rando de malsato; male, tiuj kiuj financis la frankisman militon estis rekompencitaj. Al la plej elstaraj frankistoj oni aljuĝis kontraktojn por liverado de varoj aŭ servoj al la ministerioj aŭ publikaj konstru-laboraĵoj. Aliaj profitis el la donado de publikaj oficoj, ofte al nekleraj kaj nekompetentaj homoj kiuj estis nekapablaj anstataŭigi siajn mortintajn, ekzilitajn, malliberigitajn aŭ malsatantajn antaŭulojn. La plej granda instituciigita korupto estis la uzo de la ŝtataparato por privata gajno; ĝiaj ĉefaj profitantoj estis tiuj kun kontaktoj en la ministerioj kaj tiuj kiuj rekte subaĉetis la ministrojn. La personoj kiuj kontroladis la aliron al ***Franco*** estis lia frato ***Nicolás***, lia fratino ***Pilar*** kaj lia bofrato, ***Felipe Polo***, kiuj provizadis prezentleterojn al la ministroj kontraŭ mono. Tiuj, kiuj havis permeson por importado de malabundaj varoj, atingadis kolosajn profitojn, kiel, kompreneble, ***Juan March***. ***Nicolás Franco***, krom la grandioza ofico de la Ambasado de Lisbono, kie li pagane amuziĝis, estis prezidanto, vicprezidanto aŭ direktoro de sennombraj kompanioj kreitaj sub la protekto de la reĝimo.

La korupto estis ĉie. La spionservo de la falango informis ***Franco***-n ke la civila guberniestro de Madrido, ***Miguel Primo de Rivera***, uzis la monon de kvesto farita favore al la Blua Divizio por pagi sian luksan vivmanieron. Kiam la utopia falangista poeto ***Dionisio Ridruejo*** estis akceptita de ***Franco*** post la reveno el la Blua Divizio fine de aprilo de 1942, repatriita pro pulma malsano, li raportis ke, inter liaj kunuloj, estis ega kritiko pro la korupto en Hispanio,

***Franco*** respondis al li senemocie ke, antaŭe, la venkintoj estis rekompencitaj per noblaj titoloj kaj teroj, sed ĉar tio estas malfacila nuntempe, li tenis siajn sekvantojn feliĉaj fermante la okulojn antaŭ ties koruptado.
Fakte, ***Franco*** fermis la okulojn kaj al la korupto de siaj partianoj kaj al la sufero de la malriĉuloj kiel rezulto de la aŭtarkio. La popola subnutrado kaŭzis la revigliĝon de malsanoj kiuj laŭsupoze estis malaperintaj de antaŭlonge. Kaj britaj kaj germanaj diplomatoj kaj la propra sekureca servo de ***Franco*** komentis kun teruro la spektaklon de malsatantaj homoj fosantaj tra rubejoj kaj fetigaj amasoj da rubo. La Ministro pri Milito, generalo ***José Varela***, ricevis leterojn de altaj oficistoj plendantaj pri la skandala nesufiĉo de la porcioj por la soldatoj. Por la senhavuloj, la nigra merkato, la tiel nomata "estraperlo", estis superviva strategio. Sed kvankam ne intence konceptita kiel tia, la kontraŭleĝa komerco estis unu plia instrumento de subpremo. La koruptaj magistratoj faris malmulton por bremsi tiujn, kiuj plej profitis el ĝi, sed dume tre severe punis tiujn, kiuj okupiĝis pri etaj interŝanĝoj. Por la riĉuloj, la nigra merkato estis garantio de deca manĝaĵo kaj lukso, kaj de egaj profitoj por multaj agrikulturaj produktantoj.
La nigra merkato faciligis la aperon de tute nova klaso da koruptaj komercistoj kiuj, dank'al sia proksimeco al la reĝimo, povis amasigi riĉaĵojn. Unu el la plej bedaŭrinde famaj estis ***Julio Muñoz Ramonet***. Pro la proksimaj ligoj de lia familio al iu generalo, ***Muñoz Ramonet*** kaj lia frato ricevis kvotojn por la distribuado de kotono. Per ilia spekulado kun tiuj permesiloj ili ruinigi dudek teksaĵn firmaojn kiujn ili poste aĉetis ĉe rabatprezoj kaj relanĉis. Ili havis ŝtatoficistojn kaj juĝistojn en sia etato kaj konstruis komercan imperion, kiu inkludis la Hotelon ***Ritz*** en Barcelono, same kiel grandmagazenajn ĉenojn kaj asekur-entreprenojn en Hispanio kaj bankojn en Svisio kaj Dominika Respubliko.
***Franco*** mem profitis de sia politika povo por amasigi, inter 1937 kaj 1940, personan riĉaĵon de 34 milionoj da pesetoj (proksimume 390 milionoj da eŭroj en la nuntempo). ***José María del Palacio y Abárzuza***, grafo de ***Almenas***, testamentis al ***Franco***, kiel danko pro "lia grandioza Rekonkero de Hispanio", la bienon de ***Canto del Pico***, en la ***Sierra de Guadarrama***, proksime de ***Torrelodones***, kun areo de 820.000 kvadrataj metroj, kie ekzistas domego nomita la Domo

**Familio de *Franco***




***Franco*, lia edzino *Carmen Polo* kaj la filino de ambaŭ**




***Nicolás Franco Bahamonde***



***Pilar Franco Bahamonde***



***Ramón Serrano Súñer***




***Dionisio Ridruejo***



***Julio Muñoz Ramonet***

**Posedaĵoj “iamaniere” akiritaj de *Franco***



**Domo de la vento en la bieno *Canto del Pico***



**Bieno *Pazo de Meirás*, Palaca domo**



**Bieno *Valdefuentes***

de la Vento kiu enhavis multajn artaĵojn de granda valoro. La grafo de ***Almenas*** mortis en 1940. La bieno estis vendita de la familio ***Franco*** en 1988 kontraŭ 320 milionoj da pesetoj.

***Franco*** ekposedis ankaŭ “donacon” kiu estis rezulto de miksaĵo de korupto kaj servila flatado. ***Julio Muñoz Aguilar***, provinca guberniestro de Korunjo, kaj ***Pedro Barrié de la Maza***, loka entreprenisto, organizis "popolan" kvestadon, en teorio por ke la homoj de la provinco povu esprimi sian dankemon al ***Franco*** pro tio ke “li savis ilin”. La enspezo estis destinita al la aĉeto kaj ampleksa renovigo de grandioza grandbieno, la ***Pazo de Meirás***, kiu apartenis al la galica romanverkistino ***Emilia Pardo Bazán***. La domo estis sur tereno de 110.000 kvadrataj metroj. La reformoj estis kontrolitaj de ***Carmen Polo***, kiu, dum la procezo, ricevis multajn donacojn. Kelkaj el la kontribuoj al la kvesto estis libervolaj, kvankam multaj el la donacoj estis akiritaj per devigo kaj, en la kazo de publikaj dungitoj, la kvanto de iliaj “donacoj” estis subtrahita rekte de ilia salajro; aliaj kontribuis pro timo esti akuzitaj je mallojaleco. ***Muñoz Aguilar*** estis rekompencita per la lukraj postenoj de estro de la Civila Domo de la Generalego kaj administranto de la Nacia Heredaĵo de la aktivaĵoj kaj artaj trezoroj de la reĝa familio. ***Barrié de la Maza*** poste ricevis nobelan titolon de ***Franco***. Iu propagandisto de ***Franco*** verkis artikolon laŭdante la aŭsterecon de la estro kaj deklarante ke lia nura riĉaĵo estis lia armea salajro de 1.500 pesetoj monate. La ***Pazo de Meirás***, kiu ricevis helpon de la Diputacio kaj la Ŝtato, fariĝis lukra agrokultura bieno kaj somera loĝejo por la familio ***Franco***, kun la preteksto ke ĝi estas la loĝejo de la ŝtat-estro, kvankam poste oni sciis ke ***Franco*** fraŭde metis la bienon sianome.

Grava fonto de la enspezoj de ***Franco*** estis lia alproprigo de kvestoj teorie organizitaj por kovri la koston de la milit-investo. Ĝenerale, la kontribuo al tiuj iniciatoj estis deviga. La enspezo estis normale konservita sekreta, kio faciligis la transdonon de la mono al unu el la bankkontoj de ***Franco*** sub la nomo de “Nacia Kvesto ĉe la Dispono de Generalo ***Don Francisco Franco Bahamonde***”. Ĉi tiu kontonomo poste estis ŝanĝita al “Donacoj je la dispono de la Ŝtatestro”. Per parto de tiu mono, ***Franco*** aĉetis grandan bienon nomatan

***Valdefuentes***, apud ***Móstoles***, rande de Madrido, de dek milionoj da kvadrataj metroj, kontraŭ du milionoj kaj duono da pesetoj. En 1953, ***Franco*** jam estis investinta preskaŭ ok milionojn da pesetoj en reformoj, maŝinaro kaj konstruaĵoj, kiuj igis la bienon provizi al li egan profiton. La ***Franco***-familio tre poste vendis trionon el la posedaĵo kontraŭ dek milionoj da eŭroj.

Tiuj bienoj estas nur la pinto de kolosa glacimonto. Estis donacoj de multaj specoj, de oraj medaljonoj ĝis luksaj aŭtoj, inkluzive de du ***Hispano Suiza***, ***Chrysler***, ***Mercedes***, ***Cadillac***, ***Packard*** kaj Lincoln. ***Franco*** ricevis de ***Hitler*** kvar-rad-movilan veturilon de ***Daimler-Benz*** taksitan, laŭ nunaj prezoj, je pli ol kvarcent-mil eŭroj. En 1940, la Telefon-Kompanio komencis fari monatajn pagojn de dek mil pesetoj al la Generalego, ekvivalenta al pli ol cent mil nuntempaj eŭroj. ***Franco*** ankaŭ akiris pli ol sep milionojn kaj duonon da pesetoj el la vendo de kafo en la nigra merkato; la sumo laŭ la nuna valoro estas malfacile kalkulebla, sed ĝi ne estus malpli ol kvarcent milionoj da eŭroj. La diversaj posedaĵoj daŭre plivaloriĝis kaj generis konsiderindan profiton post 1945. Krome, la amasigita kapitalo de la diktatoro estis investita en akcioj.

La riĉiĝo de ***Franco*** kaj liaj partianoj estis certigita; ilia espero akiri iom da avantaĝo kuŝis en la manoj de la faŝismaj potencoj de la t. n. Akso. ***Franco*** pretis eniri en la mond-militon flanke de la Akso en la somero de 1940 kaj en pluraj okazoj poste. Tamen, liaj ambicioj estis bremsitaj de du konsideroj: lia propra supervivo kaj la limigita ekonomia kaj armea kapablo de Hispanio por milito. Sed Franco devis pagi la ŝuldon, kiun li kontraktis kun Germanio dum la Civil-milito, eksportante hispanajn nutraĵojn kaj mineralojn al la **Reich**. La malfortik-eco de Hispanio por militi estis reliefigita de ***Ramón Serrano Suñer***, la bofrato de ***Franco*** kaj ministro pri Internaj Aferoj, en Berlino meze de septembro 1940. ***Ribbentrop*** informis al li ke, page de la germanaj provizoj de armea materialo dum la civil-milito, Hispanio devis liveri al Germanio krud- kaj aliajn materialojn. Do, en 1941, ekzemple, la tuta hispana produktado de oliv-oleo estis ekspedita al Germanio. La eksportado de valoraj krudaĵoj al Germanio, kvankam malpliiĝis printempe de 1944, daŭris ĝis 1945. Dume, la pliintensiĝo de la malabundo en Hispanio devigis ***Franco***-n alproksimiĝi al la britoj kaj usonanoj. Li sendis tele-gramon al ***Roosevelt*** dirante ke Hispanio restus neŭtrala se Usono sendus tritikon. La diktatoro daŭre esprimis sian fervoron al la Akso, sed la ekonomia krizo en Hispanio draste plimalboniĝis. Katastrofa rikolto igis ke Hispanio bezonis pli da greno; pro la malsato, kiu estis suferante granda parto el la lando, ***Franco*** ne havis alian elekton ol provi aĉeti manĝaĵojn el Usono kaj tio nepre signifis prokrasti ajnan militdeklaron. Tio kion li povis fari favore al ***Hitler*** estis nur permesi al germanaj petrolŝipoj ankri en la norda marbordo por provizi je benzino la **Kriegs**marine-destrojerojn. La germanoj insistis ke Hispanio pagu al Germanio la ŝuldojn de la Civita milito, kiuj estis fiksitaj je 372 milionoj da germanaj markoj. Dume, en la frankistaj vicoj estis kontraŭdiroj inter porgermanaj


Juan Vigón Suero-Díaz


Alan Hillgarth


Antonio Aranda Mata


José Enrique Varela

kaj poraliancanaj sektoroj. Por ruinigi la german-favoran influon de la ministro ***Serrano Suñer***, la 7-an de aprilo 1941, la Britio donis al Hispanio kreditojn kun valoro de du milionoj kaj duono da sterlingaj pundoj. La premo sur ***Franco*** pliiĝis kiam fine de aprilo ekis grava interna lukto post kiam la generalo ***Juan Vigón*** diris al li ke, se li ne ĉesigus la potencon de ***Serrano Suñer***, la armeaj ministroj demisius. La rezulto de la krizo estis unu el la unuaj fruktoj de brita plano, ellaborita dek monatojn pli frue, por subaĉeti gravajn elementojn de la hispana ĉef-komando. Kiel estis neevitebla, kiam temis pri subaĉetaĵoj, ***Juan March*** ne estis malproksime de la intrigo. Kun sia senerara kapablo aliĝi al la venka teamo, ***March*** kredis ke Britio poste gajnos la militon kaj decidis doni sian financan subtenon al la brita regantaro. La cerbo de la plano estis kapitano ***Alan Hillgarth***, maramea ataŝeo ĉe la brita ambasado en Madrido de 1939 ĝis 1943, kaj efika estro de brita spionservo en Hispanio. ***Hillgarth*** lernis multon pri ***Juan March*** dum sia tempo kiel konsulo en Majorko kaj konsideris lin "integra kanajlo".

La rilato de ***Hillgarth*** kun ***March*** ebligis munti la subaĉetoperacion por plifortigi la opozicion de gravaj generaloj al ***Serrano Suñer*** kaj al la eniro de Hispanio en la militon. Pere de ***Antonio Aranda***, ili fine disdonis dek-kvar milionojn da dolaroj inter la generaloj ***José Varela***, ***Luis Orgaz***, ***Alfredo Kindelán*** kaj ***Carlos Asensio***, kolonelo ***Valentín Galarza*** kaj ***Nicolás***, la frato de ***Franco***. La ideo korupti hispanajn oficialulojn pli verŝajne venis al ***March***, kiu konis la povon de sub-aĉeto pli bone ol ***Hillgarth***. La financaj garantioj de ***March*** al la armeaj konspirantoj printempe de 1936 montris al li ke ili pretas preni lian monon. La britoj entuziasme akceptis la ideon disdoni tian kolosan sumon, taksante la ricevantojn kiel "grupo da koruptaj generaloj", "aro da mizeruloj". La ricevantoj pensis ke la mono venis, ne de la brita registaro, sed de ***March***: ***Nicolás Franco*** ricevis du milionojn da dolaroj, ***Aranda*** pliajn du, same kiel ***Varela***; ***Galarza***, unu milionon, kaj ***Kindelán***, duon-milionon. Timante ke la eksigo de ***Serrano Suñer*** igus lin ostaĝo de la monarkiismaj generaloj, ***Franco*** nomumis du aliajn falangistajn ministrojn: ***Miguel Primo de Rivera***, kiel ministro pri Agrikulturo, kaj ***José Luis de Arrese***, Ministro Sekretario de la Falango.

***José Antonio Girón***, ankaŭ li por-nazia falangisto, jam estis ministro pri Laboro. ***Franco*** certigis la lojalecon de ĉiuj tri kun promesoj de plirangigo. La krizo de majo 1941 estis la komenco de la fino por ***Serrano Suñer***. Krome, dum tiu epizodo ***Franco*** lernis kiom malmultekosta estis aĉeti la Falangon. Estas indicoj, kvankam ne certeco, ke en tiu epoko ***Serrano Suñer***, kiu estis bofrato de ***Franco***, estis konspirante kun la germanoj por forigi lin. La generaloj estis konvinkitaj ke la politiko de ***Suñer*** estis endanĝerigante la neŭtralecon de Hispanio kaj ke li devus esti eliminata. Fakte, tiam ***Serrano*** estis organizante la sendon de kvindek-mil falangistaj volontuloj por batali en Rusio flanke de la germanoj, la t. n. «Blua Divizio».



***Luis Orgaz Yoldi***



***Alfredo Kindelán***



**Carlos Asensio Cabanillas**



***Valentín Galarza***

La internaj kontraŭdiroj de la reĝimo alvenis al kriza pinto meze de aŭgusto de 1942 kiam iu falangista atenco kontraŭ la generalo ***Varela*** vundis 732 personojn. La Ministroj pri Milito kaj Internaj Aferoj, ***Varela*** kaj ***Galarza***, profitis la okazon por provi bremsi la potencon de la Falango. ***Franco*** reagis al ilia plano ĉesigante ilin, kio estis malsukceso por la brita subaĉet-plano, en kiu ambaŭ ministroj estis ludante esencan rolon. Tamen, laŭ sugesto de la sekretario, ***Luis Carrero Blanco***, ankaŭ ***Serrano Suñer*** estis ĉesigita kiel ministro pri Eksteraj Aferoj kaj estis anstataŭita de la generalo ***Francisco Jordana***. Evidentas ke ***Franco*** sciis lerte navigi inter la rifoj konstituitaj de la mond-militantaj potencoj kaj ties hispanaj klientoj.

En januaro 1943, la Ministerio pri Eksteraj Aferoj ordonis al la hispanaj diplomatoj ne engaĝiĝi al savado de la judoj kaj malhelpi ke la sefardidoj estu legitimitaj kiel hispanoj. Tamen, ankaŭ oni ordonis al la diplomatoj preni noton de la havaĵoj de tiuj sefardidaj judoj, "kiuj, iel, estas parto de la nacia heredaĵo". Kelkajn semajnojn poste, la germana ambasado en Madrido informis la hispanan registaron ke la Tria **Reich** tuj suspendos la specialan traktadon donitan al la hispanaj judoj, kiuj ekde la fino de marto devos forlasi la germanajn okupatajn teritoriojn aŭ atendi la saman traktadon kiel la nehispanaj judoj. Tio prezentis al la registaro de ***Franco*** gravan dilemon: se Hispanio konsentus ke la sefardidoj submetiĝu al la germana juro, ĝi riskus esti akuzita, ĉefe en Usono, pri kunkulpeco en la murdo. Tio montras, ke la hispanaj aŭtoritatoj estis perfekte konsciaj pri la


Miguel Primo de Rivera


José Luis Arrese


José Antonio Girón


Francisco Gómez-Jordana

naziaj abomenaĵoj kontraŭ la judoj kaj ke ili ne trovis ilin riproĉindaj; male, oni konsideris ke "la solvo alporti ilin al Hispanio, kie ilia raso, ilia mono, ilia Anglofilio kaj ilia framasonismo igus ilin agentoj de ĉiaj intrigoj, ankaŭ ne estas akceptebla". La tuta procezo estis kondiĉigita de longaj burokratiaj prokrastoj. Nur 25 homoj rajtus eniri samtempe kaj nur post ilia foriro estus akceptitaj sekvaj 25. Dum ili estus en Hispanio, la judoj devis esti prizorgataj fare de internaciaj rifuĝintagentejoj. ***Franco*** maltrankviliĝis pri sia bildo en la internacia gazetaro kaj tre kontraŭvole akceptis la rekomendon de sia frato ***Nicolás*** kaj ***Jordana***, ke la rilatoj kun la Monda Juda Kongreso estu plibonigitaj. Sed tiu ĉi frankisma politiko ne havis humanitaran dimension. Li akceptis la konsilojn de ***Jordana*** ĉar li timis ke la malvenko de la Tria **Reich** igos la mondon fali en la manojn de la jud-framason-bolŝevisma konspiro. Kaj se estis judoj savitaj, tio ne estis pro ***Franco***, sed pro la kuraĝa individua agado de la hispanaj konsuloj en Ateno, ***Sebastián Romero Radigales***, kaj en Budapeŝto, ***Ángel Sanz Briz***.

Komence de majo de 1943, dum turneo de Andaluzio, ***Franco*** faris paroladojn pri sia neŭtraleco kaj lia deziro je paco. La invado de Sicilio far la aliancanoj kaj la posta falo de ***Mussolini*** en julio konvinkis la hispanajn altrangajn generalojn pri la urĝa bezono repripensi la estontecon. Ok el ili, inkluzive de la ĉefaj ricevantoj de britaj subaĉetaĵoj, ***Kindelán***, ***Varela*** kaj ***Orgaz***, prezentis timeman leteron al Franco la 15-an de septembro petante al li pripensi la eblecon de monarĥia restarigo. ***Gil Robles*** pensis ke tiu timideco estis pro ilia malemo perdi la avantaĝojn de la "Frankisma korupt-afero". ***Franco***, kiu ankaŭ estis maltrankvila pri la situacio kaj estis konscia pri la intrigoj de la monarkistoj, anoncis la retiron de la Blua Divizio, kvankam permesante al la volontuloj resti en la germanaj unuoj.


La korupto de la ministroj estis konata, precipe en la kazoj de ***Girón*** kaj ***Demetrio Carceller***, ministro pri Industrio kaj Komerco. Oni pensas ke ***Carceller*** kreis firmaon al kiu li donis, kiel ministro, import-licencojn por du mil veturiloj. Laŭ kurzo de dek unu pesetoj por dolaro, lia firmao aĉetis kamionojn en Usono kontraŭ kvin mil dolaroj, tio estas kvindek kvin mil pesetoj, kiuj poste estis venditaj

en Hispanujo kontraŭ unu miliono da pesetoj. Eĉ ***Juan March*** plendis la 10-an de januaro 1944 al ***Gil Robles*** pri "novaj kaj teruraj kazoj de administra malmoraleco, perfekte pruvitaj". Du monatojn poste, ***March*** komentis al ***Gil Robles*** ke "la administra malmoraleco tiome pliiĝas ke la anglosaksoj informas siajn registarojn ke certaj ministroj forprenas la nacian havaĵon". Komence de aprilo 1944, ***March*** rakontis al la brita gazetara ataŝeo ***Tom Burns*** ke la malamikeco de ***Girón*** kaj ***Carceller*** al li instigis al ***Galarza*** konfiski la pasporton de ***March*** kaj meti lin sub hejm-areston. ***Galarza*** faris averton al ***March*** ĝustatempe por ke li forlasu Hispanion. Kaj la magnato skribis al ***Franco*** neante la akuzojn kontraŭ li kaj proponante ilin refuti, sed nur antaŭ la Konsilio de Ministroj, en kiu li pruvus la korupton de tri ministroj kaj tiel do la kabineto devus decidi kiu meritas iri en mal-liberejon, ĉu li aŭ la publikaj funkciuloj. La letero restis nerespondita, sed ***March*** restis for de policesploro kaj li konservis sian pasporton. La majorkano detale rakontis al ***Burns*** pri la grando de la korupto en la registaro de ***Franco***. Ĉi tio levas la demandon kiel eblas ke ***Franco*** ne scius pri la brita subaĉeta operacio. La ricevitaj monsumoj estis kolosaj; lia frato ***Nicolás*** estis implikita kaj, ĉiukaze, la diktatoro havis ĉiujn siajn generalojn sub kontrolo. Pri ***Aranda***, ekzemple, ***Franco*** sciis ke li estis en kontakto kaj kun la britoj kaj la germanoj kaj kun la opozicio al la reĝimo. Ĉiukaze, la monarĥia konspiro, en kiu ***Aranda*** kaj ***Gil Robles*** partoprenis en Lisbono, ricevis kontribuon de ***Juan March*** de unu miliono da svisaj frankoj.

***Orgaz*** apartenis al la monarĥiista "opozicio", sed alie li estis certe nefidinda ĉar, ekde la komenco de septembro 1943, ***Franco*** havis sur sia skribotablo raporton pri lia parto-preno en korupt-aferoj en Nordafriko. Jam en la jaro 1944, la ŝtatestro ricevis la novaĵon, ke ***Orgaz*** plendis pri la zorgo de ***Varela*** por siaj havaĵoj kaj investoj. Kompren-eble, la posedaĵoj de ***Varela*** ne estis limigitaj al tiuj de lia edzino. Tiel do, ***Franco*** sendube konsciis pri la amasiĝo de riĉaĵo far siaj generaloj; sendube li sciis, ke kelkaj el ili prenis sub-aĉetaĵojn el la germanoj. Kelkaj altrangaj oficiroj ricevadis grandajn komisionojn por fraŭde aperi kiel direktoroj de german-posedataj minokompanioj por igi ilin aspekti kiel hispan-posedaĵoj. Fakte, ***Franco*** ne nur



***Sebastián Romero Radigales***



***Ángel Sanz Briz***



***Luis Carrero Blanco***



***Demetrio Carceller Segura***



Joaquín Ríos Canapé



Rafael García Valiño



Francisco de Borbón y de la Torre



Rolando de Tella y Cantos

konsciis pri la korupto, sed uzis siajn sciojn por kontroli la membrojn de sia koalicio. Li ne havis intereson malhelpi ĝin; pli ĝuste, li preferis uzi siajn informojn pri tiuj praktikoj kiel levilforton kun tiuj implikitoj. Fakte, li ofte pagis tiujn, kiuj rakontis al li pri korupto, ne por agado kontraŭ la kulpuloj, sed lasante ilin scii, kiu denuncis ilin.
En la armeo, multaj oficiroj kun komercaj interesoj uzis siajn soldatojn, kaj la respublikanajn militkaptitojn, kiel malmultekostan aŭ senpagan laboristaron. Aliaj uzis armeajn veturilojn por privataj celoj. Estis ofte ke altrangaj oficiroj okupiĝu pri kontrabando. La generalo ***Joaquín Ríos Canapé***, amiko de ***Franco***, posedis drinkejon ĉe ***Gran Vía*** de Madrido, kaj uzis aerarmeajn aviadilojn por alporti alkoholaĵon, kafon kaj tabakon el la libera haveno de Tanĝero, dum lia edzino vendis kuponojn de benzino ĉe la drinkejo. Aliaj generaloj importis kontrabandajn produktojn el la Kanariaj Insuloj. La buĝeto de la armeo estis dediĉita al privataj elspezoj, kiel la luksa plenaĝ-debuto de la filino de la generalo ***Carlos Asensio*** kiam li estis Ministro pri Armeo. La altekostaj donacoj de la kapitan-generaloj estis devige pagitaj de ĉiuj oficiroj. La superaj oficiroj sukcesis duobligi aŭ triobligi sian salajron per bonpagataj laborpostenoj en la ŝtatservo aŭ en la estraroj de privataj kompanioj. La luksa vivmaniero de kelkaj kapitan-generaloj kiel ***Rafael García Valiño*** skandalis kelkajn el liaj pli aŭsteraj kunbatalintoj. En pli malalta nivelo, la suboficiroj uzis soldatojn kiel servistojn, laboristojn, infanistinojn, kaj simile. ***Franco*** sciis tion kaj ŝajnis al li perfekte, ke oni sciu, ke li tion sciis. Nur en du okazoj li uzis tiun scion por forpeli altrangan oficiron el la Armeo. Unu estis generalo ***Francisco de Borbón y de la Torre***, akuzita pri kontraŭleĝa manĝ-kontrabandado, sed reale pro lia agado favore al la restarigo de la monarkio. La alia estis la elstara afrikanista generalo ***Heli Rolando de Tella y Cantos***. Malgraŭ lia elstara militista historio, ***Tella*** estis senigita de ĉiuj armeaj honoroj pro “administraj neregulaĵoj” faritaj en la uzo de armeaj veturiloj kaj personaro lige kun lia farun-fabriko kaj la rekonstruo de lia grandbieno, dum li estis armea guberniestro de Lugo. Ĉar ***Franco*** ne konsideris la korupton kiel gravan krimon, postaj atakoj kaj atenco kiun ***Tella*** suferis konvinkis lin ke li estis persekutita pro sia por-monarkia agado.

Fekunda kampo por korupto estis la ekstraktado kaj eksportado de volframo, decida ingredienco en la fabrikado de altkvalita ŝtalo por armiloj. ***Franco*** pensis ke lia supervivado dependis de milita venko de la faŝismaj landoj. La limigoj al la eksportado de volframo far la aliancanoj malfermis egajn ŝancojn por korupto. Evidentas ke ***Carceller*** gajnis multe da mono en interŝanĝo por permesado de kontraŭleĝaj eksportaĵoj al la **Reich**, kvankam ĝi estis nur parto de la riĉaĵo kiun li amasigis dum sia tempo kiel ministro. ***March*** dirus al ***Tom Burns*** ke la volframo estis relative malgrava elemento por la riĉiĝo de ***Carceller***, ĉar preskaŭ ĉiuj importaĵoj kaj eksportaĵoj de Hispanio pagis tributon en la poŝon de tiu ministro; li estis homo sen granda riĉaĵo antaŭ la tempo kiam li iĝis Ministro, sed de tiam, malgraŭ ke li ŝajne ne okupiĝis pri komerco, tamen li amasigis egan riĉaĵon. Estas vere, ke ***Juan March*** kritikis sinjoron ***Carceller***-on kiel bankrabisto poŝŝteliston, sed tamen la kritiko estis ĝusta. Komence de 1944, estis usona plendo antaŭ la hispana registaro pro la daŭra eksportado de volframo al la germanoj. Usono ege reduktis la petrol-eksportojn al Hispanio. Tio kaj aliaj premoj de la Aliancanoj devigis la registaron de Franco pli limigi ĝian apogon al Germanio kaj plu distanciĝi el la militantaj faŝismaj landoj laŭlonge de la jaro 1944 kaj ĝis la fino de la hitlerisma reĝimo en majo de 1945.
Malantaŭ la klopodoj kiujn ***Franco*** kaj lia propagand-maŝino dediĉis por reskribi lian rolon en la Dua Mondmilito, estis certa timo. Tial vico da mensogoj estis disvastigita pri la agadoj de la diktatoro dum la milito. Tiel, dum sia tuta vivo, li konservis la fikcion de sia firma defendo de la hispana neŭtraleco. La malvenko de la Tria **Reich** metis finon al la pretendoj de la diktatoro konstrui novan imperion. Ĉar li ne sentis sin devigita morti en ruinoj de bunkro, ***Franco*** sciis defendi sin kontraŭ la malamikeco de la Aliancanoj per ruzo kiu montris nedubindan politikan lertecon. Lia strategio rilate al la grandaj potencoj estis reskribi sian rolon en la Dua Mondmilito, kaj kun rilato al la hispana loĝantaro, reskribi tion, kio estis okazante eksterlande. Li konsideris, ke la ekstera kritiko de lia figuro estis rezulto de framasona komploto kontraŭ la Hispana Ŝtato. Dum la Malvarma Milito, li senhonte uzis la gazetaron kiel ilon por certigi sian supervivadon, ripetante preskaŭ ĉiutage, ke la viro, kiu senhonte flirtis kun ***Hitler***, persone savis Hispanion de la dua Mondmilito. La internacia ostracismo kaŭzita de liaj ligiloj kun la Akso estis prezentita kiel perversa internacia persekuto motivita de la envio de la demokratioj pro tio, kion li faris por la lando. Kvankam kontraŭ lia reĝimo estis farata gerilmilito kaj malgraŭ ke malsato afliktadis grandparton el la loĝantaro, ***Franco*** gratulis sin pro ***«ĉi tiu ordo, ĉi tiu paco kaj ĉi tiu ĝojo, kiu faras ke nia popolo estu en ĉi tiu turmentita Eŭropo unu el la tre malmultaj kiuj ankoraŭ povas rideti»***.
En la enlanda politiko, ***Franco*** klopodis plifirmigi la lojalecon de la tri kolonoj de la reĝimo: la Eklezio, la Armeo kaj la Falango. Dume, lia ekstera politiko emfazis la katolikajn kaj monarĥismajn elementojn de reĝimo kiu prezentis sin kiel specife



***Alberto Martín Artajo***



**Falangistaj *Franco-Gvardioj***

hispanan. Projekciante ĉi tiun bildon, la diktatoro prenis la antaŭzorgon ĉirkaŭi sin per Pretoriana Gvardio de Akso-lojaluloj. Li konservis la monarkiismajn generalojn for de pozicioj de maksimuma respondeco, dum li nomumis la falangist-ekstremistojn kiel suboficirojn. Li ankaŭ kreis la Franco-Gvardion, milician korpon formitan de falangistaj fanatikuloj. La Falango, kiu por li estis «bastiono kontraŭ perturbo, sekureca valvo, kiun oni kulpigas pri la registaraj eraroj», estis ankaŭ la instrumento por mobilizi la homamasojn, kiuj akceptadis la ŝtatestron dum liaj turneoj tra Hispanio.

***Franco*** tiam prezentis sian reĝimon kiel ian konstitucian monarkion. Estis anoncita pseŭdo-konstitucio, la Foruo de la Hispanoj (***Fuero de los Españoles***), kiu, preter ŝajna garantio de civilaj liberecoj, ne permesis opozicion al la "Fundamentaj Principoj de la Ŝtato" aŭ la ekziston de politikaj partioj aŭ sindikatoj. ***Franco*** deklaris ke lia reĝimo finfine estos sukcedita de tradicia monarkio. La 18-an de julio 1945, li forigis el sia kabineto la ministrojn plej proksimajn al la Akso kaj nomumis konservativajn kristanajn demokratojn kiel ekzemple ***Alberto Martín Artajo*** kiel Ministro pri Eksteraj Rilatoj, donante fidon al sia nova bildo kiel aŭtoritatema katoliko. La nomumo de ***Juan Antonio Suanzes*** kiel Ministro de Komerco kaj Industrio estis malbona aŭguro por la evoluo de la ekonomio. La ĉefa nomumo estis la menciita ***Martín Artajo***, al kiu ***Franco*** certigis ke li povos faciligi transiron al la promesita monarkio. La nova ministro ne rimarkis, ke, samtempe, ***Franco*** promesis al la falangistoj, ke nenio ŝanĝiĝos. Fakte, la diktatoro konservis la kontrolon de ekstera politiko kaj uzis la ministron kiel la akcepteblan vizaĝon de sia reĝimo antaŭ la internacia komunumo. Por neŭtraligi la monarĥiistojn en sia koalicio kaj prezenti pli plaĉan aspekton al la okcidentaj potencoj, li planis aprobi leĝon por igi Hispanion regno; tamen, li tute ne volis permesi la revenon de la reĝa familio kiun li taksis makulita per konstituciismo, krom tio ke ĝi signifus la finon de lia politika potenco.

En la fonda konferenco de Unuiĝintaj Nacioj, okazinta en San-Francisko inter la 25-a de aprilo kaj la 26-a de junio de 1945, Meksiko sukcese proponis la ekskludon

de iu ajn lando, kies reĝimo ekregis helpe de ŝtatoj, kiuj batalis kontraŭ la Unuiĝintaj Nacioj. La propono povus esti aplikita nur al la Hispanio de ***Franco***. La meksika rezolucio estis adoptita de la tri grandaj potencoj ĉe la Pocdama konferenco kiam, la 2-an de aŭgusto 1945, Hispanio estis ekskludita de la Unuiĝintaj Nacioj pro la kunlaboro de la ***Franco***-reĝimo kun la Akso. Sed la supervivo de la frankisma reĝimo estis favorata de la fakto, ke la alianco de la potencoj kiuj batalis kontraŭ Germanio estis rompita. En la kunteksto de la Malvarma Milito, la ekzisto de kontraŭkomunista reĝimo kia tiu de ***Franco*** estis oportuna por la okcidentaj interesoj. Sen ekstera opozicio, la diktatoro povis koncentriĝi sur sia interna pozicio, kies defendo baziĝis sur la apogo de la armeo kaj la Eklezio, apogo kiun li estis gajninta insinuinte, ke, se li malaperus, finiĝus “la epoko de grasaj bovinoj”, t. e. “tempo de abundo”, en klara aludo al la gajnoj de la korupto.
Kontraŭ la Maldekstro, li aplikis senbridan subpremadon: malliberejo, ekzekutoj, torturo kaj ekzilo jam estis okazigintaj ĥaoson sur la respublikana opozicio. La malsato kaj la malfacileco trovi laboron sen vojaĝ-permesoj kaj atestiloj pri bona konduto –tio estas, pri politika lojaleco– pli malfortigis la rezistkapablon. La efiko de aŭtarkio, korupto kaj nekompetenteco videblas en la prezoj de la manĝaĵoj. En 1936, kilo da bovaĵo kostis 2 pesetojn kaj 40 cendojn; kilo da terpomoj, 30 cendojn, kaj litro da olivoleo, 1 peseton kaj 70 cendojn. En 1945, supozante ke ili povus esti trovitaj, kilo da bovaĵo kostis inter 35 kaj 40 pesetojn; kilo da terpomoj, 5 pesetojn, kaj litro da olivoleo, 68 pesetojn kaj 70 cendojn. Koncerne oleon, ĉiu olivoleo-produktado estis eksportita dum 2-a Mondmilito kaj anstataŭe estis importita malbonkvalita sojfaba oleo, kaŭzante plurajn kazojn de nutra veneniĝo.
Inter 1945 kaj 1951, estis farita senkompata milito kontraŭ la maldekstremaj gerilanoj. En la buĝeto de 1946, el kiu apenaŭ 6 procente estis asignitaj al edukado, la subpremaj instrumentoj, la polico, la Civil-Gvardio kaj la Armeo, ricevis 45 procenton. La politiko de bruligita tero en la milito kontraŭ la rezistado igis la Civil-Gvardion detrui tutajn urbetojn. La rifuzo de la kamparanoj al la gerilanoj akceliĝis pro la agoj de specialaj unuoj de agentoj provokistoj de la Civil-Gvardio, kiuj, alivestite kiel gerilanoj, eniris la vilaĝojn serĉante manĝaĵon kaj ŝirmejon kaj, kiam aperis simpatiantoj, ili estis arestitaj aŭ ekzekutitaj. Foje tiuj falsaj gerilanoj atakis urbetojn kaj dediĉiĝis al seksperfortado kaj rabado. Fine de la 1940-aj jaroj, la veraj gerilanoj ne plu povis kalkuli je la apogo de la kamparanoj kaj devis ŝteli, nur por pluvivi.
Malgraŭ prezentado de sia reĝimo kiel monarĥia, la diktatoro koleris kiam la reĝa heredanto, ***Don Juan***, rifuzis veni al Hispanio krom por preni la tronon. En februaro 1946, don Juan ekloĝis en Estoril, proksime de Lisbono. 458 el la plej gravaj hispanaj personoj -inkluzive dudek eksministroj, la prezidantoj de la kvin ĉefaj bankoj de la lando, multaj aristokratoj, kaj eminentaj universitataj profesoroj-subskribis leteron al ***Don Juan*** esprimante sian deziron vidi la monarkion re-estigita, “enkorpigita en Via Moŝto”. ***Franco*** ekkoleris kaj planis malliberigi ĉiujn subskribintojn de la letero sen proceso sed kelkaj altranguloj klarigis al li la



**Juan de Borbón kaj ties familio**



*Cristino García Granda*



*Raimundo Fernandez-Cuesta*



**Frankism-favora mitingo de la 9-a de decembro 1946**

negativajn internaciajn sekvojn de tia procedo. Do, li kontentiĝis per kelkaj forprenoj de pasportoj, impostaj inspektadoj aŭ maldungoj. ***Kindelán***, kiun ***Franco*** konsideris la gvidanto de la movado, estis ekzilita al la Kanariaj Insuloj. Sed pli akra estis lia traktado al la maldekstraro: la 21-an de februaro, unu el la gerilgvidantoj kaj heroo de la franca rezistado, ***Cristino García***, estis ekzekutita kune kun naŭ aliaj gerilanoj. Kelkajn tagojn poste, tridek sep membroj de la Socialista Partio estis kondamnitaj al prizono pro ilia provo reorganizi la partion.

La 1-an de oktobro 1946, dum la abundegaj festoj, kiuj okazis en Burgoso, post tedeumo en la katedralo, ***Franco*** ricevis oran kaj platenan ŝildon inkrustitan per rubenoj, diamantoj kaj smeraldoj, donaco de la aŭtoritatoj de la kvindek hispanaj provincoj. Fine de tiu jaro, ***Franco*** atribuis al "sovetia intrigo" la postulon de la Unuiĝintaj Nacioj por ke li cedu potencon al provizora reprezenta registaro. La falangistaj ministroj ***Girón*** kaj ***Fernández Cuesta*** organizis ega propagand-kampanjon por prezenti bildon de absoluta nacia unueco. Amaso de falangistoj kaj eksbatalantoj kolektiĝis en la Placo de Oriento la 9-an de decembro 1946, svingante standardojn kun sloganoj atakantaj Rusion kaj eksterlandanojn ĝenerale. La krioj de "Franko! Franko! Franko!" resonis dum unu horo post la finiĝo de la diskurso.

***Franco*** planis kun ***Carrero Blanco*** igi sian reĝimon akcept-ebla en la internacia sceno, kio signifis instituciigi la reĝi-mon kiel monarkion kaj li resti dumviva ŝtatestro kaj reg-anto. Ŝanĝi la nomon de la reĝimo al "regno" ne ŝanĝis ĝian enhavon. En januaro de 1947, ***Andrés Saliquet***, kiu gvidis delegacion de pli maljunaj generaloj, esprimis sian zorgon pri la decido de Unuiĝintaj Nacioj, al kiu ***Franco*** res-pondis: "Ne estas pro kio zorgi. Krome, ĉu al cia sapo-fabriko ne iras bone?". Ĉi tiu komento montris, ke la diktatoro konsciis, ke lia afero estas subtenata danke al koruptaj retoj. Multaj generaloj ĝuis gvidajn postenojn en firmaoj kiuj volis pagi sian influon por akiro de malabundaj krudaĵoj aŭ elektra potenco.

La alveno de manĝaĵo el Argentino estis decida por subteni la reĝimon dum la internacia blokado. ***Juan Domingo Perón*** malobeis la UN-rezolucion kaj, en 1947, sendis


novan ambasadoron kies alveno estis salutita kun manifestacioj kaj eŭforia gazetara raportado. Eĉ pli spektaklan propagandon generis la vizito al Hispanio de ***María Eva Duarte de Perón***, somere de tiu jaro. La Falango mobilizis enormajn homamasojn ĉe ĉiu el la komunaj publikaj aperoj de ***Eva*** kaj ***Franco***. Fine de la vizito estis subskribita la ***Franco-Perón***-Protokolo, kiu garantiis novajn kreditojn kaj liverojn de tritiko ĝis 1951. En oktobro 1947, Usono decidis normaligon de ekonomiaj kaj politikaj rilatoj kun Hispanio malgraŭ pruvoj ke miloj da kontraŭuloj de la reĝimo estis malliberigitaj kaj ke oni daŭre estis donante azilon al multaj naziaj militkrimuloj. Multaj ambasadoroj revenis al Madrido, kaj en januaro de 1948 Usono pretis sendi ambasadoron. ***Franco*** estis jam travivinta la plej malbonan situacion kaj tiam konsideris ke li povus dediĉi pli da tempo al sia distro. Tiam li pasigis la paskajn feriojn fiŝkaptante en Asturio, kaj grand-parton el la somero li dediĉiĝis al altamara fiŝkaptado en la Atlantiko sur sia jakto ***Azor***. Krome, li ĉiam trovis tempon por ĉasoj, en kiuj estis akordita bona parto el la koruptaj interkonsentoj de la reĝimo.



Andrés Saliquet Zumeta

***Franco*** aranĝis renkontiĝon kun ***Don Juan*** en la ***Azor***, en aŭgusto de 1948. Lia celo estis certigi ke la dekjara filo de ***Don Juan***, ***Juan Carlos***, kompletigu sian edukon en Hispanio. Li volis ke la knabo estu ostaĝo kaj por pravigi sian rolon kiel reganto kaj kontroli la restarigon de la monarkio. Tiamaniere la diktatoro evitis proksimiĝon de monarĥistoj kaj socialistoj. Kiam ***Juan Carlos*** vizitis ***Franco***-n, la presaro kontrolita de la reĝimo donis la impreson ke la monarkio estis subordigita al la diktatoro. ***Don Juan*** tro malfrue komprenis ke li estis trompita; ***Franco*** profitis la ŝajnan proksimecon inter la diktatoro kaj ***Don Juan***.

La subprema aparato de la frankisma reĝimo estis tiom potenca, ke la diktatoro, fakte, ne devis zorgi pri la Maldekstro. En la laboristaj kvartaloj de la ĉefaj urboj oni povis vidi homojn vestitajn per ĉifonoj, kiuj traserĉas rubejojn, kaj la stratoj estis plenplenaj de almozuloj. La plej grandaj urboj havis suburbojn en la periferio, kie homoj vivadis en terure primitivaj kondiĉoj. En la periferio de Barcelono kaj Malago, kelkaj vivis en kartonaj kaj metalaj barakoj, kaj aliaj en kavernoj. Ŝtataj medicinaj kaj socialservoj estis preskaŭ nulaj. La situacio plimalboniĝis per la internaj amasmigradoj de




Apoteoza vizito de ***Eva Perón*** al Hispanio



**Kunveno de *Franco* kaj *Don Juan* en la *Azor* en aŭgusto de 1948**



**Domaĉaj suburboj en Hispanio en la 40-aj kaj 50-aj jaroj**



***Franco* fiŝkaptante en Asturio**

1945 kaj la senbrida kresko de industriaj grandurboj. Pro la manko de urba planado, la bezono loĝigi la ĵusalvenitan populacion permesis al konstru-entreprenistoj amasigi grandajn riĉaĵojn konstruante malbon-kvalitajn kvartalojn kaj trologatajn loĝdomojn, al kiuj ĝenerale mankis bazaj servoj, hospitaloj, lernejoj, publika transporto, liftoj kaj sekureco... La eblecoj por korupto estis preskaŭ senlimaj, ĉar publikaj funkciuloj devis esti subaĉetitaj por akiri la necesajn rekvalifikojn, same kiel permesojn por bazaj konstru-materialoj kiel ekzemple cemento, ŝtalo kaj ligno, kiuj estis kondiĉigitaj de porciigo ĝis la Stabiliga Plano de 1959. La malfacilaĵoj, subnutrado, epidemioj, la pliiĝo de la prostituado, la nigra merkato kaj la korupto estis sekvoj de la politikoj de la frankisma reĝimo, sed la malfacilaĵoj de ĝiaj viktimoj ne maltrankviligis la diktatoron.

La tiama hispana registaro estis implikita en ombra operacio kun ***Juan March***, danke al kiu li akiris grandegan riĉaĵon. La afero rilatis kun la firmao ***Barcelona Traction, Light and Power Co. (La Canadiense-BTLP)***, la ĉefa elektro-produktanta kompanio en Katalunio. Malgraŭ tio ke ĝia registrita oficejo estis en Kanado, ĝia ĉefa akciulo estis la belga firmao, ***SOFINA***, ankaŭ posedanta de la ***Compañía Hispano-Americana de Electricidad (CHADE)***, la plej granda generatoro de elektro en Latin-Ameriko. Kvankam ĝi ne funkciis en Hispanio, la profitoj de ***CHADE*** en Latin-Ameriko estis repatriitaj al ĝia ĉefsidejo en nia lando kaj ĝuis tre favoran impostan traktadon fare de ***Franco***. ***March*** estis aĉetante ***BTLP***-akciojn ekde la fino de la 2-a Mondmilito tra iu firmao kun sidejo en Tanĝero. En 1947 perantoj de ***March*** informis la prezidanton de ***CHADE*** ke se lia firmao ne vendus al li ***BTLP***, la hispana registaro atakus ***CHADE***-n. Antaŭ tiu operacio, ***March*** prirezignis sian defendon de la afero de ***Don Juan*** por restarigi siajn rilatojn kun ***Franco***. Lia unua celo estis la ministro ***Blas Pérez***, kiu ricevis rajtigon de ***Franco*** por intervidiĝi kun li. Oni ne konas la enhavon de ilia konversacio, sed ***CHADE*** tuj komencis ricevi kritikojn de la registaro kaj de Kortesoj-anoj kiel ekzemple ***Blas Pérez*** kaj ***Suanzes***, tre ligitaj kun ***March***. ***Suanzes*** aplikis restriktajn impostajn iniciatojn kontraŭ ***CHADE***. Oni diris, ke ***March*** liveris

pakon da akcioj al la hispana registaro. La vero estas, ke ***Blas Pérez*** poste aliĝis al la direktoraro de la ŝipkompanio ***Trasmediterránea***, posedata de ***March***. La ***BTLP*** estis profit-dona firmao. Ĝiaj aktivoj leviĝis al proksimume dek milionoj da sterlingoj (preskaŭ nuntempa duonmiliardo da eŭroj). La administraj malfacilaĵoj aplikitaj en Hispanio kontraŭ la ***BTLP*** igis fali la prezon de la obligacioj de tiu firmao. Agentoj de ***March*** aĉetis ilin sekrete, kaj kiam li havis sufiĉe da obligacioj (21 procente), ***March*** postulis pagon de la ŝuldata interezo. En februaro 1948, liaj agentoj arkivis proceson en tribunalo en ***Reus***, asertante ke ***BTLP*** ne pagis la ŝuldon kaj postulante tujan kompenson. La juĝisto, kiu laŭdire estis subaĉetita, juĝis favore al la akuzantoj (fakte, favore al ***March***) kaj aljuĝis al ili la proprieton de ĉiuj ***Barcelona Traction***-aktivaĵoj. La eksterlandaj posedantoj de la firmao apelaciis la verdikton, sed la hispanaj tribunaloj malakceptis la apelacion. Kvankam la apelaciantoj havis la subtenon de la registaroj de Belgio, Kanado kaj Usono, iliaj iniciatoj estis lerte blokitaj fare de la advokatoj de ***March***. ***Ramón Serrano Súñer***, la bofrato de ***Franco***, estis unu el tiuj advokatoj. Antaŭ junio de 1951, ***March*** havis la plimulton de la akcioj en sia posedo kaj premis por ke la firmao estu vendita. La kondiĉoj de la aŭkcio estis ke la aĉetanto devis pagi ĉiujn interezojn, kies plej granda parto estis ŝuldita al ***March***. Dum ĉi tiu procezo, la mallorkano havis la subtenon de ***Blas Pérez***, ***Suanzes*** kaj ***Franco***, kiuj pensis ke temis pri operacio kiu celis naciigi la firmaon. Kiam ***Suanzes*** estis anstataŭigita per ***Arburúa*** en julio 1951, ***March*** metis ankaŭ lin en la salajro-etaton. La nura proponanto kiu povis plenumi la kondiĉojn de la aŭkcio estis ***Fuerzas Eléctricas de Cataluña S. A.***, kiu apartenis al ***March***. Tiamaniere la mallorka financisto akiris, per dek milionoj da pesetoj, firmaon kiu estis taksita inter 1.500 kaj 6.000 milionoj da pesetoj. La tuja reago de ***Franco*** estis priskribi tiun ĉi operacion kiel "aŭdaca triumfo de la hispana naciismo". Estis dirite ke la subteno de la diktatoro estis lia maniero rekompenci ***March***-on pro lia helpo dum la Civita milito. ***Suanzes*** koleregis kiam la firmao ne estis naciigita, ĉar ĉiuj profitoj iris en la poŝon de ***March***.

La krizo pri nutrado plimalboniĝis. Post Kristnasko de 1949, ***Varela*** esprimis al ***Franco*** sian maltrankvilon pro la administra korupto kaj la alarma manko je tritiko. La diktatoro



***Franco* fiŝkaptisto en lia jakto *Azor***



***Franco* ĉasisto**



***Blas Pérez González***



***Manuel Arburúa de la Miyar***

respondis memkontente, ke li povus facile akiri kreditojn eksterlande por aĉeti manĝaĵojn, sed ke li ne volis pagi tion per politikaj reformoj. ***Varela*** proponis ke li metu finon al la korupto de la registaro donante pli da libereco al la gazetaro kaj la Tribunaloj. ***Franco*** obĵetis ke la negativaj sekvoj estus pli malbonaj. La korupto estis centra instrumento de lia potenco. La renkontiĝo finiĝis per ĉi tiuj vortoj de ***Franco*** al ***Varela***: «Mi ne donos al Hispanio ajnan liberecon en la venontaj dek jaroj. Post tiu periodo, mi iom malfermos mian manon». La teruraj vivkondiĉoj de la laborista klaso kunekzistis kun la bona vivo kaj la korupto de la elitoj, kiuj provokis protestojn de kelkaj el la plej aŭsteraj generaloj. En diskurso de la generalo ***Juan Yagüe*** en marto de 1950, li amare plendis pri la «*nekleraj, needukitaj uloj, kun ne pli da bagaĝo ol sia kapablo aĉeti konsciencojn, kiuj rapide riĉiĝas kaj ankaŭ fanfaronas sian senhontecon; aliaj estas altigitaj al elstaraj pozicioj, sen ke iu scius, kiu estas la nigra mano, kiu ilin levas kaj subtenas*».
***Franco*** konsideris sin kiel modelon pri aŭstereco. Certe, li ne estis donjuano, li ne fumis, li modere trinkis vinon ĉe manĝoj kaj li ne vetis pli ol iom da mono en la nacia loterio aŭ kiam li kartludis kun amikoj. Tamen ĉiuj rimedoj, antikvaĵoj kaj artaĵoj, palacoj kaj bienoj de la iama reĝa heredaĵo estis je la ekskluziva dispono de lia familio, privilegio kiun li plene profitis, ĉefe por ĉasado. La elspezoj de liaj ĉasaj kaj fiŝkaptaj ekspedicioj estis enormaj. Lia alta-mara fiŝkaptado postulis tutjaran prizorgadon de la ***Azor***-jakto, same kiel la ĉeeston de marameaj akompanoj dum persekutado de tinusoj kaj balenoj en la Atlantiko. Tiel lia ĉasado kiel lia dolĉ-akva fiŝkaptado implicis la movadon de grandaj sekvantaroj ĉie en Hispanio. Krome, estis la kaŝaj kostoj de neglektado de la aferoj de la regado, ĉar ne nur ***Franco*** sed ankaŭ pluraj el liaj ministroj partoprenis en tiuj ekspedicioj. La korupto de la familio ***Franco*** signife pliiĝis, kiam ilia filino ***Carmen***, ***"Nenuca"***, edziniĝis, la 10-an de aprilo 1950, kun negrava frivola dando de la societo de Ĥaeno, d-ro ***Cristóbal Martínez Bordiú***, kiu baldaŭ iĝis la markizo de ***Villaverde***. La preparoj kaj la amasiĝo de donacoj estis tia ke la gazetaro estis ordonita diri nenion pro timo je kaŭzado de nedezirataj kontrastoj kun la malsato kaj mal-riĉeco kiuj afliktis grandan parton el la lando. La geedziĝo estis elspezo, kiu estis malfacile elportebla por ajna eŭropa reĝa familio: honoraj gardistoj, armeaj bandoj kaj centoj da gastoj -inkluzive de la tuta registaro, la diplomatia korpuso kaj brila aro da aristokratoj- partoprenis la solenan ŝtatceremonion. La populara atento koncentriĝis sur la belaj juveloj portitaj de la novedzino kaj la bizara uniformo de la edziĝanto, Kavaliro de la Sankta Tombo, kompleta kun glavo kaj pluma kasko. La diktatoro, vestita per grandioza parad-uniformo de kapitan-generalo de la armeo, transdonis sian filinon. ***Martínez Bordiú*** anstataŭigis la malnovan motor-ciklon sur kiu li iradis renkontiĝi kun sia amatino per serio de konverteblaj ***Chrysler*** kaj ***Packards***. Li plene profitis sian ligon kun la familio de la diktatoro por promocii siajn komercajn interesojn kiel vojaĝanta vendisto por teni la peradon de pluraj eksterlandaj firmaoj, kies produktadoj estis proksime rilataj al ŝtataj

publikaj servoj. Kune kun la Markizo de ***Huétor de Santillán***, estro de la Civila Domo de ***Franco***, ***Martínez Bordiú*** amasigis riĉaĵon el diversaj fontoj, precipe per la akiro de la ekskluziva licenco por importi ***Vespa-***motorciklojn el Italio, en tempo kiam Hispanio havis malmulte da valuto por importado. Formiĝis iu klano ***Villaverde*** kies ekonomia cerbo estis la onklo kaj baptopatro de ***Martínez Bordiú***, ***José María Sanchiz Sancho***. La patro de ***Sanchiz***, ***José Martínez Ortega***, Grafo de ***Argillo***, laboris por la Tria **Reich** dum 2-a Mondmilito kaj poste helpis kaŝi naziajn financon. ***Sanchiz*** baldaŭ prizorgis la ekonomiajn interesojn de ***Franco***. Li faris riĉaĵon por la ***Villaverde***-klano per spekulado pri nemoveblaĵoj kaj import-eksport-licencoj, kaj lia sukceso permesis al li akiri konsiderindajn bankinteresojn. Laŭ la pasado de la tempo, la ***Villaverde***-klano deprenis la influon de la gefratoj de ***Franco***, ***Nicolás*** kaj ***Pilar***. Iu grava falangisto kiu konservis notojn pri subaĉeto kaj korupto ene de la elito de ***Franco*** priskribis ***Sanchiz***-on kiel "*aventuriston kun la animo de ŝakalo*" por kiu "*la politiko ne povas esti akceptita kiel sindonema servo por la komuna bono, sed prefere kiel la ruza manipulado de malpura vendotablo, kies grasa rezulto devas esti reflektita tuj en la persona banka fonduso, en la nuna konto. Li enmerdigas ĉion kion li tuŝas kaj lasas merdan spuron tie tra kie ajn li iras*". La klano ***Villaverde*** estis verŝajne la plej sukcesa el la multaj kiuj ekspluatis siajn ligojn kun ***Franco***.

Kiel dirite, ***Franco*** havis neniun intereson esplori la korupton, ĉar krom tio ke li mem estis ege implicita en tiaj aferoj, tiu teniĝo certigis al li la lojalecon de la elito. Entute oni kalkulas ke li ricevis kvar miliardojn da pesetoj (ĉirkaŭ 24 milionoj da eŭroj) en donacoj dum sia mandato. Tiu ĉi kalkulo verŝajne ne inkluzivas la valoron de la centoj da memorigaj oraj medaloj kiujn loĝantaroj kaj entoj de Hispanio donis al la diktatoro kaj kiujn ***Doña Carmen*** igis fandi por produkti ingotojn. Krom la biendomo de ***Valdefuentes***, la ***Franco***-familio akumulis pliajn dek kvin posedaĵojn. En 1945, ***Doña Carmen*** aĉetis tutan loĝej-blokon en Madrido kaj, en 1962, la grandiozan Palacon de ***Cornide*** en Korunjo. La kompleksaj kaj suspektindaj maĥinacioj kiujn tio implikis inkludis trukitan aŭkcion faciligitan fare de ***Pedro Barrié de la Maza*** kaj la urbestro de Korunjo. La avareco kaj avideco de la Damo estis legendaj. La juvelistoj de Madrido kaj Barcelono kreis ne-



**Geedziĝo de la filino de *Franco* kaj *Cristóbal Martínez Bordiú***



***Ramón Díez de Rivera* Markizo de Huétor de Santillán**



**Klano *Franco-Villaverde***



***Carmen* "Kolieroj"**

oficialajn asekurejojn por kompensi sin post ŝiaj vizitoj. En Korunjo kaj Oviedo, la juvelistoj kaj antikvaĵistoj kutimis mallevi siajn ŝutrojn kiam ili eksciis, ke ŝi estis en la urbo. Al la komercistoj kiuj ricevis ŝiajn vizitojn oni petis sendi la fakturon al la Civila Domo de ***El Pardo*** kaj tiuj, kiuj kuraĝis fari tion, estis senprokraste pagitaj, jes ja, sed tiuj fakturoj –por objektoj destinitaj al la privata kolekto de ***Carmen Polo***– estis pagitaj per ŝtataj monrimedoj. Al tiuj ambiciuloj kiuj volis flati la Sinjorinon oni indikadis la specojn de donaco kiujn ili devis liveri al ŝi por ke ĝi estu akceptebla de la edzino de ***Franco***.
Kaj rilate al ***Doña Pilar***, fratino de la diktatoro, ŝi ĉiam prezentis sin kiel malriĉa vidvino, kiu neniam profitis esti fratino de la ŝtatestro. Sed fakte, la rilato kun lia frato certigis al ŝi postenojn en la estraroj de pluraj firmaoj kiuj prosperis pro la supozo ke ***Franco*** mem havis intereson en ili. Malgraŭ havi nur magran vidvin-pension en 1941, kiam ŝia edzo mortis, en la 1950-aj jaroj, ***Pilar*** iĝis tre riĉa virino. Ŝia hejmo, en eleganta Madrida kvartalo, kostis al ŝi dek du milionojn da pesetoj. Ŝi sukcesis aĉeti loĝejojn por ĉiu el siaj dek gefiloj; ŝi povis lui du aliajn; ŝi posedis bienon en ***Puentedeume***, apud Korunjo; kaj ŝi havis grandan akcian kapitalon. Ŝia plej profitdona afero estis aranĝita en 1957. Iu 81-jaraĝa fraŭdisto, ***Manuel Bruguera Muñoz***, falsis mapojn kaj dokumentojn, kiuj permesis al li vendi terpecon en Madrido kiu jam havis aliajn posedantojn. Per cent mil pesetoj, ***Pilar Franco*** aĉetis por si kaj sia amikino ***María Queipo de Llano***, nevino de generalo ***Gonzalo Queipo de Llano***, la terenon en areo en plena urba evoluo (la etendo de la stratoj ***O'Donnell*** kaj ***Sainz de Baranda***). La advokatfirmao de ***José María Gil Robles*** komisiis defendi la interesojn de la veraj posedantoj. Laŭ ***Jaime Sánchez-Blanco***, la advokato kiu traktis la kazon, ***Pilar*** uzis sian politikan influon por profiti la plej grandan parton de la fraŭda operacio. Unue, la Madrida Urbodomo kaj la Posedaĵ-Registro enskribis la terenon kiel apartenanta al ***Pilar***. Kiam la esploroj komenciĝis, la dokumentoj, kiuj establis la legitiman proprieton, malaperis kvazaŭ magie el la Plejsupera Kortumo ĝuste kiam iu dumviva amiko de ***Franco***, ***Camilo Alonso Vega***, estis ministro pri Internaj Aferoj. Kiam la trompisto ***Bruguera*** mortis, la krimo pri falsigo estis deklarita preskripta. En 1964, kiam, kiel rezulto de la baldaŭa urbigo de la areo, la tereno estis devige eksproprietigita, la Ministroj pri Publika Konstruo kaj Financo zorgis, ke ***Pilar*** akiru grandan kompenson de tri milionoj da pesetoj por parto de la tero kaj dek kvin milionoj por alia. En julio 1973, ***Pilar*** ricevis kroman kompenson de 134 milionoj da pesetoj, mon-kvanto multe pli alta ol la komenca, post kiam la taksantoj estis informitaj ke la tero "apartenis" al ***Pilar Franco***.
Tiu estis unu el la plej sensaciaj kazoj de riĉaĵoj atingitaj per ne-klaraj teren-klasifikoj. Alia ekzemplo estis tiu de la riĉeco akumulita de la falangisto ***José Antonio Girón***. Nomumita Ministro pri Laboro en majo de 1941, li restis en tiu posteno dum dek ses jaroj. Ene de la reĝimo, li estis akuzita pri defraŭdo de publikaj monrimedoj en sia programo por krei teknikajn altlernejojn, en kiuj liaj

amikoj riĉiĝis danke al malavaraj konstru-kontraktoj. ***José Solís*** akuzis lin je esti pli fia ol la sicilia mafio. Antaŭ lia forlaso de la ministerio, li zorge preparis sian postan karieron. Li estis aĉetinta domon en ***Fuengirola*** (Malago), de kie li dediĉis sin al negocado pri nemoveblaĵoj, por kiu li havis la helpon de ***Hans Hoffmann***, germano kun kiu li iĝis amiko dum la 2-a Mondmilito. ***Hoffmann*** laboris kiel interpretisto por la Blua Divizio kaj tiam estis asignita al la ambasado de Tria **Reich** en Madrido, de kie li uzis siajn ligojn kun ***Girón*** por kolektadi informojn pri la hispana registaro, kiujn sekve li sendadis al Berlino. Post 1945, li estis gvida membro de la ekzilita nazia komunumo en Hispanio kaj la esenca ligo inter kanceliero ***Konrad Adenauer*** kaj la ***Franco***-registaro. Pro tiuj servoj, li estis rekompencita per la nomumo de konsulo de Germanio, unue en ***Algeciras*** kaj poste en Malago. Dum la 60-aj jaroj, ***Hoffmann*** estis la peranto en la aĉeto de multaj parceloj nome de la edzino de ***Girón***, ***María Josefa Larrucea***. ***Girón*** ekloĝis en ***Fuengirola*** en 1949 post kiam lia amiko la urbestro kaj estro de la loka Falango devigis kelkajn kamparanojn vendi biendomon al la edzino de ***Hoffmann*** kontraŭ dek kvin mil pesetoj. La edzino de ***Girón*** aĉetis la teron post unu jaro per la sama kvanto kaj entreprenis konstrui pompan domon sur parto el la tero kiu invadis la arkeologian protekto-zonon de la araba kastelo de ***Sohail***. ***Hoffmann*** kaj ***Girón*** dediĉiĝis akiri ĉaletojn, apartamentojn, komercajn ejojn kaj terojn. ***Girón*** profitis ankaŭ sian amikecon kun alia falangista urbestro, ***Clemente Díaz Ruiz***. La havaĵoj de ***Girón*** plivaloriĝis post kiam en 1964 li estis nomumita prezidanto de la ĵus kreita Kooperativo de Promociantoj de la Sunmarbordo, kiu altiris gravajn promociantojn, bankistojn kaj hotelistojn al la areo, kiel ***Banús***, ***Meliá***, ***Marsans***, kaj la bankiero ***Ignacio Coca García-Gascón***, kiu havis gravajn ligojn kun la ***Franco***-familio.

Plejmulte el tiu koruptado restis nekonata de la hispana popolo pro la totala kontrolo de la inform-medioj far la reĝimo. Tiam, iompostiom, plu pliboniĝis la situacio de tiu reĝimo en la internacia sfero. Konscia ke hispana aliĝo al **NATO** estis malfacila pro la eŭropa politika malamikeco, ***Franco*** koncentriĝis pri plifirmigado de la rilato kun Usono. Pro geopolitikaj kialoj, Usono serĉis la estontan kunlaboron de la Hispana Armeo kaj la starigon de usonaj aeraj kaj mar-




***Pedro Barrié de la Maza***
**Conde de Fenosa**



***Camilo Alonso Vega***



***José Solís Ruiz***



***Hans Hoffmann***

***Franco* sub baldakeno**



armeaj bazoj en tiu ĉi teritorio. Konsiderante la armean malforton kaj strategian gravecon de la lando, kaj la politikajn obĵetojn kontraŭ la hispana aliĝo al **NATO**, la Brita Stabo konsentis ke la nura solvo estis aparta interkonsento inter Usono kaj Hispanio. En junio 1951, ***Eisenhower*** –plejalta komandanto de **NATO**–. la Pentagono kaj la Stabestroj konsentis sendi usonan armean mision al Hispanio por negoci interakordon. La armeaj bezonoj pezis pli ol la dubsentoj de la britaj, francaj kaj aliaj eŭropaj membroj de ***NATO***. Malpli ol unu monaton poste, usonaj armeaj kaj ekonomiaj studgrupoj de la plej alta nivelo jam estis en Hispanio. ***Franco***, kiu ne volis konsenti pri politikaj reformoj, aĉetis la subtenon de Usono kun la rezigno pri la aŭtarkio. La profitoj estis enormaj: komence, la usona amikeco; longa-tempe, ekonomia kresko. Tamen, la ŝanĝo evidentigis ian distanciĝon inter ***Franco*** kaj lia reĝimo. Baldaŭ estis necesaj bone trejnitaj teknokratoj, prefere ol iamaj kamaradoj, por pritrakti ekonomian administradon kies komplekseco estis preter la kompreno de la diktatoro. La usonaj skipoj senditaj por esplori la ekonomion kaj armean pretecon de Hispanio estis teruritigaj vidi la bedaŭran staton de ambaŭ.

En aŭgusto de 1953, estis sukcese finitaj la longaj Konkordataj intertraktadoj kun la Vatikano. Kvankam malpli grava ol la reĝimo asertis, la traktato estis grava paŝo al internacia agnosko de ***Franco***, kiu, ŝanĝe, donis al la Eklezio gvidan rolon en edukado kaj socia moralo, same kiel konfirmi la Katolikismon kiel oficialan religion de la ŝtato. La diktatoro akiris la markon de legitimeco de sia duon-monarkia reĝimo, kio permesis al li pravigi kaj la monerojn kun la legendo "Gvidanto laŭ la graco de Dio" kaj la alprenon de la rolo de monarko dum eniro kaj eliro de la temploj sub la baldakeno antaŭe rezervita al la reĝoj de Hispanio.

La graveco de la Konkordato estis superita de la subskribo, en septembro 1953, de la Madridaj Paktoj kun Usono pri defendaj aferoj. La pakto signifis la kontribuon de 226 milionoj da dolaroj en milita kaj teknologia helpo. Interŝanĝe, ***Franco*** permesis starigon de usonaj armeaj bazoj en kelkaj lokoj sur hispana teritorio. La ekonomia helpo estis akompanita de postuloj kiel realisma kurzo por la peseto kaj ekvilibra buĝeto kiu implicis ŝanĝojn en la naturo mem de la reĝimo, kio signifis la finon de la aŭtarkio.

La memfido de ***Franco*** tradukiĝis en pli grandan sindediĉon al liaj ŝatokupoj: ĉasado, altamara kaj dolĉakva fiŝkaptado, golfo, okcidentaj filmoj, kiujn li spektis en sia privata kinejo en la palaco ***El Pardo*** kaj administrado de sia bieno en ***Valdefuentes***, kie li kultivis tritikon, terpomojn kaj eĉ tabakon. Ĉar li havis aliron al la laboristoj kaj maŝinaro de la Agrikultur-ministerio, ***Valdefuentes*** iĝis ege profitdona entrepreno. Li ĉiam lasis siajn ministrojn okupiĝi pri la teknika parto de iliaj ministerioj, por riĉigi sin aŭ simple por esti efika aŭ eĉ nekompetenta, dum li diktis la larĝajn liniojn de politiko, precipe ekstera politiko. Post 1953, li ĉiam pli kaj pli lasis la monotonecon de la ĉiutaga regado al aliaj kaj daŭre ignoris korupton, ĉu en siaj politikaj pozicioj aŭ en sia familio, kondiĉe ke la koruptuloj montru absolutan lojalecon al li.

En 1954 finiĝis la konstruado de la kripto de la ***Valle de los Caídos*** (Valo de la Falintoj), kiu estis por ***Franco*** obsedo, ia sekreta pasio. Ĝi reflektis la ideon de la diktatoro pri li mem kiel historia figuro egale al Filipo la 2-a. Ĝi estis kolosa entrepreno, ĉizita el solida granito, 262 metrojn longa kaj 41 metrojn alta ĉe la transepto. Tie ekis multaj el la grandaj konstru-entreprenoj de la frankisma epoko: ***Banús***, ***Agromán*** kaj ĉefe ***Huarte***, kiuj ricevis la konstru-kontrakton de la monumenta kruco, finita en septembro de 1956, kun pezo de 181.620 tunoj, 150 metrojn alta kaj brakoj 46 metrojn longaj.

***Franko*** alfrontis la opozicion de la monarkiistoj kiuj memorigis al li ke li rompis la promeson restarigi la monarkion. Krome, ***Don Juan*** alfrontis la diktatoron pri la edukado de ***Juan Carlos*** ĉar li volis ke lia filo faru siajn universitatajn studojn en Loveno, dum ***Franco*** volis ke li studu en hispanaj universitatoj kaj armeaj akademioj kaj, finfine, sub la ombro de ***Franco*** mem. Ĉi tiu deklaris ke tiuj kiuj volus regi Hispanion devus esti edukitaj en Hispanio, kio signifis ke ***Don Juan*** ne estis en la restarig-planoj kaj endanĝerigis la restablon de la monarkion. Fakte, ***Franco*** uzis la terminon "establado" por substreki ke ne estos restarigo de la Burbona linio, sed nur la altrudo de frankisma monarko, kiu devus esti elektita kaj trejnita por garantii la kontinuecon de la reĝimo. Maltrankviligita pro la ebleco de rompo kun ***Franco***, ***Don Juan*** cedis. Al la Falangaj funkciuloj estis garantiitaj bone pagitaj postenoj kaj diversaj avantaĝoj, same kiel la daŭrigo de la unupartia reĝimo, ŝanĝe de ilia akcepto de la monarĥio. Same, la monarkistoj devis akcepti ke la monarkio estus restarigita nur ene de la frankisma reĝimo. ***Franko*** ŝajnis ne zorgi pri la grandaj problemoj de la ŝtato, la plej grava el kiuj estis la persisto de inflacio kombinita kun ekonomia stagnado. Li okupiĝis pri ĉasoj kiuj iĝis famaj kiel la epicentro de la korupto de la reĝimo. La ministroj ne povis foresti el la kliko de la diktatoro, kiu ŝajnis ne ĝeni, ke ili neglektas registarajn aferojn. La entreprenistoj sponsoris multekostajn ĉasojn por proksimiĝi al ministroj.


En Aprilo de 1956, Franco subskribis kun profunda bedaŭro la sendependec-deklaron de la maroka protektorato de Hispanio. Kaj estis aliaj problemoj. ***Franco*** devis alfronti la konstantan kontraŭdiron inter la falangistoj kaj la monarkistoj.



**Monumenta "Valo de la Falintoj"**



**Juna *Juan Carlos* kun lia patro *Don Juan* de Burbono**



***Joaquín Ruiz-Giménez***



***Agustín Muñoz-Grandes***

Krome, la liberalaj iniciatoj en la universitatoj de la Ministro pri Edukado, ***Joaquín Ruiz-Giménez***, pliintensigis la streĉitecojn ene de la reĝimo. La Hispanaj studentoj, eĉ maldekstremaj kaj liberalaj, venis preskaŭ ekskluzive el riĉaj etburĝaj familioj kaj ne povis esti submetitaj al la brutala subpremo per kiu la laboristaj strikistoj estis kutime punitaj. Sed ***Franco*** ne havis flekseblecon por lerni pri tiuj novaj fortoj. Tial li tute erare interpretis studentan maltrankvilon ne konsiderante ĝin simptomo de la defaziĝo de la reĝimo rilate al la hispana socio. Sed li devis alfronti la indicon ke la plimulto de la studentoj konsideris la politikajn kaj armeajn aŭtoritatojn nekompetentaj kaj malmoralaj. Ĉar li ne pripensis la enkondukon de reformoj, ***Franco*** taksis la malkontenton kiel perturbon. Post la publikigo de iu universitata manifesto de komunisma inspiro en februaro, okazis manifestacioj de progresemaj studentoj de la Universitato de Madrido, kiuj estis disrompitaj de perfortaj grupoj de falangistoj. La radikaluloj de la Gvardio de ***Franco*** ellaboris liston de "perfiduloj", inkluzive de ***Ruiz Giménez***, kio kaŭzis la indignon de pluraj famaj generaloj, inkluzive de la Ministro de la Armeo, ***Agustín Muñoz Grandes***, kiuj persone esprimis sian malkontenton al ***Franco***.

La plej granda lerteco de ***Franco*** ĉiam estis kredigi ĉiujn grupojn en la frankisma koalicio, ke li vere subtenas ilin. Tio konfirmis la diktatoron kiel la arbitraciiston tenantan la sistemon kune. Sed la kontraŭdiroj inter falangistoj kaj monarkistoj pli kaj pli malfaciligis la ekvilibron sur kiu baziĝis lia persona politika potenco. Krome, ankaŭ la korupta konduto de lia familio vekis malakcepton en la reĝimaj fortoj. Ekde kiam la filino de ***Franco*** geedziĝis kun ***Martínez Bordiú***, ***Doña Carmen*** ĵetis sin en la altan socion kaj fordonis sin al sia pasio por juvelaĵoj kaj antikvaĵoj, kiuj igis ŝin akiri la moknomon "***Doña Collares***" (La Sinjorino de la Kolieroj).

En la baraktado de ***Franco*** por sin teni ekvilibre inter la kontraŭdiraj fortoj sur kiuj sin apogis lia reĝimo ludis gravan rolon la ministro ***Luis Carrero Blanco*** kiu, dum la 50-aj kaj 60-aj jaroj, rolis kiel sekretario de la diktatoro, kaj estis li kiu elpensis la formulon de interakordo inter la diversaj frankismaj fortoj dum la fina etapo de la diktaturo. Tiu formulo estis krei la leĝdonan kadron por aŭtoritatema

monarkio por certigi la supervivon de la frankismo post la morto de la diktatoro. Siavice ***Carrero Blanco*** havis sian propran asesoron por tiu tasko. Temis pri ***Laureano López Rodó***. Ĉi tiu apartenis al iu nova forto kiu estis akirante tiam egan influon en la frankisma kadro, la t. n. ***Opus Dei***, ia kvazaŭ religia ordeno kreita de ***José María Escrivá de Balaguer***, kiu povas esti plenrajte envicigita en la liston de tio kion ni nomis "operet-roluloj".




José Mª Escrivá de Balaguer



Laureano López Rodó



Mariano Navarro Rubio



Alberto Ullastres Calvo

***López Rodó*** estis kreanta administran maŝinon, kiu ebligus trakti la kompleksajn teknikajn problemojn de moderna ekonomio, kiuj estis tute nekompreneblaj por ***Franco***. Ĉi tiu devis agnoski ke Hispanio, krom la senbrida inflacio, havis same katastrofan pag-bilancon, parte pro la netaŭgeco de liaj ministroj, sed ankaŭ pro lia obstino en la konservado de la aŭtarkio. La neatentemo de ***Franco*** al administraj detaloj estis permesinta ke la troa ministra elspezo estu traktita per presado de mono. ***Franco*** ne komprenis la damaĝon kaŭzitan de la aŭtarkio aŭ ke Hispanio havis bezonon de kompleksaj ekonomiaj teknikoj. Li kontraŭvole akceptis la ideon de komerca liberaligo kaj integriĝo de Hispanio en la Organizon por Eŭropa Ekonomia Kunlaboro kaj la Internacia Mon-Fonduso. Restrukturante sian registaron en februaro 1957, li plue cedis sian personan kontrolon sur la hispana politiko; tiu kabineta krizo markis la komencon de la transiro de Franco de aktiva diktatoro al simbola figuro.

La novaj planoj estis ellaboritaj, kiel dirite, kunlabore kun la ĉiam pli influa ***Carrero Blanco***, kies scipovo pri ekonomio estis same rudimenta kiel tiu de lia estro. Tamen, li povis fidi je la talento de ***López Rodó***. La longperspektivaj implicoj de la kabinetŝanĝoj rekomenditaj de la juna ***Opus Dei***-ano iris preter tio kion ***Franco*** antaŭvidis. Ili kaŭzis ne nur la politikan senarmiĝon de la Falango, sed ankaŭ, dum du jaroj, la forlason de la ekonomia politiko de ***Franco*** kaj la alprenon de la moderna kapitalismo, kiu alportis enorman investon de fremdaj kapitaloj, industriigon, delokiĝon de la loĝantaro, urbanizadon kaj grandan evoluon de la edukado. ***Franco*** kaj la Falango iĝis historiaj anakronismoj, kvankam la diktatoro fine atribuis al si la meriton de la ekonomia evoluo, kiel li estis farinta pri "lia milittempa neŭtraleco". La fino de aŭtarkio estis atingita per

la inkludo de la “teknokratoj”, kies rolo estis enkonduki Hispanion en la tutmondan ekonomion. La nova Ministro pri Financoj, ***Mariano Navarro Rubio***, estis katolika advokato kaj direktoro de la ***Banco Popular***, kontrolita de la ***Opus Dei***. La nova Ministro pri Komerco estis ***Alberto Ullastres Calvo***, profesoro pri ekonomiko kaj, kiel ***López Rodó***, membro de la ***Opus Dei***, kies voto de malriĉeco distingis lin de lia antaŭulo. Estis dirite ke tiu triopo formis sinistran blokon kontrolitan fare de speco de katolika framasonismo. Certe estas, ke, dum la sekvaj jaroj, ili metis la bazojn por la supervivo de la reĝimo per ĉi ties ekonomia kaj politika transformiĝo, kiu nutris la rankoron de la Falango, tiam marĝenigita, kiu akuzis ilin pri forrabo de la ŝtat-estro kaj la reĝimo. En la nova situacio, desegnita de ***López Rodó***, la diktatoro, eĉ se li estus io pli ol ŝtatestro kun nur protokolaj funkcioj, li havus malpli da partopreno en la ĉiutaga administrado de la Registaro. La Registaro iĝis pli administra kaj malpli politika.
Printempe de 1957, la perdo de aĉetpovo de la laboristoj generis alian ondon da strikoj. ***Franco*** vidis malantaŭ la labor-konfliktoj la manon de komunistaj agitantoj kaj framasonoj. Li konsideris ke parolado pri nesufiĉaj salajroj kaj malsato estis fremda propagando. Ankaŭ en la printempo de 1958 okazis plia ondo da strikoj en la Asturiaj minejoj kaj en Katalunio, kiujn la diktatoro denove atribuis al eksterlandaj agitantoj kaj laborista mallaboremo. Sed li pli kaj pli delasis la registar-laboradon por dediĉiĝi al siaj ŝatokupoj. La tiama regantaro, gvidata de ***Carrero Blanco*** kaj subinspire de ***López Rodó***, estis preparante, en la politika kaj leĝa terenoj, la monarkion kiu devus sukcedi la frankismon kaj senpotencigi la falangismon. Fine de aŭtuno, la nova Papo Johano la 23-a entreprenis liberaligon de la Katolika Eklezio kiu kaŭzos gravajn problemojn por ***Franco*** kaj kiu, kombinita kun la kreskanta partopreno de hispanaj klerikoj en la movado de "laboristoj-pastroj", markis la finon de la  monolita faŝismo de la Eklezio.
Komence ***Franco*** rezistis akcepti la Stabilig-planon kiun proponis ministro ***Ullastres***. Li suspektis, ke post kiam li finance dependos de internacia bonvolo, li eble estos premata al politika reformo aŭ eĉ eksiĝo. Sed ***Ullastres*** venkis la malamikecon de la diktatoro montrante al li kiom proksime Hispanio estis al bankroto. La Stabiliga Plano adoptita la 6-an de marto 1959, la nova malplivalorigo de la peseto kaj la redukto de la publika elspezo havis gravajn sociajn sekvojn. Multaj kompanioj estis devigitaj fermiĝi, kio pliigis la senlaborecon. Tamen, malgraŭ ministra opozicio al la buĝet-reduktoj, ***Franco*** apogis la politikon. Li akceptis la teknikajn argumentojn, ĉar la aferoj estis de kompleksceco preter lia kompren-kapablo. En la sama tempo, li permesis al la monarĥistoj de sia kabineto desegni sian propran konstitucian skemon por sukcedado. ***Carrero Blanco*** donis al li la unuan skizon la 7-an de marto 1959, instigante lin por kompletigi la konstitucian procezon por ke la reĝo ne heredu lian potencojn kun la ebleco ŝanĝi ĉion. Ne dezirante fari ion ajn, kio povus akceli sian propran foriron, ***Franco*** lasis la projekton de Konstitucio netuŝita dum pliaj ok

jaroj. Lia konvinko ke esence nenio ŝanĝiĝis estis konfirmita per la festadoj de la dudeka datreveno de la fino de la Civita Milito, kiu inkludis la inaŭguron de la Valo de la Falintoj la 1-an de aprilo. La ĝojo de ***Franco*** tute ne reflektis la humoron de la plej multaj hispanoj. La laborista klaso pagis la sociajn kostojn ĉar salajroj estis frostigitaj, la senlaboreco altiĝis kaj estis manko de bazaj konsumvaroj.

En la malfruaj 1950-aj jaroj, ekzistis reviglîĝo de kaŝa sindikata agado, organizita fare de katolikaj grupoj same kiel la Komunista Partio kaj aliaj maldekstremaj formacioj. ***Franco*** pensis ke Hispanio denove estis sieĝita fare de la internacia komunismo kaj framasonismo. Sed, verdire, la laboristaj konfliktoj de tiuj jaroj tute ne havis politikan karakteron; temis pri nuraj depostuloj pri salajro-altiĝo. Krome la popolo sciis nenion pri la internaj bataloj de la reĝimo rilate al la afero de la sukcedado de ***Franco***. Fakte, la Komunista Partio de Hispanio estis jam rezigninta de antaŭlonge la bataladon kontraŭ la reĝimo de ***Franco*** pere de la geriloj. Ekde la jaro 1956 tiu kom.partio estis alpreninte la politikon tiel nomatan de "Nacia Repaciĝo", t. e. la sola batalado kiun ĝi postulis estis tiu, kiel la strikoj, kiuj estas leĝe permesitaj en ĉiuj demokratiaj landoj.

Cetere, la frankisma reĝimo ĝuis tiam je normala internacia akcepto, ĉefe post la subskribo de la Konkordato kun la RomKatolika Eklezio kaj la militista pakto kun Usono. Ĝuste fine de la jaro 1959 vizitis Hispanion la usona Prezidento ***Eisenhower***. La vizito, la unua de usona prezidento al Hispanio, simbolis la definitivan rehabilitadon de ***Franco*** post jaroj da ostracismo kaj lia akcepto kiel aliancano de Usono. ***Eisenhower*** surteriĝis en la usona aerbazo ***Torrejón de Ardoz***, apud Madrido, kie li estis akceptita de la diktatoro. Dum la vojaĝo inter la bazo kaj Madrido, la du ŝtatestroj estis vivuitaj de preskaŭ miliono da homoj; ***Eisenhower*** kaj ***Franco*** promenis tra la ĉefaj stratoj de la hispana ĉefurbo en malferma aŭto.

La restado de ***Eisenhower*** en Hispanio ne estis tre longa: li forlasis Hispanion matene de la sekva tago. Ĉi tiu vizito estis la plej alta punkto atingita de ***Franco*** en internacia politiko. La esprimoj de admiro de la emocia ***Franco*** por Usono igis la fratinon de la diktatoro komenti: "Se ***Hitler*** kaj ***Mussolini*** povus aŭdi lin!".



**Subskribo de Konkordato inter Hispanio kaj la Rom-Katolika Eklezio la 27-an de aŭgusto de 1953**













**Vizito de la usona Prezidento Eisenhower al Hispanio la 21-an de decembro de 1959**




Ade oni devas memori ke, kvankam nia raportado temas pri la korupto en Hispanio, ni devas atenti ankaŭ pri la faktoj kaj eventoj de la epoko en kiu la koruptado okazis; ĝi estas la fono aŭ scenejo sur kiu disvolviĝas tiu opereto kiu estas la korupto en Hispanio. Nu, ni priskribu la duan kaj lastan etapon de la frankisma reĝimo, kiu, laŭ la arbitra divido kiun ni faras, komencas en la jaro 1960. Tiam, la frankisma reĝimo estis spertinte, eĉ se la popolo ne perceptis tion, ian evoluon aŭ mutacion, se ne de la diktatoreca naturo de la frankismo, jes ja de la fortoj kiuj demarŝis la politikan potencon de la reĝimo. Konkrete, la faŝism-tipa Falango estis perdinte influon profite al la ***Opus Dei***, ia speco je katolika masonaro, ĉu filio de la tradicia, klasika framasonaro?, eble… aŭ eble ne… sed ĉiukaze plendediĉita al la sama celo, t. e. la konservado de la burĝa, kapitalista sociekonomia sistemo.

Al tiu ***Opus Dei*** apartenis, en tiu jaro 1960, la ĉefaj ministroj de la registaro de ***Franco***, kies fakta gvidanto estis ***Luis Carrero Blanco***. En la ekonomia kampo, la klopodoj de ***Ullastres*** kaj ***Navarro Rubio*** komencis doni fruktojn ekde tiam. ***Franco***, atribuis al sia genieco kaj prudento la “ekonomian miraklon” kiu estis rezulto de liberala ekonomio kaj integriĝo en la internacian kapitalist-sistemon, kiun li estis kondamninte ekde 1939. Ĉar krome estis epoko de daŭra internacia ekonomia kresko, eblis la eksportadon de troa labor-forto, plejparte al norda Eŭropo, kio generis sendaĵon de fremda valuto al Hispanio kaj ankaŭ produktis potencan turisman industrion por germanoj, francoj kaj britoj kiuj provizis Hispanion per valoraj valutoj. Al la kontraŭkomunismo kiu alportis la usonan helpon meze de la 1950-aj jaroj aldoniĝis la altiro al eksterlandaj investantoj la ekzisto de subpremaj laborleĝoj en Hispanio, same kiel la facileco por la re-patriigo de profitoj; Hispanio iĝis dolĉa celo por eksterlandaj investoj en la fruaj 1960-aj jaroj.


La teknokratoj estis tre fortigitaj per la relativa sukceso de la Stabiliga Plano. La ekonomiaj ŝanĝoj implicitaj en iliaj politikoj kaŭzis la senesperon de la Falango. La 19-an de decembro de 1960, ***Navarro Rubio*** anoncis la unuan Planon pri Disvolvigo, kiu estis preparita kunlabore kun la Monda Banko. Sed la reĝimo estis malvolonta fari ŝanĝojn al sia politika formo de diktaturo. En

februaro 1961, ***Carrero Blanco*** prezentis raporton en kiu li avertis pri la bezono malakcepti ĉiun usonan premon favore al politika liberaligo. ***Franco*** ŝajnis nekonscia ke liaj malamikoj ne estis tiuj de 1936, sed junaj laboristoj pretaj striki kontraŭ longaj horoj, malaltaj salajroj kaj danĝeraj kondiĉoj, kaj progresemaj eŭskaj kaj katalunaj studentoj kaj pastroj kiuj denuncis la kontraŭ-naciisman subpremon.
Krom la teknokratoj de la ***Opus Dei***, aliaj elstaraj administrantoj de la reĝimo en la 1960-aj jaroj, kiel ***Manuel Fraga*** kaj ***Torcuato Fernández-Miranda,*** kutimis difini sin kiel falangistojn, sed estus pli ĝuste difini ilin kiel meritokratiaj oficialuloj. La teknike kompetentaj oficialuloj kiuj elstaris inter 1957 kaj 1973 estis konsideritaj "nepolitikaj" laŭsence ke ilia ĉefa zorgo estis la efika administrado prefere ol lojaleco al specifa frakcio de la reĝimo. En situacio de kreskanta prospero, la sola minaco al la kontinueco de la diktatoro ŝajnis esti lia sano, kvankam la socia malordo deĉenigita de la ekonomiaj transformoj donis flugilojn al la opozicio en la fabrikoj, la universitatoj kaj la regionoj. Ĉasakcidento kiu okazis fine de 1961 vekis panikon pri la morto de ***Franco***. La ĉaspafilo de la diktatoro eksplodis, kaŭzante gravajn vundojn al lia maldekstra mano. La zorgo por la estonteco estis pliigita kiam grandaj strikoj ekis printempe de 1962 en Asturio kaj en egparto el la norda industrio.
Por konservi la impeton de la ekonomiaj reformoj iniciatitaj fare de la teknokratoj, la ministro pri Eksteraj Aferoj ***Fernando María Castiella*** kaj la financ-ministroj konvinkis ***Franco***-n permesi al Hispanio peti membrecon de la Eŭropa Ekonomia Komunumo. Fine, la EEK konsentis intertrakti ekonomian interkonsenton, sed insistis ke, antaŭ ol pripensi ajnan politikan ligon, estus necese enkonduki gravajn konstituciajn ŝanĝojn en Hispanio. La rifuzo de la Eŭropa Komunumo okupiĝi pri politikaj intertraktadoj konvinkis al Franco ke Hispanio daŭre estis ĉirkaŭata de malamikaj fortoj celkonsciaj faligi lin, ideo kiu estis plifortigita per la ekapero de strikoj en asturiaj minejoj kaj en la eŭska ŝtalindustrio printempe de 1962. Estis farita amasa kaj brutala deplojo de la Civil-Gvardio kaj de la polico kontraŭ la ministoj kaj ties virinoj, sed malgraŭ tio la strikoj disvastiĝis al Katalunio kaj Madrido, kaj ne ĉesis pro la subpremo, sed pro la salajraltigoj, kio konsistigis sukceson por la renaskiĝanta laborista movado. En la ekonomia reviviĝo, kiu sekvis la severecon de la Plano pri Stabiligo de 1959 ĝis 1961, la venko de la laboristoj pruvis, ke ŝtataj entreprenoj kaj industriistoj de la privata sektoro pretis pagi cele eviti interrompon de sia valora produktado. ***Franco*** denove atribuis la agitadon al eksteraj agentoj kaj estis perpleksa pro la apogo de multaj pastroj al la labor-istoj, ĉefe en Eŭskio. Rilate al la konflikto, li reprenis la vortprovizon de la Civila Milito pri la "malamiko" kaj fremdaj komunistaj kaj framasonaj agitantoj. La malsukceso de la reĝimo en siaj provoj alproksimiĝi al EEK kaj la strikoj de 1962 altiris la simpatiojn de Eŭropo al la kontraŭfrankisma opozicio. Por profiti tion, proksimume okdek monarĥistoj, katolikoj kaj elrevigitaj falangistoj, loĝantaj en Hispanio, renkontiĝis kun 38 ekzilitaj socialistoj kaj eŭskaj kaj katalunaj naciistoj en Munkeno en la 4-a Kongreso de la Eŭropa Movado de la 5-a ĝis la 8-a de junio 1962. La renkontiĝo, finiĝis per modera kaj paca deklaro postulanta la

politikan evoluon de Hispanio. ***Franco*** ekkoleris pri tio, kion li vidis kiel komploto por subfosi la reĝimon fare de framasonoj, judoj kaj katolikoj, kaj insistis pri suspendo de la malabundaj konstituciaj garantioj tiam ekzistantaj. Multaj el la hispanaj delegitoj, inkluzive de ***Dionisio Ridruejo*** kaj ***José María Gil Robles***, estis arestitaj kaj deportitaj pro sia partopreno en tio, kio estis malestime nomita “la Munkena Konkubado” (***Contubernio de Munich***, en la hispana lingvo), kaj en la publikaj amaskomunikiloj kaj en publikaj paroladoj de ***Franco***. Munkeno ŝajnis pravigi komunistajn asertojn, ke ilia politiko de “nacia repaciĝo”, adoptita en 1956, estis fruktodona per la kreado de ampleksa fronto de kontraŭfrankismaj fortoj. Krome, post la Dua Vatikana Koncilio en 1959, estis indicoj de konflikto kun la Romkatolika Eklezio. La encikliko ***Mater et Magistra*** de la papo en 1961 maltrankviligis radikalulojn en la frankisma kabineto per ĝia postulo pri justaj salajroj kaj humanaj kondiĉoj por la laboristoj, redistribuaj impostoj kaj sindikataj rajtoj.

La reago de ***Franco*** al la Munkena Konspiro estis grava eraro. ***Castiella*** kaj la hispanaj ambasadoroj en Parizo, ***José María de Areilza***, kaj en Vaŝingtono, ***Antonio Garrigues***, informis lin pri la damaĝo kaŭzita. Ĉiam atentema pri minacoj al lia supervivo, la diktatoro respondis per grava registara reorganizo. La ekonomia linio de la teknokratoj firmiĝis per la nomumo de la dinamika ***Gregorio López-Bravo***, 38-jara, kiel Ministro pri Industrio. Aliaj pli “progresemaj” teknokratoj de la ***Opus Dei*** anstataŭigis falangistojn: ***Manuel Lora Tamayo*** kiel Ministro pri Edukado kaj ***Jesús Romeo Gorría*** kiel Ministro pri Laboro. Ĉefa ŝanĝo estis la promocio de ***Manuel Fraga Iribarne*** kiel Ministro pri Informado por ripari la damaĝon kaŭzitan de la gazetara reago al la Munkena Konspiro.

Por konservi sian politikan potencon, ***Franco*** metis sian esperon sur kombinaĵo de brutala subpremo kaj pli da ekonomia kresko. Daŭre oftis la arestoj kaj torturo de maldekstremaj aktivuloj. Nova ondo de strikoj en Asturio kaj Katalunio dum la monatoj de aŭgusto kaj septembro de tiu jaro 1962 estis kontraŭbatalita per severa polica agado. Dume, konstru-spekulistoj, kiuj koluziis kun altrangaj publikaj oficistoj, amasigis grandegajn riĉaĵojn. En Barcelono, dum la mandato de urbestro ***Josep Maria Porcioles***, la urbo-domo reklasifikis privatajn kaj publikajn proprietojn kiel sportejojn kaj eksproprietigis terenojn. Poste, la notari-oficejo de





**Frankista propagand-mobilizo kontraŭ la “Munkena Konkubado”**

***Porcioles*** administris la necesajn konstru-permesojn por la konstru-firmao de ***Josep Maria Figueras***, kies bofrato, hazarde, estis la delegito de la Municipa Servo de Urboplanado. En la provinco Valencio, inter 1960 kaj 1975, dum la tempo kiam la falangisto ***Adolfo Rincón de Arellano*** funkciis kiel guberniestro, la nombro de loĝantoj pliiĝis je unu miliono, atingante tri milionojn. La sekva urba ekspansio kaŭzis grandan spekuladon kaj la aperon de riĉaĵoj atingitaj per la trafiko de permesoj kaj licencoj.


La barbara karaktero de la reĝimo ĝenerale kaj de ***Franco*** konkrete evidentiĝis per la proceso kaj ekzekuto de la komunisto ***Julián Grimau*** en 1963, kiu provokis ondon da manifestacioj kontraŭ la frankismo en la ĉefaj urboj de Eŭropo kaj Ameriko. Bedaŭrinde por la reĝimo, la proceso de ***Grimau*** koincidis kun la grava reformisma encikliko ***Pacem in Terris*** de la Papo Johano la 23-a, kiu defendis homajn rajtojn kiel liberecon de asociiĝo, sinesprimo kaj politika partopreno, kio reasertis la konvinkiĝon de ***Franco***, ke la Vatikano estas nesto de framasonoj kaj komunistoj. Malgraŭ la internaciaj postefikoj, li insistis ke ***Grimau*** mortu. La sekva reago de internacia rifuzo subfosis la klopodojn plibonigi la bildon de la reĝimo. Kvar monatojn poste, post mallonga proceso, du anarkiistoj, ***Francisco Granados Gata*** kaj ***Joaquín Delgado Martínez***, estis ekzekutitaj per garroto pro sia supozita implikiĝo en bombatako sur la Madrida policĉefstabejo. La internacia klamado, kvankam pli milda ol en la kazo ***Grimau***, estis konsiderinda.

Tiaj politikaj eraroj, kune kun ekonomia ŝanĝo, vundis la reĝimon. Eĉ la Falanĝo estis malpli fidinda: ĝia gvidado konsistis el korupta gerontokratio kaj ĝiaj pli junaj membroj estis cinikaj kaj ambiciaj funkciuloj. Ankaŭ la liberaligo de la Eklezio sekvanta la Duan Vatikanan Koncilion havis sian efikon; la novaĵo, ke la progresema kardinalo ***Montini*** estis elektita kiel papo, kun la nomo de Paŭlo la 6-a, atingis ***Franc***o-n dum registar-konsilio la 21-an de junio 1963 kaj igis lin ekkrii amare: “Duŝo da frida akvo”. Kun moto elpensita de ***Fraga,*** “Dudek kvin jaroj da Paco”, dum 1964 estis organizitaj kolosaj festoj, je ega kosto, por la datreveno de la fino de la Civita Milito. Hagiografiaj libroj kaj artikoloj estis publikigitaj kiuj klopodis transformi ***Franco***-n, kies legitimeco antaŭe baziĝis sur milita venko, en paradigmon de paco. En aprilo, la festado estis senbriligita per


Fernando María Castiella


José María de Areilza


Antonio Garrigues Walker


Gregorio López Bravo


Manuel Lora Tamayo


Manuel Fraga Iribarne


Jesús Romeo Gorría


Josep Maria Porcioles

reviglIĝo de strikoj en Asturiaj minejoj en protesto kontraŭ nova laborleĝaro. La brutala subpremado kaŭzis la maldungon de multaj viroj kaj la aresto de strikistoj, multaj el kiuj restis en malliberejo ĝis 1970. Krome, tio estis kialo de konfrontiĝoj en la Registaro. ***Romeo Gorría*** akuzis ***López-Bravo***-n esti inklina aĉeti la strikistoj. ***Franco*** apogis ***López-Bravo***-n kaj komentis ke la Ministrejo pri Laboro kaj la Falanga Sindikata Organizo estis infiltritaj fare de komunistoj. Laŭ li multaj ministoj "obeas okultajn potencojn". Li pripensis intensigi la subpremadon, sed ***Fraga***, ***Castiella*** kaj la reformistoj sukcesis konvinki ***Franco***-n, ke pli da perforto estus kontraŭefika.

La populara aklamado en Hispanio igis ***Franco***-n pli sentema al kritiko de eksterlande. La kreskanta ondo da strikoj, studentaj manifestacioj kaj tumultoj en Katalunio kaj Eŭskio ĝuis larĝan priraportadon de la eŭropa gazetaro, inkluzive de kelkaj katolikaj publikaĵoj. ***Franco*** supozis ke la subfosado en Hispanio estis la laboro de sinistraj eksterlandaj fortoj kaj estis perpleksa pro la kritiko al lia registaro eliranta el la Vatikana Koncilio. Lia konvinko esti instrumento de la dia providenco estis neskuebla, kaj tio ofte estis konfirmita per la troa laŭdado de kelkaj sektoroj el la hispana eklezia hierarkio. Li konsideris la koleron de Vatikano pro la malliberigo, torturo, elpelo, kaj eĉ ekzekuto de la malamikoj de la reĝimo, kune kun la kresko de la katolika laborista organizo **HOAC**, indicon de komunista enfiltriĝo. La sieĝa pensmaniero de ***Franco*** kaj ***Carrero Blanco*** estis kontraŭa al la humanisma kaj plurala renovigo de Katolikismo, kiu disvolviĝis en Romo. La evoluo de la sintenoj de multaj superaj membroj de la hierarkio estis akompanata de la radikaliĝo de la laboristaj pastroj, kiuj spertis propraokule la malfacilaĵojn de migrantaj laboristoj loĝantaj en la antaŭurboj de la grandaj industriaj urboj. En septembro de 1964, kiam la Koncilio aprobis rezolucion petante al la ŝtatoj prirezigni la privilegion de interveno en la nomumo de episkopoj, ***Franco*** firme rifuzis negoci pro timo ke la nuncio nomumus episkopojn pli zorgemajn pri la intereso de iliaj komunumoj ol por servi la ŝtaton. Malgraŭ lia daŭra entuziasmo por ĉasado kaj fiŝkaptado, la sano de ***Franco*** montris signojn de malboniĝo, kun simptomoj de Parkinson-malsano.

Notindas ke la tiamaj politikaj intrigoj, malkonkordo interne de la registaro, premoj de la monarkistoj por la nomumo de

la sukcedonto de la diktatoro… estis aferoj pri kiuj la hispana popolo, la ĝenerala publiko, sciis nenion. ***Franco*** prokrastigis ĉion kaj faris nur ŝanĝeton en la registraro kiel la nomumo de la monarkisto ***Faustino García Moncó*** kiel Ministro pri Komerco en 1965. La malboniĝo de la sano de ***Franco*** estis evidenta. Konsiderante sian aĝon kaj la neceson je sukcedo, la 13-an de junio 1966, li transdonis al ***Carrero*** la skizon de la Organika Leĝo de la Ŝtato. La leĝo ne estus debatebla. Ĝi estus prezentata unue por aprobo de la Kortesoj kaj poste al la popolo sen iu ajn publika pravigo aŭ klarigo.
Kiam ***Franco*** prezentis la Organikan Leĝon de la Ŝtato al la Kortesoj la 22-an de novembro 1966, li fanfaronis pri la sukcesoj de sia regado. La tono estis de adiaŭo sed li proklamis ke li ne retiriĝos. La diktatoro petis al la kortesanoj aprobi la leĝon sen debatado pri ĝiaj dek sekcioj, kion ili faris per aklamo. Tri semajnojn poste, ***Franco*** alparolis al la nacio petante jesan voĉdonon en proksima referendumo. Konforme al la oficiala devizo "**Franco jes!**", li transformis la konsulton en plebisciton pri si. Li asertis ke la demokratio estis fikcio kaj ke la eksterlanda malamikeco estis pruvo de internacia admiro pri lia reĝimo. Sur ĉiu strato kaj ŝoseo estis gigantaj afiŝtabuloj surportantaj la bildon de la diktatoro. Oni ripetis ĝis naŭze, ke voĉdoni "ne" estus voĉdoni por Moskvo. Sen ia ajn debatado pri tiu nekomprenebla leĝo, la 14-an de decembro de 1966, voĉdonis 88 elcentoj el la balotrajta loĝantaro kaj malpli ol 2 elcentoj voĉdonis "ne". La opozicio estis silentigita. Estis kazoj de multobla voĉdonado kaj eĉ lokoj kie la efikeco de la aŭtoritatoj igis pli ol 120 procentojn de la balotantaro voĉdoni "jes". En aliaj, la balotoj ne estis kontrolitaj, sed oni notis laŭvole la rezulton. La plej alta nivelo de sindetenoj kaj neaj voĉdonoj estis registrita en industriaj urboj. La ŝtata teroro farita inter 1936 kaj 1944 estis generinta ĝeneralan politikan apation.
La teknokratoj esperis ke, laŭ la dispozicioj de la nova Organika Leĝo, la diktatoro nomumos ***Carrero-Blanco***-n prezidanton de la Konsilio de Ministroj. Fine, ***Franco*** nomumis lin Vicprezidanton la 21-an de septembro 1967 kaj transdonis la kontrolon de la Registaro. ***Carrero*** estis servinta lin lojale ekde 1941 kaj liaj opinioj estis preskaŭ nedistingeblaj de tiuj de la diktatoro. Tamen, lia favora teniĝo rilate al ***Juan Carlos*** vekis alarmon de la falangistoj. Ili timis ke, ***Juan Carlos*** pavimus la vojon al liberala monarkio kaj la fino de



*Faustino García Moncó*



**Prezentado, far la Diktatoro, de la Ŝtata Organika Leĝo**











**Propagando de la reĝimo favore al jesa voĉdono en la Referendumo de 1966**



Alfonso Pérez Viñeta



Tomás García Rebull



Carlos Iniesta Cano



Angel Campano López

iliaj privilegioj, tial ili alfrontis la ***Opus***-n en la mez-1960-aj jaroj, uzante la gazetaron de la reĝimo por tion fari. Rondo de dekstruloj kiuj renkontis en ***El Pardo*** faris sian propran insidan kampanjon por ultrakonservativismo, por kiu ili provis altiri la pli kaj pli kadukan ***Franco***-n. Tiu cirklo inkludis ***Cristóbal Martínez Bordiú***, ***Doña Carmen*** kaj radikalajn falangistojn kiel ***Girón***, kiuj havis kontaktojn kun reakciaj soldatoj kiuj konsideris la Armeon esti la pretoriana gvardio de la reĝimo. Ĉe la fino de la 1960-aj jaroj, kelkaj el la plej eminentaj falangistaj generaloj, ankaŭ nomitaj "bluuloj", kiel ***Alfonso Pérez Viñeta***, ***Tomás García Rebull***, ***Carlos Iniesta Cano*** kaj ***Ángel Campano López***, tenis ŝlosilajn funkciajn poziciojn. En liaj pli postaj jaroj, plejparte pro lia malsano kaj la medikamentoj kiujn li prenis por mildigi simptomojn, ***Franco*** iĝis pasiva ponto inter tiuj grupoj. La diktatoro kunhavis la projekton de ***Carrero Blanco*** kaj ***López Rodó*** pri transiro al aŭtoritatema monarkio, sed kiam li maljuniĝis, liaj instinktoj estis pli emaj aŭskulti la alarmismajn rakontojn pri eventoj prezentitaj al li de tiu kliko.


La studenta revolucio de 1968, eĉ se malpli ol en Francio, ankaŭ havis mobilizojn en Hispanio. ***Franco*** estis konvinkita ke la studentaj tumultoj estis laboro de eksterlandaj agitantoj kaj ke la radikalaj pastroj estis kaŝaj komunistoj. Li ĝojis pro la perforta subpremo de maldekstraj kaj liberalaj pastroj kaj universitat-studentoj far generalo ***Pérez Viñeta***, Kapitan-Generalo de Katalunio. Por li, ne eblis repaciĝo kun liaj malamikoj. Li estis konsternita de la kreskanta progresemo de la Eklezio kaj la agado de la episkopoj kiuj kondamnis la policsubpremon. Ĉar pli kaj pli da pastroj subtenadis la laboristojn kaj la regionisman opozicion al la reĝimo, en la somero de 1968, ***Franco*** rajtigis la kreadon de malliberejo por pastroj en Zamoro, kun kapacito por pli ol 50 religiuloj. Pro la movo de parto de la Eklezio maldekstren, aperis ekstremdekstra antiklerikalismo ene de la reĝimo, inter la Falango, la karlistoj kaj la militistaro. Pluraj novnaziaj grupoj, kiel la **Nova Forto** de ***Blas Piñar***, la **Gerilanoj de Kristo Reĝo** k. a. faris terorismajn atakojn kontraŭ ĉio, kio ŝajnis liberala aŭ maldekstrema, ĉu ili estis pastroj aŭ laboristoj. En renkontiĝo kun ***Dean Rusk*** en novembro de 1968, por diskuti pri la renovigo de la usona interkonsento, iu apenaŭ lucida ***Franco*** faris malmulton pli ol grumblon de unusilaboj. Lia jarfina mesaĝo, estis malforta kondamno de la universitataj tumultoj.


La kontraŭfrankisma opozicio ne estis nur tiu de la fortoj de maldekstraro; estis ankaŭ la naciismaj movadoj. En la jaro 1969 estis jam sufiĉe perceptebla la radikaliĝo de la eŭska naciismo kiu konkretiĝis en la terorisma organizaĵo ETA. En tiu jaro pliintensiĝis la intrigoj kaj malakordo interne de la frankisma reĝimo kaj la premoj sur la diktatoro por ke li decidu ion pri la afero de lia sukcedado, sed pri ĉi lastaj aferoj la hispana popolo eksciis tiam preskaŭ nenion. Pro la senpacienco de la teknokrataj ministroj, ***Franco*** decidis anonci la 17-an de julio sian decidon ke ***Juan Carlos*** estu lia sukcedonto kiel reĝo. Sed dirinte nenion pri la afero al ***Juan Carlos***, kiu estis vizitonta lian patron en Portugalio, ĝis lia reveno la 12-an de julio, ***Franco*** ruze provokis la rompon inter patro kaj filo, ĉar ***Don Juan*** supozis, ke lia filo estis trompinta lin, kaj tiel la rilatoj inter ili restis streĉitaj dum iom da tempo. Al ***Juan Carlos*** oni asignis la titolon de «Princo de Hispanio», kaj ne tiu de «Princo de Asturio», tradicia por la heredonto de la trono. Tiel, ***Franco*** interrompis kaj la kontinuecon kaj la dinastian legitimecon de la Burbonoj. La nova monarkio estis lia. En sia interveno antaŭ la Kortesoj la 22-an de julio, la diktatoro fieris pri la precizeco de la instrumentoj kreitaj por la sinsekvo. La princo ĵuris fidelecon al la Principoj de la Movado (la baza ideologio de la reĝimo), post kiam lia konsilisto ***Torcuato Fernández-Miranda*** certigis al li ke la ĵuro ne malhelpus estontan procezon de demokratia reformo.

Meze de aŭgusto 1969, eksplodis la politika bombo de la skandalo MATESA (Tekstila Maŝinaro de Norda Hispanio), firmao de fabrikado de tekstila maŝinaro. Sub la gvidado de ***Juan Vilá Reyes***, MATESA evoluigis sennavedan teksilon kiu estis eksportita al Eŭropo, Latin-Ameriko kaj Usono. La ŝajna sukceso de ***Vilá Reyes*** igis lin unu el la referenculoj de la teknokratoj. Por akiri eksportkreditojn, la firmao malfermis filiojn en Latin-Ameriko, kiuj mendis grandan nombron da teksiloj. Sed financaj neregulaĵoj estis malkovritaj kaj estis asertite ke la filioj kaj iliaj mendoj estis fraŭda mekanismo por atingi krediton kaj ke proksimume dek miliardoj da pesetoj el ŝtataj fondusoj estis defraŭditaj por financi ***Opus Dei***-operaciojn eksterlande. Kaj por la riĉigo de ***Vilá Reyes***. La ministroj akuzitaj je kunkulpeco en la intrigo estis ***Faustino García Moncó*** (Komerco), ***Juan José Espinosa de San Martín*** (Fisko) kaj ***Gregorio López-Bravo***


**Blas Piñar López**


**TorcuatoFdez. Miranda**


**Juan Vilá Reyes**


**Juan José Espinosa de San Martín**




**Disturboj en 1968 en la universitatoj**



**Proklamo de *Juan Carlos* kiel Princo de Hispanio la 22-an de julio de 1969**



***Tomás Garicano Goñi***



***Alfredo Sánchez Bella***

(Industrio), kune kun la Guberniestro de la Banko de Hispanio, ***Mariano Navarro Rubio***. ***Franco*** ne estis maltrankvila, ĉar ***Vilá Reyes*** konvinkis al li ke la firmao simple transsaltis kadukiĝintajn regularojn por akceli tre bezonatajn eksportaĵojn por la lando.


Tamen la problemoj de la firmao plimalboniĝis kiam la gazetaro de la reĝimo uzis la aferon por deĉenigi perfortan kampanjon kontraŭ la ***Opus***. ***Solís*** esperis rompi la hegemonion de la ***Opus-Dei***-teknokratoj antaŭ la komenciĝo de la postfrankisma estonteco de ***Juan Carlos***, sed lia intrigo fiaskis. ***Franco*** kaj ***Carrero*** estis jam maltrankvilaj pri la liberaligo de la presaro kiun ***Fraga*** iniciatis, kaj ili ĉagrenis pro la provo ŝanĝi la planojn kiujn la ***Opus-Dei***-anoj estis desegnintaj por la sukcedo de ***Franco*** far ***Juan Carlos***. La raporto de ***Carrero*** emfazis la "bedaŭrindan neglekton" de la ministroj implikitaj kun la damaĝo al la internacia kredindeco de Hispanio kaŭzita de la presara kampanjo. La raporto de ***Carrero*** konvinkis la diktatoron, ke la gazetara reto de ***Solís*** kaj la Informad-Ministerio de ***Fraga*** klopodis damaĝi la registaron. ***Espinosa San Martín*** kaj ***García Moncó*** eksiĝis, sed ***Franco*** ne pridubis ilian honestecon. ***Carrero Blanco*** volis eksigi ankaŭ ***Fraga***-n kaj ***Solís***-n. Li konvinkis ***Franco***-n ke ***Solis*** provis konstrui sendependan potencan platformon kaj ke la pri-gazetara leĝo de ***Fraga*** permesis pornografion kaj komunisman propagandon. La diktatoro respondis per registara reorganizo la 29-an de oktobro de 1969 en kiu unuafoje ***Carrero***, kun la helpo de ***López Rodó***, ludis decidan rolon en la elekto de ministroj. La prezidanteco de ***Franco*** estis iomete pli ol simbola. La dinamika ***Gregorio López-Bravo*** anstataŭis ***Castiella***-n kiel ministro pri Eksteraj Rilatoj. ***Fraga*** estis anstataŭita de la ***Opus-Dei***-ano ***Alfredo Sánchez Bella***; ***Solís***, de la ruza ***Torcuato Fernández-Miranda***, ankaŭ el la ***Opus-Dei*** kaj ĉefa konsilisto de ***Juan Carlos***. La ***Opus-Dei*** kontrolis Edukadon, Informadon, Eksterajn Rilatojn kaj la kvar ministeriojn de ekonomio: Financo, Komerco, Industrio kaj la Evoluplano. ***Alonso Vega*** estis anstataŭigita per burokrata militista advokato, ***Tomás Garicano Goñi***. La "unukolora registaro" konsentis en sia subteno al ***Juan Carlos***.

La internaj disputoj de la reĝimo pri la kazo MATESA preteriris la rivalecon pri la privilegioj de potenco. Ili ankaŭ reflektis malkontenton pro la laborista, studenta, kaj regiona agitado. La subtenantoj de ***Franco*** komencis dividi en frakciojn kiuj

ne reproduktis la tradiciajn dividojn inter falangistoj, monarkistoj kaj katolikoj, sed prefere diverstipajn grupojn celante viv-opciojn post la morto de la diktatoro.


Tial ke la unukolora registaro ne kapablis solvi la gravajn problemojn kaj daŭris la boladon de hispana socio, ***Franco*** kaj ***Carrero*** refalis en la sieĝan senton de la 1940-aj jaroj. La plej evidenta signo de la radikala turno kiun la okazaĵoj prenis por la interesoj de ***Franco*** estis la nomumo de ***Vicente Enrique y Tarancón*** kiel primato de Hispanio laŭ peto de la papo Paŭlo la 6-a en februaro 1969. La Kardinalo ***Tarancón***, engaĝita al la progresema spirito de la 2-a Vatikana Koncilio, estis la instrumento per kiu Romo distanciĝis de la reĝimo. Dume, la pliiĝo de opozicio en universitatoj, fabrikoj, kaj historiaj naciecoj reflektis la limigojn de ekonomia kresko en la 1960-aj jaroj. La planoj por ekonomia disvolvigo estis akompanitaj de neefikeco, korupto kaj altaj sociaj kostoj kaj tute ne kontribuis al redistribuo de riĉaĵo aŭ malpliigo de teritoriaj malekvilibroj. Kiam la evoluo de la 1960-aj jaroj komencis malrapidiĝi, la teknokratoj respondis per severaj rimedoj, kiuj neeviteble pliigis la nombron da strikoj. La ekonomia kresko kreis novan laboristan klason, kies militeco povus esti kontrolita nur per konstante plibonigado de vivnivelo aŭ plia subpremo. Ja, la unukolora registaro de ***Carrero*** intencis doni kontinuecon al Frankismo post ***Franco*** per ekonomia prospero, sed sen ia politika liberaligo. Tiel, antaŭ la fino de 1969, ***Fernández-Miranda*** estis devigita forĵeti la projekton de leĝigo de politikaj asocioj, pro timo ke ili povus estigi aŭtentajn partiojn.

La jaro 1970 komenciĝis per striko de dudek mil ministoj en Asturio, devigante la importon de la karbo necesa por la ŝtalindustrio. Antaŭ la somero jam okazis gravaj laborkonfliktoj en la ŝipkonstruejoj, la konstruentreprenoj de Granado kaj Madrido kaj la metroo de tiu urbo, kie 3.800 dungitoj estis devigitaj reiri al laboro kiam la kabineto dekretis militan mobilizadon, kio ebligus ke ili estu juĝitaj pro milit-ribelo. Dum la striko en Asturio, la Ĉefepiskopo de Oviedo, ***Gabino Díaz Merchán***, kondamnis la reprezaliojn de la registaro kontraŭ la ministoj. La 21-an de julio, estis polica pafado kontraŭ manifestacio de 2.000 konstrulaboristoj en Granado, kaŭzante tri mortojn kaj plurajn vundojn. La Granada katedralo kaj kelkaj preĝejoj disponigis azilon al la strikistoj fronte al la polico. Dum la gazetaro de la reĝimo akuzis la


Kardinalo *Vicente Enrique y Tarancón*


*Gabino Díaz Merchán*


*Emilio Benavent Escuín*


*Santiago Carrillo*



**Nepino de *Franco*, edziniĝinta al iu nepo de la reĝo *Alfonso* la 13-a**













**Vizito de *Nixon* kaj *Kissinger* al Hispanio en septembro de 1970**

lokan pastraron je provoko de la striko, la 28-an de julio la Ĉefepiskopo de Granado, ***Emilio Benavent Escuín***, kondamnis la polican perforton kontraŭ la laboristoj. La subteno de pastroj al la laboristaj aspiroj malfermis breĉon inter katolikoj kaj la frankisma ŝtato. Ĉar prezoj plialtiĝis en la aŭtuno, okazis alia ondo da strikoj tra la tuta lando, ĉefe tiu de dudek mil konstrulaboristoj en Madrido. La brutala respondo de la reĝimo konvinkis multajn laboristojn kaj etburĝajn profesiulojn pri la neceso de politika ŝanĝo.

La Komunista Partio vidis la strikojn kiel signojn de popola subteno por ĝia strategio de ampleksa alianco de kontraŭ-reĝimaj fortoj, la "Pakto por Libereco". Dum la 1960-aj jaroj, pliiĝis la komunista membraro en la universitatoj kaj fabrikoj kie la neleĝa komunista sindikato konkuris kun la t. n. "vertikalaj" falangist-sindikatoj. En 1970, la komunista gvidanto ***Santiago Carrillo*** jam diris, ke la Kom.partio eliris el la katakomboj por kunlabori kun aliaj progresemaj kaj maldekstremaj grupoj en studentaj, laboristaj kaj najbaraj asocioj. La dividoj ene de la frankismo estis kreskantaj. Kun la diktatoro montranta kreskantan senilecon kaj la plimalboniĝantan ekonomian situacion, la teknokratoj nervoziĝis. ***Carrero*** refalis en siajn ultrakonservativajn tendencojn. La kazo MATESA forigis la opcion de reformisma falangismo kaj eĉ frankisto kia ***Manuel Fraga*** komencis adopti pli progreseman teniĝon. Aliaj timis ke la bonaj tagoj de korupto kaj senpuna subpremo estis finiĝontaj. La frankistoj estis dividitaj inter la tiel nomitaj ***"aperturistas"*** (malfermistoj), gviditaj de ***Fraga***, la grizaj teknokratoj, nomitaj ***"continuistas"*** (daŭrigistoj), kaj la necedemaj ultrakonservativuloj aŭ ***"inmovilistas"*** (senmovecistoj). La veteranaj kaj plej radikalaj falangistoj, la **Nova Forto** de ***Blas Piñar***, la oficiroj de la polico, la Armeo, la Civilgvardio kaj la familia rondo de ***Franco*** kuniĝis por batali kontraŭ la progresismo ĝis la fino, pro kio ili estis nomitaj per la hitlera kromnomo de "bunkro". En opozicio al la defendo de ***Juan Carlos*** de la teknokratoj, la bunkro estis subtenanto de ***Alfonso de Borbón-Dampierre***, filo de la pli maljuna frato de ***don Juan***, ***Jaime***, kaj fianĉo de la plej aĝa nepino de ***Franco***, ***María del Carmen Martínez Bordiú***.

En septembro de 1970, ***Richard Nixon*** vizitis Hispanion akompanate de ***Henry Kissinger***. Vaŝingtono daŭre havis strategian intereson en Hispanio kaj deziris moderan evoluon

de la reĝimo post la morto de ***Franco***. La usona politiko estis konservi kunlaboron kun la frankismo sed kontaktante kun la modera opozicio. Kiam ***Nixon*** kaj ***Kissinger*** renkontiĝis kun ***Franco*** por tio kio laŭsupoze estis "gravaj konversacioj", ili estis mirigitaj trovi la 78-jaraĝan diktatoron dormetante dum ***Nixon*** parolis.

***Carrero*** kaj la plej ultrakonservativaj generaloj, moknomitaj "blu-uloj", konvinkis la diktatoron alfronti la terorisman organizaĵon ETA per ŝajna proceso de 16 eŭskaj kaptitoj, inkluzive de du pastroj. La juĝaj farsoj de la reĝimo antaŭe estis okazigitaj malantaŭ fermitaj pordoj, sed ĉar eklezianoj estis inter la akuzitoj, la Vatikano premis por publika proceso. La proceso, kiu komenciĝis la 3-an de decembro en Burgoso, estis unu el la plej longaj iam okazigitaj de la reĝimo. La teniĝo de la armeaj prokuroroj enfokusigis mondan atenton sur la naciismaj aspiroj de la 16 akuzitoj kaj multaj aliaj eŭskoj. En la tribunalejo, la akuzitoj elstarigis la brutalecon al kiu ili estis submetitaj en malliberejo. Fakte, la reĝimo mem finiĝis juĝita de la akuzitoj de ETA kaj de la monda gazetaro. Kiam la eŭska eklezia hierarkio kondamnis la procezon kaj petis pardonon por la mortkondamnitoj, la amaskomunikiloj de la reĝimo reagis histerie.

Post perfortaj kolizioj inter polico kaj manifestacianoj en Madrido, Barcelono, Bilbao, Oviedo, Sevilo kaj Pamplono, la 14-an de decembro, kvar kapitan-generaloj iris al ***Franco*** por postuli pli fortan registaran agadon. Premite de la ministro pri internaj aferoj, Generalo Garicano Goñi, kaj de la tri militaj ministroj, Franco akceptis la suspendon de la konstituciaj garantioj. La ultrakonservativuloj allogis elementojn de la reĝimo, kiuj vidis siajn privilegiojn subdanĝere kaj kiuj kulpigis la ***Opus Dei***-n tiom kiom la "ruĝulojn" kaj "separistojn" de la opozicio. La 16-an kaj la 17-an de decembro okazis grandegaj faŝismaj manifestacioj en Burgoso kaj Madrido. Publikaj laboristoj ricevis la liberan tagon por ĉeesti. Kamparanoj alvenis al Madrido per buso el la kampara Kastilio, kun taga salajro kaj tagmanĝo en la lunĉujo. Tiu ĉi tago de "patriotismo" estis organizita far grupo de altrangaj falangistoj, armeoficiroj kaj eksministroj kiuj estis anstataŭitaj de la teknokratoj. En la Madrida Placo de Oriento, la homamaso vivuis ***Franco***-n. La konfuzita diktatoro kaj lia edzino

**PROCESO DE BURGOSO**



**La 16 akuzitoj**



**Ekster- kaj en-landaj mobilizoj kontraŭ la frankisma reĝimo**



**Manifestacio favore al la reĝimo okaze de la sentenco de la proceso de Burgoso**

venis el ***El-Pardo***. ***Doña Carmen*** faris la faŝistan saluton kaj li levis ambaŭ manojn en konsento kun la sloganoj kontraŭ la ***Opus-Dei*** kiujn la homamaso ĉantis. La proceso de Burgoso finiĝis per duobla mortkondamno por tri ETA-anoj kaj ordinara mortkondamno por pliaj tri el la dek kvin trovitaj kulpaj. ***López Rodó*** kaj ***Carrero Blanco*** konsentis ke estus katastrofe por ***Franco*** ratifi ilin. En la kunveno de ministroj de la 30-a de decembro 1970, ***López-Bravo*** rekomendis komuton. ***Franco*** kontraŭvole faris grandaniman geston kaj ŝanĝis la mortkondamnojn al prizontempoj.

***Franco***, kaptita inter la grizaj teknokratoj kaj la ultradekstruloj de la bunkro, iĝis pli sentiva al la premo de la ***El-Pardo***-kliko kaj la plej duraj falangistoj, ĉefe ***Girón***. Li kaj ***Carrero*** sin turnadis al la Armeo por defendi la reĝimon, kiel pruvas la ascendo de la "bluaj" generaloj: ***Tomás García Rebull*** estis nomumita kapitan-generalo de Madrido; ***Carlos Iniesta Cano***, direktor-generalo de la Civil-Gvardio, kaj ***Ángel Campano López***, armea guberniestro de Madrido. Tiu defenda plifortigo de la reĝimo ne kontribuis solvi la enormajn sociajn problemojn kiujn la registaro alfrontadis. La polica brutaleco kontraŭ laboristoj estis ofta praktiko. Dum la strikoj en Sevilo, la polico eniris en la fabrikojn kaj arestis laboristojn. Koalicio de advokatoj, profesoroj, kuracistoj, arkitektoj kaj laboristoj prezentis al la Kardinalo-Ĉefepiskopo de Sevilo detalan denuncon de policaj ekscesoj. En Pamplono, la striko de metallaboristoj estis perforte subpremita de la polico. La 8-an de aprilo de 1971, Sankta Ĵaŭdo, en 80 elcentoj de la eklezioj en Navaro estis legita dokumento subskribita de ducent pastroj, priskribanta torturon de la laboristoj. En la katedralo de Pamplono, en ĉeesto de lokaj frankistaj eminentuloj, la helpepiskopo deklaris: ***«Mi vidis per miaj propraj okuloj, ĉi tie en Pamplono, la torturon, la arbitrajn pridemandadojn kaj la nepravigeblajn kaj neklarigeblajn arestojn. Tiuj, kiuj praktikas ilin, ilin ordonas, ilin toleras aŭ simple ignoras ilin, distancigas sin de la Eklezio».*** Frustriĝo pro la retiriĝo de la reĝimo en la kutimojn de la 1940-aj jaroj igis eĉ gvidantajn frankistojn publike esprimi alarmon pri la manko de progreso al politika evoluo. En julio, ***Ramón Serrano Suñer*** parolis en Burgoso pri la bezono de iom-post-ioma reveno al partia sistemo. En novembro, ***Juan Manuel Fanjul Sedeño***, gvida membro de la reĝimo kaj monarĥista membro de la ***Opus-Dei***, deklaris ke la supervivo de la sistemo postulis demokratan reformon. Baldaŭ poste, ***Manuel Cantarero del Castillo***, iama estro de la Falanga Junulara Fronto, instigis la regantojn entrepreni politikan malfermon.

Ĉio estis vana. En respondo al kreskanta opozicio, ***Carrero*** lanĉis pli striktajn iniciatojn kaj vastigis la nombron da krimoj metitaj sub la armea jurisdikcio. La monpunoj, suspendoj kaj fermoj de progresemaj gazetoj iĝis pli kaj pli oftaj. La 1-an de oktobro 1971, la Ministerio pri Internaj Aferoj uzis la strukturojn de la reĝimo por organizi amasan feston de la tridek-kvina datreveno de la alveno de ***Franco*** al la politika potenco. La falangistoj sopiris al refirmigo de la plej radikala frankismo, kiu estis plenumita per la deklaroj de la diktatoro, ke ***"la malamikoj ne malaperis, ili klopodas dividi nin".*** La teknokratoj siaflanke volis ĉesigi la skandalon MATESA. ***Vilá Reyes*** laŭdire minacis malkaŝi informojn damaĝajn al ***Opus-Dei***-teknokratoj se li ne eliros el malliberejo.

La reĝimo-gvidantoj suferis skuon pro la akcelita liberaligo de la hispana Eklezio sub la aŭtoritato de kardinalo ***Enrique y Tarancón***, kiu la 13-an de septembro 1971 inaŭguris asembleon de episkopoj kaj pastroj kiuj rifuzis la civilmilitan ideologion de la diktaturo per ĉi tiuj vortoj: ***«Ni humile agnoskas kaj tial petas pardonon, pro tio, ke ni ne sciis esti, kiam necese, veraj ministroj de repaciĝo»***. En decembro 1971, la Vatikano nomis ***Tarancón***-on Ĉefepiskopo de ***Madrid-Alcalá***. Li estis anstataŭigita kiel primato per la ĉefepiskopo de Barcelono, ***Marcelo González Martín***, kiu cedis la arkidiocezon al la progresema kataluno ***Narcís Jubany i Arnau***. Subgvide de la episkopo de Onubo, ***Rafael González Moralejo***, la komisiono ***Pax et Justitia*** de la Eklezio denuncis la brutalecon de la reĝimo. ***Franco*** reagis al ***Tarancón***, ***Jubany*** kaj ***González Moralejo*** kvazaŭ la Eklezio estus aliĝinta al la malamiko. En lia jarfina mesaĝo de 1971, li diris ke la registaro ekagos kontraŭ la pozicioj adoptitaj far la progresemaj episkopoj. Liaj minacoj pli reasertis ilin en siaj pozicioj. La episkopo de Onubo deklaris ke oni ne silentigos la hierarkion.


La malkontento de la laborista klaso daŭre kreskis pro malaltaj salajroj, nesufiĉa loĝado... La Komunista Partio strebis helpi en la solvado de la sociaj problemoj per ŝajne nepolitikaj najbaraj asocioj kiuj iĝus pli kaj pli potenca elemento de opozicio. La strikoj en Madrido, Barcelono kaj Asturio finiĝis per polica perforto. En la plej potencaj industrioj, la subpremaj mekanismoj de ***Franco*** jam estis konsideritaj malhelpo al efikaj laborrilatoj. Multaj komencis preteriri la oficialajn sindikatstrukturojn kaj intertrakti rekte kun la komunista sindikato “Laboristaj Komisionoj”. La malcedemo de la reĝimo donis flugilojn al la strategio de la Komunista Partio de la Pakto por la Libereco, precipe en Katalunio, kie dum 1971 aliĝis reprezentantoj de la ĉefaj opoziciaj formacioj. En novembro proksimume 300 delegitoj kunvenis sekrete en Barcelono por festi la unuan Asembleon de Katalunio kun larĝa politika spektro, ekde komunistoj kaj ties sindikato ĝis progresemaj monarkistoj, katolikoj, profesiaj organizoj kaj virinaj grupoj, la Asembleo adoptis programon de amnestio kaj politika libereco kiu estis apogita far gravaj anoj de la industria burĝaro kaj financo.


Similaj asembleoj baldaŭ aperis en la cetero el la lando, ĉefe en Madrido kaj Sevilo. ***Carrero*** rajtigis uzon de perforto kontraŭ tiuj opoziciantoj al la reĝimo. Ĉirkaŭ la revuo


Juan Manuel Fanjul Sedeño


Manuel Cantarero del Castillo


Frankisma manifestacio de la 1-a de oktobro-1971


Kun la papo Paŭlo la 6-a, la episkopoj *Marcelo González, Tarancón* kaj *Jubany*


La episkopo de Onubo, *Rafael González Moralejo*

***Fuerza Nueva*** (Nova Forto) kaj ĝia redaktoro ***Blas Piñar***, amiko de ***Carrero***, ekestis pluraj novfaŝismaj terorismaj grupoj kun titoloj kiaj "Gerilanoj de Kristo Reĝo", "Komandoj de Kontraŭ-marksisma Batalado"... kiuj atakis la preĝejojn de progresemaj pastroj kaj atakis la membrojn de la pastraro kaj renovigantaj parokanaroj. En la laboristaj kvartaloj, ili atakis la sindikatestrojn. Tiuj bandoj, konsistantaj el dungitaj brutuloj, falangistaj radikaluloj kaj kelkaj eksterdeĵoraj policistoj, agis senpune, kio montras la koluzion de la aŭtoritatoj. Reale, ili estis organizitaj de la spion-servo de ***Carrero***. La ministro pri Internaj Aferoj, ***Garicano Goñi***, eĉ plendis al ***Franco*** pri la danĝero, kiun ĉi tiuj ekstremistoj reprezentas. Tia dekstrema terorismo estis simptomo ke la socio ŝanĝiĝis sen tio ke la frankismo povu ĝin kontroli. En marto de 1972, dum striko ĉe la ŝtataj ***Bazán***-ŝipkonstruejoj en ***El Ferrol***, la polico ekpafis kontraŭ manifestacio de tri mil laboristoj, mortigante du kaj vundante aliajn dek-kvin. Tio estigis solidarecajn strikojn en tuta Galegio, en la asturiaj minejoj, en Katalunio kaj Eŭskio. Pli ol kvindek homoj estis vunditaj en disturboj en la madrida universitato. La reĝimo sentis sin vundebla pro la kampanjoj de bomboj, raboj kaj atakoj faritaj de ETA-aktivuloj.


En 1972, la fetoro de korupto ĉe la kortego de ***Franco*** plifortiĝis. Lia frato, ***Nicolás*** havis ampleksan reton de komercaj interesoj dank' al sia parenceco kun la Ŝtatestro. ***Nicolás*** estis implikita en unu el la plej grandaj financaj skandaloj de la diktaturo, la "REDONDELA oleo-kazo". Estis malkovrite, ke mankis kvar milionoj da litroj da olivoleo, stokitaj kiel ŝtatrezervoj en magazenoj apartenantaj al la oleo-rafina firmao REACE. La firmao, ne antaŭvidinte ke estus necese ĉerpi el tiaj rezervoj, spekuladis pri la oleo. ***Nicolás*** estis unu el la ĉefaj akciuloj de REACE. Dum la juĝa enketo, ses homoj implikitaj en la raportado de la kazo mortis perforte, kaj sekreta operacio estis farita por kaŝi la ligilojn inter ***Nicolás*** kaj tiuj akuzitaj je fraŭdo. ***Franco*** ne maltrankviliĝis pri korupto; je sia aĝo li ne multe dediĉiĝis al la laboro, li pasigis longajn horojn antaŭ la televido kaj bezonis longe dormeti. Ĉe registar-kunvenoj li diradis preskaŭ nenion kaj ofte endormiĝis. Kiam li estis veka, liaj manoj senrege skuiĝis. Lia vido plimalboniĝis, li suferis de fungaj infektoj en la buŝo kaj doloro en la kruro. La ĉiujara akcepto la 1-an de oktobro estis mallongigita, ĉar li ne povis longe elteni. La medikamento por lia Parkinson-malsano igis lin ĉiam pli nedecidema. Li estis obsedita pri "perfiduloj" aŭ "sendankemuloj", esprimo kiun li uzis rilate al teknokratoj. Lia familio sin tenis kontraŭ la monarkisma opcio de ***Juan Carlos***. Ĉar la malsanoj de ***Franco*** pliiĝis, la edzinoj de la "bluaj" generaloj kaj ultrafrankistoj kiel ***Girón*** -kiun ***Doña Carmen*** invitadis vespermanĝi ĉe ***El Pardo*** ĉiusemajne- konvinkis ŝin ke ŝi alprenu dominan rolon. ***Doña Carmen*** verve asertis antaŭ ***Carrero*** ke ***Garicano Goñi*** estis malforta kaj ***López-Bravo*** mallojala. En ***El Pardo***, ŝi kaj ***Cristóbal Martínez Bordiú*** malkaŝe taksis ***Carrero-Blancon*** kiel timema kaj la princon kiel perfidulo.

La 4-an de decembro de 1972, ***Franco*** iĝis okdekjara. Liaj kruroj estis ŝvelintaj kaj la filmado de lia jarfina parolado estis plurfoje interrompita por ke li povu ripozi. Dum sia parolado, malgraŭ sia kaduka aspekto, kun preskaŭ neaŭdebla flustro, li


ripetis sian malpermeson, ke la Eklezio kuraĝu juĝi la agadon de la reĝimo kaj certigis ke li plu regados sendifine: ***«Ĉi tie vi havos min, same firmece kiel antaŭe, tiom longe kiom Dio volos ke mi daŭre povu efike servi la Patrujon»***. La uzo far ***Carrero*** de ekstremdekstraj terorismaj taĉmentoj substrekas ĝis kioma grado al la zorgoj pri la sano de ***Franco*** aldoniĝis la malboniĝo de la soci-politika situacio.

Pludaŭris la subprema perforto far la policaj kaj nepolicaj fortoj de la reĝimo, intensigante dividojn interne de la reĝimo kaj fortigante la opozicion. La Hispana Socialista Partio ne havis konkretan projekton kaj ankoraŭ estis en procezo de rekonstruo post jaroj da malforteco. En ĝia 12-a Kongreso, en Tuluzo en aŭgusto de 1972, influa grupo de novaj aktivuloj, gvidataj de ***Felipe González*** el Sevilo kaj ***Nicolás Redondo*** el Bilbao, anstataŭis la malnovajn gvidantojn en ekzilo. Same kiel la komunistoj, ilia strategio estis bazita sur tio ke la laborista klaso ludus la ĉefrolon dum la gvidantaro serĉus aliancojn kun aliaj opozici-fortoj. La nekapablo de ***Carrero*** solvi sociajn streĉiĝojn per iu ajn alia rimedo ol perforto igis dizertintojn de la reĝimo aliĝi al la vicoj de la modera opozicio, serĉante politikan transiron sen implico de la strategio de la maldekstraro. ***Torcuato Fernández-Miranda*** estis la profesoro de ***Juan Carlos*** pri Politika Juro kaj iĝis lia proksima konsilisto. Dume, ***José María Areilza***, ***Antonio Garrigues y Díaz Cabañete***, kiu eksiĝis de sia posteno kiel ambasadoro ĉe la Vatikano, kaj aliaj gvidaj figuroj de la modera opozicio komencis vidi en ***Juan Carlos*** la ŝlosilon por certigi "leĝan" evoluon al demokratio.

Komence de aprilo de 1973, la morto de strikisto per polic-pafado en ***Sant Adrià de Besòs*** ekigis strikojn ĉie en Katalunio. Dum la manifestacio de la 1-a de Majo en Madrido, iu sekret-polica inspektisto estis mortpikita kaj du aliaj vunditaj far anoj de la ekstrem-maldekstra Revolucia Kontraŭfaŝisma kaj Patriota Fronto (FRAP). La okazaĵo estis la perfekta preteksto por reprezalio de la fanatikuloj de la reĝimo. Okazis amasaj arestoj de maldekstruloj, kiuj estos torturitaj. La plej signifaj eventoj okazis ĉe la entombigo de la murdita policisto, kies procesion estris generalo ***Iniesta***, en kiu estis polica manifestacio postulanta pli da subpremo, dum tri mil falangistaj militveteranoj kriegis por venĝo per standardoj laŭdantaj la novnaziistojn kaj petis la mortpafon por la «ruĝaj ĉefepiskopoj». La fakto ke polica ribelo estis tolerita en ĉeesto de ***Carrero Blanco*** estis klara indiko de ŝanĝo ekstremdekstren, kiu estis konfirmita la 7-an de majo, kiam ***Garicano Goñi*** demisiis,


Felipe González Márquez


Nicolás Redondo Terrero


José María Areilza



Antonio Garrigues y Díaz Cabañete



José Utrera Molina



Francisco Ruiz Jarabo ĵuras kiel nov-ministro



Julio Rodríguez Martínez



Carlos Arias Navarro



Manifestacio de la 7-a de majo de 1973, en Madrido, kontraŭ la FRAP

frustrita de la manko de reformo kaj alarmita de la kreskanta influo de la ekstrema dekstro.

La 3-an de majo, la diktatoro diris al ***Carrero Blanco***, ke li nomumos lin ĉefministro kaj ekplanu sian kabineton. La elektado de novaj ministroj far ***Carrero*** signis la finon de la influo de la teknokratoj. Por kompleco de ***Doña Carmen***, ***López Rodó*** estis destinita al la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj kun la tasko doni bildon je modereco al vere reakcia registaro. Alia pruvo de la influo de la kliko de ***El Pardo*** estis la nomumo de du duraj falangistoj: ***José Utrera Molina*** kaj ***Francisco Ruiz-Jarabo***, same kiel la militema ***Julio Rodríguez Martínez*** kiel Ministro pri Edukado. Surprize, ***Torcuato Fernández-Miranda*** estis elektita kiel vicprezidanto kaj ĝenerala ministro sekretario de la Movado. ***Franco*** akceptis la liston kun nur unu ŝanĝo: konvinkita de lia edzino kaj bofilo, ke la registaro estis tro mola, li insistis pri la nomumo de ***Carlos Arias Navarro***, kiel Ministro pri Internaj Aferoj. Kiel urbestro de Madrido ekde 1963, ***Arias*** iĝis unu el la favoratoj de ***Doña Carmen***. Dum la Civil-Milito, lia senkompatemo kiel prokuroro gajnis al li la kromnomon "la buĉisto de Malago". ***Carrero*** estis 70-jara kaj ne havis popularan aŭ armean subtenon. La kompono de tio, kion oni nomis "la funebra kabineto" frustris la esperojn pri progresema ŝanĝo.

Per la apero de la unua energikrizo kaj la peza dependeco de Hispanio el importita energio, la strategio de la teknokratoj de mildigo de la politika malkontento per pliigita prospero estis nuligita. La nura respondo de ***Carrero Blanco*** estis pliigita subpremo, simbolita per la t. n. «Procezo 1.001», ŝajna proceso de dek membroj de la komunista sindikato Laboristaj Komisionoj akuzitaj je kontraŭleĝa asocio kun la celo montri la persistemon de la registaro disbati la kaŝajn sindikatojn. Frumatene de la 20-an de decembro, ETA-komando murdis ***Carrero-Blanco***-n krevigante eksplodeman ŝargon sub lia aŭto. ETA kalkulis, ke tiu murdo detruus la planojn de ***Franco*** por la daŭrigo de lia reĝimo kaj intensigus la dividojn ene de la reĝimo.

***Franco*** pli restis sub-preme de la ***El-Pardo***-kliko. ***Fernández-Miranda*** tuj iĝis provizora Prezidanto de la Registaro. Tamen, ekis batalo por la politika kontrolo de la reĝimo. En evidenta misuzo de aŭtoritato, la ĝenerala direktoro de la Civil-Gvardio, ***Carlos Iniesta***, sendis telegramon ordonante senliman uzon de pafiloj por sufoki manifestaciojn. Du ministroj, ***Julio Rodríguez*** kaj ***José Utrera Molina***, iris en la oficejon de la madrida policestro por proponi ke li aliĝu al la komando de venĝantoj, kiu lokalizus kaj mortigus la murdistojn de ***Carrero***. Sed regis la prudento: interkonsiliĝinte la estro de la Ĉefa Stabo, ***Manuel Díez-Alegría***, ***Fernández-Miranda***, ***Arias Navarro***, admiralo ***Gabriel Pita da Veiga*** kaj la estro de la privata spionservo de

***Carrero***, subkolonelo ***José Ignacio San Martín***, interakordis eviti sangobanon. ***Iniesta*** estis devigita nuligi sian telegramon kaj estis dumtempe metita sub hejmareston. ***Blas Piñar*** ricevis ordonon teni siajn sekvantojn subkontrole.


La spiritoj estis agititaj: ĉe la meso por ***Carrero***, ekstremdekstraj uloj puŝis kaj insultis ĉefepiskopon ***Enrique Tarancón***. Post la komenca ŝoko, kiam venis la tempo por decidi pri la estonteco, ***Franco*** ricevis premon de la kliko de ***El Pardo*** koncerne al la sukcedo de ***Carrero***. ***Doña Carmen*** kaj ***Cristóbal Martínez Bordiú*** decide intervenis por bloki la nomumon de ***Fernández-Miranda***, kiun ili konsideris kunkulpa pri tio, kion ili pensis, estus la liberaligo de la reĝimo sub ***Juan Carlos***. Ili preferis ke la sukcedanto de ***Carrero*** estu ***Arias Navarro***, pro lia reputacio esti severa pri sekurecaj aferoj. Rezulte de la truda influo de lia familio, ***Franco*** aprobis tiun nomumon. Dum liaj ses monatoj kiel Ministro pri Internaj Aferoj, la politiko de publika ordo de ***Arias Navarro*** sekvis la subpreman politikon de liaj antaŭuloj. Li entreprenis gravajn ofensivojn kontraŭ ETA, el kiuj li pafmortigis naŭ militistojn; kontraŭ la Komunista Partio, el kiu li malmuntis diversajn regionajn retojn, kaj kontraŭ la sindikato Laboristaj Komisionoj. La nomumo de ***Arias*** kaj lia kabineto estis la lasta grava politika decido de ***Franco***. Ekde tiam, la malkresko de liaj fizikaj kaj mensaj kapabloj koincidis kun altiĝanta opozicio kaj pli kritika internacia kunteksto. La registaro de ***Arias***, anoncita la 3-an de januaro 1974, konsistigis delikatan ponton inter reakciuloj kaj progresemuloj. ***Arias*** retenis ok el la ministroj de ***Carrero*** en sia nova kabineto kaj alportis kelkajn durajn falangistojn. En la liberala alo, estis ***Antonio Carro***, kiel Ministro de la Prezidanteco, kaj ***Pío Cabanillas***, kiel Ministro pri Informado, ambaŭ sekvantoj de ***Fraga***, same kiel ***Antonio Barrera de Irimo*** en la Ministerio pri Financo, kaj la Vicprezidanteco de priEkonomiaj Aferoj, homo reprezentanto de la plej dinamikaj sektoroj de la hispana kapitalismo kaj dediĉita al ***Juan Carlos***. La plej reakciaj elementoj estis du fanatikaj falangistoj: ***José Utrera Molina***, kiu iĝis Ministro Sekretario de la Movado, kaj ***Francisco Ruiz Jarabo*** kiel Ministro pri Justico, kiu reflektis la influon de ***Girón***. ***Utrera*** havis la celon malhelpi ajnan reformon de la institucioj de la reĝimo. ***José García Hernández***, Ministro pri Internaj Aferoj kaj vicprezidanto respondeca pri la interna sekureco, estis, kiel ***Arias*** mem, asistanto de ***Alonso Vega***.


**Ĵuro de *Carrero Blanco* kiel Ĉefministro**


**Truo de la eksplodo de la dissaltigo de *Carrero***


***Manuel Díez-Alegría***



***Gabriel Pita da Veiga***


***José Ignacio San Martín***


Antonio Carro Martínez


Pío Cabanillas Gallas


Antonio Barrera de Irimo



José García Hernández


Alfonso García Osorio


La kliko ***El Pardo*** ĝojis ke ***Arias*** ne faris konsulton al ***Juan Carlos*** pri la konsisto de sia kabineto. Tamen, ***Arias Navarro*** ne plenumis ĝiajn esperojn. La strukturaj problemoj de la reĝimo devigis lin akcepti pli da ŝanĝoj ol ***Carrero*** iam estis farinta. Li heredis disputojn en asturiaj minejoj, la eŭska ŝtal-industrio kaj la kataluna teksa sektoro, same kiel en Zaragozo, Valadolido kaj ***Alcoy***. Ili estis la sekvoj de inflacio kiu estis proksima al 25 procentoj jare kaj frostaj salajraj pli-iĝoj de ĉirkaŭ 15 procentoj. Sekve de la milito de ***Jom Kippur*** kaj la sekva naftoembargo far la arabaj produktantaj landoj, krudnaftoprezoj forpafiĝis kaj grave influis sur Hispanio. La kosto de la energio estis rekte transdonita al konsumantoj. En la unua trimonato de 1974, la elektroprezoj altiĝis 15 procente, benzino 70 procentoj, butangaso, la plej uzata brulaĵo por hejt-ado kaj kuirado, 60 procentoj, kaj transportado, 33 procentoj. La ondo de strikoj ne trankviliĝis kaj, pligravigis la aferojn, tio ke du el la ĉefaj fontoj de valuto, turismo kaj monsend-aĵoj de migrintaj laboristoj, baldaŭ draste falis kiam la energi-krizo trafis nordan Eŭropon.

La ministro ***Antonio Carro Martínez*** estis ligita al la prem-grupo nomita "***Tácito***", same kiel multaj el la plej talentaj oficialuloj de la reĝimo. La kolektiva identeco de tiuj konser-vativaj kristandemokratoj, subtenantoj de la paca reformo de la sistemo kaj ligitaj al la ***National Catholic Association of Propagandists-lobio***, venis de serio de influaj ĵurnalistikaj arti-koloj publikigitaj ekde 1972 en la katolika gazeto "***Ya***" kun la subskribo de "***Tácito***" kiu pledadis por reformo de la sistemo de interne. Liaj ligoj kun la banka kaj industria mondo kaj kun la eklezia hierarkio ne permesis al ***Arias*** ignori ilin. Kiam la gvidanto de la grupo, ***Alfonso Osorio García***, ofertis al ***Arias*** la subtenon de la grupo se li engaĝiĝos al reformado de la registaro, la ĉefministro akceptis kaj, sur la rekomendo de ***Carro***, nomumis kvar el ĝiaj membroj kiel vicsekretarioj. Malgraŭ lia aŭtoritata inklino, ***Arias*** estis sufiĉe vanta por pri-zorgi sian publikan bildon. ***Carro***, ***Osori***o kaj ***Pío Cabanillas*** konvinkis lin ke, por pluvivi, li kaj la ***Franco***-reĝimo bezonas ŝanĝon de bildo. Tiel, la 12-an de februaro 1974, li publik-igis timeme malfermitan programon. La teksto, redaktita de la oficejo de ***Carro***, kaj poste konata kiel la "spirito de la 12-a de februaro", proponis pli larĝan politikan partoprenon, kvankam ene de la limoj de la frankisma leĝeco. Urbestroj kaj lokaj oficialuloj estis elektotaj kaj ne nomumotaj fare de la

registaro. La procento de la prokuratoroj al la Korteso nerekte elektataj de la ŝtatestro, sed per strikte limigita balotrajto, pliiĝis de 17 ĝis 35 procentoj. Al la oficiala sindikato de la reĝimo estis promesita pli granda intertrakt-kapablo. La kreado de politikaj asocioj, kvankam ne de partioj, ankaŭ estis interkonsentita.
Tiu plano estis la plej liberala deklaro iam farita de ***Franco***-ministro, sed la opozicio taksis ĝin nesufiĉa. La pli liberala sinteno al la gazetaro kaj redakcioj de la Ministerio pri Informado de ***Pío Cabanillas*** kaj la toleremo montrita al la plej moderaj opoziciaj grupoj ŝajnis konfirmi la paroladon de ***Arias***. Sed fakte, spite al la promeso pri liberaligo, ***Arias*** rigore reagis al socia agitado, montrante sian propran inklinon kaj la facilecon per kiu la bunkro povis impulsi ***Franco***-n kontraŭ la reformoj simple deklarante ke framasonoj puŝis Hispanion en la abismon de pornografio kaj ĥaoso.
Krom ***Arias***, la persono plej proksima al ***Franco*** en la registaro estis ***Utrera Molina***. Post la parolado de ***Arias***, la diktatoro petis al ***Utrera*** klarigi "la spiriton de la 12-a de februaro" kaj, profunde alarmita de liaj klarigoj, ***Franco*** deklaris, ke ***«se la reĝimo permesas ataki sian doktrinan substancon kaj ĝiaj servistoj ne kapablas defendi tion, kio estas fundamenta, ni devos pensi pri malkuraĝa volo de memmortigo».***
Kun prezoj altiĝintaj post la energikrizo, la radikaliĝo de la laborista klaso pliiĝis komence de 1974. Nekapabla proponi ajnan gravan ŝanĝon, la pozicio de ***Arias*** estis netenebla. Paradokse, la unua interveno de ***Franco*** estis bremsi la reakcian inklinon de lia ĉefministro. La ekstremdekstra gazeto ***El Alcázar*** eĉ postulis perforton kontraŭ tio, kion ĝi vidis kiel "perfido" de la progresema Eklezia hierarkio, plejparte reage al ĉeesto de multaj eŭskoj inter la opozicia pastraro. ***Arias*** estis forpelonta la episkopon de Bilbao, ***Antonio Añoveros*** el Hispanio pro publikigo de homilioj en defendo de etnaj minoritatoj. Kaj ***Tarancón*** kaj Paŭlo la 6-a defendis ***Añoveros***-on, kaj ***Franco***, kiu ne volis riski ke oni ekskomuniku sian ĉefministron, devigis ***Arias***-on rezigni.
Ĉi tio estis la escepto. Jam en la unuaj du monatoj de 1974 estis arestitaj pli ol 150 anoj de laboristaj organizoj, ETA kaj maldekstraj grupoj. ***Franco*** rifuzis ŝanĝi la mortkondamnojn truditaj al la kataluna anarkiisto ***Salvador Puig Antich*** kaj la polo ***Heinz Chez***, ambaŭ akuzitaj je mortigo de membroj de la sekurecaj servoj. Malgraŭ internacia skandalo rememoriga pri la procesoj de ***Grimau*** kaj Burgoso –kun protestoj de Vatikano, EEK kaj pluraj ŝtatestroj– la ekzekutoj per garroto okazis la 2-an de marto, kio kaŭzis la kondamnon de la reĝimo far la Eŭropa Parlamento.
Se tio ne maltrankviligis la bunkro-anojn, pli devis igi tion la falo de la portugala diktaturo la 25-an de aprilo, kio multe kuraĝigis la opozicion en Hispanio. Tri tagojn poste, la timo de la ultra-frankistoj pri la efiko de la luzitanaj okazaĵoj estis reflektita per impeta atako de ***Girón*** en la gazeto ***Arriba*** kontraŭ ***Arias*** kaj la liberaluloj en ties kabineto. ***Franco*** sciigis al ***Utrera***, ke ne malplaĉis al li la "***Giron***-faro". Kadre de la sama operacio, la Rezerva Generalo ***García Rebull*** kondamnis la partiojn kaj politikistojn. Ĉi-tio estis la startsignalo por operacio dezajnita por permesi al ***Iniesta*** eviti lian baldaŭan translokigon al la rezervo kiel kapo de la Civil-Gvardio por anstataŭigi la liberalulon ***Manuel Díez Alegría*** kiel estro de la Ĉef-stabo. La bunkro timis ke ***Díez-Alegría*** farus en Hispanio kiel Generalo ***António de Spínola***


Episkopo *Antonio Añoveros*


*Salvador Puig Antich*


La polo *Heinz Chez*


*António de Spínola*


*Francisco Coloma Gallegos*

en Portugalio. Generalo ***Ángel Campano*** ekkontrolus la Civil-Gvardion kaj oficiroj suspektitaj je liberalismo estus elpurigataj. La plano havis la subtenon de la ***El Pardo***-kliko, kvankam la ĉiam pli malsana diktatoro ne estis informita pri iliaj intencoj. ***Arias Navarro***, sciinte pri la intrigo dank' al la Ministro pri Armeo, Generalo ***Francisco Coloma Gallegos***, kuris por vidi ***Franco***-n kaj minacis eksiĝi. Maltrankviligita, la diktatoro, kiu konsideris respekton al la hierarkio kaj antikv-kutimon kiel sanktajn, subtenis ***Arias***-n kaj devigis ***Iniesta***-on retiriĝi la 12-an de majo, kiel planite.

***Arias*** vane provis trovi mezan vojon inter la bunkro kaj la opozicio, kiu travivis novan ekprosperon post la okazaĵoj en Portugalio. Unuflanke, arestoj de maldekstruloj pliiĝis. Aliflanke, li prezentis senentuziasman projekton por leĝigo de politikaj asocioj strikte limigitaj al formacioj ene de la reĝimo. Dume, ***Franco*** ŝajnis nekonscia pri kio okazas. La 9-an de julio, la diktatoro estis enhospitaligita kun flebito en la dekstra kruro. Ĉar lia sano plimalboniĝis, la 19-an de julio, ***Arias*** kaj la prezidanto de la Kortesoj konvinkis ***Franco***-n apliki la artikolon 11 de la Organika Leĝo de la Ŝtato, laŭ kiu ***Juan Carlos*** alprenus la postenon de ŝtatestro en funkcioj. ***Doña Carmen*** kaj ***Villaverde*** furioziĝis. ***Juan Carlos*** mem ne volis preni potencon tiel baldaŭ post la ekzekuto de ***Puig Antich*** kaj la kazo ***Añoveros***. Maltrankviligis lin esti makulita de asocio kun nepopulara registaro, kiun li ne elektis kaj kies prezidento ne konsultis lin. Tamen, li havis malmultajn opciojn se li ne volus endanĝerigi sian sukcedeblon. Estis humiliga sperto. ***Cristóbal Martínez Bordiú***, kiu alprenis la rolon de estro de la familio, estis klare malĝentila kun la Princo. ***Franco*** povis forlasi la hospitalon la 30-an de julio, kvankam li ne revenis al laboro. ***Vicente Gil*** instigis lin, por sia sano, rezigni la potencon. ***Martínez Bordiú***, koleregа, fizike atakis ***Gil***-on kaj maldungis lin kiel kuraciston de la Ŝtatestro. Maltrankvila pri la perspektivo de perdado de siaj privilegioj, la ***El Pardo***-kliko konvinkis ***Franco***-n ke ***Juan Carlos*** ne povas esti fidinda kaj premadis lin por repreni siajn funkciojn, kion li faris la 2-an de septembro.

Lia paniko estis prava. La malsano de la diktatoro plikuraĝigis la opozicion, kiel pruvas la formado de demokrataj konsilioj kaj rond-tabloj. La plej sukcesa el tiuj estis la ***Assemblea de Catalunya*** kiu, aldone al ĝuado de signifa populara subteno, enhavis bankierojn kaj industriistojn inter siaj gvidantoj. La novaĵo pri la malsano de ***Franco*** provokis la kreadon, fare de

***Santiago Carrillo***, de la Demokrata Konsilio, en Parizo la 30-an de julio 1974, formita de Laboristaj Komisionoj, la eta Populara Socialista Partio de ***Enrique Tierno Galván***, pluraj regionismaj grupoj, la karlistoj, kaj kelkaj elstaraj personecoj, kiel la ***Opus-Dei***-ano ***Rafael Calvo Serer***. La programo de la Konsilio postulis ke provizora registaro prenu la politikan potencon por la celoj de kompleta politika amnestio, leĝigo de politikaj partioj kaj sindikatoj, libereco je esprimo kaj de la amaskomunikado, la sendependeco de la juĝistaro, regiona aŭtonomio, la apartigo de eklezio kaj Ŝtato, kaj la okazigo de liberaj balotoj post 18 monatoj. Malgraŭ la foresto de la Kristandemokratoj kaj de la Hispana Socialista Laborista Partio, la Konsilio kaj ĝia programo de demokratia rompo kun la reĝimo vigligis opoziciajn rondojn kaj intensigis la senton, ke la bunkro estas sieĝata.

La socialistoj rifuzis aliĝi al la Konsilio pro diferencoj pri strategio. Post jaroj da letargio, la PSOE estis en procezo de reviviĝo. La maljuna gvardio estus flankenlasita ĉe la 13-a Kongreso de la partio en ekzilo, okazigita en Suresnes, proksime de Parizo, meze de oktobro 1974. La dinamika alianco formita fare de ***Enrique Múgica***, ***Nicolás Redondo***, ***Felipe González*** kaj ***Alfonso Guerra*** alprenis la gvidadon de la partio. La novaj gvidantoj konsideris nerealisman la planon de la PCE renversi la Frank-reĝimon per ĝenerala striko. La nova ĝenerala sekretario, ***Felipe González***, estis konvinkita, siabedaŭre, ke estos necese intertrakti kun la reformistoj de la reĝimo.


La venko de la ***El Pardo***-kliko super ***Juan Carlos*** atingante la reakiron de la politika potenco far ***Franco*** estis sekvita de atako kontraŭ la plej liberala ministro, ***Pío Cabanillas***. Oni prezentis al ***Franco*** dosierujon de paĝoj de hispanaj revuoj enhavantaj reklamojn pri strandaj ekipaĵoj kun bikinitaj modeloj, lerte intermetitaj kun paĝoj de ***Playboy***, por doni la impreson, ke la materialo estis eldonita en Hispanio. Estis facile konvinki la diktatoron, ke ***Pío Cabanillas*** devis esti foririgita. ***Franco*** estis aparte kolerigita per la indico en la dosiero ke ***Pío Cabanillas***, sekvante la ekzemplon de ***Fraga*** kun la MATESA-kazo, permesis al la gazetaro pritrakti la REDODELA-oleokazon. La diktatoro ordonis al ***Arias*** forigi lin. Solidare kun li, ***Antonio Barrera de Irimo*** demisiis. ***Arias*** proponis ekvilibri la registaron forigante ***Utrera***-on kaj ***Ruiz-Jarabo***-n, sed ***Franco*** firme rifuzis, argumentante


Doktoro *Vicente Gil García*


*Enrique Tierno Galván*


*Rafael Calvo Serer*


*Enrique Múgica Herzog*


*Alfonso Guerra González*


Marcelino Oreja Aguirre


Antonio Castro Villacañas


Antonio Izquierdo


Licinio de la Fuente


Fernando Herrero Tejedor

ke ambaŭ estis "tre lojalaj". Sed tio estis sengrava venko por la bunkro, ĉar ĝi nur akcelis la disfalon de la reĝimo. Kun la falo de akciaj prezoj, influaj sektoroj de la oligarkio komencis postuli reformojn. Ĉie en 1974, ekzistis praktike publikaj renkontiĝoj de gvidaj industriistoj kaj financistoj kun membroj de la modera opozicio. La krizo kiu kaŭzis la foriron de la liberalaj ministroj rivelis la bankroton de la registaro. Tio konfirmis ke ***Arias*** estis nekapabla enkonduki realajn ŝanĝojn, kaj estis sekvita per la eksiĝo de esencaj oficialuloj apartenantaj al la grupo ***"Tácito",*** gviditaj de la vicsekretario de ***Pío Cabanillas***, ***Marcelino Oreja***.

La bunkro reagis mobilizante siajn fortojn tra la amasa Nacia Konfederacio de Eksbatalantoj subgvide de ***Girón***. Ke la situacio elglitis el la manoj de ***Arias*** evidentiĝis fine de novembro kiam la polico, sen lia rajtigo, arestis la gvidantojn de la modera opozicio, kiuj kunvenis en Madrido por diskuti la kreadon de fronto kiu konkurus kun la Demokrata Konsilio. La okazaĵo kaŭzis alian internacian skandalon similan al tiu de la kazo ***Añoveros***. Post kelkaj tagoj, la arestitoj estis liberigitaj, sed la pozicio de ***Arias Navarro*** suferspertis grandegan damaĝon. ***Franco*** ŝajnis nekonscia pri ĉio ĉi. Antaŭ la fino de 1974, li montris kreskantajn signojn de senileco. Lia buŝo estis ĉiam malfermita en konstanta oscedo. Foje li agis normale, sed plejofte li restis en nepenetrebla absorbo. Tamen, pro politikaj kialoj, oni devigis lin konservi ritmon de agado kiu alarmis liajn kuracistojn. Lia pasio por ĉasado kaj fiŝkaptado, kombinita kun la insisto de la ***El Pardo***-kliko ke li estu vidata aktiva, kondukis lin al streĉaj ekskursoj malgraŭ la malbona vetero. Dum la vintro de 1974-1975, li partoprenis plurajn ĉasojn dum venta kaj pluva vetero kaj temperaturoj proksimaj al nul gradoj.

Per sia radiotelevidigita novjara mesaĝo la 30-an de decembro 1974 li dankis esti plene resaniĝinte post sia lastatempa malsano kaj fanfaronis pri kiom bone funkciis la institucioj dum lia foresto. Li ŝajnis nekonscia pri la disfalo de la frankisma koalicio. La unua bataleto de 1975 okazis en februaro. ***Arias*** furiozis kiam la gazetaro de la reĝimo ne festis la datrevenon de lia parolado de la 12-a de februaro kaj ordonis al ***Utrera*** maldungi la direktoron de la gazetaro kaj radioretoj de la reĝimo, ***Antonio Castro Villacañas***, kaj la redaktoron de la ĵurnalo ***Arriba***, ***Antonio Izquierdo***. ***Utrera*** rifuzis kaj rapidis informi la solecan kaj malfortan

***Franco***-n, kiu petis lin obei ***Arias***–n por eviti problemojn. La medikamento por Parkinson-malsano igis lin timema. ***Utrera*** prezentis al la diktatoro indicojn de la planoj de ***Arias*** dissolvi la reĝimajn instituciojn kaj registradojn en kiuj li estis aŭdita kritiki ***Franco***-n. Kiam ***Utrera*** diris: "***Arias estas perfidulo***", la diktatoro ekploris kaj respondis: ***"Jes, jes, Arias estas perfidulo, sed neniu eksciu tion. Vi devas daŭrigi singarde."*** La bunkra kampanjo pliintensiĝis. Radikalaj ministroj blokis leĝajn rimedojn, kiuj celis enkonduki limigitan strikrajton. La 24-an de februaro, ***Licinio de la Fuente***, Ministro pri Laboro ekde 1969, kaj frankisto preter ĉiu suspekto de liberalismo, eksiĝis en frustriĝo.

Finfine, ***Arias*** estis devigita kontraŭataki la bunkron. Li diris al ***Franco*** ke li volas anstataŭigi la ministrojn ***Ruiz-Jarabo***-n kaj ***Utrera***-on. Kiam ***Franco*** rifuzis, ***Arias*** minacis demisii. La ŝtatestro cedis kaj tiele, ***Fernando Herrero Tejedor***, ĉefprokuroro de la Supera Kortumo, eniris la kabineton kiel la nova granda promeso de liberalismo en la posteno de Ministro Ĝenerala Sekretario de la Movado. ***Herrero*** kontaktis la moderan kaj toleritan opozicion de la Kristana Demokratio kaj la Socialdemokratoj de ***Ridruejo***. Li ankaŭ dediĉis sin al la peza tasko doni kredindecon al la senenhava projekto de la politikaj asocioj.



Vizito de la usona prezidento *Gerald Ford* al Hispanio en majo-junio de 1975

Alia pruvo de la dekadenco de la diktaturo estis tio ke la usona regantaro distancigis sin de la hispana diktatoro por priatenti la princon ***Juan Carlos***. Kiam la usona prezidento ***Gerald Ford*** alvenis en Hispanion la 31-an de majo por dutaga vizito, li pasigis pli da tempo kun la princo ol kun ***Franco***. La 23-an de junio 1975 ***Herrero Tejedor*** mortis pro trafikakcidento. Lia logika sukcedanto estus lia ambicia asistanto, ***Adolfo Suárez***, kiu alproksimiĝis al la ***Opus Dei*** kaj uzis sian amikecon kun sia mentoro por establi ligilojn kun ĉeffiguroj en la registaro. ***Generalo Alonso Vega*** estis nomuminta lin guberniestron de Segovio en 1968. ***Suárez*** alproksimiĝis al la pinto forte laborante por altiri la atenton de ***Franco*** kaj amikiĝi al ***Juan Carlos***. La princo rekomendis lin al ***Carrero Blanco***, kiu en 1969 nomumis lin Ĝeneralan Direktoron de ***Radio Televisión Española***, posteno de kiu li dediĉis sin al reklamado



*Adolfo Suárez*

de la bildo de ***Juan Carlos***. ***Suárez*** gajnis la favoron ankaŭ de altrangaj ministroj kaj generaloj, ofertante al ili televidan ekrantempon kaj sendante florojn al iliaj edzinoj. Antaŭ februaro de 1975, li jam aliris al la ŝlosila posteno de Vic-sekretario de la Movado.

***Franco*** ne volis promocii ***Suárez***-on, sed insistis ke la nova Ministro-Sekretario estu ***José Solís***, reflektante la konvinkiĝon de la ***El Pardo***-kliko ke, por forpuŝi la opozicion, ***Franco*** devus ĉirkaŭi sin per sia fidinda maljuna gvardio. ***Martínez Bordiú*** kaj ***Doña Carmen***, en koluzio kun ***Girón*** kaj ***Alejandro Rodríguez de Valcárcel***, prezidanto de la Korteso, konvinkis ***Franco***-n plilongigi la parlamenton de la Korteso dum ses monatoj. Tiamaniere ili esperis akiri la necesan tempon por forpeli ***Arias***-on kaj certigi la promocion de ***Solís***, ***Rodríguez de Valcárcel***, aŭ eĉ ***Girón***, al la prezidanteco. Tamen, aliaj pensis ke ***Suárez*** estis la estonteco. La sagaca komentisto ***Luis María Ansón*** nomis lin "politikisto de la monato" en la revuo ***Blanco y Negro*** la 2-an de julio. En tiu tempo, estonta reformo signifis labori ene de la frankisma sistemo kiel estis antaŭvidite de ***Torcuato Fernández-Miranda***. La pezo de la premoj de la laborista klaso, la regionistoj kaj la studenta movado dum la sekvintaj 18 monatoj estis kio metis la ĝeneralan demokratian ŝanĝon sur la politika tagordo.


Tiuj, kiuj volis bloki eĉ la plej etajn reformojn, vivis en angoro pri sia estonteco kaj bezonis ***Franco***-n viva. La diktatoro estis elĉerpita kaj senpacienca ripozi, kaj eĉ komentis la eblecon imiti Karolon la 5-an kaj retiriĝi al monaĥejo por morti. Panikita, lia edzino konvinkis lin ne forlasi la politikon, dum lia same maltrankvila bofilo konservis lin vivanta artefarite. Dum liaj lastaj monatoj, la bunkro ludis kun la timoj kaj antaŭjuĝoj de la diktatoro, plifaciligitaj de la neŝancelebla konvinko de ***Franco*** ke la sinistra minaco de framasonismo daŭre ekzistas. La 15-an de julio, la diktatoro diris al delegacio de la ***Hermandad Nacional de Alféreces Provisionales***, fortikejo de la bunkro, ke ili devas defendi la venkon en la Civil-Milito ĝismorte. Ekstremdekstraj terorismaj taĉmentoj intensigis siajn atakojn kontraŭ maldekstraj advokatoj kaj pastroj, librovendejoj kaj laboristoj, ĉefe en Eŭskio, kie krizostato estis provoke deklarita la 26-an de aprilo, la datreveno de la bombado de Gerniko. Tio plifortigis la unuecon de la opozicio kaj konfirmis la emon de la Eklezio distanciĝi el la reĝimo.

Militkonsilio okazigita en Burgoso kondamnis du ETA-anojn al morto kaj, la 19-an de septembro, alia en Barcelono aprobis trian mortkondamnon. Dume, du aliaj militaj konsilioj, okazigitaj la 11-an kaj 17-an de septembro en armea bazo ĉe la periferio de Madrido, mortkondamnis ok membrojn de la FRAP. Kadre de tutmonda ondo de protestoj, dek kvin eŭropaj registaroj retiris siajn ambasadorojn. Okazis atakoj kaj manifestacioj kontraŭ hispanaj ambasadejoj en la plej multaj eŭropaj landoj. La prezidanto de Meksiko postulis la elpelon de Hispanio el la Unuiĝintaj Nacioj. La Papo Paŭlo la 6-a kaj ĉiuj hispanaj episkopoj apelaciis por indulgo. ***Don Juan*** sendis la saman peton per sia filo. Similaj postuloj venis de registaroj tra la mondo. ***Franco***, ignoris ilin ĉiujn. En kunveno de ministroj, la 26-an de septembro, prezidita de ege malsana diktatoro, estis konfirmitaj kvin mortkondamnoj. Ĉe tagiĝo la venontan tagon, la akuzitoj estis pafitaj. La internaciaj kondamnoj -inter kiuj

elstaris tiu de Paŭlo la 6-a- intensiĝis, kaj la Eŭropa Komisiono petis ĉesigon de komerco kun Hispanio. La hispana ambasadejo en Lisbono estis prirabita.
La prestiĝo de la opozicio pliiĝis inverse al la rifuzo provokita de la brutaleco de la reĝimo. Al la kreado de la Demokrata Konsilio sekvis, en junio de 1975, la naskiĝo de la Platformo de Demokratia Konverĝo, kiu kunigis la PSOE-n kun la Hispana Socialdemokrata Unio de ***Dionisio Ridruejo***, la Kristandemokratian Maldekstron de ***Joaquín Ruiz Giménez*** kaj diversaj regionismaj grupoj, inkluzive de la Eŭska Naciisma Partio. La Platformo estis pli malferma al dialogo kun la reformistoj de la reĝimo ol la Demokrata Konsilio, kiu estis alpreninta la strategion de la Kom.Partio de strikoj kaj amasmobilizoj. Tamen, la ekzekutoj igis ambaŭ organizojn venki iliajn suspektojn kaj komencis pensi pri ebla kuniĝo.
La fino de ***Franco*** alproksimiĝis. Malsana kaj sub la influo de la bunkro, li perdis pezon kaj komencis suferi je sendormeco. La 1-an de oktobro, en la trideknaŭa datreveno de lia nomumiĝo kiel Ŝtatestro, li aperis antaŭ granda homamaso manifestacianta en la Placo de Oriento. Multaj el la ĉeestantoj alvenis per aŭtobusoj pagitaj de la reĝimo kaj, en la antaŭaj tagoj, la ŝtataj radio kaj televido instigis homojn ĉeesti la manifestacion. Oficejoj, fabrikoj kaj vendejoj oficiale fermiĝis por faciligi helpon. En sia lasta publika apero, la nun eta kaj kurbigita diktatoro marteladis per siaj eternaj paranojaj kliŝoj: la problemo de Hispanio, li deklaris, estis “framason-maldekstrema komploto de la politika klaso, en koluzio kun terorista-komunisma subfosado en la socia sfero”. La diktatoro adiaŭis la homamason ploranta kaj kun ambaŭ manoj levitaj. En la sama tago, kvar policanoj estis mortpafitaj fare de lastatempe kreita terorista grupo, GRAPO (Unua de oktobro Kontraŭfaŝistaj Rezistgrupoj). Dum la sekvintaj kvin jaroj, GRAPO agus kiel danĝera agentprovokisto kun suspektindaj polickonektoj.
Dume, manifestacioj, strikoj kaj atakoj markis la rapidan malboniĝon de la sano de ***Franco***. La murdoj faritaj de la FRAP kaj ETA estis sekvitaj per tujaj reprezalioj de ekstremdekstraj teroristoj. La eksponiĝo de la diktatoro al la fortaj aŭtunaj ventoj en Madrido dum lia interveno en la Placo de Oriento la 1-an de oktobro ekigis la eskaladon de kuracaj krizoj, kiuj kulminis per lia morto. La 14-an de oktobro, li manifestis akutajn gripajn simptomojn. Matene de la 15-a



***Alejandro Rodríguez de Valcárcel***



***Luis María Ansón***



**Lasta mitingo de *Franco* la 1-an de oktobro - 1975**



**La «Verda Marŝado» de marokanoj en la tiama hispana Saharo**



**Pertelevida anonco de la morto de *Franco* far *Arias Navarro***

de oktobro, ***Franco*** vekiĝis kun doloro en la brusto kaj ŝultroj: li suferis gravan koratakon. Malgraŭ tio, li daŭre laboris, ĉeestante dek unu formalajn demando-sesiojn ĵaŭde, la 16-an de oktobro. Kontraŭ la konsilo de liaj kuracistoj, li insistis pri prezidado de konsilio de ministroj la sekvan tagon. Liaj kuracistoj, alarmitaj, insistis, ke li almenaŭ estu kontrolata. Dum la konsilio, la novaĵo pri la maroka "verda marŝo" sur la hispana Saharo kaŭzis al li recidivon.

Je la 20-an de oktobro, ***Franco*** havis alian koratakon, kaj dum la sekvaj tagoj, lia kondiĉo komencis grave plimalboniĝi. Li havis pluajn koratakon dum la sekvaj tagoj. Oni devis fari al li konstantajn sangtransfuzojn. Dum ĉi tiu tempo, malgraŭ la akra doloro kiun la diktatoro suferis, ***Martínez Bordiú*** provis mal-helpi ke lia vera sanstato estu publika. La 30-an de oktobro, la diktatoro prezentis simptomojn de peritonito. Kiam li estis informita pri la graveco de lia stato, li ordonis, apliki la artikolon 11 de la Organika Leĝo de la Ŝtato kaj transdonis la Ŝtatestrecon al ***Juan Carlos***. ***Martínez Bordiú*** kaj ***Arias***, tiam kunigitaj en paniko, vane provis igi ke ***Juan Carlos*** akceptu provizoran nomumon, sed li rifuzis. Post malmultaj tagoj, la princo diris al la revuo ***Newsweek*** ke li volis esti "la simbolo de nacia unueco kaj repaciĝo". La loĝejo de ***Juan Carlos***, la Palaco de la Zarzuela, iĝis pilgrimloko por liberalaj frankistoj. La septembraj ekzekutoj malkaŝis la kadukiĝon de la reĝimo kaj vekis ĝeneralan deziron al ŝanĝo, kiu unuigis la demokratan opozicion kun larĝaj sektoroj de la ekonomia oligarkio, la mezaj klasoj kaj la Administracio. La espero tiam koncentriĝis en ***Juan Carlos***. Dum la tuta monato de novembro, la kurzo en la Madrida Borso altiĝis. La maldekstro dubis pri kiommezure la princo estis kaptita far la frankisma reganta klaso. Tamen, en la finaj semajnoj de ***Franco***, la kontaktoj de la princo kun eŭropaj senditoj kaj kun liberalaj figuroj ene de la interno sugestis ke li verŝajne provos gvidi Hispanion direkte al demokratio.

La hospitalo kie oni estis farante al ***Franco*** la lastajn, kvankam vanaj, operacioj, estis sieĝita fare de la gazetaro, ofertante grandegajn sumojn por fotoj de la for-velkanta diktatoro. La doktoro ***Pozuelo*** indignite rifuzis la fabelajn proponojn nur por malkovri poste, ke la markizo de ***Villaverde*** jam siaprofite uzis sian fotilon. La emo de la ***El Pardo***-kliko konservi ***Franco***-n vivanta malgraŭ lia intensa sufero estis ligita al la fakto ke la mandato de ***Alejandro Rodríguez de Valcárcel*** kiel prezidanto de la Konsilio de la Regno kaj de la Korteso finiĝos la 26-an de novembro. Se ***Franco*** povus sufiĉe resaniĝi por plilongigi la mandaton de ***Rodríguez de Valcárcel***, la kamarilo havus homon kapablan certigi ke la ĉefministro elektota de ***Juan Carlos*** estu "fidinda". ***Franco*** estis vivanta, sed nur apenaŭ: li estis apenaŭ konscia kaj plene dependa de la kompleksa maŝinaro de vivsubteno. Finfine, lia filino ***Nenuc***a insistis ke estu permesata al li morti en paco. La 19-an de novembro, je la 23:15, la diversaj tuboj, kiuj kunligis lin al la maŝinoj, estis forigitaj, sekvante la instrukciojn kontraŭvole formulitajn de ***Martínez Bordiú***. La diktatoro verŝajne baldaŭ poste mortis. La oficiala horo de morto estis la 5:25 frumatene de la 20-an de novembro 1975.

***Franco*** mortis riĉa, kun riĉaĵo de ĉirkaŭ kvarcent milionoj da eŭroj, laŭ prezoj de 2015. La timo de ***Doña Carmen*** pri reprezalioj estis senbaza. Kelkajn tagojn post sia investiĝo kiel reĝo, ***Juan Carlos*** aljuĝis al ŝi la titolon de Sinjorino de ***Meirás***, kaj tiun de Dukino de ***Franco*** al ŝia filino. La sinjorino havis tempon kontroli la procezon de pakado kaj ŝarĝado sur kamionojn sennombrajn skatolojn da juvelaĵoj, antikvaĵoj, pentraĵoj kaj gobelinoj, kune kun la paperoj de la diktatoro, por transdoni ilin al la diversaj posedaĵoj de la familio en Hispanio aŭ al sekuraj rifuĝejoj eksterlande. Oni supozas ke kelkaj el la objektoj de ne-kalkulebla valoro apartenis al la nacio, sed ke ekzistis neniu kontrolo far la responsuloj pri la Nacia Havaĵo.

Malgraŭ la morto de ***Franco***, la familio restis eksterordinare riĉa. La juvelaĵ-kolekto de ***Doña Carmen*** estis kolosa. En ŝia loĝejo, estis ĉambro en kiu la muroj estis kovritaj de la planko ĝis la plafono per kvardek kolonoj da 20 mallarĝaj tir-kestoj enhavantaj "pelmelon da juveloj: kolĉenoj, tiaroj, orelringoj, girlandoj, broĉoj, kameoj", kaj krome estis aliaj tirkestoj plenaj da oro kaj arĝento kaj unuopaj ŝtonoj: perloj, diamantoj, rubenoj, smeraldoj kaj topazoj. Kaj la plej valoraj pecoj estis en sekuraj skatoloj en bankoj. Ili estis donacoj de hispanoj kaj eksterlandanoj kiuj provis gajni la favoron de la diktatoro. En la domego de la biendomo ***Canto del Pico***, kiun la ***Franco***-familio ricevis kiel donaco en 1937, tunoj da donacoj estis amasigitaj far la diktatoro kaj lia edzino.

En aliaj lokoj, ekzistis tutaj magazenoj enhavantaj la donacojn kiuj estis senditaj al ***Franco***. Kaj, krom la amasigita riĉaĵo, ***Doña Carmen*** ricevis malavarajn ŝtatajn pensiojn kiel vidvino de la ŝtatestro, kapitan-generalo kaj tenanto de pluraj medaloj. Oni taksas, ke la kombinita valoro de la pensioj havigis al ŝi enspezon, kiu duobligis tiun de la ĉefministro (proksimume 350 000 eŭroj jare en 2019).




**Posteularo de la diktatoro kaj beneficuloj de ĉi ties predado al Hispanio**




La morto de ***Franco*** vekis esperon en tiuj, kiuj deziris demokration en Hispanio. Neniu ŝtatestro, krom la ĉilia diktatoro, ***Pinochet***, ĉeestis la funebraĵon. Male, en la kronado ***de Juan Carlos*** estis kelkaj politikaj gravuloj el Eŭropo kaj Usono. Tamen, estis egaj obstakloj survoje. La malamo en Eŭskio estis fonto de problemoj. La bunkro estis fortikigita en la polico kaj armeo. Pli ol 100.000 falangistoj daŭre estis rajtigitaj porti armilojn. En la ceremonio en la Korteso kiam ***Juan Carlos*** estis proklamita reĝo, li ĵuris la frankismajn leĝojn sed, en lia iome progresema parolado, li estis malvarme akceptita de la deputitoj. Ĉe lia kronado, la bunkro koleris ĉar kardinalo ***Tarancón*** admonis lin esti "reĝo de ĉiuj hispanoj".
Jes, ***Franco*** mortis sed daŭre validis la leĝoj kiuj subtenis la frankisman reĝimon. La procezo de demokratiigo estis longa kaj malfacila, kiel ni vidos. Sed nun interesas precizigi ke la koruptado pludaŭris ankaŭ dum la transira procezo kaj post la atingo de la demokratio. Pludaŭre estis kazoj similaj al tiuj jam priskribitaj de SOFICO, MATESA kaj la REDONDELA-oleo. Sed estas necese klarigi ankaŭ ke, same kiel dum la vivo de la diktatoro, la politikaj eventoj estis en ega rilato kun koruptado. Ĉiuj politikaj intrigoj enportis koruptan teniĝon kaj agadon. Ambaŭ, la politika disvolviĝo kaj la koruptado, samtempe estis kaŭzo kaj rezulto unu de la alia.
***Juan Carlos*** konsciis pri la forto kaj malbonvolo de la bunkro. Krome, ĉio, kion li faru, devus esti ene de la malvastaj limoj de la frankisma leĝaro, al kiu li ŝuldis sian tronon. Ĉar populara premo por reformo intensiĝis en la stratoj, ***Juan Carlos*** implikiĝis en kompleksa sekreta intertraktado. Li sukcesis anstataŭigi ***Rodríguez-de-Valcárcel***-on kiel prezidanto de la Korteso per sia fidinda kandidato kaj konsilisto, ***Torcuato Fernández-Miranda***. Kiel ĉefministro, li kontraŭvole konservis ***Arias***-on, malgraŭ konsideri ĉi tiun tro obstina, ĉar li tute konsciis, ke la bunkro taksus provoko anstataŭigi ***Rodríguez de Valcárcel*** kaj ***Arias Navarro*** samtempe.
La maldekstra eksterleĝa gazetaro ricevis la kronadon kun titoloj proklamante: "Ne al trudita reĝo" kaj "Ne al la frankisma reĝo". La fakto ke la unuaj agoj de ***Juan Carlos*** celis plifirmigi lian pozicion ene de la armeo konfirmis la timon de la opozicio. Li sendis mesaĝon al la armetrupoj, renovigante sian fidelecon al la flago kaj emfazante la rolon de la Armeo kiel garantianto de la fundamenta frankisma leĝaro.

La nova registaro inkluzivis sufiĉe da membroj de la frankisma sektoro por komplezi la bunkron. Tamen, sub premo de la reĝo, konsilita de ***Fernández-Miranda***, ***Arias*** inkludis ankaŭ kelkajn famajn reformistojn. ***Fraga***, ***Areilza*** kaj ***Antonio Garrigues***. Tamen, decida faktoro por la planoj de ***Juan Carlos*** estis la nomumo de ***Fernández-Miranda*** kiel prezidanto de la Korteso kaj de la Regna Konsilio. Lia scio pri konstitucia juro permesus al la reĝo igi la reformon sen rompi liajn ĵurojn. La monarko konvinkis ***Arias***-on por la nomumo de ***Adolfo Suárez*** kiel ministro ĝenerala sekretario de la Movado. Por la bunkro, ***Suárez*** estis tute akceptebla, sed ŝajnoj trompas. Same okazis kun la juna falangisto ***Rodolfo Martín Villa***, nomumita Ministro pri Sindikataj Rilatoj.


***Arias*** esprimis sian decidon sekvi la ekzemplon de ***Franco***, kaj publike certigis ke li ne instigas ***«ajnan turpan deziron al reviziismo aŭ suicid-intencojn de forigo de nia institucia sistemo pro juko por noveco aŭ nerespondeca arbitreco»***. Li reasertis sian decidon eternigi la frankismon kaj kontraŭbatali ties malamikojn. La opozicio postulis plenan politikan amnestion, la leĝigon de ĉiuj politikaj partioj, liberecon de asocio, la malmuntadon de la reĝima leĝaro kaj vertikalaj sindikatoj, kaj la okazigo de liberaj elektoj. La ses monatoj kiuj sekvis plenis je kolizio inter la malcedemo de ***Arias*** kaj la reformema volo de ***Fernández-Miranda*** kaj la reĝo. La bilanco kliniĝis favore al reformo danke al la mobiliziĝo de la amasoj en la tuta Hispanio kaj la perforto en Eŭskio.

Al la strikoj en Madrido sekvis en februaro manifestacioj postulante amnestion per pli ol okdek mil partoprenantoj en pluraj sinsekvaj dimanĉoj en Barcelono kaj eĉ pli grandaj en Eŭskio. Multaj eŭskoj pensis ke la perforto de ETA estis pravigita respondo al la institucia perforto de la frankismo. Strikoj kaj amasaj demisioj de municipaj oficistoj kontribuis al la intensa kampanjo de manifestacioj favore al amnestio. ETA restis aktiva. En la unuaj tri monatoj de 1976, pluraj anoj de la civil-gvardio estis mortigitaj, same kiel iuj polic-informantoj, al kiuj devas esti aldonitaj la kidnapo kaj posta murdo de industriisto. Du-monata striko en la urbo Vitorio kulminis per granda manifestacio la 3-an de marto, dum kiu okazis polica atako, kiu mortigis kvin homojn kaj vundis pli ol 70. Responde, estis ĝenerala striko en la tuta Eŭskio. La frontoj kreitaj en la cetero de Hispanio, disvastiĝantaj por altiri la moderulojn, neniam enradikiĝis en Eŭskio.


La ĉilia diktatoro *Aŭgusto Pinochet* en la funebraĵo de *Franco*


*Rodolfo Martín Villa*


*Torcuato Fernández Miranda* kaj la reĝo *Juan Carlos*


*Adolfo Suárez* kun la reĝo *Juan Carlos*

La Komunista Partio devis akcepti, ke ĝiaj esperoj pri "nacia demokratia agado" por renversi la frankisman sistemon estas nerealigeblaj preter Madrido kaj Barcelono. ***Santiago Carrillo*** vidis, ke la demokratia rompo povus veni nur el intertraktado de la reformistoj en la registaro kaj la plej moderaj opoziciantoj kvankam tia intertraktado favorus la socialistojn kaj kristandemokratojn, ŝajne pli "respektindajn". Do, li akceptis la unuiĝon de la du demokratiaj platformoj. Fine de marto ambaŭ iniciatoj kuniĝis en la Demokratian Kunordigon kaj tio pavimis la vojon por intertraktado kun la reformistoj de la sistemo. La fakto, ke estis necese atingi tian interkonsenton, montras, ke granda parto de la kontraŭstaro al frankismo havis tamen burĝan pensmanieron kun ĉio, kion tio signifas, tio estas, aprobon de la privata proprieto kun la malegaleco kiun ĝi implicas. Ĉu tio povas esti juĝata kiel ia formo de socia, kolektiva korupto?
La plej flekseblaj ministroj, kiel ***Areilza***, ***Suárez*** k. a. estis pretaj al dialogo, sed ***Fraga*** sekvante siajn aŭtoritatemajn tendencojn, arestis la opoziciajn gvidantojn, kiuj kunvenis la 29-an de marto por lanĉi la Demokratian Kunordigon. Li asertis ke li planis "bati per bastonoj" la manifestaciantojn ĉe mitingo favore al la amnestio tiam okazonta. Lia forlaso de reformismo estis miskalkulo kiu eliminis lin kiel ebla sukcedanto de ***Arias*** kaj akcelis la karieron de ***Adolfo Suárez***. Ĉi tiu plifirmigis sian pozicion sen veki la suspektojn de ***Arias*** aŭ la bunkro, kiuj estis konvinkitaj ke li estas falangisto kiu volis nur doni al la reĝimo demokratian bildon. Sed kontaktoj kun ***Fernández-Miranda*** konvinkis ***Suárez***-on ke lia estonteco dependis de lia subteno al demokratio, kaj li komencis konstrui pontojn kun la "tolerita opozicio" de la kristandemokratoj ligita al ***Fernando Álvarez de Miranda***. La grupo estis tre proksima al la reĝo, kiu komencis vidi ***Suárez***-on kiel iu kiu povus altiri malsimilajn sektorojn de frankisma politiko. Tiu ĉi opinio estis konfirmita kiam ***Suárez*** prezentis al la Korteso, ege elokvente, la Leĝon de Politikaj Asocioj de ***Arias***.
***Juan Carlos*** estis furiozigita per la aroganteco de ***Arias***, kiu konsideris sin neanstataŭebla, kaj obstrukciis la reformojn. ***Arias*** ne kaŝis sian malestimon pri la reĝo. Ĉi tiu donis intervjuon al ***Newsweek*** per kiu li priskribis la ĉefministron kiel "absolutan katastrofon" ĉar li reprezentis la interesojn de la bunkro. La 9-an de junio, post la parolado de ***Suárez***, la Korteso aprobis la Leĝon pri Politikaj Asocioj, sed rifuzis ŝanĝi la Krimkodon por permesi leĝigon de partioj. La reĝo sciis ke lia propra supervivo dependis de transiro al demokratio kaj ke tio, siavice, postulis politikiston kapablan trakti kaj la bunkron kaj la opozicion. Sekve, komence de junio, dum sukcesa vojaĝo al Usono, la reĝo petis de la Blanka Domo garantiojn de subteno. La 1-an de julio, ***Juan Carlos*** postulis la eksiĝon de ***Arias***.
La malgrando de la reformoj de ***Arias*** kaj la rezisto de la bunkro kontraŭ ili misfamigis la ekstrem-dekstraron antaŭ la cetero de la frankisma elito. La netaŭgeco de la planoj de ***Arias*** konvinkis multajn frankistojn kaj komercistojn pri la bezono aliĝi al la reformisma tendaro. Dume, la subprema mallerteco de ***Fraga*** plifirmigis la unuecon de la opozicio. La sukceso de la ŝanĝprojekto dependis de la persono elektita por sukcedi ***Arias***-on. Por desaponto de ***Areilza*** kaj ***Fraga***, estis nomumita

***Suárez*** kiel prezidanto la 3-an de julio. Lia promocio dependis de la fakto ke lia kono pri la Movado permesus al li, sub la gvido de ***Fernández-Miranda***, uzi la sistemon por fari la reformon. Baldaŭ, liaj frankistaj akreditaĵoj bridis la bunkron. Li poste agnoskis ke la mobilizo favore al amnestio en la dua semajno de julio konvinkis lin pri la urĝeco de rapida kaj profunda reformo.

La plej tuja problemo estis formi registaron post kiam ***Areilza*** kaj ***Fraga*** rifuzis partopreni en ĝi. ***Fernández-Miranda*** kaj la reĝo konvinkis ***Alfonso Osorio***-n esti vicprezidanto de la registaro kaj Ministro de la Prezidanteco. ***Osorio***, siavice, persvadis aliajn "tacito"-anojn akcepti ministrecon. La listo de ***Suárez*** de konservativaj katolikoj ligitaj al la plej progresemaj sektoroj de la hispana kapitalismo, kiel ***Marcelino Oreja***, pri Eksterlandaj Aferoj, kaj ***Landelino Lavilla***, pri Justico, estis pli sukcesa en la enkondukado de reformoj ol oni antaŭsupozis. Ilia programo, elokvente prezentita per televido, agnoskis la suverenecon de la popolo kaj promesis referendumon pri politika reformo, kaj ankaŭ balotadon antaŭ la 30-a de junio de 1977. ***Suárez*** gajnis konsiderindan popolan simpation, sed li devis manovri inter la opozicio kaj la malamika bunkro. ***Carrillo*** loĝis kaŝe en Hispanio kaj la Komunista Partio estis ĉe la avangardo de amaspremo postulante ŝanĝon. Tiun jaron okazis dekoble pli da strikoj ol en 1976. Sen provoki la Armeon, la strategio de ***Suárez*** estis enkonduki rimedojn antaŭ ol la fanatikuloj de la frankisma reĝimo povu reagi; tamen, li ankoraŭ devis igi la opozicion akcepti ke demokratiigo eblus okazi nur ene de la "leĝeco" de la frankismo.

***Suárez*** dediĉis la monaton aŭgusto al kontaktado kun multaj opoziciaj personecoj, inter ili ***Felipe González***. Per perantoj, la prezidanto akiris certigojn de ***Carrillo*** ke li ne interrompos pacan transiron. La opozicio varbis pli kaj pli da vrakuloj el la frankisma reĝimo. La kreado de liga komitato sufiĉis por devigi ***Suárez***-on plirapidigi sian politikan reform-projekton. Tio siavice kaŭzis maltrankvilon en la armeo. La reakcia generalo ***Fernando de Santiago y Díaz de Mendívil***, en sia pozicio kiel Vicprezidanto kaj Ministro pri Defendo, estis ŝlosila ligo inter la militistaro kaj civiluloj en iliaj klopodoj malhelpi demokratan reformon. Lia influo estis rebatita iagrade per la nomumo de la pli




**Manifestacioj en 1976 postulante politikan amnestion**


***Fernando Álvarez de Miranda***



***Alfonso Osorio García***


***Marcelino Oreja Aguirre***


***Landelino Lavilla Alsina***


**Generalo *Fernando de Santiago y Díaz de Mendívil***


**Generalo *Gutierrez Mellado* kun *Adolfo Suárez***


***Kortesa sesio de la harakiro aŭ memmortigo de la frankisma reĝimo***

liberala generalo ***Gutiérrez Mellado*** kiel estro de la Ĉef-Stabo. La 8-an de septembro 1976, ***Suárez*** petis subtenon por sia reformprojekto de la armeaj ministroj, la naŭ kapitan-generaloj kaj la ĉefoj de la Ĉef-Stabo de la tri branĉoj de la Armeo. Kun la subteno de ***Juan Carlos***, la konvinke deklaritaj planoj de ***Suárez*** estis senentuziasme akceptitaj, kvankam kun la postulo ke la Komunista Partio estu ekskludata el iuj estontaj reformoj. ***Suárez*** certigis, ke la internaciaj fidelecoj enskribitaj en la statutoj de la kom.partio malhelpus ĝian leĝigon. Li ne diris al ili ke, per siaj sekretaj kontaktoj kun ***Carrillo***, li sciis ke oni estis prilaborante la modifon de la menciitaj statutoj kaj la postan leĝigon de la Komunista Partio.

La Registaro aprobis la Politikan Reform-Leĝon sen opozicio de la kvar armeaj ministroj. Kelkajn tagojn poste, aliflanke, generalo ***Fernando de Santiago*** impete kontraŭbatalis proponitan sindikat-reformon tiamaniere ke la 21-an de septembro ***Suárez*** eksigis lin kaj anstataŭigis lin per ***Gutiérrez Mellado***. Poste, la rilatoj de ***Suárez*** kun la militistaro plimalboniĝis rapide. La kolera reago de ***De Santiago*** kaj Generalo ***Iniesta Cano*** konsistigis militdeklaron kontraŭ ***Gutiérrez Mellado***; ambaŭ generaloj dediĉis sin inciti puĉon far la Armeo per artikoloj en ***El Alcázar***. Tamen, ***Gutiérrez Mellado*** povis entrepreni la urĝan taskon de promociado de nova generacio de oficiroj lojalaj al la baldaŭa demokrata registaro.

Kiam la teksto de la reformo fariĝis publika, la reagoj de la opozicio estis diversaj. La fakto ke la promesita balotado estus okazigita sub la tiama registaro vekis timojn pri manipulado. La Komunista Partio denuncis la tekston kiel "kontraŭdemokratia fraŭdo". La PSOE estis permesita okazigi sian 27-an Kongreson. ***Martín Villa***, Ministro pri Internaj Aferoj, malpermesis ĉiujn publikajn komunismajn agadojn, sed fakte li fermis la okulojn al la PCE. ***Suárez*** insinuis al la socialistoj kaj la maldekstraj kristandemokratoj ke li faros eĉ pli grandajn koncedojn, kondiĉe ke ili ne provokos la Armeon per insistado pri la leĝigo de la kom.partio. Li lerte igis ***Felipe González*** konsenti ke trofrua leĝigo estus nerealisma. Pro ruzo kaj lerteco de ***Fernández-Miranda***, ***Suárez*** sukcesis realigi la reformprojekton pere de la frankistaj institucioj. La 8-an de oktobro, ĝi estis aprobita kun

negravaj modifoj far la Nacia Konsilio kaj, meze de novembro, ĝi estis ratifita en la Korteso, en ambaŭ kazoj fare de tre grandaj plimultoj. Kelkaj necedemaj uloj estis senditaj por oficialaj ekskursetoj al Panamo, tra la Karibio, kaj al aliaj estis promesitaj sidlokoj en la estonta Senato. Multaj prokuroroj naive kredis, ke ili estos reelektataj en la venonta balotado. Ĉi tio estis, laŭ tiel nomata, kolektiva memmortigo, la "harakiro de la frankisma reĝimo".

Ankoraŭ nekonfidante, ampleksa fronto de kontraŭuloj malakceptis la planojn de ***Suárez*** submeti sian politikan reform-projekton al referendumo. Sed la alvoko al sindeteno estis vana. La alvoko al ondo da strikoj ne interrompis la kalendaron de reformoj, ĉar la plimulto de la loĝantaro aprobis la ŝanĝojn enkondukitajn de la prezidanto. La ĝenerala striko de la 12-a de novembro ne fariĝis la granda nacia agado kiun la komunistoj esperis, plejparte pro la rigoraj antaŭzorgoj prenitaj de la Ministro pri Internaj Aferoj, ***Rodolfo Martín Villa***, kiu ordonis la areston de laboristaj lideroj en Madrido, Barcelono, k. a. Multaj opoziciaj grupoj akceptis tiam, ke trakti kun ***Suárez*** povus konduki al reala reformo. La PSOE klinis al modereco, kiel evidentiĝis en sia 27-a Kongreso okazinta en Madrido en decembro. La partia gvidantaro timis, ke eĉ se ili rifuzus partopreni en la balotado, solidare kun la komunistoj, multaj socialistoj voĉdonus al rivalaj grupoj. La ĉeesto de la ĉefaj socialistaj lideroj de Eŭropo subtenis la moderan linion de ***Felipe González***, kiu klarigis, ke lia partio partoprenus en la balotado eĉ sen antaŭa leĝigo de ĉiuj partioj.

La rezulto de la referendumo estis venko por ***Suárez***, sed ankaŭ por la premo de la amasoj kiuj dum 1976 puŝis la Registaron al demokratiigo. ***Suárez*** ankoraŭ havis du gravajn problemojn rilate al sia delikata paŭzo kun la Armeo: la leĝigo de la PCE kaj terorismo. La unua estus solvita koste de venena rankoro en la militaj rondoj. La dua, male, estis nesolvebla kaj, fine, estis la falo de ***Suárez***, kiu, mergita en la komplika tasko trafi la vojon al demokratio, ne kapablis kompreni la postulojn de ETA aŭ kompreni ke ili havis siajn radikojn en la ekscesoj de la frankismo. Por solvi tiun problemon, estus necesa amnestio por ĉiuj ETA-malliberuloj kaj la leĝigo de la eŭska flago, sed tiaj akordigaj gestoj estis pli ol tio kion li, kaj ĉefe la bunkro, pretis konsenti. Tamen, la leĝigo de la kom.partio estis relative simpla. Konscia ke la cetero el la opozicio verŝajne ne riskus siajn proprajn gajnojn por helpi la komunistojn, ***Carrillo*** kuraĝis alpreni iun iniciaton. Kaŝe loĝanta en Madrido, li decidis trudi ian situacion okazigante gazetaran konferencon la 10-an de decembro kun pli ol 70 hispanaj kaj fremdaj ĵurnalistoj. Ĉi tio estis provoko por ***Martín Villa***, sed la vortoj de ***Carrillo*** al la ĵurnalistoj estis akordigaj. Li asertis ke se la PCE estus permesita kandidatiĝi en la elektoj, la komunistoj kunlaborus en la kreado de socia kontrakto por trakti la ekonomian krizon, signifa oferto surbaze de la komunista influo en Laboristaj Komisionoj. ***Martín Villa*** ordonis la areston de ***Carrillo***, kiu restis en prizono dum ok tagoj, sed finfine ***Suárez*** liberigis lin, ĉar proceso damaĝintus lian kredindecon kiel reformanto. Tiele, ***Suárez*** faris egan paŝon al la leĝigo de la PCE.



**Antonio María de Oriol y Urquijo**



**Emilio Villaescusa Quilis**




**Murditoj en la atenco de *Atocha* kaj amasa manifestacio de ilia funebraĵo**

Tio povis nur kolerigi la bunkron, ĉefe la armean estraron. Post kiam ***Suárez*** anoncis sian reformprojekton, GRAPO lanĉis fajne dizajnitan kampanjon por malstabiligi la landon, laŭ la linioj de la ekstrema dekstro en Sudameriko kaj Italio. Ĝi komenciĝis per serio da bombatakoj, kiuj kreskadis dum la etapo antaŭ la referendumo kaj kulminis per la kidnapo de ***Antonio María de Oriol y Urquijo***, prezidanto de la Ŝtata Konsilio. La fakto, ke la referendumo pri demokratia reformo finiĝis per favora voĉdono de ega plimulto el la balotantoj, igis la GRAPO pliintensigi la provokadon per la kidnapo de Generalo ***Emilio Villaescusa Quilis***, prezidanto de la Plejsupera Konsilio de Milita Justico. En la sama tago, ekstremdekstraj teroristoj murdis kvin homojn, el kiuj kvar estis komunistaj laborist-advokatoj, en advokata firmao en la madrida kvartalo ***Atocha***. ***Carrillo*** ne lasis sin provoki kaj anstataŭe alvokis por trankvilo. Ĉe la funebraĵo de la viktimoj, la Kom.Partio organizis kolosan manifestacion de silenta solidareco. Tiu elmontro de la komunista forto kaj disciplino ne nur profunde impresis ***Suárez***-on, sed ankaŭ dispelis multon el la popola opono al leĝigo de la Komunista Partio. Ŝanĝe de agado kontraŭ la bunkroperforto, opozicia delegacio ofertis al Suarez komunan deklaron kondamnante la terorismon kaj postulante la subtenon de la nacio al la registaro. La implica agnosko ke ***Suárez*** apartenis al la demokratiaj fortoj donis flugilojn al lia pozicio.

***Suárez*** povis organizi la promesitan ĝeneralan balotadon, sed tio estis nur paŝo al lia fina celo. La celo de la projekto estis garantii la politikajn kaj ekonomiajn interesojn de la frankisma pov-strukturo kiu, male ol la bunkro, alianciĝis kun la monarkio. Por tio necesus krei centrodekstran partion kun balotperspektivoj. La progresemaj eksfrankistoj, kiuj tiam ariĝintaj en la demokratiajn vicojn, haste prepariĝis por la balotado. ***Fraga*** kreis dekstran partion kunlabore kun ses aliaj eks-frankismaj figuroj, kiel ***Laureano López Rodó***. Ili esperis altiri la sektoron de la socio kiu estis formita de preskaŭ 40 jaroj da frankisma propagando. La kontrolo de la amaskomunikiloj kaj la eduka sistemo kreis tion, kion oni nomis “sociologia frankismo”. Per ega subteno de la bankoj, la partio de ***Fraga***, ***Alianza Popular*** (Populara Alianco), estis fondita jam en septembro de 1976. Parto el ĝia financado venis kontraŭleĝe de la Kristana Socia Unio de ***Franz Josef***

***Strauss***. ***Hans Hoffmann***, membro de la ekzilita nazia komunumo en Hispanio, kreis la Fondaĵon ***Hanns Seidel*** kaj ties mono estis enkanaligata al ***Alianza Popular***. Fakte, kiel ĝia alinoma, la Popola Partio, la partio de ***Fraga*** estis ofte akuzita je korupto. Ankaŭ la Socialista Partio ricevis germanan monon de la ***Stiftung Friedrich Ebert***. Tra la tempo, la serĉo de balotfinancado igis aliajn politikajn partiojn engaĝiĝi en korupton.
La strategio de ***Fraga*** konvinkis ***Suárez***-on ke plej konvene por li estus krei propran centran partion. Li kreis la Union de la Demokrata Centro (UCD) profitante la bezonon de aliancoj de multaj malgrandaj centro-dekstraj partioj. Lia venka atuto estis la kontrolo de ŝtata Radio-Televido kaj la maŝinaro de la loka administracio. La UCD estis kuniĝo de kvin ĉefaj grupoj, kiuj siavice estis konsistigitaj de pluraj grupoj. Laŭ la pasado de la tempo, ĉiuj kontribuis al la disrompiĝo de la UCD, sed en 1977 ĉiuj ili volis esti parto de balote profita partio. Ideologiaj, personaj kaj moralaj konsideroj restis dualoke en la senkompata postkuro de profitdonaj aliancoj. La kontrolo far ***Suárez*** de la balotmaŝinaro de la ŝtato donis al li egan potencon. Neeviteble, la kandidat-listoj de la UCD estis plenigitaj per viroj kiuj estis prokuroroj en la frankisma korteso, burĝaj kaj municipaj registarpostenoj, ŝtatindustrioj, Radio-Televidaj, aŭ altrangaj oficialuloj. La reala potenco en la UCD apartenis al ***Suárez*** kaj liaj iamaj kolegoj en la frankisma reĝimo kaj, en pli malgranda mezuro, al la “baronoj” de la malsamaj grupoj kiuj konsistigis la partion. En la politika potenco, la UCD-deputitoj estis ambiciaj viroj ĉefe devontigitaj al siaj propraj karieroj. La plimulto konservis proksimajn rilatojn kun la komerca mondo, la industrio kaj, ĉefe, la bankoj. La UCD estis do la ideala ilo por garantii ke, en la transiro de diktatora reĝimo al demokratia reĝimo, la vera potenco de la Registaro restu en la manoj, se ne de la sama personoj kiel antaŭe, almenaŭ de sufiĉe konservativaj individuoj por garantii la ekzistantan strukturon de la ekonomia kaj socia potenco.
Paralele al la formado de la UCD, aliaj partioj estis leĝigitaj. La problemo ankoraŭ estis la PCE. La bunkro kaj la Armeo estis neflekseble malfavoraj al ĝia leĝigo, sed sen ĝi demokratio estis nekompleta. Suárez prokrastis ĝin tiel longe kiel li povis, sed la 27-an de februaro li renkontiĝis kun ***Carrillo***. Ŝanĝe leĝigo, ***Carrillo*** promesis akcepti la monarkion, adopti la ruĝ-flavan flagon kaj lian subtenon por estonta socia pakto. La 9-an de aprilo, dum plejparte el la politika kaj armea elito estis ĝuante la paskan semajnfinon, ***Suárez***, fidante je la konsento de la Armeo, anoncis la leĝigon de la Komunista Partio, kio altiris al li ferocan malamon de la bunkro, kiu konsideris tion kiel malnobla perfido al la venko de ***Franco*** en la Civil-milito. La Ministro de la Mararmeo, Admiralo ***Pita da Veiga***, eksiĝis. Malgraŭ la klopodoj de ***Suárez*** la 11-an de aprilo por pravigi tion kion li faris al la ĉefkomando, estis klare ke la opozicio de la militistaro estis konsiderinda. Kiel sekureciniciato, esencaj armeunuoj estis lasitaj preskaŭ sen nafto. La leĝigo de la PCE estis necesa parto de la transiro, sed ankaŭ donaco al la bunkro. En la kazernoj, serio da “patriotaj

Balotkampanjo de 1977




konsiloj” distribuis propagandon, supozeble kreitan fare de ekstremistoj kiel ***Girón***, ***Utrera Molina***, kaj ***Blas Piñar***, denuncante la “perfidon” de ***Suárez***. Sektoroj de la armeo venis al la konkludo ke necesus interveni en politikon. Admonoj al armea subfosado estis publikigitaj ĉiutage en la gazetaro de la bunkro.

La balotkampanjo okazis en festa etoso; okazis amasaj mitingoj organizitaj de la Socialista kaj la Komunista partioj. La UCD-kampanjo baziĝis sur la televido, gazetaro kaj radio. Dek-ok milionoj da homoj voĉdonis, preskaŭ 80 elcentoj de la balotlisto, kaj 90 procentoj el ili klare voĉdonis por la ŝanĝo. Tiu popola deziro pri ŝanĝo sed ne al konfronto estis favora al ***Suárez*** kaj ***Felipe González***. Male, ***Carrillo*** kaj ***Fraga*** vekis memorojn de la pasinteco. Malgraŭ iliaj abundaj monrimedoj, la viciĝo de gravaj frankistoj en Populara Alianco ne helpis ilian aferon, ĉefe pro la nostalgio de ***Arias Navarro*** kaj la impeto de ***Fraga***. La dekstra gazetaro profitis la ĉeeston de komunistaj figuroj el la milito en la listoj de Kom.Partio, kiel ***Carrillo*** aŭ ***Dolores Ibárruri***, por veki timon pri interna milito. Aliflanke, la moderna bildo de ***Felipe González*** kaj la prestiĝo, kiun la subteno de la eŭropaj socialismaj gvidantoj donis al li, igis lin serioza rivalo por la gvidanto de la UCD. ***Suárez*** rifuzis partopreni ajnan debaton kun la lideroj de aliaj partioj, fidante je la amaskomunikiloj kaj bone financita reklamkampanjo. La propagandaparato de la UCD ege laboris por altiri virinojn, profitante la korpan aspekton de ***Suárez*** kaj kreante bildon de devota familioviro kaj katoliko. Kiel atendite, la UCD venkis en la baloto, per 34,3 elcento de la voĉoj; sed la socialistoj restis duavice kun 28,5 elcento. La Kom.Partio triavice kun 9,3 elcento kaj Populara Alianco kvaravice kun 8,4 elcento.

La kreado de demokratia registara sistemo, en tiu ĉi kunteksto, estis ebla danke al la lerteco de ***Adolfo Suárez*** kaj liaj konsilistoj, al la persistemo de ***Juan Carlos*** sed, ĉefe, al la modereco de ***González***, ***Carrillo*** kiuj multe foroferis favore al la tuja celo de demokratio. Formala politika demokratio estis granda atingo post 38 jaroj da diktaturo, sed nur timema unua paŝo. Krome, ĝi faris nenion por forigi la koruptajn praktikojn hereditajn de la frankisma reĝimo kaj antaŭaj. La simpla problemo de lanĉado de kandidatoj por naciaj kaj lokaj balotoj ofte signifis ke la etiko de novaj rekrutoj ne povus esti adekvate kontrolita. Praktikoj kiuj estis konsiderataj normalaj sub la frankismo, kiel ekzemple la privata uzo de oficialaj veturiloj kaj vojaĝaj kaj

reprezentaj monhelpoj, daŭris kun la argumento ke "nun estas nia vico". Kun venko en la balotoj kiel la ĉefa prioritato, tio estis neevitebla, precipe kiam temis enspezi financojn por la partioj. Espero pri socia kaj ekonomia reformo estis diskrete forlasitaj. Ekzistis neniu puno por tiuj kiuj profitis el la fruktoj de venko en la Civil-Milito kaj nenia justico por iliaj viktimoj. Multaj frankistaj roluloj restis en pozicioj de potenco simple transirante el la frankisma reĝimo al la UCD. Eble neeviteble, en kunteksto de kreskanta inflacio kaj senlaboreco, dum la sekvintaj kvar jaroj popola entuziasmo turniĝis al elreviĝo.

La problemoj kiuj eluzigis la demokration en la postaj kvar jaroj –puĉoj, terorismo kaj ekonomia stagno– ne povus esti solvitaj per la simpla ekzisto de modera voĉdonantaro. Neeviteble, pro siaj proksimaj ligoj al la financa kaj industria elito, la UCD havis nur malmulte da intereso fari strukturajn reformojn. La prioritato de la nova registaro devis konservi la unuecon de dividita partio kies membroj celis plejparte akiradon de alte pagitaj oficialaj pozicioj. La personaj amikoj de ***Suarez*** estis bone reprezentitaj en la registaro; inter ili estis la nova Vicprezidanto pri Politikaj Aferoj, ***Fernando Abril Martorell***. La kapablo de la prezidanto kontentigi la esperojn de la voĉdonantaro estis limigita de la kostoj teni sian heterogenan partion unuece, de la manko de absoluta plimulto en la Kortesoj, de la bezono krei konstitucian kadron kiun ĉiuj povus akcepti, de la postuloj por aŭtonomeco de iuj regionoj kaj, ĉefe, de la ĉiutaga perdo de energio pro la kontraŭdemokratia perforto de la ekstrema dekstro kaj la ekstrema maldekstro. Senĉese estis necese atingi interkonsentojn antaŭ la plej gravaj voĉdonadoj en la Kortesoj, kaj ene de la UCD kaj kun la aliaj partioj. Sia propra karaktero kaj la problemoj kiujn li renkontis signifis ke ***Suárez*** kutimis ŝlosi sin en fumplenaj oficejoj. Lia kutima maniero atingi interkonsentojn, sekrete kaj malantaŭ la kulisoj, kaj la ĉiutaga nervozeco kaj timo, kiujn la ETA-terorismo deĉenigis, transformis la optimismon de 1977 en la elreviĝon de 1980.


La akraj streĉiĝoj en Eŭskio, kiuj ekestis dum la frankismo, estis sufiĉe intensigitaj per la konduto de nereformitaj policoj. Multaj eŭskoj kredis ke faŝisma subpremo daŭre ekzistis, kvankam sub alia nomo. La kutimoj de polica



**Nova Registaro kaj Korteso post la balotado de la 15-a de julio de 1977**



***Fernando Abril Martorell***



***Jaime Blanco García***


perforto ne malaperis kaj, eĉ ekster Eŭskio, en 1977 okazis pluraj skandaloj. En aŭgusto, la socialista deputito por Santandero, ***Jaime Blanco***, estis batita de la polico dum mitingo. En decembro, polico ekpafis kontraŭ renkontiĝo de andaluzaj naciistoj en Malago, mortigante unu viron kaj vundante ses aliajn. Post kelkaj tagoj, studento estis pafmortigita en la Universitato de ***La Laguna***, en Tenerifo. Kiam ***Martín Villa*** apogis la policon kaj faris nenion kontraŭ la respondecaj, li denove estis kondamnita kiel frankisto en la Kortesoj fare de ***Alfonso Guerra***. ***Martín Villa*** kun la polico kaj ***Gutiérrez Mellado*** kun la Armeo alfrontis la saman personar-problemon kun kontraŭdemokratia formacio. Necesaj reformoj estis evititaj pro timo de ribeloj. Ĝis la jaro 1979, ***Martín Villa*** estis nekapabla trudi ampleksajn reformojn al la polico.
La leĝigo de la Komunista Partio intensigis kontraŭdemokratiajn konspirojn en la superaj rangoj de la armetrupoj, instigitaj de la ultra gazetaro, dum la kazernoj estis plenigitaj je pamfletoj postulantaj armean intervenon. La spionservoj ne transdonis informojn pri la konspirantoj. Origine kreita por ekstermi liberalismon en la Armeo, la armea inteligenteco estis radikale faŝisma laŭ sia konsisto, celoj kaj metodoj, do la armeaj malamikoj de la demokratia reĝimo havis valoregan helpon. La ***Suárez***-registaro provis reformi la spionservojn kreante la Plejalta Centro de Informado de la Defendo (CESID). Heredinto de la kunlaborantaro de ĝiaj diversaj frankismaj antaŭaĵoj, la CESID formis paralelan potencostrukturon kiu ne kunhavis la fidelecon al la reĝo de armea hierarkio de ***Gutiérrez Mellado***. Malgraŭ indico ke CESID spionadis ministrojn kaj aliajn politikistojn malsukcesante priesplori puĉistojn, la registaro fermis la okulon. La kontraŭdemokratia furiozo en la Armeo estis rimarkinda en la aŭtuno de 1977. Meze de septembro de tiu jaro, Generalo ***Fernando de Santiago*** gastigis tritagan kunvenon de elstaraj generaloj en ***Játiva*** (Valencio). Ili volis ke la reĝo nomumu registaron de nacia savo prezidita de ***De Santiago***. Malgraŭ oficiala neo, ĝeneraligitaj onidiroj pri ĉi tiu sensanga puĉo elmontris la minacon de armea interveno. Paralele estis organizitaj civilsubtenaj retoj por subfosado. La organizantoj de la propagandaj kampanjoj de la “patriotaj konsilioj” supozeble preparis siajn adeptojn por alpreni kontrolon de la publika administrado, loka registaro kaj komunikado en la okazo de puĉo. Timante ekigi armean intervenon, la registaro faris neniun agon kontraŭ la partoprenantoj en la renkontiĝo de ***Játiva***.
***Gutiérrez Mellado*** provis kontroli la militistaron per strategiaj translokigoj kiel tiu de la ekstremdekstra Generalo ***Jaime Milans del Bosch*** al Valencio. La ŝanĝoj de ***Gutiérrez Mellado*** nur instigis la suspektojn de la militistaro ke la registaro estis nedecidema, enmiksema, kaj rankora. Alia pruvo de malforteco estis ke la kolonelo ***Antonio Tejero*** de la Civilgvardio estis punita nur per unumonata aresto en la kazerno, malgraŭ esti preskaŭ provokinta masakron en Malago la 8-an de oktobro, kiam, laŭ liaj ordonoj, rajtigita manifestacio estis detruita fare de tre armitaj civil-gvardistoj. Lia nerespondeca brutaleco igis lin kulta figuro inter la ekstremdekstrularo.

Malgraŭ la eŭska terorismo, ***Suárez*** faris rimarkindan progreson en la solvado de la problemo de Katalunio. Danke al la mediacio de la bankisto ***Manuel Ortínez***, ***Suárez*** establis proksiman rilaton kun la 77-jara ekzil-prezidanto de la ***Generalitat de Catalunya*** (Politika ento de regiona suvereneco), ***Josep Tarradellas***. La rezultoj de la balotado de la 15-a de junio en Katalunio konsciigis ***Suárez***-on pri la «kataluna problemo». La UCD estis tie venkita de du el la katalunismaj partioj, la socialista PSC kaj la komunista PSUC. Tiel, fine de junio, ***Tarradellas*** estis invitita al Madrido kaj komencis penigajn intertraktadojn kun la ĉefministro. La Reĝo ***Juan Carlos*** ludis gravan rolon por la interkonsento. Ŝanĝe de la restarigo de la ***Generalitat***, ***Tarradellas*** promesis lojalecon de Katalunio al la monarkio, akcepton de la unueco de Hispanio kaj respekton por la armetrupoj. La renkontiĝo estis teatra gesto kiu malgravigis la balotan venkon de la katalunaj maldekstremaj partioj kaj reasertis la emon de ***Suárez*** regi per kaŝaj intertraktadoj. La interkonsento kun ***Tarradellas*** estis ege populara sukceso, sed ĝi estis atingita je la prezo de la rankoro de la militistaro.

La progreso kun la eŭskoj estus multe pli malrapida pro la temo de amnestio por ETA-kaptitoj. Komence de oktobro, la opozicio premadis ke amnestio ne nur estu donita al la ETA-anoj, sed ankaŭ al la armeaj oficiroj kiuj batalis por la Respubliko dum la Civita Milito kaj eĉ al la ekstremdekstraj teroristoj respondecaj pri la masakro de ***Atocha***. ***Suárez*** renkontiĝis kun reprezentantoj de ĉiuj partioj, sed li avertis ilin, ke li alfrontas tion, kion li nomis la “faktaj potencoj”, tio estas, la potencaj entoj kiuj gardis la demokratian reĝimon: la Armeo, la bankoj. kaj, en pli malgranda mezuro, la Eklezio. Tio klarigas kial la amnestio aprobita en la Korteso la 14-an de oktobro ekskludis kaj respublikanajn oficirojn kaj membrojn de la Demokrata Armea Unio. Tamen, tiu amnestio, ratifita per la preskaŭ unuanima voĉdono de la Korteso, ŝajnis simboli repaciĝon. Kiel bazo de la tiel nomata “pakto de forgeso”, ĝi estus unu el la kolonoj de la transiro al demokratio. La leĝo estis ankaŭ akompanita de la detruo de la arkivoj de la subprema aparato de la frankisma reĝimo.

Tamen, la fantomo de armea rankoro pendis super la intertraktadoj pri eŭska aŭtonomio. La eŭska registaro en ekzilo estis pli grava ento ol la simbola kataluna ***Generalitat***. ***Suárez*** ne pripensis atingi interkonsenton kun la eŭska ***lendakari***,


***Antonio Tejero Molina***


***Manuel Ortínez Mur***



***Josep Tarradellas***


***Jesús María de Leizaola***


***Manuel Clavero Arévalo***

***Jesús María de Leizaola***, kiel tiu kiun li fermis kun ***Tarradellas***. Aliflanke, en komplikaj cirkonstancoj, la vicministro por la Regionoj, ***Manuel Clavero Arévalo***, konsentis kun parlamentaj reprezentantoj de la Eŭska Naciisma Partio kaj la eŭskaj grupoj de la PSOE kaj la UCD krei la Ĝeneralan Eŭskan Konsilion, kun kiu la Registaro intertraktus problemojn pri aŭtonomio. Tiamaniere, la plej radikalaj separistoj estis ekskluditaj, do ili rigardis la procezon kun suspekto. La plej polemika afero estis la situacio en Navario. Por la eŭskaj naciistoj, la provinco estis parto de Eŭskio; por la Armeo, la UCD kaj la dekstraro ĝenerale kaj la navara dekstraro aparte, ĝi estis la lulilo de la hispana naciismo. Krome, nek la PSOE nek la PCE estis favoraj al la inkludo de Navario en Eŭskion. Sekve, la Statuto de Aŭtonomeco de Eŭskio, kiu ekvalidis la 25-an de oktobro 1979, limiĝis al la tri eŭskaj provincoj Biskajo, Gipusko kaj Alavo.
Sed el la plej neverŝajnaj areoj de Hispanio, postuloj de aŭtonomio ekestis kiel respondo kaj al la korupto kaj neefikeco de lokaj registaroj sub ***Franco*** kaj al la ekonomiaj malekvilibroj hereditaj de la reĝimo. ***Clavero Arévalo*** provis kontentigi la lokajn aspirojn sen provokado de la militistaro, per kreado de dunivela sistemo. La tri historiaj naciecoj, Katalunio, Eŭskio kaj Galegio, estis permesitaj ellabori statutojn de aŭtonomio kiuj poste estus submetitaj al loka referendumo. Dek tri aliaj regionoj, kelkaj malgrandaj kiel Kantabrio, aliaj grandaj kiel Andaluzio, estus regitaj per malpli precizaj reguloj. Ne necesas diri, ke la procezo helpis flamigi la malkontenton de la militistaro kun la demokratia reĝimo. Pri aliaj aferoj, tamen, la aŭtuno kaj vintro de 1977 atestis kunlaboron kaj oferon inter la ĉefaj politikaj partioj, kiel simbolas la socia interkonsento subskribita fine de oktobro fare de reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj partioj, kiu okazis nomita “la Moncloaj Paktoj”. ***Suárez*** profitis, ke ***Santiago Carrillo*** akceptis, ke la lando estas tro malforta ekonomie kaj la sano de la ĵus naskita demokratio tro delikata por elteni maldekstrajn postulojn. La Moncloaj Paktoj estis esence plano je aŭstereco, kvankam ilia celo estis establi komunan respondon al la terorismo, same kiel al inflacio, senlaboreco kaj la kreskanta komerca deficito. Kun inflacio je 29 elcento, la maldekstro akceptis salajrolimojn kaj aliajn dispoziciojn por limigi krediton kaj registarajn elspezojn. Interŝanĝe, la registaro promesis gravan struktur-reformon, ĉefe en agrikulturo kaj la impost-sistemo, la reorganizadon de la polico, kaj la redonon de la konstruaĵoj, gazetoj, kaj sindikat-fondusoj konfiskitaj fare de la frankistoj post la Civita milito. En la realo, la Registaro plenumis malmultajn el siaj promesoj kaj la laborista klaso estis la plej trafita de la ekonomia krizo. Dum la sekvaj tri jaroj, la inflacio falis al 15 procente, kaj la senlaboreco ŝvebis de 7 al preskaŭ 13 procente, pro bankrotoj kaj fermoj de fabrikoj kaŭzitaj de mon-politikoj. Malgraŭ la espero ke la demokratio solvus ĉiujn misaĵojn de Hispanio, tia severeco kontribuis al tia ĝeneraligita seniluziiĝo kiu estis konata kiel “desencanto” (seniluziiĝo, elreviĝo).
La redaktado de Konstitucio estis grava jura tasko; la konstitucia pakto signifis paŭzon inter la politikaj partioj kiuj faciligis ĝin. Malgraŭ malakordo pri iuj

temoj, stabila progreso estis farita sub la prezidanteco de ***Emilio Attard***. La interkonsiliĝoj finiĝis la 20-an de junio. Ĝi ne kontentigus la ultradekstrulojn aŭ la tiamajn eŭskajn naciistojn aŭ la katalunistojn de kvardek jaroj poste, sed la moderigo de la teksto kaj la garantio de bazaj liberecoj certigis al ĝi vaste favoran popolan akcepton. La sukcesa kariero de ***Suárez*** venis al fino en 1978 pro la pliiĝo de la strata deliktado kaj kreskanta senlaboreco. La ekstrema dekstro asertis, ke la krimuloj estas maldekstruloj, kiuj estis liberigitaj el malliberejo danke al la amnestio. La maldekstraro argumentis ke la polico provis erozii demokration permesante al krimo foriri de kontrolo. Estis, kompreneble, okulfrapa kontrasto inter la brutala efikeco de la polico sub ***Franco*** kaj ilia ŝajna senpoveco sub la demokratia reĝimo. La demando pri leĝo kaj ordo eroziis la popularan kredindecon de la registaro de ***Suárez***, kvankam estus la terorismo de ETA kaj la armea respondo al la agoj faritaj de la bando kiuj finfine detruis ĝin. La ĝenerala konvinko en Eŭskio, ke ***Martín Villa*** aprobis la brutalecon de la polico akcelis la subtenon al ETA. La daŭra kresko de la senlaboreco kaj la malsukceso de la registaro efektivigi la reformojn promesitajn de la Moncloaj Paktoj igis la PSOE kaj la liberalan gazetaron konkludi ke la UCD estas la marioneto de la Hispana Konfederacio de Komercaj Organizoj (CEOE), dekstrula organizaĵo de dungantoj. La populareco de ***Suare***z komencis malkreski.
La pasado de la tempo ne akordigis la armetrupojn kun la demokratia reĝimo. La necesaj klopodoj de ***Gutiérrez Mellado*** por promocii progresemajn oficirojn devigis lin preteriri la rigidan sistemon de plirangigoj bazitaj sur strikta servodaŭro, kiu ofendis tradiciistojn kiuj ne estis nepre puĉsubtenantoj. La grandega pliiĝo en defenda elspezo, kun 21-procenta salajra kresko, malmulte helpis kreskigi armean lojalecon. La Registaro estis kaptita inter la malamikeco de la veteranaj oficiroj rilate al la proceso de regiona sencentraligo kaj la premo de la eŭskoj por akceli la procezon. La 85 viktimoj de terorismo en 1978 triobligis la nombron de la antaŭaj du jaroj. La intensiĝo de la perforto de ETA kontraŭ la polico kaj militistaro provokis brutalan respondon de la sekurecaj taĉmentoj kiuj, siavice, havigis al ili subtenon. ETA kaj la ekstrema dekstraro formis kontrapunkton de subpremo kaj teruro. En la dua duono de 1978, la polico kaj la Civil-Gvardio estis iomgrade for de la kontrolo de la Registaro. Ĝia senpoveco antaŭ brutalaj agoj konfirmis la disvastiĝintan ideon en Eŭskio, ke la hispanaj sekurecaj taĉmentoj estas eksterlanda okupa armeo kontraŭ kiu la agoj de ETA konsistigis legitiman defendon. La registaro ŝajnis paralizita de multaj murdoj de policanoj fare de la terorista grupo. La agoj de sendistinga terorismo komencis redukti popolan subtenon al ETA, kvankam ne sufiĉe por helpi ***Suárez***-on. La ondo de atencoj igis la registaron fari plurajn provojn negoci armisticon, vane ĉar ETA volis provoki la Armeon okupi Eŭskio kaj tiel, ili esperis, provoki nacian revolucian ribelon. Simpatio al ETA estis plejparte konservita pro la agadoj de ekstremdekstraj terorismaj taĉmentoj kaj la maldisciplino de la polico. ETA ne estis timigita kaj establis "revolucian imposton" al eŭskaj



Emilio Attard Alonso



Ricardo Sáenz de Ynestrillas kun Antonio Tejero



Jose Gabeiras Montero



Guillermo Quintana Lacaci

komercistoj kaj ripetis ĝiajn atakojn kontraŭ armeoficiroj dum la aŭtuno kaj vintro de 1978.

La ekstremdekstra gazetaro komencis kompari la situacion kun tiu, kiu antaŭis la ribelon de 1936 kaj denuncis la novan konstitucion kiel inspiritan komunistan atakon kontraŭ la nacia unueco. La Korteso aprobis la Konstitucion la 31-an de oktobro de 1978, kun 363 voĉdonojoj favoraj, 6 kontraŭaj kaj 13 sindetenoj. La politiko de ***Gutiérrez Mellado*** de strategiaj promocioj iom post iom malpliigis lian apogon en la Armeo. Iuj pensis ke ili devus agi antaŭ ol demokratio estis plu plifirmigita per la konstitucia referendumo fiksita por la 6-an de decembro. Tiel, ili ellaboris planon por kidnapi ***Suárez*** kaj lian registaron la 17-an de novembro kiel la unua paŝo al altrudo de registaro de “nacia savo” kiu suspendus la Kortesojn kaj intensigus la malpuran militon kontraŭ ETA. La projekto estis nomita Operacio ***Galaxia***, laŭ la kafejo kie Leŭtenanto Kolonelo ***Tejero*** de la civil-gvardio kaj Kapitano ***Ricardo Sáenz de Ynestrillas***, de la Nacia Polico, elpensis la provon. La dato estis elektita ĉar en tiu tago la reĝo kaj multaj ĉefaj oficistoj estis atenditaj troviĝi ekster Madrido, kaj granda nombro da ekstrem-dekstruloj, multaj el ili armitaj, estis atenditaj por la memorfesto de la datreveno de la morto de ***Franco,*** la 20-an de novembro. En ĉi tiu kazo, la intrigo estis malkovrita ĝustatempe. ***Tejero*** kaj ***Sáenz de Ynestrillas*** estis arestitaj, sed nenio estis farita por malhelpi agadojn ligitajn al la planita puĉo. Multaj oficialuloj kaj spionservoj estis konsciaj pri la intrigo, sed ne raportis ĝin ĉar ili preferis atendi kaj vidi kio okazos. La ŝajna senpuneco de ***Tejero*** instigis la penson ke li kaj liaj samideanoj estis imunaj kontraŭ enketo. Krome, pro pura timo, politikistoj trans la parlamenta arko, eĉ tiuj de la registaro, estis ĉiam pli respektemaj al la armea hierarkio.

La onidiroj pri la puĉo ne deadmonis ETAn intensigi la atakojn kontraŭ la polico kaj civil-gvardio. Tiel, la referendumo pri la konstitucia teksto okazis la 6-an de decembro en streĉa etoso. Tamen, malgraŭ nacia sindeteno de 32,3 elcento, la rezulto estis klara popola subteno de la konstitucio. La sindeteno estis simptomo de kreskanta elreviĝo kun la politiko. La Registaro esprimis zorgon pri la rezultoj en Eŭskio, kie la sindeteno atingis 51,1 el-centon de la voĉdonantaro kaj la nea voĉdono konsistigis 23,54

elcenton de la voĉoj. Tamen, 76,46 elcentoj de la jesaj voĉoj kontraŭdiris la aserton de ETA ke Eŭskio malaprobis la Konstitucion. Necesis ankoraŭ, ke la Registaro rapide ellaboru kontentigan Statuton de Aŭtonomeco por Eŭskio. Por atingi la nepran parlamentan apogon, ***Suárez*** kunvokis ĝeneralan balotado por la 1-a de marto de 1979. La kampanjo okazis en streĉa etoso pro la agado de ekstremdekstraj puĉistoj kaj ETA-atakoj kontraŭ policanoj, civil-gvardianoj kaj armeaj oficiroj. La popola seniluziiĝo estis reflektita en la alta sindeteno. Tamen la UCD venkis danke al la subteno de la eklezia hierarkio kaj la lerta alvoko de ***Suárez*** al la voĉdono de timo, ekspluatante la sindifinon de la Socialista Partio kiel marksisma. La atakoj de ***Suárez*** akcelis procezon per kiu la PSOE forlasis la marksismon, plifirmigis la gvidadon de ***Felipe González*** kaj agnoskis ke la tuja prioritato devus esti venki en la balotoj kaj ne la establado de la socialismo. La balotan venkon de ***Suárez*** sekvis neevitebla malkresko. La UCD atingis malbonajn rezultojn en la komunumaj balotoj de la 3-a de aprilo 1979, dum la PSOE kaj la PCE gajnis 27 provincaj ĉefurboj, kun 10.500.000 loĝantoj. Kontraste, la UCD gajnis nur 23, kun entute nur 2.500.000 loĝantoj. Kiam ***Suárez*** prezentis sian registaran programon en la Korteso, lia prestiĝo estis grave difektita kiam ***Felipe González*** citis la frankistajn paroladojn kiujn li estis farinta kiel Ĝenerala Sekretario de la la frankisma "Movado". Al la nova registaro mankis la energio kaj imago necesaj por solvi la problemojn de regiona aŭtonomeco, terorismo, senlaboreco kaj la puĉo, sento de nekapablo derivita de la foriro de elstaraj figuroj kiel ***Rodolfo Martín Villa***, elĉerpita post tri jaroj ĉe la Ministerio pri Internaj Aferoj. Krome, ***Suárez*** estis ĉiam pli forestanta kiel rezulto de akra denta problemo. Terorismo, krimo kaj puĉo plenigis la gazetojn plej multajn tagojn. ETA estis ĉiam pli kaj pli dediĉita al perforto, kaj la ekstrem-dekstruloj estis tre influaj en la Armeo kaj, ĉefe, en la spion-servoj kaj esencaj unuoj kiel ekzemple la kirasitaj divizioj.

La malfacilaĵoj de ***Suárez*** malboniĝis pro la manko de parlamenta plimulto de lia partio en la Korteso. La febla unueco de la UCD estis konstante minacata kiam ideologiaj diferencoj komencis ekaperi inter la diversaj grupoj kiuj konsistigis la cinikan balot-koalicion de 1977. ETA-atakoj kontraŭ altrangaj armeaj komandantoj kaj la abomenaĵoj faritaj de provokantoj kiel GRAPO favoris la aperon de ĉiam pli laŭtajn alvokojn al puĉo. Ĝenerale, la respondo de la registaro ĉiam estis trankviligi la armeajn desktrulojn. Kio plifortigis la furiozon de la ekstremdekstruloj estis la nomumoj de la liberalulo ***José Gabeiras Montero*** kiel ĉefo de la Plejalta Stabo de la Armeo kaj ***Guillermo Quintana Lacaci*** kiel Kapitan-Generalo de Madrido. La intertraktadoj de la Statuto de Aŭtonomeco de Eŭskio lasis ***Suárez***-on kaptitan inter la aspiroj de la radikalaj eŭskaj naciistoj kaj la malamikeco de la ekstremdekstruloj. Fine oni interkonsentis tekston kun la plimulto de la Eŭska Naciisma Partio, kiu poste estis aprobita en referendumo en Eŭskio la 25-an de oktobro 1979. Kvankam tio konsistigis esperon pri paco, ETA restis aktiva kaj kun popola subteno pro la agado de la ekstremdekstraj


Jaime Milans del Bosch


Jesús González del Yerro


Luis Torres Rojas


Alfonso Armada

terorismaj taĉmentoj, en kiuj ofte partoprenis eksterdeĵoraj policanoj kaj civilaj gardistoj. Ne estas mirinde, ke la ĉefaj dekstremaj generaloj kiel ***Milans del Bosch*** kaj ***Jesús González del Yerro***, Kapitan-Generalo de Kanariaj Insuloj, malkaŝe denuncis la demokratian reĝimon kiel respondecan pri terorismo, malsekureco, inflacio, senlaboreco kaj pornografio. Planado de puĉo komenciĝis implikanta la esencan Madrid-bazitan unuon, la Kirasan Divizion ***Brunete***. La Kirasita Divizio estis subkomande de dekstrulo, Generalo ***Luis Torres Rojas***, kiu organizis manovrojn por ekzerci preni la nervocentrojn de Madrido kaj kontrolo de la ĉefaj alirvojoj. ***Torres Rojas*** partoprenis en la planoj preni la Palacon de la ***Moncloa*** kun la subteno de helikopteroj. La konspirantoj ne povis ricevi sufiĉe da subteno por sia plano kaj, la 24-an de januaro 1980, ***Torres*** estis forigita de sia komando en la Kirasa Divizio kaj sendita kiel armea guberniestro al Korunjo, kadre de la politiko de la Registaro flati la militistaron. Ĉe la proceso al la konspirantoj de la Operacio ***Galaxia,*** kiu okazis en majo de 1980, ***Tejero*** kaj la ĵus promociita majoro ***Sáenz de Ynestrillas*** estis kondamnitaj al nur sep kaj ses monatoj da malliberigo, respektive. Estis malfacile imagi pli grandan instigon por la konspirantoj. La populareco de ***Suárez*** estis en malkresko pro la erozio de terorismo, stratkrimo, inflacio kaj senlaboreco. Krome, la PSOE senĉese atakadis lin en la Korteso kaj en la gazetaro pro lia neaktiveco kaj izoliteco. Private, la socialistoj intertraktis kun la socialdemokrata alo de la UCD, gvidata de ***Fernández Ordóñez***. La ebleco de la socialdemokratoj forlasi la partion estis nur simptomo de ĝia putriĝo. La kvar ĉefgrupoj en la UCD -iama Movada burokrataro, Kristandemokratoj asociitaj kun ***Rodolfo Martin Villa***, Socialdemokratoj, kaj la liberaluloj de ***Joaquin Garrigues***- estis malakorde pri kelkaj sociaj, ekonomiaj, kaj religiaj temoj. Ĉar la populareco de ***Suárez*** malkreskis, ili scivolis ĉu ili eble ne havos pli bonan ŝancon sen li. ***Fernández Ordoñez*** rekonsideris sian estontecon. La Kristandemokratoj, la plej kohera familio en la UCD, volis ke la partio estu pli malkaŝe konservativa kaj konfesia kaj kontraŭbatalis la divorcleĝ-proponon de ***Suárez***. Internaj dividoj, registara senpoveco kaj nebone planitaj kampanjoj kontribuis al serio da balotmalsukcesoj kiuj vundis la UCD-n en Andaluzio, Eŭskio, Katalunio, kaj Galegio. Kreskanta senlaboreco kaj energi-

limigoj aldonis al la streĉitecoj de sistemo plagita de timoj de eŭska terorismo kaj armea subfosado. La ĝenerala sento de misregado estis pliigita per la malabundeco je la prezentiĝoj de ***Suárez*** en la Korteso, en presar-aŭdiencoj kaj eĉ en la konsilio de ministroj. La prezidanto enŝlosis sin en la Palaco de la ***Moncloa***, izolita el la reala politika mondo, kaj eĉ de siaj propraj kolegoj de UCD, far intima rondo de konsilistoj. Jam printempe de 1980, estis neeble kaŝi la internajn malkonsentojn de la UCD. La nova registaro anoncita la 2-an de majo ekskludis la liberalulojn de ***Garrigues*** kaj la socialdemokratojn de ***Fernández Ordóñez***, kaj la kristandemokratoj iĝis la plej influa frakcio. La UCD apenaŭ postvivis mocion de cenzuro de la PSOE en televida debato en la Kortesoj inter la 28-a kaj 30-a de majo, en kiu ***Felipe González*** brilis kiel verŝajna prezidenta kandidato.

La internaj dividoj de la UCD igis ***Suárez*** perdi sian plej proksiman aliancanon, ***Abril Martorell***, kiu eksiĝis en la somero de 1980. Tiun aŭtunon, la prezidanto trovis sin izolita de sia kabineto, lia partio kaj la gazetaro, batalante kun la senkaŝa malamikeco de ***Felipe González*** kaj nekapabla elteni la rapidan kreskon de senlaboreco. La persistemo de ETA integrigi Navaron en Eŭskion konsistigis militdeklaron kontraŭ la Armeo. La puĉo estis ĉe konstanta bolado dum la printempo kaj somero de 1980 pro atenco kontraŭ altrangaj generaloj de ETA kaj GRAPO. En lasta provo reakiri kontrolon de lia partio, la 9-an de septembro ***Suárez*** reorganizis sian ministraron por krei "Registaron de Baronoj", kies provizora lojaleco estis certigita en kelkaj kazoj. Tamen, la nomumo de ***Francisco Fernández Ordoñez*** kiel Justic-ministro, respondeca pri rilatoj inter Eklezio kaj Ŝtato, fremdigis lin de la kristan-demokratoj pro la leĝpropono pri divorco de ĉi-lasta. La situacio baldaŭ komencis malboniĝi neeviteble. La militistaro konspiris preskaŭ malkaŝe. La dekstra gazetaro konjektis pri la plej taŭgaj armeaj kandidatoj por formi registaron. La 17-an de oktobro 26 el la plej elstaraj ultraj de Hispanio kunvenis en Madrido por diskuti pri financo kaj civila subteno por puĉo.

La perforto de la aŭtuno de 1980 finis provoki kontraŭ-ETA reagon en Eŭskio mem. La 9-an de novembro, silenta manifestacio de tridek mil homoj el ĉiuj partioj marŝis tra la stratoj de Donostio, kun la lokaj gvidantoj de la PSOE, la UCD kaj la PNV unu apud la alia. Estis pli kaj pli multaj komercistoj, kiuj rifuzis pagi la "revolucian imposton", kiun ETA postulis. La konscio, ke la atenco de ETA kontraŭ la hispana demokratia reĝimo devis esti kontraŭagata antaŭ ol estos tro malfrue, kaŭzis la kreadon de Eŭska Fronto por Paco en kiu la PSOE, la PCE, la moderaj eŭskaj partioj, la UCD kaj la karlistoj. Tamen, tiu timema komenco ne servis por redukti la malamikecon de la militistaro.


***Suarez*** estis maltrankviligita de spekulado pri koalicio gvidata de la ***Armada*** aŭ de lia amiko ***Alfonso Osorio***, kiu jam sugestis la ideon de forta, plurpartia registaro al ĉefaj membroj de la PSOE, liaj kunuloj kristan-demokratoj en la UCD, kaj eĉ ***Jaime Ballesteros*** de la PCE. Fronte al alarmaj onidiroj pri perforta puĉo, kaj antaŭ la nekapablo de ***Suarez*** solvi la problemojn de ETA kaj senlaboreco, la koalicio gvidata de generalo komencis aspekti kiel preskaŭ alloga elekto. En ĉi




Francisco Fernández Ordoñez



Jaime Ballesteros



Landelino Lavilla



Leopoldo Calvo Sotelo

tiu kunteksto, la UCD estis abelujo de intrigoj. ***Suarez*** estis atakita far kristanaj demokratoj kiuj ankaŭ estis en koluzio kun la Populara Alianco de ***Fraga***. La 12-an de januaro de 1981, ***Landelino Lavilla***, en vaste eĥa ĵurnalisma intervjuo, akuzis ***Suarez***-on je arbitra akumulado kaj misuzado de potenco. Alfronto estis atendita ĉe la 2-a Kongreso de la UCD, kiu estis okazonta en Majorko la 29-an de januaro. Fizike kaj psikologie elĉerpita post la titana penado de la antaŭaj kvar-kaj-duono jaroj, dum la semajnfino de la 24-25-a de januaro 1981, ***Suarez*** decidis eksiĝi. Li sciis ke dek sep generaloj de la armea gvidado kunvenis la 23-an de januaro por diskuti armean intervenon en politiko kaj ke la reĝo estis tiel alarmita ke li revenis pli frue ol atendite de iu ĉaso. Venko en la Kongreso donus al li nur mallongan trankvilon. Kun disiĝanta partio, ***Suarez*** havis neniun deziron gvidi koalician registaron. Krome, opini-sondoj donis al li nur 26 elcenton de popola apogo, kompare kun 43 elcento por ***Felipe González***. Konkludinte, ke li ne havis alternativon, li planis anonci sian demision ĉe la UCD-kongreso.
Ĉar striko de aertrafik-kontrolistoj devigis la kongreson esti prokrastita, ***Suarez*** komunikis sian decidon al sia registaro, la partigvidantaro kaj la reĝo kaj tiam anoncis sian foriron en televida mesaĝo la 29-an de januaro. La ekstrema dekstro ĝojis. ***Juan Carlos***, kiu estis informita de sia iama mentoro, ***Armada***, inter aliaj, pri la kontraŭdemokratia sento de la Armeo, estis maltrankvila, same kiel ***Suarez***, pri interveno de la militistaro kontraŭ la demokrata reĝimo. La humiliga fino de ***Suarez***, la malboniĝo de lia bildo, lia malkomforto en la Korteso kaj lia izoliteco ne devus obskuri liajn atingojn. Malgraŭ ĉiuj problemoj, kiujn ĝi heredis, inter 1977 kaj 1980 ĝi multe kontribuis al la kreado de konstitucia demokratio, al la promocio de la parlamenta kunekzisto kaj al la donado de aŭtonomio al naciecoj kaj regionoj. Kiaj ajn liaj kulpoj, ***Suarez***, ja, atingis honoran lokon en la historio de hispana demokratio. Aliflanke, lia foriro ne sukcesis ĉesigi la disfalon de la UCD. Ĉar la rivalaj "baronoj" neŭtraligis unu la alian, lia posteulo estis la Vicprezidanto de la Registaro, ***Leopoldo Calvo Sotelo***, kies bonaj bankaj kontaktoj kaj administra kompetenteco igis lin racia kompromisa kandidato. Tamen, ***Calvo Sotelo*** alfrontis internajn konspirojn kaj la volon de la Armeo interveni en politikon, kiu plifortiĝis kiel rezulto de la akordiga vizito de la reĝa familio al


Eŭskio de la 3-a ĝis la 5-a de februaro 1981. La vojaĝo estis senbriligita de kontraŭhispanaj manifestacioj en la flughaveno de Vitorio kaj en la Asemblea Domo de ***Guernica***. La reĝo eltenis digne kaj trankvile la interrompojn kaj insultojn al sia parolado de la membroj de la eŭskaj radikalaj naciistoj. Lia respondo havis ege favoran efikon al la eŭska publika opinio. Tamen, la insultoj al la Supera Komandanto de la Armeo ĉagrenis la puĉistojn.
Du ETA-kidnapoj eĉ pli severigis la situacion. Tiu de la riĉa industriisto ***Luis Suñer*** estis simpla ago de ĉantaĝo. Tre malsama kazo estis tiu de ***José María Ryan***, ĉef-inĝeniero de la atomcentralo ***Lemóniz***. Post denunco de la planto kiel simbolo de hispana ekspluato, ETA postulis ĝian malkonstruon. La terorista organizo ignoris internaciajn vokojn kaj manifestaciojn por la liberigo de ***Ryan***, kiu estis murdita la 6-an de februaro. Inter la protestoj kontraŭ la ETA-agoj estis ĝenerala striko kaj amasaj manifestacioj en Eŭskio. La ekstremdekstra furiozo de la Armeo responde al la murdo de ***Ryan***, kiel ETA ŝajnis atendi, estis esprimita per incendia artikolo de la emerita generalo ***Fernando de Santiago y Díaz de Mendívil***, kiu, kun la titolo “Lima situacio”, lamentis la senpovecon de la Ŝtato antaŭ la longa listo de kidnapoj kaj murdoj de la organizo. ***De Santiago*** citis la kreskantan balot-sindetenon kiel pruvon ke homoj malaprobis “politikan konkubadon” kaj volis ke la armeo savu Hispanion. Ekde meze de decembro 1980, la ĵurnalo ***El Alcázar*** publikigas malkaŝajn alvokojn por milita puĉo kun la subskribo de “***Almendros***” (Migdalujoj), indiko ke io estis planita por la dua duono de februaro, kiam la migdalarbo normale floras. Aldone al la stabo de la gazeto, la ***Almendros***-kolektivo inkludis plurajn konatajn ekstrem-dekstrajn oficirojn, inkluzive de Generalo ***De Santiago*** kaj Kolonelo ***San Martín***, nun Ĉefo de Plejalta Stabo de la Kirasita Divizio. La grupo havis la subtenon de influaj civilaj ekstremdekstruloj, kiel ***Girón de Velasco*** kaj ***Juan García Carrés***. Ili sopiris al pli malkaŝe frankisma puĉo ol la mola opcio de ***Armada*** aŭ la plano de la koloneloj. Liaj esperoj estis fiksitaj sur ***Milans del Bosch***.
***Calvo Sotelo*** prezentiĝis antaŭ la Korteso por la formala investitura proceduro la 20-an de februaro, en kunteksto de surdigaj onidiroj pri puĉo. La suspektinda morto de




***Luis Súñer Sanchís***



***José María Ryan***



Atomcentralo ***Lemóniz***



***Juan Jose San Martín***



***Juan García Carrés***

supozata ETA-membro ***Joseba Iñaki Arregi Izagirre*** dum li estis en polica arestejo nuligis la kontraŭ-ETA senton vekitan en Eŭskio per la murdo de ***Ryan*** kaj ekigis impetajn kontraŭ-hispanajn manifestaciojn. Ĝi ankaŭ senigis ***Calvo Sotelo***-n je la PNV-voĉdonoj. Li akiris simplan plimulton, kun 169 voĉoj favoraj, 158 kontraŭ kaj 17 sindetenoj, sed ne la absoluta plimulto de 176 voĉoj necesa por konfirmi lin kiel prezidanton en la unua voĉdonado, pro kio li devis atendi du tagojn por dua voĉdono, por kiu nur sufiĉus simpla plimulto. Tiuj ĉi voĉdonoj ĵus komenciĝis la 23-an de februaro kiam, je la 18:20 horo, 320 civil-gvardistoj sub la komando de la leŭtenanto kolonelo ***Tejero*** subite eniris en la Parlamentejon kaj, deklarante ke ili estis agante nome de la reĝo, prenis la tutan politikan klason kiel ostaĝo. ***Tejero*** telefonis al la sidejo de ***Milans del Bosch*** kaj konfirmis, ke la celo estis plenumita, kaj lia kolego anoncis al la Korteso, ke baldaŭ alvenus altranga armea aŭtoritato por ekkontroli la situacion.

Baldaŭ post kiam ***Tejero*** alvenis ĉe la Korteso, ***Milans del Bosch*** deklaris krizostato en la Valencia Komunumo, dekretis la militarigon de ĉiu personaro implikita en publikaj servoj, trudis elirmalpermeson je la naŭa horo kaj malpermesis ĉiujn politikan agadon. La tankoj alprenis poziciojn apud gravaj publikaj konstruaĵoj. Okazis trupmovadoj en diversaj partoj de Hispanio. En Madrido, ekzemple, la radio- kaj televid-studioj de ***Prado del Rey*** estis mal-longe okupitaj fare de unuo de la Kirasita Divizio, kiu insistis ke la radio dis-sendu nur armeajn marŝojn. La griza eminenteco malantaŭ ĉio ĉi estis Generalo ***Armada***, kiu, en sia rolo de vickomandanto de la Ĉefa Stabo, ŝajne klopodis igi ***Tejero***-n liberigi la deputitojn de la Korteso, kiam, fakte, li faris altriska movo, profitante la fanatikan ***Tejero*** por establi sian propran registaron de nacia savo




**Bildoj de la puĉo-provo de la 23-a de februaro de 1981. En la Parlamentejo, en la stratoj de Valencio, pertelevida mesaĝo de la reĝo…**

en la stilo de ***De Gaulle***. Por ĉesigi la danĝeran situacion en la Korteso, ***Armada*** farus la “patriotan oferon” de formado de registaro sen ŝajni estinti unu el la instigantoj de la alsalto.

La puĉo malsukcesis ĉar la decida ago de la reĝo kaj liaj proksimaj kunlaborantoj eksponis la ambiguecojn kaj neadekvatajn preparojn de la konspirantoj. La tri ĉefaj intrigoj, kiuj bolis laŭlonge de la jaro 1980-aj, interakordiĝis tro haste. ***Milans*** kaj la koloneloj de la Kirasita Divizio planis turkostilan puĉon, kun brutala elpurigo de la maldekstro, “malpuran militon” kontraŭ ETA, kaj reiron al rigida centralismo. Ilia espero atingi reĝan aprobon igis ilin ligi kun ***Armada***, kiu volis uzi la minacon de la koloneloj por ĉantaĝi la politikan klason favore al lia plano pri plurpartia registaro por nacia savo. La konvinkiĝo de ***Tejero*** kaj ***Milans*** ke ili havis la aprobon de la reĝo povis veni nur de ***Armada***.


La provo estis malmuntita far triumviraro konsistigita de la reĝo mem, la ĝenerala sekretario de la Reĝa Domo, Generalo ***Sabino Fernández Campo***, kaj la nova Ĝenerala Direktoro de Sekureco, ***Francisco Laína García***. Ili havis la subtenon de la Plejalta Armea Stabo, Generalo ***José Gabeiras Montero***; la Kapitan-Generalo de Madrido, ***Guillermo Quintana Lacaci***; la Ĝenerala Inspektoro de la Polico, Generalo ***José Sáenz de Santamaría***, kaj la Ĝenerala Direktoro de la Civil-Gvardio, Generalo ***José Luis Aramburu Topete***. Provizora registaro estis formita konsistigita de la vic-sekretarioj de ĉiu ministerio, subgvide de ***Laína*** en la Ministerio pri Internaj Aferoj. ***Juan Carlos*** kaj liaj helpantoj faris telefon-batalon por certigi la lojalecon de la kapitan-generaloj de la ceteraj armeaj regionoj. Plejmulte el ili simpatiis al ***Milans*** kaj nur la reĝo staris inter hispana demokratio kaj ĝia detruo. La tasko de la reĝa teamo ĉe la ***Zarzuela*** estis malhelpita de la kompleksa ludo de ***Armada***. Evidentiĝis ke ***Armada*** estis, fakte, la “kompetenta aŭtoritato, armea, kompreneble”, kiun ***Tejero*** atendis. Li eniris en la parlamentejon je la 00:30 horo matene de la 24-an de februaro kaj parolis kun ***Tejero*** dum proksimume tri kvaronhoroj. Li volis proponi sian registaron de nacia savo al la kaptitaj deputitoj, kiuj siavice proponus tiun “konstitucian solvon” al la reĝo. ***Tejero*** volis, ke ***Pinochet***-stila konsilio dispremu la maldekstraron kaj revoku la regionajn aŭtonomiojn, do li kolere malaprobis la ideon de koalicia registaro kun ***Felipe***



***Joseba Iñaki Arregi Izagirre***



***Sabino Fernández Campo***



***Francisco Laína García***



***José Luis Aramburu Topete***

***González*** kiel vicprezidanto kaj eĉ komunisto, ***Jordi Solé Tura***, kiel ministro pri Laboro, sugestante ke ***Tejero*** estis nekonscia pri la intencoj de ***Armada***. Ĉiukaze, la puĉo komencis ŝanceliĝi kiam ***Juan Carlos*** aperis en televido je la 1:15 horo matene de la 24-a de februaro kaj anoncis, ke la Krono kontraŭas ĉian provon perforte renversi la demokratie ratifitan Konstitucion. Kiam la reĝo informis al ***Milans*** ke li kontraŭstaris la puĉon, ke li ne abdikus aŭ forlasos Hispanion, kaj ke por sukcesi la ribelantoj devos mortigi lin, ***Milans*** retiris siajn soldatojn el la stratoj. Estis la kvara horo matene. Laca kaj frustrita, ***Tejero*** finfine negocis sian kapitulacon kun ***Armada***, kiu kelkajn tagojn poste estis arestita.
La eventoj de la 23-a de februaro generis multe da konjektoj kaj polemikoj. La plej grava afero estis la rolo de ***Juan Carlos***. Evidentiĝas, ke li riskis sian prestiĝon kaj sian personan sekurecon por savi demokration. La investituro de ***Calvo Sotelo*** estis aprobita en la sekva voĉdono per 186 voĉoj favoraj kaj 158 kontraŭaj. La 27-an de februaro, tri milionoj da homoj manifestaciis favore al demokratio en Madrido kaj aliaj urboj, kvankam ne en Eŭskio. La malvenko de la puĉo tiel nomata "23-F" ne solvis la problemojn de la demokratia reĝimo, sed ĝi donis al ĝi duan ŝancon. Kiam ***Juan Carlos*** akceptis la ĉefajn politikajn gvidantojn en la nokto de la 24-a de februaro, li atentigis ilin, ke ne devus esti necese, ke li risku sian prestiĝon kaj sian sekurecon.
La unua registaro de ***Calvo Sotelo*** distribuis potencon egale inter la malsamaj grupoj de la UCD. Tamen, la malamikeco de la kristanaj demokratoj al la proponita leĝigo de ***Fernández Ordóñez*** pri eksgeedziĝo kaŭzis profundajn kaj finfine mortigajn dividojn. Baldaŭ la ĉefa prioritato estu la forigo de la puĉo, tasko konfidita al la nova Ministro pri Defendo, ***Alberto Oliart Saussol***. Post la okazaĵoj de la 23-a de februaro, la reĝo avertis la gvidantojn de la parlamentaj grupoj, ke severa respondo povas provoki novan armean reagon. Tamen, ***Oliart*** estis tiel akordiga ke tio generis la suspekton ke ***Armada*** sukcesis turni la armeajn aŭtoritatojn en specon de subombra registaro. Fakte, la puĉo havis kelkajn neantaŭviditajn pozitivajn rezultojn. La hispana popolo komencis pli aprezi siajn demokratiajn instituciojn. ***Calvo Sotelo*** estis pli alirebla ol ***Suárez*** kaj aperis pli ofte en la Korteso kaj antaŭ la gazetaro. Li ankaŭ regule interkonsiliĝis kun la gvidantoj de la aliaj partioj kaj kun la armea hierarkio. ***González***, ***Fraga*** kaj ***Carrillo*** reciprokis apogante la Registaron en la Korteso. ETA anoncis senfinan batalhalton. La malkaŝo de la volo de ***Tejero***, ***Milans*** kaj aliaj sin turni al sangoverŝado, kune kun la grando de la ekonomiaj problemoj de Hispanio, ĉesigis la eŭforiajn esperojn de 1977-1979. La demokratio tiam estis io tre serioze prenita. Tamen, la kapablo de ***Calvo Sotelo*** utiligi la novan spiriton de nacia kunlaboro estis fatale malhelpita de la dividoj ene de la UCD kaj la naturo de liaj politikaj proponoj: eniro en la NATO, tranĉoj en publikaj elspezoj, pli privata investo, salajra moderigo, ia renovigita kontraŭ- terorisma kampanjo kaj malrapidiĝo en progreso al regiona aŭtonomio kiu donis al la militistaro unu el ĝiaj ĉefaj postuloj.

La registaro petis la NATO-membrecon esperante ke integriĝo en la okcidentan defendan sistemon malatentigus la armetrupojn de ilia obsedo pri la enlanda politiko. La PSOE kontraŭbatalis eniron, kaj multaj oficiroj kiuj bonvenigis aliron al moderna NATO-armilaro estis malfeliĉaj pro tio, kion ili vidis kiel la humiliga volemo de la UCD aliĝi, sen konvena agnosko de tio kion Hispanio alportus al la organizo. Tamen, la sento ke demokratio estis sub armea kuratoreco intensiĝis kiam multaj el la sekundaraj partoprenantoj de 23-F estis liberigitaj dum marto kaj aprilo, dum la plej eminentaj konspirantoj estis loĝigitaj en ekstreme komfortaj kondiĉoj kaj la ĵurnalo ***El Alcázar*** malkaŝe pravigis la puĉon. La timo de armea subfosado estis nutrita de la konstantaj teroristaj atakoj de ETA kaj la provokoj de GRAPO. La malkvieto de la loĝantaro estis provokita de multaj okazaĵoj, inkluzive de la kidnapo de la Centra Banko de Barcelono fare de armitaj viroj (oni diris, ke ili estas civil-gvardistoj), kiuj postulis la liberigon de ***Tejero*** kaj aliaj implikitaj en la puĉo de la 23-F. La banko estis finfine liberigita fare de la Speciala Operacia Grupo de la Nacia Polico. Zorgo estis esprimita pro tio ke nur 30 el la preskaŭ 300 oficiroj implikitaj en la puĉo-provo estis juĝitaj. Krome, onidiroj de kvazaŭa kunkulpeco de la reĝo kaj kelkaj politikistoj en la epizodo komencis subfosi la fidon al la monarko kaj al la politika klaso. Tiam, la 21-an de junio, du koloneloj estis arestitaj pro provado organizi alian puĉon.
Nova bato por la Registaro estis iu skandalo rilata al publika sano. Ekde la komenco de majo, 48 homoj, inkluzive de pluraj infanoj, mortis pro mistera malsano diagnozita kiel “maltipa pulminflamo”. Kromaj pli ol 8.000 estis enhospitaligitaj kaj suferis de terure doloraj simptomoj. La kaŭzo de la epidemio estis denaturita kolz-oleo, kiu estis falsita kun industria oleo kaj diversaj kemiaĵoj por igi ĝin aspekti kiel olivoleo kaj povus esti vendita ĉe stratbudoj. La Agrikultur-Ministerio ignoris avertojn pri kontraŭleĝa kuiroleo. La limigitaj leĝoj pri protekto de konsumantoj de Hispanio kaj la neagado de la San-Ministerio deĉenigis publikan malamikecon kontraŭ la Registaro.
Krome, oni konis alarmajn detalojn pri la malsukcesa puĉo de junio. Oni malkovris kaj forevitis kroman puĉo-provon kiun la fortoj de la ekstrema dekstraro intencis organizi. Ĝi komenciĝus per kampanjo de bombatakoj, kiu kulminus per la sanga interrompo de granda kataluna mitingo planita por la 23-an de junio en Barcelono. Laŭ la planita proceduro, samtempe, la reĝo estus kaptita kaj devigita abdiki. Por la realigado de tiu plano estus formita ia Armea konsilio kaj estis desegnitaj nigraj listoj de maldekstruloj kaj demokratoj kiuj devus esti likvidataj. La problemoj de ***Calvo Sotelo*** pliiĝis kiam komencis fragmentiĝi la UCD-unueco kiu estiĝis post la puĉo de ***Tejero***. En novembro, dum la kristandemokratoj moviĝis al interkonsento kun la partio de ***Fraga***, la socialdemokratoj de ***Fernández Ordóñez forlasis*** la UCD-n por aliĝi al la Socialista Partio. La malkresko de la UCD estis evidenta en la regiona baloto okazinta en Galegio la 20-an de oktobro, kiam ĝi suferspertis masivan perdon da voĉdonoj.


Jordi Solé Tura


Alberto Oliart Saussol


Narcis Serra i Serra


Viktimoj de la Kolza Oleo

La PSOE progresis kun ***Felipe González*** altstarante en la opinio-sondojn kiel la plej populara lidero en Hispanio. La rolo de la PSOE kiel respondeca opozicio estis plifortigita de ĝia denunco de la nekapa traktado de la Registaro pri la skandalo de la kolzo-oleo, kies mortnombro superis 130. La kampanjo de la socialistoj kontraŭ la NATO pliigis ĝian popularecon. Krome, la PSOE ne havis rivalojn maldekstre, ĉar la Komunista Partio de ***Carrillo*** estis mergita en internaj bataloj.

Dum la tuta monato da novembro, la UCD komencis sian agonion; dum la partio disfalis, la ministro pri defendo ***Alberto Oliart*** esprimis hontigan adoradon al la militistaj ekstremdekstruloj. Dum la preparoj por la proceso de tiuj implikitaj en la februara puĉo, esprimoj kontraŭ la reĝo restis senpunaj. Komandantoj je dubinda lojaleco estis promociitaj kaj ***Milans del Bosch*** ricevis medalon pro Suferado por la Patrujo. La subskribintoj de la artikoloj de la kolektivo ***Almendros*** reklamis manifeston, denuncante la Konstitucion, kiu verŝajne estis ligita al provo revivigi la konspiron de la koloneloj aŭ devigi la nomumon de koalicia registaro prezidata de Generalo ***González del Yerro***, simila al tiu, kiun ***Armada*** estis proponinta. La pluaj onidiroj pri puĉo koincidis komence de 1982 kun amasa ĉantaĝa kampanjo lanĉita de ETA kiu generis ondon da indigno en Eŭskio. Kaj, dume, la UCD daŭrigis sian procezon de disfalo kun ĉiam pli oftaj dizertoj. Ironie, la konstanta puĉominaco kaj la ETA-terorismo komencis ŝanĝi la humoron de la loĝantaro. La konfido al la reĝo kaj al la demokratiaj institucioj de Hispanio firmiĝis, malgraŭ la puĉistoj, dum la proceso de la implikitaj soldatoj, kiu komenciĝis la 19-an de februaro de 1982 kaj elstaris en la informmedioj dum la sekvaj tri monatoj kaj duono.


La akuzitoj estis rivelitaj kiel malĝentilaj brutuloj, kies aroganteco kaj morala nuleco estis embarasaj. Malgraŭ la klopodoj de ***El Alcázar*** prezenti la proceson kiel proceson al la tuta armeo, multaj oficiroj estis naŭzitaj pro la provo de la akuzitoj ŝanĝi la kulpigon por 23-F al la reĝo. Kiel koncesio al la sensiveco de la militistaro, ili estis juĝitaj far militista kaj ne civila tribunalo. Kvankam tio ne estis la intenco, tio malhelpis, ke oni asertu, ke la militistaro estis juĝita de la civila socio. Post la proceso, kontraŭdemokratiaj deklaroj kiuj antaŭe ricevus silentan aprobon,

se ne rektan admiron, pli verŝajne altiris severajn riproĉojn de armeaj aŭtoritatoj. La ŝanĝo de sinteno estis ankaŭ la rezulto de la reklampolitiko iniciatita de Generalo ***Gutiérrez Mellado***. La pozicio de ***Calvo Sotelo*** plimalboniĝis tagon post tago. La ĉantaĝ-kampanjo de ETA kaj la grandega ĝeno kaŭzita de la detruo de la madrida telefoncentralo kiel rezulto de unu el ĝiaj atakoj pliigis la senton de nekapablo de la registaro. Opinio-sondoj montris ke la PSOE povus facile venki la venontan ĝeneralan baloton. En la baloto por la Andaluzia Parlamento la 23-an de majo, la PSOE gajnis 52 el-centon de la voĉdonoj kaj 66 parlamentajn seĝojn. La Populara Alianco estis en dua loko, kun 17 sidlokoj, kaj la UCD en tria pozicio, kun nur 15. Disŝirita de la reciprokaj riproĉoj de iliaj gvidantoj, la UCD estis mortanta. La bankoj traktis la partion kun kreskanta malvarmo kaj injektis monon en la Popularan Aliancon, kiu altiris militistojn kun la ega rapideco de mil novaj membroj ĉiusemajne. La pozicio de ***Calvo Sotelo*** ne estis helpita per la publikigo la 3-an de junio de la relative malpezaj sentencoj por la konspirantoj de la 23-F. Kvankam ***Tejero*** kaj ***Milans del Bosch*** ricevis la maksimuman eblan punon, 30-jaran enprizonon, ***Armada*** estis kondamnita al nur ses jaroj. Dudek du el la 32 akuzitoj estis kondamnitaj al tri jaroj aŭ malpli, kio permesis al ili reeniri en la armeon post la plenumado de siaj punoj. Poste la Plejsupera Tribunalo iome pliigis la punojn, precipe en la kazo de ***Armada***. Tamen, tiutempe, konsternite la politika klaso vidis la sentencojn kiel pruvo ke nenio ŝanĝiĝis.

En januaro 1981 ***Calvo Sotelo*** ŝajnis same izolita kiel ***Suárez***. Dum la somero de 1982, lia populareco falis dum tiu de ***Fraga*** y ***González*** akceliĝis. Ne provante devigi fruajn elektojn kaj insistante ke la misio de la PSOE estis certigi la supervivon de la demokrata reĝimo, ***Felipe González*** konstruis al si bildon de modereco kaj forto kiu igis lin akiri kredindecon. ***Calvo Sotelo*** anoncis la 30-an de julio, ke li ne estos la prezidenta kandidato de la UCD en la sekvaj elektoj. Male, ***Felipe González*** havis ĉiam pli prezidentan aeron. La memdetruo de la UCD konkuris kun tiu de la Komunista Partio. Internaj disputoj inter la komunistoj atingis tian punkton, ke ***Carrillo*** sukcesis alkroĉiĝi al la potenco per la danĝera gesto de efemera rezigno la 7-an de junio.

La kaoso de la UCD atingis sian plej dramecan punkton ĉe la fino de julio de 1982, kiam ĝi komencis fendetiĝi en siajn komponentoj. La pli konservativaj kristandemokratoj formis la Popularan Demokratan Partion kaj sciigis balot-koalicion kun ***Fraga***. ***Suárez***, kiu estis forlasinta la partion de li fondita, kreis novan politikan formacion, la Demokratan kaj Socian Centron, kaj sciigis ke, post la balotado, li subtenos socialisman registaron. La UCD aperis tre mal-pliigita antaŭ la balotado, pri kiu oni antaŭdiris larĝan socialisman venkon, kaj ankaŭ bonan rezulton por la Populara Alianco. La socialista programo estis modera, kun la promeso de kreado de 800.000 novaj laborpostenoj per ŝtata investo apogita per interkonsento kun privatentrepreno. Post la memdetruo de la centro, la nura rivalo por la Socialista partio estis la Populara Alianco de

***Fraga***, kun tradiciisma konservativa programo de publika ordo, libera merkata ekonomio kaj defendo de la familio kaj nacia unueco.
La 3-an de oktobro de tiu jaro estis konata la novaĵo de planita puĉo planita por la antaŭvespero de la balotado de la 28-a de oktobro. Malkovrita fare de arme-spionado, ĝi estis kvazaŭ versio de la puĉo de la ***Milans del Bosch*** kaj la koloneloj. La palacoj ***Zarzuela*** kaj ***Moncloa***, la sidejo de la Ĉef-Stabo, pluraj ministerioj, esencaj publikaj konstruaĵoj, fervojaj stacidomoj, flughavenoj, radio- kaj televid-stacioj kaj gazetaj oficejoj estus okupataj kaj la politika elito "neŭtraligota" en siaj hejmoj. La reĝo estus senpovigita, pro perfido je sia fideleco-ĵuron al la Movado (la frankisma reĝimo). La balotado okazis sub la konstanta minaco de armea interveno, sed la voĉdono de la popolo esprimis masivan rifuzon al la puĉistoj kaj ĉi ties aserto ke ili faras tion, kio estis plej bona por Hispanio. La socialistoj akiris pli ol dek milionoj da voĉdonoj, 47,26 elcenton, kaj 202 sidlokojn. La partio de ***Fraga*** estis en dua loko kun 5.548.335 voĉdonoj, 25,89 elcento, kaj 107 deputitoj. La UCD estis malantaŭ la kataluna regiona koalicio ***Convergència i Unió*** , kun 1.323.339 voĉdonoj, 6,17 elcento kaj 11 deputitoj. ***Calvo Sotelo*** ne atingis parlamentan sidlokon. Kaj, kvankam ***Carrillo*** estis elektita, la Komunista Partio falis de preskaŭ 11 al 3,6 elcento kaj perdis tri kvaronojn el siaj deputitoj. La forto de la venko de la Socialista Partio ĉesigis la ŝajnigon, ke la Armeo povus pli bone interpreti la nacian volon ol la elektitaj politikistoj. Tamen, la taskoj kiuj atendis ***Felipe González*** estis kolosaj. Problemoj rilataj al ETA-terorismo kaj armea subfosado postulis lertecon kaj aŭtoritaton. Danke al siaj bonaj rilatoj kun la moderaj eŭskaj trupoj, la PSOE havis eble pli bonan ŝancon sukcesi kontraŭ ETA ol la UCD. La sagaca kaj diskreta ***Narcís Serra***, kiel Ministro pri Defendo, sukcesus superi la triamondan puĉisman pensmanion de la armetrupoj. La rekonvertiĝo de la hispana industrio, kun ĝiaj malnoviĝ-intaj sektoroj, ĝia alta energidependeco, ĝiaj regionaj malekvilibroj kaj ĝiaj teknologiaj mankoj, postulis vizion kaj dediĉon. La samon oni povas diri pri agrara reformo. La fakto, ke la PSOE estis preta alfronti la taskojn, kiujn la UCD evitis, donis al ĝi rimarkindan toleremon de la publika opinio pro tujaj rimedoj kiel la malplivalorigo de la peseto, la plialtiĝo de la impostoj kaj la altiĝo de la karburaĵo. La socialistoj estis elektitaj de serioza balotantaro kiu suferis la agoniojn de terorismo kaj puĉoj.
La vojo ekde 1969 estis malglata. Tamen, malgraŭ la mafavora kunteksto heredita el ***Franco***, estis kreitaj en spirito de ofero kaj kunlaboro iu konstitucia kadro kaj regionaj aŭtonomiaj strukturoj. Malgraŭ la enormaj obstakloj de ultranaciismaj puĉoj kaj terorismo, la balotado de la 28-a de oktobro de 1982 estis triumfo de la popola volo. La politika transiro estis plenumita. La politika klaso povus nun komenci alfronti longdaŭrajn sociajn kaj ekonomiajn pro-blemojn, same kiel dividojn ligitajn al la heredaĵo de la Enlanda Milito, kaj la konstanta plago de la korupto.



# Legante pri la korupto en Hispanio


Per ĉi revua numero ni pritemas la korupton en Hispanio ĝis difinita dato, konkrete, ĝis decembro de 1982, komenco de la unua registaro de ***Felipe González***. Kompreneble, de tiam, kaj ĝis nun, jes ja, estis multe pli da korupt(ad)o en nia lando, kaj ni konfesas ke nia unua intenco, antaŭ proksimume unu jaro, estis pritrakti ĉiujn korupto-skandalojn ĝis la nuntempo, sed laŭlonge de la ellaborado de nia raporto evidentiĝis ke la afero estas multe pli komplika ol supozite. La amplekso kaj graveco de la prikoruptaj kazoj pretersuperis nian kapablon pristudi ĉiujn en unujara tempodaŭro kaj prezenti la tutan materialon en unusola revuo-numero. Do, tio okazinta de antaŭ 40 jaroj devos atendi kroman jaron. Ni estas certaj ke, dum tiu plua jaro la skandaloj pri koruptado senĉese kreskos same kiel kreskis ekde la momento kiam ni entreprenis la ellaboradon de ĉi tiu 98-a numero de la revuo.


Do, ni vidu la fontojn de la materialo kiun ni kompilis pri la korupto en Hispanio ekde fine de la 15-a jarcento, dum la reĝado de Johano la 2-a de Kastilio, ĝis la fino de la Transira procezo al Demokratio, fine de la jaro 1982. Kompreneble, por ilustri tiom longan periodon estis necese sin turni al tre diversaj dokumentaro-fontoj, kaj inter ili ne estas la malplej grava Interreto, konkrete Vikipedio, sed estis ankaŭ aliaj pri kiu ni volas ion diri.

Kompreneblas ankaŭ tio ke la dokumentaro des pli estas abunda ju pli temas pri ĵusaj okazintaĵoj. Se temi pri la eventoj de pasintaj jarcentoj estas necese sin turni al la historiaj verkoj pli malpli klasikaj. Ekzemple, por ekscii pri ***Alvaro de Luna***, kiu estas la unua koruptulo kiun ni pritemis, oni devas konsulti tion kion verkis pri li sufiĉe antikvaj historiistoj, kiaj ***Fernán Pérez de Guzmán***, ***Juan de Mariana***, kaj pli ĵuse, ***Gregorio Marañón***. Sed, ĉar tiutipaj fontoj ne estas facile troveblaj, por scii tion kion ili verkis pri tiu aŭ tiu personulo, plue estas nepre necesa la interreta servo de Vikipedio k. s.

Nu, por la 15-a al la 17-a jarcentoj, aŭ eĉ la 18-a, oni nepre devas aliri al la publikigita ĝenerala materialo pri la Historio de Hispanio, t. e. ne ekzistas specifikaj verkoj pri koruptado de tiuj epokoj, tiuj historioj estas ĝeneralaj de la lando kaj ofte okazas ke faroj kiuj estas vere koruptaj, estas pritaksataj de la historio-verkistoj kiel gloraj heroaĵoj de la mis-farintoj. Tio validas, ekzemple por la historia pritakso de personuloj kiaj Izabela la Katolika, Gonzalo de Kordovo, Kristoforo Kolombo kaj la konkerintoj kiaj ***Hernán Cortés***, ***Francisco Pizarro***… Sed… oni devas fari escepton pri tio, la verko de la pastro ***Bartolomé de las Casas***, kiu










pritemas la konkeradon de amerika teritorio far tiuj “gloraj herooj”, estas tre kritika kaj objektiva, kaj li asignis la nomon de **krimoj** al la krimoj de tiuj uloj. Sed la fakto mem ke tiu historiisto estis oficale kondamnita kaj rifuzita en nia lando ĝis relative ĵusa tempo montras kiomgrade nia lando, je ĉiuj sociaj niveloj, alprenis kiel normalajn kaj indajn farojn, la krimojn kaj dispredadon de la potenculoj sur la malfortuloj.


Bedaŭrinde ĉi tio validas eĉ por la historiaj verkoj de la nuntempo kiuj pritraktas tiujn “glorajn” jarcentojn. Ni memoru la apoteozan celebradon de la 5-jarcenta datreveno de la Malkovro de Ameriko, kaj la fakton ke tiuj personuloj havas statuojn kaj monumentojn multloke en Hispanio, dum oni rifuzas omaĝi indajn personojn kiuj distingiĝis pro alitipaj faroj, favore al la homaro, la justeco…


Tamen, se per nia raporto ni povis priskribi la okazintaĵojn de tiuj jarcentoj estas pro tio ke ni devis kaj povis eltiri informon el tia verkaro. Informon pri la okazintaĵoj, pri la faroj, sed la moralan aŭ etikan pritakson ni devis fari laŭ nuntempaj kriterioj, surbaze de valoroj kiuj signifis nenion por la homoj de tiuj jarcentoj, antaŭ la 19-a, kaj por la historiistoj kiuj pritemis ilin.

Jes, foje la koruptuloj estis punitaj: ***Antonio Pérez***, la Duko de Lermo, ***Valenzuela***… sed la kriterio de ilia kondamno, far la samtempuloj kaj ankaŭ far la postaj historiistoj, estis la perdo de la reĝa favoro, t. e. oni mezuris aŭ taksis ilian kulpecon laŭ la malplaĉo kiun ili inspiris al la suverenoj… aŭ la Eklezio. Surbaze de tiaj kriterioj estas senutile serĉi en la historia literaturo akuzon al Izabela la Katolika por ŝia uzurpado de la Kastilia krono, aŭ al katolikaj gereĝoj pro la forpelo de la judoj el Hispanio, aŭ al Kristoforo Kolombo pro la masakrado de indianoj, tial ke poste la reĝo Ferdinando indulgis lin.













Hodiaŭ oni prijuĝas laŭ kriterioj kiuj volas esti aŭ ŝajni moralaj, etikaj… Sed, ĉu tio estas tiele? En nia burĝa, Okcidenta socio, la reĝoj, kie ili ankoraŭ ekzistas, jam ne havas la povon indulgi koruptulojn, sed daŭre estas suvereno(j) kiu(j) povas indulgi aŭ kondamni la korupton. La suverena rolo nuntempe apartenas al la popolo. La popoloj, la kolektivoj, naciismaj aŭ sociklasaj, indulgas aŭ kondamnas la koruptitojn laŭ siaj interesoj kaj inklinoj. Tiorilate ni vidu kiel la katalunistoj pardonis ***Jordi-Pujol***-on pri ĉi ties respondecon je la afero de la Kataluna Banko, aŭ kiel la partianoj de la Socialista kaj la Populara Partioj kondamnas la koruptulojn de la kontraŭa partio dum indulgas la proprajn.




Sed ni ne eniru ankoraŭ en korupt-aferojn kiuj devos estis tratataj per sekvonta numero de la revuo. Ni revenu al la etapo pritraktita per la unua ĉapitro de nia raporto, t. e. «Antaŭ la 19-a jarcento», kaj konstatu ke ekde difinita momento komencis ŝanĝiĝi la posedanto de la suvereneco. Ĝenerale, oni konsideras la Francan Revolucion de 1789-1799 kiel la signon de tiu ŝanĝo, sed tiu Revolucio havis siajn antaŭaĵojn, kaj en Hispanio oni povas konsideri antaŭsignon de la ŝanĝo de suvereneco la fakto ke en la t. n. Militon pri Sukcedado (1701-1713) du reĝoj devis konkuri por la hispana trono, kaj ili bezonis apogon de la hispanaj popolaj kolektivoj, la regionoj, ne nur la nobelaro kiel en la kazoj de antaŭaj interreĝaj konkuroj. Tiele ni vidis ke en la hispana Milito pri Sukcedado, la burbona pretendanto devis alpreni centralismajn poziciojn kiuj garantius al li la apogon de la kastilianoj ĝenerale kaj ĉefe de la madridanoj, dum la habsburga pretendanto devis sin apogi sur periferiaj, foruaj regionoj. Resume, la popoloj komencis aŭdigi sian voĉon en la historio, kaj en la prihistoriaj libroj respeguliĝis tio.














Kaj temante pri historiaj libroj oni devas enkalkuli inter ili la t. n. novelojn kun historia fono. Verdire, por la diskonigo de la historiaj eventoj kaj personoj inter la publiko pli efikas tiutipa literaturo ol la akademiaj historiaj tekstoj ĉar ĉi lastaj povas rezulti tedaj por la granda publiko dum la prihistoriaj romanoj, eĉ se kun inventitaj protagonistoj, povas amuze enkonduki la legantojn en la epokon kaj etoson de la priskribitaj eventoj.

Nu, aldonendas, tamen, ke la verkistoj de prihistoriaj romanoj, same kiel la aŭtoroj de klasikaj historiaj libroj kaj la kronikistoj de la historiaj okazintaĵoj, subjektive partoprenas en la militojn, batalojn kaj konfliktojn kiujn ili pritemas. En nia lando, tipaj ekzemploj de tiutipaj verkistoj estas ***Arturo Pérez Reverte*** kaj ***José Calvo Poyato***, sed ili ne estas la solaj kiuj prikantas aŭ prigloras la prodaĵoj de sia lando ĉu ĉi tiuj estas decaj aŭ ne, kaj, kompreneble, same okazas en ĉiu aliaj ceteraj landoj.

Revenante al la menciita Milito pri Sukcedado en nia lando, interesa kaj amuza roman-kolekto pri ĝi estas tiu verkita de ***Alfonso Danvila*** (1879-1945). La kolekto titoliĝas: «La frat-murdaj luktoj en Hispanio», kaj konsistas el 14 volumoj, kies titoloj estas: - La Testamento de Karolo la 2-a; - La Savojanino ; - Habsburgoj kaj Burbonoj; - La Unua Karolo la 3-a; - Almansa; - La Princino de la Ursinoj; - La arkiduko en Madrido (2 Volumoj); - La Kongreso de Utrecht (2 volumoj); - La Triumfo de la Lilioj (2 volumoj); kaj - Estas ankoraŭ Pireneoj (2 volumoj).



Kvankam ĉi tiu kolekto ne celas okupiĝi pri la afero de la korupto, sed pri la historio de tiu periodo, tamen ĝi trafe respegulas la korupton kiu enestis en la politikaj kondutoj de la realaj protagonistoj de tiu historio.

Alia interesa roman-kolekto pri historia periodo, ĉi-kaze pli ampleksa ol la ĵus menciita, estas tiu verkita de ***Benito Pérez Galdós***: Naciaj Epizodoj. Ĝi konsistas el ne malpli ol 46 volumoj, kiuj pritraktas 75 jarojn de la historio de Hispanio, ekde 1805 al 1880. Kaj ankaŭ ĉi-kaze, kvankam la priskribo de la korupto en nia lando ne estis la celo de la verko, la koruptado senĉese aperas ĉar ĝi estis senĉesa komponaĵo de tiu historio, kiel evidentiĝis pri nia ĉi-revua raportado.

Inter la eventoj traktitaj de la verko de ***Galdós*** estis la epoko kaj regado de ***Godoy***. Pri ĉi tiu etapo ni jam menciis en la dua ĉapitro de nia raporto kiel fonto de informo la korespondon de Luciano Bonaparto kun ties imperiestra frato. Pri ***Godoy*** verkis unu biografion ***Emilio La Parra***, kiu verkis ankaŭ pri Fernando la 7-a, la Kortesoj de Kadizo, k. a. Ĉi tiuj ne estas noveloj sed formala historia raportado, kiu, kompreneble, ne povas ignori la korupton, konstante ĉeestanta.

Same prihistoria, sed sen speciala atento al iu specifa afero kia la korupto estas libroj pri aliaj etapoj de la pritraktita periodo pri kiu ni raportis. Ne indas priskribi ĉiujn; ni prezentas ĉi tie la kovrilpaĝojn de iuj el tiuj multenombraj verkoj. Sed ni devas fari iun atentigon, tiu libro titolita: «Mia batalo por unu nova Hispanio - Memoraĵoj de la Markizo de Salamanko», reale, ne estis verkita de li sed de iu pranepino lia, sed tamen la teksto estas same mem-apologia kvazaŭ estus verkinta ĝin li mem.


Ju pli la tempo pasadis, des pli kaj pli la popolo -ties etnoj kaj sociaj klasoj- iĝis protagonisto de la historio kaj demarŝanto de siaj interesoj. La priskribo kiun oni faras en nia raporto pri la 19-a jarcento -karlistaj militoj, liberalaj revolucioj…-




montras situacion tre malsimilan ol tiu de la epoko de ***Alvaro de Luna***, kiam la konfliktoj estis kontraŭdiroj de la interesoj de la feŭda nobelaro, kaj la popolo ludadis nenian rolon. La historiaj verkoj respegulas tiun socian ŝanĝon kiel ne povas esti alimaniere.
Sed, eĉ se ŝanĝiĝis la socian naturon de la historiaj rolantoj, tamen la korupto daŭre estis/as ligita al la ekzercado de la politika povo. Povas ŝajni ke nia raporto tre detale priskribas la politikajn eventojn kaj konfliktojn. Tioma atento al la politiko kaj ties evoluo respondas al la konvinko ke la fenomeno de la korupt(ad)o estis nekonceptebla sen la ekzisto de la politika potenco. Ĉi tio ne estas anarkiism-favora argumento; ni konscias ke la homo nepre devas vivi en asocio kun aliaj homoj, kaj ĉiu homa (a)socio nepre postulas ian formon de politika potenco. Sed la formoj de politika potenco kiuj konkretiĝas povas ne esti justaj kaj honestaj, kaj tio generas konfliktojn, militojn… inter konkurantaj socioj sed ankaŭ inter kolektivoj diversaj ene de la sama socio. Nur konante tiun realaĵon oni povas entrepreni eblajn solvojn.
Nu, kiel oni povas vidi per la bildoj de la libraj kovrilpaĝoj kiuj aperas en ĉi paĝo, la publikigita prihistoria materialo respegulas la sociajn kontraŭdirojn kiujn oni estis konkretante en la hispana socio dum la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento. Kiel sciate, la pliakriĝo de tiuj kontraŭdiroj kulminis per Civitana Milito kies sekvoj, iamaniere kaj iomgrade, influas ankoraŭ sur la hispana socio.
Ĝuste la misio aŭ celo de la historia scienco estas kontribui serĉi solvojn por la socia problemaro. Tiuj historiistoj kiuj konscias pri tio ke la korupto estas iu el la faktoroj kiuj fuŝas la socion kaj kontribuas detrui la harmonion kiu devas regi en homa (a)socio, dediĉis specifan historian esploron al la fenomeno de la korupto. Ĝis nun ni menciis historiajn verkojn en kiuj la korupto estas nur unu el la komponaĵoj de la prirakontata materialo, sed decas klarigi ke iuj specialistoj priatentis la fenomenon de la korupto mem aŭ konkreta(j)n kazo(j)n de koruptado, aŭ biografioj de konkretaj koruptuloj. Ni menciu iujn el ili.




***Alfredo Alvar Ezquerra***, inter kelkaj aliaj prihistoriaj libroj kiujn li verkis, li dediĉis unu al la Duko de Lermo, kiu, kiel ni priskribis per nia raporto, estis ege korupta ĉefministro de la kortego de Filipo la 3-a. Per tiu verko, ***Alvar*** ne nur studas ĝisfunde la personan kaj politikan agadon de la Duko de Lermo sed ankaŭ faras sociologian esploron de la mondo de Lermo, kiu generis tiutipajn ulojn kaj eltenis ties fian agadon.





***Andreas Faber-Kaiser***. Li estis fama nifologo kiu mortis en 1994 estante nur 49-jaraĝa. Lia verkaro, ĉefe pri esoteraj aferoj, estis tre polemika, diskutita. Same polemika estis lia verko: «Pakto de Silento» kiu temas pri la malsano provokita de la kolzo-oleo, en 1981 kiu provokis pli ol cento da mortintojn kaj multajn milojn da damaĝitoj. Laŭ la teorio de ***Faber-Kaiser***, kiun li prezentis per tiu libro, la damaĝo estis provokita ne de la kolzo-oleo sed de la konsumado de tomatoj traktitaj per organikaj kemiaĵoj de la multnacia ***Bayer***, en kemia milita provo farita verŝajne de la usona registaro. Per lia lasta artikolo, publikigita en oktobro 1993, sub la titolo “Konfesoj de ***Andreas Faber-Kaiser*** inter vivo kaj morto”, li konfesis ke li estas portanto de aidoso, sen povi klarigi kiel li povus esti infektita, kaj rilatigante ĝin al lia esploro pri la venena sindromo, ĉar kaj li kaj aliaj esploristoj kaj kuracistoj, kiuj provis vere esplori la originon de tiu stranga malsano, mortis aŭ suferis subitajn kaj strangajn malsanojn.





***Alfredo Grimaldos***. Ĵurnalisto tre kritika kun la sistemo, per lia verko «La CIA en Hispanio» li priskribas la agadon de la usona spion-servo en Hispanio. En ĉapitro 12 de tiu libro, ***Grimaldos*** deklaris ke kolzo-malsano ne ekzistis kaj ke la vera kialo de la veneniĝo estis bakteriologia fuĝo en la usona bazo en ***Torrejón***. Teorio kiu koincidas kun tiu de ***Andreas Faber-Kaiser***. Li forpasis en decembro 2020 post suferi gravan malsanon.





***Ibiza Melián***. Doktorino pri Sociaj kaj Juraj Sciencoj. Ŝi verkis kelkajn prisociologiajn librojn. Tiu titolita «La korupto en Hispanio kaj ties kaŭzoj», celas rilatigi la altan gradon de politika korupto en Hispanio kaj la institucian sistemon adoptitan, krom tio, ke aliaj specoj de historia-religiaj faktoroj eble influis. La demando estas: «Kiel oni devas regi?». Esplorado, kiu estas decida en ĉi tiu tempo. En lando kiu komencas polariĝi denove, laŭ la eterna fraticida lukto inter la du Hispanioj, kaj la solvoj devas veni el la akademia mondo, por poste disvastigi kaj kaŭzi ŝanĝon.





Nun ne eblas al ni pritaksi la ĝustecon de la sociologiaj konkludoj de ***Alfredo Alvar Ezquerra*** kaj ***Ibiza Melián***, nek la pravecon de la teorioj de ***Andreas Faber-Kaiser*** kaj ***Alfredo Grimaldos*** pri la afero de la kolzo-oleo kaj aliaj usonaj konspiroj en Hispanio. Sed ni pensas ke tiuj kvar aŭtoroj laste menciitaj meritas apartan atenton kaj ni rekomendas la legadon de ties verkoj al tiuj kiuj interesiĝas pri la fenomeno de la korupto kaj aliaj kiuj misefikas kontraŭ la socia harmonio.
Same interesa kaj rekomendinda ŝajnas al ni la verkaro de ***Paul Preston***, brita historiisto aŭtoro de diversaj verkoj pri la nuntempa historio de Hispanio. Li estis unu el la ĉefaj fremdaj hispanistoj dediĉitaj al la studo de lastatempa hispana historio, ĉefe tiu de la Dua Respubliko kaj la Civilmilito. Lia verkaro pri hispanaj politikaj aferoj, ĉefe la milito, estas ampleksa. Por la afero de la korupto en Hispanio, kiu estas la temo pri kiu ni recenzas nun, rezultas tre interesa lia libro titolita: «Unu perfidita popolo»; ĝia enhavo alportis abundan informon por nia raporto. Lia pritrakto de tiu temo ekis de la jaro 1874, kiam la Burbona dinastio estis restarigita en Hispanio far la puĉo de Generalo Pavia.
Tralegante tiun verkon kaj aliajn kiuj pritemas saman aferon, oni konstatas ke la ĉefa motivo aŭ stimulo de la agado de la politikistoj estis la persona intereso, ne la servo al la socio; el tia egoisma instinkto naskiĝas la korupto, samkiel la politika kaj ekonomia subpremado, la perforto… Ĉu alpreni tiun scion povas utili por koncepti solvon al la problemo?. Ŝajnas ke la homa historio estas la senĉesa





kontraŭfrontiĝo de tiuj kiuj serĉas kaj volas apliki solvojn kaj tiuj aliaj kiuj volas profiti ĉiun ajnan avantaĝon por subpremi aliajn homojn.
Kompreneble, por solvi la socian problemaron oni devas koni la problemojn, kaj por tio povas helpi la verkoj kies studon ni prezentas kaj rekomendas, sed, se ni konkludas ke la radiko de la sociaj konfliktoj kaj kontraŭdiroj estas la homa egoismo kiu estas esenca komponaĵo de nia naturo, kiel solvi, do, problemon intime ligitan al la naturo mem de la homo? Evidentas ke por aliri al la solvo ne sufiĉas studi historion, sociologion, ekonomion… estas necesa ankaŭ la psikologio. Tion komprenis la antikva greka filozofo kiu diktis jenan sentencon: **γνωθι σεαυτόν** **Konu cin mem!**
























# Ĉu kapitalismo kaj paco?

***Ĉu povas esti paco kun kapitalisma sistemo reganta la mondon? Ĉu kapitalismo kaj paco kongruas? Oni parolas pri pacaj intertraktadoj por la milito en Ukrainio, kaj verŝajne –kaj espereble– ili atingos interkonsenton, kaj pli-malpli stabila paco estos subskribita.***

Sed, ĉu tio signifos, ke ni estas en mondo en paco? Kaj kion pri la nombro da militoj, etaj, mortigaj kaj kruelaj militoj, kiuj estis faritaj en la mondo antaŭ la komenciĝo de la rusa atako kontraŭ Ukrainio kaj kiuj daŭros eĉ se paco estos subskribita en tiu konflikto?

## La kialoj de la militoj

Laŭ Vikipedio, nuntempe ekzistas pli ol sesdek aktivaj militoj kaj konfliktoj, kun miloj da mortoj en ili. Kelkaj estas pro rasaj aŭ religiaj kialoj, sed granda parto estas pro ekonomiaj kialoj, kaj la interesoj de okcidentaj landoj kaj grandaj multnaciaj estas implikitaj.

Tiuj militoj vekas tre malmulte da intereso en la okcidentaj amaskomunikiloj, kaj ĉiuj homoj, kiuj estas fuĝantaj de ili, provas atingi Eŭropon, trovas fermitajn limojn, kie neniel oni prikonsideras ke ankaŭ ili estas rifuĝintoj, same kiel la ukrainoj kiuj eskapas el la bomboj de ***Putin***.

## Neebla tasko

Ĉu ĉiuj ĉi tiuj dramaj situacioj estas io hazarda, kiu povus esti evitita estonte? Ĉu eviti ĝin se daŭre la kapitalisma sistemo markos la liniojn per kiuj la mondo moviĝas? En la kapitalismo estas fundamentaj principoj la serĉado de la plej granda ekonomia profito kaj la konkurenco por atingi ĝin. Neebla tasko la paco en ĉi tiu sistemo.

Kapitalismo instigas al nesatigebla ambicio (vidu la miliardulojn kun riĉaĵoj de miliardoj kaj kiuj daŭre aspiras posedi pli kaj pli), dum la varoj de la Tero estas

limigitaj. La distribuo ne estas farita pro justeco kaj egaleco, sed estas rezulto de senkompata konkurenco. Konkurado, kiu lasas milionojn da viktimoj disbatitaj, kaj tio kondukas al ĉiam pli severaj konfrontiĝoj, kiuj povas finiĝi en militoj. Malbona scenejo por paco.

### Nur solidareco restos

Fronte al ĉi tiu situacio, ĉu la homa raso ne povos starigi pli bonan kunvivan sistemon ol neracia kaj barbara kapitalismo? La solidarecaj movadoj vekitaj de ĉi tiu milito; la deziroj pri paco, kiuj etendiĝas al ĉiuj popoloj de la mondo, ĉu ili ne povus servi kiel bazo por moviĝi al mondo, kiu ne estas kondamnita al la kapitalisma milito?

# La Rezerva Armeo

***Mi pensas, ke ni ne povas limigi nin prilamenti la bonajn rezultojn de Marine Le Pen en la francaj balotadoj. Necesas, ke ni pripensu la kialojn de la ekspansio de la ekstrema dekstro tra Eŭropo, kaj pripensu kiel alfronti ĝin.***

Estas vere, ke la ambicio blindigas kaj frenezigas, sed la grandaj kapitalistoj, kiom ajn blindigitaj ili estas pro sia ambicio, ne povas esti tiel malsaĝaj, ke ili ne rimarkas la krizojn, kiuj minacas nin: la socia krizo kaj la ekologia krizo.

### La minacoj de la du krizoj

La minaco de la ekologia krizo estas abunde dokumentita de ĉiuj sciencaj raportoj kiuj, jaron post jaro, estis avertante nin pri la neeblo daŭrigi kun la nuna produktisma-konsumisma sistemo al kiu la kapitalismo puŝas nin.

La socia krizo jam eksplodis: militoj kaj mortigaj konfrontiĝoj multiĝas en la tuta mondo, dum milionoj da homoj malsatas.

Estas vere, ke ĉi tiu krizo ankoraŭ ne plene atingis nin, ni ankoraŭ povas ĝoji en la vivo per “libereco” kaj bieroj. Tamen ni pli kaj pli aŭdas, ke ni vivas pli bone ol niaj gepatroj, sed niaj infanoj vivos pli malbone ol ni, por ne paroli pri niaj genepoj. Ni komencas konsciiĝi pri la kritika situacio al kiu ni direktiĝas, sed ne sufiĉas por ke ni ekagu.

### La aŭtoritateca solvo

Ĝis nun, mensogo, manipulado, la bildo de demokratio kaj certa materiala bonfarto sufiĉis por ke la kapitalismo igis nin akcepti vivi en sistemo, en kiu la ekonomia potenco estas vere super ĉiuj potencoj de la socio, inkluzive de la politika potenco. Sed la krizoj povas fariĝi tiel akraj ke la normalaj armiloj de mensogo kaj manipulado fariĝas nesufiĉaj por teni kapitalismon surpiede. Do por ili la solvo estus sin turni al aŭtoritata registaro, kiu, kun la senkulpigo de

la interesoj de la nacio, subtenas la interesojn de la kapitalismo, eĉ se tio supozas mortbaton por la homaj rajtoj kaj liberecoj.

## La gardistoj de la sistemo

La ekstrema dekstro perfekte plenumus tiun rolon kiel la savanto de la kapitalismo. Ĝia falsa popolismo atingas, kiel ni vidas, penetri larĝajn tavolojn de la loĝantaro. Ĝi proklamas sin defendanto de la interesoj de la popolo, kontraŭ la malbonoj, kiuj minacas ĝin. Sed la kulpanto de tiuj malbonoj neniam estas la kapitalisma sistemo. Por ili, la kulpo pri malriĉeco en niaj landoj ne estas de la tre riĉaj, sed de la plej malriĉaj el la malriĉuloj, la elmigrintoj, kiuj "invadas nin".

En la landoj, kie regas la ekstrema dekstro, la homaj rajtoj estas sub danĝero, sed neniam la rajtoj de la kapitalo. Ekzemplo de tio estas la Hungario de ***Víctor Orban***, kies registaro estis sankciita de la Eŭropa Parlamento en 2018 pro sia malrespekto de homaj rajtoj. En Hungario, la esprimlibereco estas limigita, la kritikaj amaskomunikiloj estas silentigitaj, la juĝistoj, kiuj ne obeas registarajn ordonojn, estas eksigitaj, la sendependaj Ne Registaraj Organizaĵoj estas subpremitaj, dum korupto estas senbrida, kaj la kapitalo moviĝas sen ajna malhelpo.

Aŭtoritata registaro severe limigas la demokration, sed la kapitalisma sistemo ne tuŝas ĝin. Tiel, se profundiĝantaj krizoj endanĝerigas la konservadon de tiu ĉi sistemo, la ekstrema dekstro konsistigas la rezervan armeon de la kapitalismo.

# Mono en poŝo

***La impostredukto estas alia el la trompigaj proponoj de la dekstraro.***

La imposto-redukto estas alia el la kaptilaj proponoj de la dekstraro. Kiam iu dekstrulo parolas pri malaltigo de impostoj, li pravigas tion prezentante, kiel mirinde estus, ke ni, la civitanoj havus pli da mono en niaj poŝoj. Sed la veraj kialoj estas aliaj. Por ne esti trompataj, necesas analizi, eĉ se tre mallonge, kion vere signifas imposto-redukto.

En kapitalisma ekonomio, la malegalecoj tendencas pliiĝi. Kaj ili fariĝas vere skandalaj. Administrantoj de bankoj kaj grandaj kompanioj gajnas milojn da eŭroj jare, dum hodiaŭ multaj homoj eĉ ne fariĝas mileŭristoj. Malsupre estas tiuj, kiuj devas iri al ***Cáritas*** aŭ supkuirejoj, kaj suprestaras la ***Florentino-Pérez***-oj, ***Amancio-Ortega***-oj kaj similuloj.

Por provi mildigi tiajn brutalajn diferencojn, aŭ eviti socian eksplodon, la registaroj serĉantaj certan egalecon enkondukis sistemon de progresemaj impostoj: ne temas nur pri pagi proporcie al tio, kio estas gajnata, sed ke la plej altaj enspezoj devas pagi pli altan procenton. Tial malaltigi ĉi tiujn progresemajn impostojn signifas malpliigi la kapablon de la Ŝtato mildigi tiujn

enormajn ekonomiajn malegalecojn. Alivorte, pli malaltaj impostoj tendencas konservi aŭ pliigi la malegalecon.

La dekstro fervore kaŝas ĉi tiun realon kaj antaŭmetas, ke la civitanoj havos pli da mono en siaj poŝoj. Estas la bombono, kiun ili proponas por ke oni voĉdonu favore al ili, sed kion enhavas ĉi tiu bombono? Por laboristo, kiu gajnas 14.000 eŭrojn jare, la imposto-redukto signifus tre malmultajn eŭrojn, dum por persono kiu gajnas 200.000 ĝi signifus tre konsiderindan sumon.

Aliflanke, la Publika Trezorejo havos malpli da rimedoj. En kio oni rimarkos tion? Kompreneble, la politikistoj ne malaltigos siajn salajrojn, nek, mi pensas, ke ili multe malpliigos la militajn elspezojn. La redukto estus rimarkinda ĉefe en la sociaj servoj, la sano kaj la edukado. Ni havus senfinajn atendolistojn en hospitaloj, pli da pacientoj por kuracisto en unua kuracado kaj, do, malpli da prizorga tempo por paciento, urboj sen kuracisto... Pli trologataj edukaj centroj, kie koncentriĝas la granda plimulto de lernantoj kun ajna tipo de malfacilaĵo, kun malpli da helpaj instruistoj kaj malpli da rimedoj, atento al dependeco ĉe la rando de paralizo...

Tion kostus al ni porti kvar pliajn eŭrojn en nia poŝo. Tiuj, kiuj profitus el ĉio ĉi, estas la sanaj kaj privataj edukaj centroj. La malboniĝo de publikaj centroj igus kelkajn, eble multajn, elspezi tiun monon el siaj poŝoj -kaj multe pli- en tiuj privataj centroj.

# Ĉu *Homo sapiens*?

Laŭ oni diras, la homa specio estis evoluanta ĝis alveni al ***Homo Sapiens***, La Saĝulo!! Sed rigardante la mondon kreitan de ĉi tiu specio, ni trovas multajn kialojn por meti la titolon pri ***sapiens*** en demando. Mi ne traktos ĉiujn sensencaĵojn, kiujn la homa specio nuntempe faras, de detruado de la medio, kiu subtenas nin, ĝis kreskigado de klimato de universala konfrontiĝo, kiun ili nomas konkurenco kaj laŭdire estas tre bona por la ekonomia disvolviĝo. Sen mencii la brutalan malegalecon, kiu kondamnas bonan parton de la homaro al mizero.

Ne estas dubo, ke tiu ĉi kurso farita de la homaro hodiaŭ estas klare movita de la kapitalisma sistemo, kiu estas prezentita kiel ekonomia sistemo, sed kiu estas konstruita sur specifa filozofio kaj antropologio, sur koncepto de la homo kaj la mondo. La granda sukceso de tiu ĉi sistemo estas, ke ĝi enkondukis en la socion pensmanieron kaj kulturon, kiuj sukcesas igi nevideblan por granda parto de la homoj la enorman neraciecon, kiun la kapitalismo enhavas. Kaj sekve, en la socio amasiĝas serio da frenezaj kaj absurdaj aspektoj, kiuj ŝajnus al ni neimageblaj en la ordinara vivo de pli-malpli normala homo.

Ekzemple, ĉu ni povas imagi grandan familion, kun limigitaj financaj rimedoj, kie la patro senĉese instigas la edzinon kaj infanojn aĉeti kaj aĉeti senlime? Kaj

por ke ili ne laciĝu je aĉetado, la patro ne lasas la infanojn ĝui trankvile tion, kion ili havas, sed daŭre kreas al ili novajn dezirojn, prezentas al ili tentajn proponojn, stimulas novajn dezirojn, atentigas ilin pri ĉio. nova kiu aperas sur la merkato, kaj proponante ĝin en la plej alloga maniero. Ni dirus, ke se vi imagas, vi povas imagi ion ajn. Sed tiu familio estas tio, pura imago. Oni ne povas agi tiel absurde.

Ja estas malfacile, ke ekzistas tia freneza familio, sed ekzistas ekonomia sistemo, kiu suferas de ĉi tiu danĝera demenco: la kapitalismo. Ĉirkaŭ duonmiliardo da dolaroj estas elspezitaj tutmonde ĉiujare por nutri homan deziron al konsumo. Kvincent miliardoj da dolaroj estas kio ĉiujare estas investita en reklamado. Ili povas diri, ke reklamado celas informi, aŭ ke ni aĉetas unu markon kaj ne alian. Bone, sed ĉe la fundo de ĉiuj reklamoj troviĝas la sama celo: movi nin aĉeti, elspezi, konsumi pli kaj pli... sur planedo de limigitaj rimedoj, kiuj alproksimiĝas al elĉerpiĝo.

De kiam ĝi ekzistas, la homa raso –kiel ĉiuj bestaj specioj kiuj antaŭis nin– dediĉis la fundamentan parton de sia agado al kontentigo de siaj ĉiuspecaj bezonoj. Iuj estas esencaj por postvivado. Krome, sperti iun bezonon kaŭzas certan senton de maltrankvilo kaj malkomforto, kiu puŝas nin kovri tiun bezonon. Por la homa bonfarto, estas do esence kontentigi la estiĝantajn bezonojn. Nu, ni trovas, ke nuntempe la baza agado por ke la kapitalisma sistemo funkciu estas la industrio de la kreado de bezonoj, kiu supozas la akcelon de malkontento kaj la sekvan malkomforton. Reklamado hodiaŭ estas la centra agado de la sistemo: la arto krei bezonojn. Ĉiu reklamo invitas nin aĉeti markon, sed la tuta reklamado, la miloj da spotoj, kiuj senĉese bombadas nin prezentante la aĉeton de io kiel la pasporton al feliĉo, kreas dependecon de la konsumo, faras ĝin vera drogo. Laŭleĝa kaj estiminda drogo, sed drogo finfine, kun ĉiuj konsekvencoj de detrua drogo.

Alia el la grandaj –kaj falsaj– mitoj de la sistemo estas konkurenco. Por kapitalismo plej bone estu estas tre konkurenco. Sed konkurenco, precipe se ĝi estas komprenata kun tiu absoluta karaktero, kiun faras la kapitalismo, metas nin en diablan spiralon, en konstantan lukton de ĉiuj kontraŭ ĉiuj, en kiu ne estas la plej malgranda paŭzo, kaj tio malhelpas al ni gvidi la ekonomian kreskon kaj la plej bonajn teknologiojn favore al pli agrabla vivo. Konkurado ne permesas al ni malaltigi nian gardon aŭ malaltigi la streĉiĝon. Ĝi puŝas nin al konstanta angoro, kaj la nura afero, kiun la sistemo permesas al ni, estas amuza, la stuporo, kiu igus nin forgesi la severan realaĵon. Kompreneble, amuziĝu konsumante, io ajn. Kaj ke temu pri amuzo ebla, kiel eble plej alieneca, tial ke ne venos en nian kapon ajnan kritikan penson pri la sistemo.


***Antonio Zugasti***


¡ometa amuzado pri la koruptado


JUSTICO
PRESARO
POLITIKO






MI VIDAS NENION
MI AŬDAS NENION
MI DIRAS NENION
1000$


KORUPTADO TIELE MI ĜIN MALKOVRIS
KORUPTADO TIELE MI ĜIN PERSEKUTIS
KORUPTADO TIELE MI ĜIN REALIGIS
Esperantigita ŝerco de
Manel F

# Oni trovis pliajn fotojn pri la eta Nikolao




Bela kampo kaj alloga domo. Al kiu ili apartenas?
En la propriet-registro ne aperas nomo de posedanto ilia.
Oni tuj enregistru ĉion nome de la episkopujo antaŭ ol alpropriigu al si ilin iu oportunisto.
Esperantigita ŝerco de
FERRERES


Mi estas graveda kaj volas abortigi.
Tio estas grava peko… Kiu estas la patro?
Vi!
Nu… Mi pensas ke ĉi-kaze oni povos fari escepton…


Mi akuzas min esti seksuminta kun la pastro de la najbara parokejo.
Kiel pento-faron vi preĝu rozarion. **Kaj memoru ke via parokejo estas ĉi tiu!**



Ĉiuj ni estas egalaj antaŭ la Leĝo, sed iuj el ni estas pli egalaj ol la ceteraj.


Estas iu presara kampanjo kontraŭ Isabel Díaz Ayuso. Unue oni faras al ŝi demandojn kaj poste oni publikigas ŝiajn respondojn.


Mi sonĝis ke la prezidantino Díaz Ayuso ĉesis fari deklaraciojn.


Mi proponas ke la senbrida ambicio kaj la senlima monavido estu klasifikitaj kiel deliktoj.
Sed... ĉu ti stultulo ne konscias ke laŭ tiu kriterio ĉiuj ni devus esti enkarcerigitaj?


Vi rajtas peti de mi unu favoron.
Tiukaze mi volus kopuli kun vi.
Ne. Tio ne eblas. Formulu alian deziron.
Do, ke vi diru al mi la nomon de unu honesta politikisto.
Nu... venu, mi tuj nudiĝos.


Ci senkulpigu min, de antaŭ multe da tempo mi ne faras ĉi tion.
Ĉu ci estas vidvo?
Ne, edzo...


Doktorino, mia edzo volas intense seksumi senĉese, Kion mi donu al li?
Donu al li mian telefon-numeron.


Mia edzo komu-nikas al mi ke li estas kart-ludante kun ci...
Kaj mia edzino diras ke ŝi revenos hejmen malfrue ĉar ŝi estas en la kinejo kun ci...



Hodiaŭ mi faros al ci ion, kion neniu iam faris al ci.
Ĉu vere? Do, purigu la banĉambron kaj lavu la telerojn.


Ekscelenco, laŭ la pritakso kiun Via Moŝto petis pri la resursoj, mi informas ke ni disponas je nafto kaj karbo por 20 jaroj, valutoj por 30 jaroj, kaj tritiko por 50 jaroj.
Tiukaze Hispanio estos bon-provizita dum kelkaj jardekoj.
Pardonu, Ekscelenco. Mi pensis ke Via Moŝto temis pri resursoj "por ni".


Mi ne kulpas pri korupt-aferoj. Okazas nur ke mi ne povas pruvi tion.


Patro, mi kopulas kvin-foje ĉiutage. Ĉu tio estas peko?
Tio estas mensogo, fanfaronulo!


Kio okazis al ci?
Agresis min mia edzo.
Sed, ĉu li ne estis vojaĝe?
Tion mi estis pensinta.


Karla, promesu al mi ke kiam mi estos forpasinta, ci edziniĝos al Rikardo.
Sed, ci abomenas Rikardon…
Ĝuste pro tio. Mi volas turmenti lin.


La ekonomia krizo tre profit-donas al ni!


Ĉu kroman pokalon da vino?
Ne konvenas por miaj kruroj.
Kial? Ĉu ili febliĝus?
Ne, ili malfermiĝus.